

eLIBRO

Artur Lundkvist

La volo de l'cielo

Imago pri Ĝingis Ĥano



INKO

Artur Lundkvist
LA VOLO DE L'ĈIELO
Imago pri Ĝingis Ĥano

El la sveda tradukis Bertil Nilsson
Lingve konsilis Ebbe Vilborg

Titolo de la originalo: Himlens vilja.
Eldonita ĉe Albert Bonniers Förlag, Stokholmo, 1970.

La esperanta traduko aperas
kun afabla permeso de
sinjorino Maria Wine

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-057-0

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

DECEMBRO 2000

Li jam revenis al Karakorum, longe atendata, longe survoje, antaŭita de mesaĝoj pri la venkoj okcidente kaj senelĉerpa fluo de militpredo.

Tiel longe kaj tiel diste for li estis ke la neeldirita demando leviĝis, ĉu li iam revenos, ĉu la militiro ne kondukos lin ĉiam pli distance for, ĝis li fine atingos trans la limojn de la mondo.

Sed nun li jam revenis, subite li estas meze inter ili kaj lia ĉeesto sin sentigas ĉie, sentiĝas kiel streĉiĝo en pafarko streĉata, sentiĝas kiel premo de forta vento, sed ankaŭ kiel freŝo de monta rivereto en la degela sezono.

Kaj multaj metas al si la neeldiritajn demandojn: ĉu li aĝiĝis, ĉu li lacas, ĉu li fariĝis pli milda, ĉu li jam satas je militoj kaj konkeroj, ĉu li nun restos en Karakorum dum iom longa tempo de paco?

Aŭ ĉu li estas neŝanĝita kaj neŝanĝebla, sen aĝo, neniam kontenta per tio kion li atingis, ĉu li post mallonge rekomencos la militon kaj ekiros por novaj konkeroj, novdirekte?

Neniu mencias lian nomon, eĉ li mem ne uzas sian nomon, estas malpermesite ĝin skribi krom per oro, li estas la Ĥano kaj tio sufiĉas, neniu lin miksas kun aliaj ĥanoj.

Ne konvenas al li lasi sin distingi per altaj nomoj kaj frajaj titoloj, li ne bezonas nomi sin tio kio li estas: Regento su-

per ĉiuj mongoloj, anstataŭanto sur la tero de la Eterna Blua Ĉielo, mastro de la Mondo.

Kiu tempo regas en la mondo? La eruditaj de la Ĥano venintaj el ĉiuj direktoj povus lin informi pri tio, atentigante ke la tempo estas kalkulata malsame en malsamaj direktoj kaj tamen ĝi estas unu sama tempo.

Okcidente en la kristana mondo regas la jaro de la Sinjoro 1225, sed en Islamo oni nombris nur ĝis la jaro 603, oriente en Ĉinio kuras la 265a jaro de la Sung-dinastio, jam 1500 jaroj pasis de la ekkonstruo de la Granda Muro, kaj sude en Hindujo la nova sultaneco dudekjara dum la apogeo de la Gupto-regno estas pasinta per preskaŭ 700 jaroj kaj pli ol 2500 jaroj pasis ekde la arja konkero de la lando.

Tiuj informoj tamen sciigus al la Ĥano nenion krom tio ke la mondo estas granda kaj plena de konceptoj kiuj povas validi sialoke sed estas nur miskonceptoj sub la Eterna Blua Ĉielo, kaj tion li komprenis jam longe.

Temponombrado estas tio kio malplej ŝarĝas la pensojn de la Ĥano, sufiĉas por li ke li troviĝas en sia propra tempo, la tempo de la Ĥano, kiam la plej grandaj eventoj okazas kaj sin plenumas la volo de la Ĉielo.

Iujn fojojn li eble imagas al si la tempon kvazaŭ etendiĝadon en spaco, similan al nesupervidebla ebenaĵo, kie li mem sin trovas meze, en la nuno, en tiu tago kiu ĝuste nun regas, dum cetere la tempo sin etendas sen difinita limo malantaŭen al la pasinteco de lia familio kaj antaŭen al la estonteco de liaj posteuloj.

Se li plu primeditus la tempon kiel pason li certe ĝin imagus kiel kuron super senlimaj vastoj, nerompitan rajdon sur-

ĉevalo dum kiu la mondo aperas kaj estiĝas, samtempe fortiriĝante kaj malaperante retren.

Li, la Ĥano, kiel neniu alia el sia familio spertis kiel la mondo vastiĝis: dum vastiĝis liaj konkeroj kaj penetroj ankaŭ la mondo estiĝis por li kaj senhalte kreskis.

Antaŭ ĉio ĝi vastiĝis en orienta kaj okcidenta direktoj, giganta etendiĝo inter sunapero kaj sunsubiro, ĝis ambaŭ ŝajnis povi renkontiĝi kaj sin penetri reciproke: preskaŭ senfina etendiĝo sed tamen ne malsuperebla por homo moviĝanta surĉevalo.

Li staris ĉe la bordo de la orienta maro, akvovasto sen fino kie homo rajdanta devas halti, kaj eble troviĝas nenio transe krom akvo, dezertaj akvovastoj kiuj fandiĝas kaj unuiĝas kun la Ĉielo.

Li penetris okcidenten distance trans dezertojn kaj montarojn, kie la grandaj akvoj denove komenciĝas kaj la mondo proksimiĝas al la fino en tiu direkto, kvankam famoj lin atingis ke aliaj landoj troviĝas ankoraŭ pli malproksime for en la direkto de la meztaga suno aŭ subiranta vespersuno.

Norde kaj sude estas la direktoj de la terura fridego kaj la terura varmego, kiuj mallogas homojn kaj ĉevalojn.

Norde li renkontis la grandajn arbarojn, la profundan neĝon kaj tiujn bestosimilajn homestaĵojn kiuj veturas helpate de hundoj kaj ne konas ĉevalojn, forpuŝan mondon sen io kio povas logi konkeranton.

Sude li atingis ĝis la nesupereblaj montaroj, sed li scias ke tiuj ne formas la finon de la mondo en tiu direkto: li mem ĉirkaŭiris la montojn kaj penetris ĝis la sunbruligitaj ebenaĵoj,

sed ankoraŭ pli distance sude troviĝas nepenetreblaj veproj, senfundaj marĉoj kaj ĉiam pli neeltenebla varmego, ĝis ardas la ŝtonoj kaj bolas la akvoj, kaj la estaĵoj kiuj malgraŭ tio tamen tie vivas, estas laŭdire nigritaj de la suno kaj povas apenaŭ esti konsiderataj homoj.

Ankaŭ norde kaj sude (tion homoj kun raraj scioj diris al li) renkontatas fine la maro, la senfina maro kiu ĉirkaŭas la mondon kaj sin unuigas kun la Ĉielo: norde kiel glacio kiu neniam degelas, sude malaperanta inter leviĝantaj vaporoj.

La Ĥano tamen ne fidas la limojn de la mondo, trans ĉiuj tiuj landoj kiujn la plejsciintoj konas eble troviĝas aliaj, nekona-taj, atendantaj: kiu scias krom sole nur la Ĉielo?

Li ja vidis la mondon kreski kaj vastiĝi ĉiam pli, ĝin vidis proprokule, ĝin spertis antaŭenklinite sur sia rapida ĉevalo, dum tagnoktoj kaj lunpasoj, tra sezono post sezono, kun la rigardo jen kontraŭ la preterfluanta grundo, jen fluganta kiel sago kontraŭ la foran horizonton.

Li malmulte fidas kion li mem ne spertis, kion aliaj diris al li, tion li ĉiam pridubis kaj ofte trovis erara: kial tio ne validus ankaŭ pri la mondo kiun li ankoraŭ ne vidis?

Kun miro li fojfoje pensas pri sia unua mondo, la mondo de infanaĝo kaj juniĝo, komence etendita nur kelkajn tageta-pajn rajdojn en diversaj direktoj, ampleksanta kelkajn paŝtejoj inter la plej proksimaj riveroj, kelkajn valojn inter la montoj kaj la tendaron de la propra tribo kun ĝiaj eluzitaj nigraj jurtoj.

Poste venis la konatiĝo kun aliaj triboj, bataloj kaj predokaptoj, malvenkoj kaj fuĝoj, atakoj kaj venkoj, distance for en

la dezertovastoj, en la montregionoj, inter ĉiam pli foraj kaj fremdaj popoloj, en urboj kun nemoveblaj domoj el ligno aŭ ŝtono.

La mondo nur kreskis kaj vastiĝis, ĝi ŝajnis ne havi finon: oni bezonis nur penetri antaŭen kaj ĝin submeti al si, necesis nur viroj kaj ĉevaloj, kaj volo kiu kunigis la disajn tribojn kaj kondukis ilin al venko: volo kiu plenumas la volon de la Ĉielo kaj kiun tial nenio povas rezisti.

La tasko kreskis kun la mondo, li mem kreskis kun la tasko, nenio lin retenis, la neimageble granda lin ne fortimigis sed lin ekscitis pluen, lin pelis antaŭen.

Nenio restis simila al si, ankaŭ ne li mem, li povis sin re trovi tia kia li iam estis nur per la peno de memoro, simila al estuleto aŭ idolo forkaŝita profunde en li mem.

Kaj samtempe, dum la mondo sin vastigis en la tempo, en la tempo de lia propra vivo samkiel en la tempo de la mondo: lia vivo komencis enhavi pli kaj pli, ĝi sin etendis ĉiam pli malantaŭen, kvazaŭ sin alligis al kaj daŭrigis la vivon de antaŭaj generacioj, kun tiuj ĥanoj kiujn la memoro de la tribo konservis kaj kiuj estis malklare konataj laŭ agoj kaj famoj.

En la pasinteco videtiĝis je malpreciza distanco la legendo de origino pri la lupo de la montoj sude kiu unuiĝis kun la cervino de la arbaroj norde: la Nigramakula Lupo kaj la Blanka Cervino, simboloj de ĉefulinjanoj kiuj unuigis malsamajn tribojn al unu potenco.

Sed la Ĥano grade trovis ke la vivo de la mongoloj estas sentempa kaj senspura kompare kun la vivo de multaj aliaj popoloj, ĝi estis kiel vento super la dezertostepo, kun ĉiuj

spuroj forviŝitaj, kun nur tago aldonita al tago, jaro al jaro, popolo sen historio.

Nenion daŭran ĝi postlasis, neniajn urbojn, neniajn enskribojn aŭ bildojn, ne daŭrantan tombon nek eĉ ŝtonon kun spuro de homa mano: nur la gresojn kiuj kreskis kaj poste forvelkis, la neĝon kiu sin sternis kaj poste fordegelis, cindron post fajroj kaj piedspurojn de ĉevaloj kiujn forbalais la sablo.

Li trovis ke eĉ kiam ĉiuj mongoloj kolektiĝis sub lia regado ĝi tamen ne estas la plej granda popolo en la mondo, ne, ĝi estas unu el la plej malgrandaj kaj plej malriĉaj, ĝi povis leviĝi al povo kaj potenco nur per la volo de la Ĉielo, per tio ke ĝi estis elektita de la Ĉielo.

En ĉiuj direktoj krom norde troviĝis popoloj kiuj estis senombraj simile al sableroj aŭ grestigoj, ili sin enfortikigis per altaj muroj kaj iliaj urboj estis kolosegaj, brilaj de riĉo kaj pompo.

Tiuj estis popoloj kiuj posedis historion, iliaj monumentoj kaj kronikoj sin etendis longe malantaŭen, longe trans homomemoron kaj migrolegendojn, jes, trans la ekzistantaj regnoj kaj popoloj troviĝis atestaĵoj pri eĉ pli malnovaj regnoj kaj gentoj, sinkintaj en la teron, tavolitaj unu sur aliajn.

La tempospaco malantaŭen aperis pli grandega ol la penso povus ampleksi, kaj kial do la tempospaco antaŭen ne povus esti same aŭ eĉ pli ampleksa?

Tamen li aŭdis famojn ke tiuj fremdaj popoloj ofte opiniis la tempon estanta antaŭ sia fino kaj proksima la pereon de la mondo: tia estus la volo ĉe iliaj dioj, kaj iliaj saĝuloj instruis ke la fino povas alveni en kiu ajn tago aŭ horo.

Sed por li, la Ĥano, tiu parolo ne validis, li estis certa ke li

sin trovas en la mezo de la mondo kaj tempo, certa ke lia imperio longe restos, laŭ la volo de la Eterna Blua Ĉielo.

Nun li jam revenis kaj enrajdas Karakorum fronte de sia armeo kaj sia nesupervidebla akompanantaro el sklavoĵoj kaj militkaptitoj, metiistoj kaj instruituloj, transportkaravanoj kaj ĉevalgregoj.

Li rajdas kelkpaŝe antaŭ la aliaj komandantoj, liaj elektitaj ĥanoj kaj orkhonoj, li sidas sur sia blanka batalĉevalo kun suprentiritaj genuoj kaj altaj piedingoĵoj, senmova, iom kun-tiriĝinte, en la soleco de regento, nepenetrebla kiel ĉiam.

Li ne rigardas flanken, ŝajnas nekonscia ke li enrajdas sian propran ĉefurbon, venkanto senkompara, renkontata de homamasoj en densa interpremo jam kie la unuaj jurtoj staras diŝe ĉe la dezertrando.

Kvieto kaj silento regas kie li rajdas, la polvo suprenkiriĝas ĉirkaŭ la ĉevalhufoĵoj kaj ŝvebas kiel nuboj malantaŭ ili, sed en la homamasoj neniu sin movas kaj neniu voko aŭdiĝas, la plej proksimaj genuoj kaj klinas sin kontraŭ la tero, ĉies vizaĝoj estas sobturnita pro respekto, neniu lin rigardas preterpasantan, nur perceptas lian potencon ĉeeston.

Iu eble aŭdacas per kaŝrigardo kapti lian vidon, tiam eble ankaŭ kuraĝas pensi ke la Ĥano ŝajnas laca kaj oldiĝinta, ne montras signojn de ĝojo pro la reveno nek ŝajnas eĉ rimarki ke li nun denove renkontas sian popolon en sia propra urbo Karakorum post tiel longa tempo.

La korpo ŝajnas peza, la ŝultroj klinitaj kvazaŭ sub ŝarĝo, la ruĝbrunaj haroj estas arĝentostriaĵoj, la mentonbarbo kaj la sobklinikitaj lipharoj same, la vangoĵoj elvolbas tiel ke la vizaĝo

larĝiĝis, fariĝis tiel larĝa kiel longa, preskaŭ kvadrata, kaj la okuloj ensinkis en profundajn faltojn en la sulkodensa haŭto.

Kiam li lante forlasas la ĉevaldorson por iri al la granda blanka regentotendo oni povas rimarki ke li lamas, iom trenas unu piedon, lia malnova koksvundo ĉiam pli sin memorigas.

La Ĥano eniras la tendon kaj kaptas per unu rigardo ke ĉio estas neŝanĝita tie, kiel li atendis: la silka subŝtofo rebriletas en rapidaj muariĝoj sub venteto, la arĝenta tablo staras provizita ĉe la enirejo, sur la fajrostablo meze en la tendo brulas fajreto el dornaj branĉetoj, klara kaj preskaŭ senfuma, ne por varmigo sed por lumigo, kiel vivsigno kaj puriga forto.

La Ĥano iras al la podieto apud la fajro, kie liaj piedoj merĝas en la maloftaj, densharaj feloj kiuj ĝin kovras, kaj li eksidas sur la basa, larĝa benko, krucas la kruojn sub si kaj apogas la manojn sur la femuroj, duone en pozo de rajdanto eĉ nun kiam li ekripozas post la vojaĝo.

Liaj komandantoj kaj aliaj elstaraj viroj sekvas lin en la jurton, unu post alia, post deca atendo, kaj eksidas sur la ĉirkaŭaj benkoj, ĉiu laŭ siaj rango kaj digno, ĉiuj silentaj, atendente parolon de la Ĥano.

Sed tio malfruas, li sidas profundiĝante en pensoj, senmova, kun la okuloj kaŝitaj en la profundaj haŭtfaltoj kaj la arĝentoringoj en la oreloj de tempo al tempo ekglimantaj, li povus ŝajni dormanta se li ne havus la sidan pozicion, kaj tamen verŝajne nenio eskapas lian atenton, la ordinara afero ja estas ke li ĉion vidas kvazaŭ rimarkante nenion.

Eĉ ne unu virino videblas en la regentotendo, la horo de viroj regas, silento kune post la hejmenveno; la virinoj ne sin altrudas ĉe la mongoloj, ili havas siajn proprajn jurtojn kaj vivas sian vivon aparte kun infanoj kaj hejmlaboroj.

La Ĥano havas multajn edzinojn kaj eĉ pli da virinoj kiuj lin apartenas ne havante statuson de edzino, sed el ĉiuj nur Byrte libere rajtas eniri lian regentotendon, Byrte kiu estas lia unua edzino kaj la plej altranga.

Post deca tempopaso ja ĝuste Byrte enpaŝas tra la tenda-perturo, stretokulas al la fajro kaj iras rekte al sia edzo kaj mastro, klinetas la kapon antaŭ li kaj lin rigardas sen ke iu el ili ŝanĝas sian vizaĝesprimon aŭ eldiras vorton.

Byrte eksidas sur la podio, maldekstre de li, kaj sidas tie kun interkrucaj kruroj, silenta kaj senmova kiel la Ĥano kaj la ceteraj viroj, super ŝi samkiel super li pendas malgranda idolo, nigra kaj ruĝa, pretigita el felto, kaj iom svingiĝas pro nerimarkeblaj ventotiroj.

Kiam la Ĥano fine ekparolas li faras tion en sia kutima malrapida maniero, pensante, vortŝpare, peze pesante: li ordonas tritagan festadon por ĉiuj, por hejmuloj samkiel por revenantoj, kaj nur en la kvara tago li komencos akcepti tiujn senditojn, kurierojn, pastrojn, komercistojn kaj aliajn kiuj atendis lian hejmvrevenon kaj deziras aŭdiencon ĉe li.

La vortoj de la Ĥano estas sekvataj de ioma silento, kvazaŭ por ke ili restu tie interne kaj penetru ĉiujn, antaŭ ol la homoj kuniĝintaj en la jurto voĉigas sian akklamon kaj post manmovo de la Ĥano ekstaras, moviĝas, prenas por si fruktojn, vian-don, trinkaĵojn, kiuj estas dismetitaj sur la arĝenta tablo.

Diskrevas do la festado kaj ĉia silentado ĉesas, ĉia solena digno forbalaĝas de la orduo de la Ĥano, en lia urbo Karakorum.

Ŝafoj kaj bovobruoj estas multnombre buĉataj, fajroj flamas inter la jurtoj kaj interne de la domoj, la trinkaĵoj fluadas, la fortfermentinta kumiso, la importitaj rizvino kaj uvovino.

La voĉoj laŭtiĝas per krioj kaj kantoj, laŭtaj ridoj eĥiĝas, la viroj dancas kaj luktas, ĉirkaŭstumblas, vomas kaj plenigas sin per manĝaĵo kaj trinkaĵo denove, tiras unu alies orelojn kredante ke tio helpas al ili enventrigi eĉ pli, renversiĝas kaj restas dorme kuŝantaj surgrunde, poste ili denove ekstumbldas kaj daŭrigas la diboĉadon.

Ĉio estas tiel kiel konvenas en vera mongola ĝojfesto kiam superabundo kaj supermezuro regas en ĉio, kiam nenia retenemo estas deca kaj nenia sinbrido postulatas de iu.

Sed la Ĥano mem partoprenas nur la plej necesan por honoro la feston kaj ĝustamaniere inaŭguri ĝin per sia ĉeesto, ne kiel antaŭe li trovas plezuron en la superabundo, pensas ke li havas nek tempon nek fortojn por fordisipi en ebrioj kaj plezuroj, multo lin okupas kaj ne emas forlasi liajn pensojn.

Li elserĉas Byrte en ŝia jurto, la servistinoj estas forsenditaj kaj ili eksidas unu apud la alia, solaj kune la unuan fojon post lia reveno, ili turnas la vizaĝon unu kontraŭ la alia kaj mildeco sterniĝas sur la trajtoj, lumas el la okulfendetoj de la Ĥano, kaj lia malhele tanita, profunde sulkita vizaĝo perdas iom da sia nepenetreblo.

Kiam li rompas la silenton, li tion faras por diri al ŝi ke ŝi bone zorgis pri la orduo dum lia forestado, ŝi tenis bonan ordon, evitigis malpacon kaj kverelon, li estas pri tio tre kontenta.

Byrte respondas ke ŝi jam longe scias sian pozicion kaj sian

respondecon kiel khatuno, unua edzino de la Ĥano, ŝi faris tion kio endas al ŝi kaj la Ĉielo estis kun ŝi same kiel kun li, ŝia mastro.

Li rimarkas nenian subtonon de amaro aŭ riproĉo en ŝiaj vortoj, ŝi estas tro fieraj por plu montri ion tian, ŝi mencias nenion pri tio ke la jaroj dum kiuj li forestis estis longaj aŭ pezaj, ankaŭ nenion aludas pri tio ke li longe prokrastis la hejmvendon, pli longe ol povus ŝajni necesa, ŝi tute ne aludas al la merkito al kiu licis akompani lin dum la tuta kampaĵo, eĉ malpli al la aliaj virinoj pri kiuj ŝi eble aŭdis famojn.

Ne, tiu tempo pasis dum kiu ŝi suferis pro malatento tiurilate, nun sufiĉas al ŝi esti khatuno, kun tiuj potenco kaj pozicio kiuj apartenas al ŝi.

Li povas vidi ke ŝi malmulte oldiĝis dum tiuj jaroj, nur fariĝis iom pli osteca, dura, simile arbon kiu kreskas dezertrande, la haŭto striktas super la vangostoj kaj subtile sulkiĝas ĉirkaŭ la buŝo, sed ŝiaj okuloj samas kiel dum la juneco, grizaj kiel granito, akraj kaj klaraj en la rigardo: okuloj kiujn li ĉiam iom timis kaj kies rigardon li foje malfacile renkontis.

La Ĥano prenas la manon de Byrte kaj ŝin kondukas al la dormloko, ili sin etendas unu apud la alia sur la molaj feloj, kaj tiel ili ripozas kune sen tio ke unu montras deziron por la alia; nenion necesas diri, ĉar ambaŭ scias ke tiu maniero de kuneco jam pasis por ili.

Dum ili silente ripozas la Ĥano repensas pri ilia longa vivo kune, bildoj emerĝas el la pasinteco kaj kvazaŭ profundigas la ripozon, donas al li nur nun klaran senton de hejmvendo,

kaj eble Byrte repensas sammaniere, tiel ke ili sen vortoj unuigâs en siaj memoroj.

Byrte estis la infanedzino de la junula tempo, li longe ŝin atendis antaŭ ol li povis ŝin konduki al la jurto de sia orduo, ili dividis mankojn kaj danĝerojn antaŭ ol li sekurigis siajn regon kaj potencon kiel Ĥano, sen ŝanceliĝo ŝi lin flankis kaj naskis al li kvar filojn, nun ĉiuj gloraj viroj kaj grandaj armeestroj, nomumitaj Orluk-agloj, imperiestraj princoj, heredontoj de la mongolimperio.

Dura kaj luktokapabla edzino ŝi estis, la frua brilo kaj ludemo ŝin forlasis, sed ne la volforto, ne la akreco de penso kaj lango: ŝi parolis kun li kiam neniu alia kuraĝis kaj ne malofte konvinkis lin pri la saĝeco de sia opinio.

Kiam li nun rigardas suben en la klarajn profundojn de la memoro li vidas sin mem kiel knabon, li jam kapablis rajdi ĉevalon kaj depafi sagon sambone kiel multaj maturuloj, li estis ekkolerema kiel taŭrido, sed tamen tuja al reekvilibro, inklinis subite fridigi sian varmegon kaj pensi klare, samkiel ardanta fero estas mergita en akvon kaj ĉe tio hardiĝas.

Li nomiĝis Timuĝin, tio estis lia frua nomo en la tempo antaŭ ol li fariĝis la Ĥano kaj ricevis la timigan regentonomon, kaj lia patro estis Jesugaj, kun alnomo Bagatur, La Forta, ĉefo super la grizokulaj kiutoj kaj respektata en sia regiono.

Venis do la okazo kiam licis al li rajdi for kun la patro, armita kiel batalulo, finfine forlibera de paŝtado de ŝafoj kaj brutoj kune kun infanoj, nun li vidos la mondon ekster la propraj paŝtejoj, la kutimaj someraj kaj vintraj lokoj.

Tagojn kaj noktojn ili rajdis super la dezertovastoj kaj renkontis karavanojn de katajaj komercistoj, virine febligataj vi-

roj kiuj plenigis la knabon per malestimo, tiaj homoj kiuj vivas en urboj, enfermitaj kaj timantaj.

Poste ili envenis inter la arbarkovritajn montdeklivojn ĉirkaŭ la rivero Onon kaj li unuafoje vidis akvon kiu torentis antaŭen, muĝante, kun forta violento, kaj arbojn kiuj tiom altis ke ili ŝajnis atingi ĝis inter la nuboj.

Apud lago, klara kiel spegulo, ili alvenis al la plej granda orduo kiun li iam vidis, kun sennombraj jurtoj kaj grasaj fumoj, kaj multaj rajdantoj venis kontraŭ ilin akompanataj de bojantaj hundoj — li nete memoras la hundojn ĉar hundoj ekde lia infanaĝo kreis en li abomenon, preskaŭ timon.

Ili estis kondukataj al la ĥano, la ĉefulo Daj-Seĉen de la khungiro-tribo, nomata La Saĝa, fama kiel batalanto sed eĉ pli fama pro sia saĝo kaj klarvido, kaj tiu akceptis Jesugaj kiel proksiman amikon kaj fraton, montris ankaŭ al Timuĝin tiun atenton kiu ŝuldiĝas al juna batalulo kaj ĉefulido.

En la jurto troviĝis ankaŭ filino de la ĥano, knabino ankoraŭ sen signoj de ekmamoj, sed malkaŝe sincera kaj glitre vivmova kiel fiŝo en sunbrila akvo, tiel ke ŝi lumis en la okulojn de la junulo kaj tuj sin plaĉigis al li.

La knabino nomiĝis Byrte, La Grizokula, kaj baldaŭ al Timuĝin estis klare ke ĝuste ŝin li deziras, ŝi estos lia nuptulino kiam venos la tempo.

Li sin turnis al sia patro kun sia deziro kaj ĝi ne estis malbone akceptita, la patro nur tion obĵetis ke la knabino ankoraŭ estas tre juna, sed post kelke da jaroj ŝi supozeble estos bela kaj taŭga junulino, kiu povos melki bovinojn kaj tani felojn, tio estos en konvena tempo kiam la filo efektive estos edzmatura.

Kaj Jesugaj parolis kun Daj-Seĉen, kiun kontentigis la sva-

to, li rigardis Timuĝin kun aprezo, rimarkis kaj ekŝatis liajn verdegrizajn katokulojn kaj tiun klaran lumon kiu eliris de lia vizaĝo, same liajn rektajn ŝultrojn kaj graciajn membrojn, kaj li diris ke en sonĝo li vidis blankan aglon kiu portis la sunon kaj la lunon en siaj krifoj, tio aŭguris bonon, kaj li kredis ke Timuĝin kaj Byrte oportunos unu al la alia, samtempe la amikeco ankoraŭ pli firmiĝos inter iliaj klanoj.

La estonta geedziĝo estis prikonsentita kaj celebrata per festenadoj, poste Jesugaj ekiris hejmen kaj Timuĝin restis sola por servi al Daj-Seĉen la Saĝa, aŭskulti lin kaj lerni ĉion kion estonta batalulo kaj regento bezonas, dum li volonte per rigardo sekvis la rapidan Byrte.

Kiel kutime la printempo venis al la altregiono kiel ŝtormo kaj inundo, venis kun ŝtormo varmega kiel spiro de besto kaj igis la grundon vapori kaj ĉiun restantan neĝon degeli, venis kun inundo de ĉiuj riveroj, rojetoj, akvofluoĵoj en valoj kaj profundoj.

La purŝvabritan spacon plenigis kojnoformaj birdovicoj survoje norden, lorlantaj kaj trumpetantaj, la bestoj tiriĝis antaŭen en rotoj, venis el la arbaroj kaj kolektiĝis sur la ebenaĵoj, cervoj ŝajnante makulitaj de neĝo faris altajn kaprioĵojn, ursoj alpretis kaj frapis brutojn, la marmotoj fosis siajn kavojn entere kaj sidis tie fajfante.

La greso ŝosis preskaŭ de unu tago al la venonta, se iu ekdormonte kuŝiĝis sur ĝi ĝi ŝajnis al li pli alten kreskinta kiam li vekigis, brutoj kaj ĉevaloj samkiel multaj specoj de sovaĝbestoj sin paŝtis per dentoj kaj langoj, ĉiu laŭ sia specio, la ŝafinoj naskis ŝafidojn kaj rapide grasiĝis, la lakto abundis el plenaj mamoj.

La floroj elburĝonis kiel fajro en multaj koloroj, luktis inter si por spaco, alten sin pafis unu preter alian, tutaj kampoj kun ĉielbluaj narcisoj kaj violeaj hiacintoj, peonioj kaj papavoj kiuj disvolvis siajn ruĝajn kapojn en densaj amasiĝoj, flamstriaĵoj tigrililioj kiuj virojn atingis ĝisbruste, ranunkoloj similaj al grandegaj strilinoj el flavfandita butero, kampanuloj grandaj kiel infankapoj.

La odoroj leviĝis narkote kaj svenige, florodoro kaj poleno portiĝis per la vento foren super la dezerto, drivis antaŭen en rozeaj aŭ oroŝimraj nuboj, sovaĝaj abeloj, burdoj kaj ĉiaspecaj insektoj zumis, zumris, flimris enaere kaj surgrunde, la flava florfaruno kolektiĝis akvorande kiel oraj borderoj kaj la fiŝidaro senhalte buŝadis por ĝi, faris ringojn akvosurface, simile kiel faras pluvo de pezaj akvogutoj.

Por la nomadoj tio estis tempo de satiĝo post la vintra malŝato, ili voris lakton kaj viandon, tenis bolantaj la kaldronojn kun viandmanĝaĵoj super la fajroj, ĵetis ostojn nur duone deroditajn al la hundoj, facile ridis kaj tion faris funde, kun malfermitaj buŝofaŭkoj kaj saltantaj ventroj, sed ankaŭ povis facile raptiĝi de subita kolero kaj elkrevi en perfortaĵoj.

Ili vivis kun la bestoj pli ol iam, tumultis kun siaj ĉevaloj, kurante faris suprensaltajn sur ties dorsojn, rajdis en vastaj rondoj tra la gresebeno, revenis kaj alsaltis la grundon antaŭ ol halti, la melkado postulis tempon, la viroj fajfis por la ĉevalinoj kiuj staris flankate de la ĉevalidoj dum ili estis melkataj, la brutaro remaĉadis kaj enspiris la kvietigan fumon de la subĉielaj fajroj.

Ankaŭ la kaprinoj estis melkataj, ili havis skuetiĝantajn, nigramakulajn mamojn kiuj preskaŭ treniĝis sur la grundo, la knabinoj komencis lerni melki ilin, la ŝvelpufaj mampintoj ŝprucis preskaŭ elmeme, sed la knaboj ludis kun la ŝafoj, disgambis super ili aŭ rajdis kun suprentiritaj kruroj, penis ilin direkti tenante ilin ĉe la oreloj, aŭ instruis al la virŝafoj kornobati, staris antaŭ ili kun alturnita postaĵo kaj lasis sin alfrapi tiel ke ili ridante flugis super la grundo.

Timuĝin mezis inter infano kaj adolto, li alterne partoprenis en ludoj kaj laboroj, rajdis la plej kontraŭstrebajn virŝa-

fojn kaj luktis kun ili, alestis kiam la ĉevalinoj estis melkataj kaj partoprenis la batadon de la grandaj ledosakoj kun ĉevallakto por igi ĝin fermenti, kunhelpis kolekti la ekskrementojn de la brutaro en korboj kaj en la sunbrilo sekigi ilin en hejtaĵon.

Li rigardis la fekundigojn de bovinoj kaj ĉevalinoj, la naskojn de bovidoj kaj ĉevalidoj, li partoprenis tirante la elmontriĝantajn postkrurojn kiam la nasko estis malfacila, kaptis ŝafojn kaj ilin ligis kiam la lano estis tranĉota, vadis en la inunda akvo kaj eltiris fiŝojn per maŝo aŭ digis malprofundajn akvogolfetojn kiuj poste estis ĉerpataj ĝis la fiŝoj baraktis en la malalta akvotavolo kaj povis kaptiĝi per la manoj, li lertis maŝkapti marmotojn, ŝteliĝis al iliaj terkavetoj kaj tiris la maŝon kiam kapo sin elŝovis.

Timuĝin ja estis filo de la ĥano kaj povis pli liberi ol la aliaj knaboj, li jam havis propran ĉevalon kaj forgalopis sur ĝi tra la ebenaĵo, li enspiris la preterblovantan aeron kaj levis laŭtajn vokojn pro ĝojo, neniam li erarvojis eĉ se li estis distan- ce for de la ordua vido, eĉ ne bezonis li rimarki spurojn kaj direktojn, malgraŭe li sciis kiel reveni.

Kaj la bardoj venis, la vagantaj bardoj, rajdantaj surĉevale kun sia unukorda instrumento ĉeflanke, kaj eble restis ili surĉevale kantante siajn kantojn, dum la homoj kolektiĝis ĉirkaŭ ili, surĉevale ankaŭ tiuj, aŭ ili descendis kaj eksidis sur ŝafofelo apud aperta fajro, tiel ke povis ĉiuj ariĝi tie kaj aŭskulti ilin, aŭ ili estis invititaj en la spacan jurton de la ĥano por kanti antaŭ elektita rondo.

La monokordon ili apogis kontraŭ la grundo kaj tenis ĝin

rekte supren antaŭ si, sidante kun krucitaj kruroj, la longa kolo el pala ligno aspektis kiel kolo de granda birdo kaj la ventro konsistis el pufblovitaj urinvezikoj donante obtuzan sonoron al la zumanta kordo, ili ludis kvazaŭ senzorge, ne pensante pri ĝi, dum iliaj buŝoj formis la kanton kaj iliaj okuloj rebrilis de la sento kiu ilin plenigis.

Pri la ĥanoj kaj bataluloj de la klano ili kantis, pri la sorto de la klano dum multaj generacioj, simile al ŝtuparo iranta retren kaj suben en la tempon, eble tre lontanen sed tamen tute proksiman, kun terura suno kaj eĉ pli terura fridego, kaj la riveroj estis pli profundaj kaj pli akvozas, la paŝtejoj ne finiĝis, la greso kreskis ĝisĉiele kaj la Ĉielo estis alta kaj eterna kaj blua, sed tamen tute proksima, kaj troviĝis bataluloj kiuj kaptis stelon en la mano por sin varmigi en la vintra nokto, troviĝis virinoj kiuj vivis nudaj en la akvoj, kaj naskiĝis gigantinfanoj kiuj tuj enpaŝis la brulantan fajron kaj ridis inter la flamoj, nevenkeblaj dekomence.

La klano apartenis al la fama Burĉikuno-tribo, la Grizokulaj, kiuj povis respuriĝi ĝis la unuiĝo inter la Nigra Lupo kaj la Blanka Cervino, du triboj el sudo kaj el nordo kiuj interpaciĝis kaj fariĝis potencaj sur la altebena inter la montoj sude kaj la arbaroj norde, ili batalis kontraŭ aliaj triboj kaj kaptis abundan predon kaj forpelis ilin de la bonaj paŝtejoj, ili militis ankaŭ kontraŭ Kataj kaj hejimportis grandajn trezorojn, iliaj kestoj estis plenigitaj per kostaĵoj kaj sur la muroj de la jurtoj pendis vestoj el silko kaj la plej belaj zibelmanteloj, flanke de oraj glavoj kaj pafarkoj inkrustitaj per gemoj,

kaj ilia orduo staris ĉe la bordo de Orkhon sub la ŝirmo de la monto Burkhan Khaldun, kaj tie vivis Bataĉi, la Blanka Ĥano kun la firmaj paŝoj, kaj Koritĉar-Margan la tre lerta, kaj

Aŭdan kiu nomiĝis la Griza kaj similis al lupo, kaj Sali kiu nomiĝis la Kaprica ĉar lia menso estis enigme maltrankvila simile al montriveroj en la degela sezono, kaj Jeke-Nidun kun la Granda Okulo, li kiu vidis pli ol iu ajn alia, kaj la saĝa Burĝidigat-Merken kun sia belega edzino Mongolajna, kaj Tor-koldaj la riĉa, la mastro super la plej grandaj gregoj, kaj Kabul ĥano kiu ensturmis en Kataj kaj tiris ilian imperiestron ĉe la barbo, bravaĵo kiun la kataj ne povis privenĝi aliel ol igi perfidulon lin veneni,

kaj jen la bardoj fine atingis ĝis Jesugaj-Bagatur, la nun reganta ĥano de la klano, la Forta, la Sentima, la mastro super la Grandmongoloj, regento super kvardek mil jurtoj kaj sennombraj gregoj de ĉevaloj kaj brutoj, nekontestebla okupanto de la lando inter la riveroj, neniam mankis kumiso en liaj sakoj kiam la vintro plej severis, neniam liaj brutoj mortmalsatis, neniam al lupoj licis libere vandali liajn gregojn, neniu rabistoj kaj ŝtelistoj kuraĝis proksimiĝi, kaj printempe la ĉevalinoj naskis kaj riĉabundis per lakto, la ŝafinoj fruktis kaj naskis kaj la ŝafidoj dancis blankaj kiel neĝmakuloj en la alta greso, la virinoj gravedis kaj naskis kaj la vivo atingis sian flusomarkon en la jurtoj, laŭdo kaj gloro al la ĥano de la Grandmongoloj, al Jesugaj, la forta kaj fortuna!

Tiel la bardoj kantis akompanate de siaj zumantaj kordoj, kaj inter la aŭskultantoj kun brulo en la sango estis la knabo Timuĝin, la unuenaskita filo de la ĥano, kiu jam decidiĝis fariĝi la plej granda el ĉiuj ĥanoj, fariĝi tiu kiu estos prikanta dum sennombraj generacioj.

Timuĝin estis la gvidanto kiun la pli junaj fratoj sekvis en ĉio, li estis la plej saĝa kaj la plej lerta, la plej aŭdaca kaj forta, escepte de la du jarojn pli juna Kassar kiu estis pli altkreska, pli forta kaj pli lerta pri pafarkado, sed kiu estis tre sindona al Timuĝin kaj en ĉio sin subordigis al li, ankaŭ kiam ili luktis li volonte lasis al la frato venki ne uzante ĉiujn fortojn, nur en pafarkado li montris sian superecon, lia fiero estis nomiĝi Kassar la Pafarkisto.

Timuĝin respondis per fervora admiro al la pafarka lerto de la frato kaj lin ofte demandis kiel estas ebla lia lerto, li povis trafi ĵetitan ŝtonon per sia sago, povis faligi flugantan birdon kaj trapenetri fiŝon en la akvo, tio lasta estas la plej malfacila, li klarigis, ĉar la akvo faras alian kaj pli malfacile prekalkuleblan kontraŭstaron ol la aero, eĉ se regus forta vento,

la trafcerto dependas de sento kiun li havas en si kaj kiu diras al li jam en la momento antaŭ ol la sago forlasas la kordon ĉu ĝi trafos aŭ ne, tio neniam misas, kiam lia sento antaŭvidis kiun kuron faros la sago por neeviteble trafi sian celon, tiam la sago sekvos tiun kurbon kvazaŭ ĝi estus nevidebla trako en la aero, kaj ĉar li ne lasas la sagon flugi antaŭ ol li sentas ke ĝi trafos, tial ĝi senescepte atingas sian celon, krom iujn rarajn fojojn kiam lia sento hezitas kaj li tamen lasas la sagon, tiel Kassar mem klarigis sian pafarkan lerton.

Pri la tria frato, Katĉiun, tiu estis tro juna kaj tro infaneca por vere konsideriĝi, kaj la plej juna, Temugu, ankoraŭ treniĝis ĉe la patrinaj jupoj, dum la fratineto Temulun nutriĝante kuŝis ĉe la mamoj de la patrino, sed troviĝis ankaŭ multaj duonfratoj kaj la plej respektataj inter ili estis Bektar, Belgutej kaj Targutaj, ili tamen ne estis samrangaj kun Timuĝin kaj ties fratoj, ne heredontoj de la ĥano, tamen kun favoraj

eblecoj maturiĝi ĝis potencaj viroj en la klano kaj brilaj komandantoj inter la bataluloj.

Timuĝin kaj Kassar tumultis kun la duonfratoj en sovaĝaj ludoj kaj petoloj, en konkuroj kaj luktoj, regis tensio inter ili sed ankaŭ sindonemo, ĝis nun ankoraŭ ne malamo nek vere pripotenca lukto, Timuĝin frue komprenis ke li saĝe agus gajnante la duonfratojn por si ne forpuŝante ilin, li klopodis montri justecon kontraŭ ili samtempe perceptigante al ili sian fortan volon, sed li ankaŭ rimarkis kiel ilia patrino kuraĝigis ilian troaplombon kaj en tio ŝi havis apogon de la ŝamano Tebtengi.

La aliaj duonfratoj estis malpli reputataj, preskaŭ ekster kalkulado, ĉar malgraŭ ke Jesugaj patris ankaŭ ilin iliaj patriroj pli malalte rangis kiel edzinoj aŭ kromedzinoj, tial la statuso de tiuj duonfratoj estis malcerta kaj tute ne respektata, ili ne malofte montris mornan kaj neprekalkuleblan karakteron, malicon kaj insidemon, ili volonte helpis sin per ruzo kaj trompaj trukoj, kaj pro tio ili estis punataj per batado kaj elpeliteco de la ceteraj Jesugaj-filoj,

kaj foje kiam ili kune fiŝkaptis, Timuĝin malkovris neordinare grandan kaj grandiozan fiŝon kiu staris en malprofunda akvo kun etenditaj orobrilaj naĝiloj kaj korale ruĝaj branĵoj kiuj moviĝis ĉe ĉiu spiro, Timuĝin mallaŭte fajfante ŝtelpaŝis tra la akvo kun la koro forte batanta pro ekscito, li etendis sian vergon kun la maŝo kaj mallevis ĝin tre singarde antaŭ la fiŝo, tiris ĝin malantaŭen ĉirkaŭ la kapo kaj la branĵoj, ektiris kaj sentis la inerton, la baraktantan pezon de la fiŝo kiam ĝi arkfluge traeris,

sed la fiŝo elglitis la maŝon kaj falis sur la greson, kaj antaŭ ol Timuĝin ĝin atingis la insida duonfrato Ossgin salte sin

ĵetis sur ĝin, kaptis ĝin per ambaŭ manoj kaj forkuregis kun ĝi akre kaj triumfe kriante ke la fiŝo estas lia, la fiŝo apartenas al li! kaj Timuĝin tiam kaptis violenta kolerego pelanta la sango for de lia vizaĝo kaj tremiganta liajn membrojn, li ekkuris post la fiŝoŝtelinto Ossgin kun la vergo en sia mano, lin ĉasis tra la greso kaj vokis al li ke li lasu la fiŝon, sed Ossgin kuris ĝis li anhelante falis, ĉiam plu kun la fiŝo en siaj manoj, forte premata al sia brusto,

sammomente Timuĝin lin ĝisatingis kaj komencis lin senbride bati per la vergo, ĝin rompis meze kaj kontinuigis bati per la pli dika parto, batadis, batadis ĝis Ossgin kuŝis tie senmova kun sango fluanta el la buŝo kaj la fiŝo disŝirita sur la sino,

Timuĝin tiam tuj ĉesis kaj foriris ne returnante sin, pli malfrue kelkaj el la aliaj duonfratoj venis dirante ke Ossgin mortis, Timuĝin nenion respondis sed iris rekte al la patro, trovis Jesugaj en ties jurto, genuis antaŭ li kaj diris: Mi mortbatis Ossgin! kaj la ĥano malsereniĝis pro kolero kaj elkriis: Vi fratmortiginto, kial vi ĝin faris? kaj Timuĝin respondis: Li ŝtelis mian fiŝon kaj vi instruis min ke ŝtelistoj estu punataj! kaj Jesugaj aŭskultis kiel la tuto okazis kaj regajnis sian trankvilon, poste li diris: La ekkoleremo vi heredis de mi, mia filo, vi devas lerni ĝin bridi, alie ĝi kaŭzos vian malfortunon, sed nun foriru kaj ni ne plu parolos pri la afero!

Kaj Timuĝin vidis virinon rajdi sola tra la greso, li rajdis post ŝi kaj ekflankis apud ŝi, ŝi okulangule lin rigardis kaj ridis, ŝiaj ruĝaj vangoj kaj sanaj dentoj diris al li ke ŝi estas tute juna, kaj li demandis kien ŝi vojas kaj kial ŝi rajdas sola, kaj la virino kun sincera malkaŝo diris: Mi survojas fiŝkapti, mia edzo estis batalulo kiu estis mortigita kaj ĝis nun neniu alia min al-

prenis al si! kaj ŝi preparolis ke ŝi havas propran jurton kaj proprajn ĉevalojn, sed infanojn ŝi ankoraŭ ne atingis naski, tiel mallongan tempon ŝi estis edzino, ŝi nomiĝas Djuma kaj bone scias kiu estas Timuĝin, malgraŭ ke li kompreneble neniam rimarkis ŝin,

kaj Timuĝin diris ke li ŝin akompanos kaj fiŝkaptos kun ŝi se ŝi volas, kaj ŝi respondis ke li bonvolu tion fari, ŝi jam trovis bonan lokon kien neniu aliaj kutimas veni, kaj ili rajdis unu apud la alia tra la greso kiu svingiĝis kontraŭ la ventrojn de la ĉevaloj, ili ankaŭ ne ĉirkaŭvojis pro la altaj strioj el floroj kiuj sendis siajn ruĝajn, flavajn kaj blujajn rebrilojn kontraŭ iliajn vizaĝojn,

Timuĝin neniam estis timida antaŭ virinoj, li malkaŝe rigardis al ili en la okulojn kaj sentis nenian konfuziĝon, li sciis al kio ili utilas sed ankoraŭ neniun elprovis laŭ la maniero de viroj, tio okazos iam en la futuro, kaj nun li akompanis Djuma, la junan virinon kiu trofrue perdis sian edzon, ili alvenis al valetoj kaj jen ĝi estis: akvo fluo kiu glitris en la greso, ne vera roĝo, nur unu el tiuj okazaj fluoj kiuj ekestis dum la printempo kaj troviĝis tie dum mallonge ĝis ili denove sekiĝos, sed tre verŝajne povus tie troviĝi fiŝoj, fiŝoj kiujn obsedis la emo sekvi ĉiujn fluajn akvojn kontraŭflue, tute ĝis ili plaŭdante pelis sin antaŭen en tiel malabunda akvo ke la dorso elpintis superakve kaj nepris al ili renaĝi,

ili descendis la ĉevalojn kaj ĉe iliaj piedoj la akvo fluo faris apertajon tra la greso, Djuma kunportis neniajn rimedojn por la fiŝkaptado krom oblonga korbo de maldensa plekto, Timuĝin scivolis kiamaniere ŝi fiŝkaptos kaj ŝi donis al li longan rigardon, ak enigman ak petolan, ŝi senceremonie komencis sin malvesti, ne hezitis, ŝi jam havis viron kaj ne estas knabi-

no, kaj tie ŝi staris nuda en la greso, paŝis en la akvon kun la korbo en la mano kaj montris al Timuĝin kiel ŝi kutimas fiŝkapti,

ŝi ekkuŝis en la akvofluo tiel ke ŝia korpo digis ĝin, krom unuflanke kie ŝi tenis la korbon tiel ke la akvo trairis ĝin, kaj la fiŝoj venis, baraktis kontraŭ ŝia korpo kaj serĉis vojon laŭ ĝi, tiel ili trafis en la korbon kaj ŝi rapide ilin kaptis unu post la alia, rompis al ili la kolon kaj ilin ĵetis sur la greson,

Djuma fieris pri tiu maniero de fiŝkaptado kiun ŝi eltrovis, ŝi rigardis al Timuĝin kaj ridis, ruĝvanga pro fervoro, mansasvingis al li kun baraktanta fiŝo en la mano kaj vokis al li ke ankaŭ li malvestu sin kaj helpu al ŝi fiŝkapti, Timuĝin estis ekstarinta tie rigardante iom surprizite, ne aparte pripensante ŝian nudecon, li sufiĉe sciis pri tio kiel virinoj aspektas sub la vestoj, sed nun ekplaĉis al li ekkuŝi en la akvo same kiel Djuma kaj partopreni en la fiŝkaptado,

li sin malvestis kaj glitis en la akvon apud ŝin, ĝi estis agrable frideta, ne tre malvarma, kaj la fluo tiklis la haŭton, li sentis la fiŝojn tuŝeti lian korpon, per rapidegaj, glataj tikoj kaj tuŝoj, aŭ en longaj strioj kiam la akvo premas ilin kontraŭ lin,

li helpis al Djuma peli fiŝojn en la korbon kaj kapti ilin per la manoj, kelkfoje iliaj kaptoj ĉirkaŭ sama fiŝo renkontiĝis kaj kiam ambaŭ klopodis teni ĝin okazis ke ĝi forglitis de ili kaj forrapidis, tiam ili meze de la fervoro ridis kaj rigardis unu la alian,

li sentis ŝiajn membrojn kontraŭ siaj propraj, fridetaj kaj glataj en la akvo, fiŝoj venis inter iliajn korpojn kaj subite ekbaraktis, tio tiel amuze tiklis ke ili denove devis ridi, kaj Timuĝin komencis provi kapti fiŝojn kiuj englitis inter ilin, li baris al ili la vojon per sia korpo premita kontraŭ la ŝia kaj palpis

por la fiŝoj per la manoj, inter ŝiaj mamoj, inter ŝiaj femuroj, estis ak ludo ak maniero kapti fiŝojn, volonte Djuma kunludis kaj multe ridis,

Timuĝin trovis ne nur fiŝojn sed ankaŭ ŝian korpon per la manoj, kaj baldaŭ li ne plu kaptis fiŝojn sed ŝiajn membrojn, ŝiajn firmajn femurojn, ŝian pli molan ventron, ŝiajn glatajn, forglitajn mamojn, kaj tio fajrigis lian sangon alimaniere ol la fiŝkaptfervoro, donis al li senton en la korpo kiu estis nova kaj tamen rekonebla, intuita aŭ duonspertita jam antaŭe,

subite li ŝin ĉirkaŭbrakis kaj levis ŝin el la akvo, ŝin portis kelkajn paŝojn for en la greso kaj sinkis sur ŝin, iliaj korpoj premiĝis malsekaj kaj fridetaj unu kontraŭ la alia, ĝis la ardo ekflamis kie ili unu la alian tuŝis kaj li sentis ke li ŝin penetras ne aparte klopodante tion, lia pulsanta duro serĉis por si tion kiel sendoloriĝon, kiu tamen ne mildigis sed intensigis la tension senton, ŝia mola-raspeta interno ak lin alsuĉis al si ak lin klopodis forpuŝi de si, tio estis iaspeca lukto kie ili estis ak kontraŭ ak kun unu la alia, ĝis venis la ellasiĝo ilin unuiganta, tiel perplekse kiel neeviteble,

kaj poste Timuĝin rememoris tiun horon kiel difuzan sed allogan unuigon de akvofrideto kaj pulsanta ardo, de baraktantaj fiŝoj kaj raspa greso, de glataj membroj kiuj kvazaŭ miksiĝis kun la mukozaj korpoj de la fiŝoj, en la leĝera susuro de la vento en la greso sub la Eterna Blua Ĉielo.

La jurto de la Ĥano, la grandega regentotendo el blanka felto superturas la ĉirkaŭon simile al monteto el neĝo en la sunbrilo, staras kvazaŭ ekster la sezonoj, blindigas la rigardon kaj samtempe ĝin friskigas.

La tendorefaldoj estas suprenŝovitaj formante pintan aper-turon ĉe la enirejo, altan kaj spacan kiel pordego, ili estas akrakolare ornamitaj per pentraĵoj pri bestoj kaj birdoj, floroj kaj sunoj, kaj ambaŭflanke staras elrektigite idolo el ligno, tegita per felto, kun spuroj ĉirkaŭ la buŝo de lakto kaj graso kiuj estas ofertataj al ĝi ĉiun matenon kaj vesperon.

Sur sia fosto sin levas la blanka triboflago kun enteksitaj bildoj de korvo kaj falko, ĝi sin dividas en naŭ pintojn unu super alia, ĉiu el ili ornamita per longhara blanka poefaga vosto: simbolo de forto, kaj la nombro naŭ respondas al la naŭ plej altrangaj armeestroj.

Apude staras la standardo de la Ĥano kun paro da poten-caj blankaj poefagaj kornoj super kvar nigraj ĉevalvostoj: la forto unuigita kun la rapideco kaj turnita al la kvar mondo-direktoj.

La triboflago estas nur unu, starigita antaŭ la regentoten-do kaj en neniuj alia loko, dum la standardoj estas multaj, starigitaj antaŭ la jurtoj de ĉiuj plej altrangaj subĉefoj, kie ili laŭ difinita rangordo ĉirkaŭas la grandan malferman spacan an-

taŭ la jurto de la Ĥano, ĉiuj turnitaj suden kvazaŭ respekte al la suno kaj eble ŝirme kontraŭ la plej severaj ventoj.

Meze sur la loko brulas du fajroj tage kaj nokte, kun gardistoj fronte, kaj ĉiu fremdulo kondukata ĝis antaŭ la Ĥano unue devas pasi inter tiuj fajroj, se tiam li havas malbonajn intencojn la flamoj ekflagros kaj lin bruligos kaj danĝeraj spiritoj kiujn li eble venigas kun si fuĝas antaŭ la puriga fajro.

Multaj homoj konstante sin movas sur la loko, rajdantoj venas aŭ malvenas, descendas aŭ eksidas sur siaj ĉevaloj, komercistoj alvenas kun siaj ŝarĝobestoj por eksponi siajn varojn, pastroj kaj monaĥoj, lamaoj kaj ŝamanoj preterpasas en siaj nekutimaj vestoj, fremdaj senditoj venas eskortite de mongolaj oficiroj kaj estas transdonataj al la Mastro de Leĝo kaj Punoj, tiu homo kiu ankaŭ responsas pri akceptaj ceremonioj kaj farendaj ritoj.

Trupo de katajaj dancistinoj en longaj, striktaj silkroboj vidiĝas elscendi el apertaj portiloj kaj fari trotetajn paŝojn direkte al la tendo de la Ĥano, sekvataj de liutludantoj kaj flutblovantoj por spektakli plezure al la regento kaj la altranĝaj generaloj.

Aŭ povas okazi ke kelkaj viroj mortigitaj de fulmo nun estas portataj kun siaj posedaĵoj en procesio inter ambaŭ fajroj, ke la mortintoj kaj iliaj posedaĵoj liberiĝu el la danĝero kiu ilin kontaĝis, la restanta risiko de la ĉiela fajro.

Nobelaj mongoldamoj elpaŝas siajn jurtojn, sekvataj de servistinoj kaj ornamitaj per baktago, la alta kapvesto el arboŝelo, tegita per silko kaj kronita per plumoj, garnita per glitrantaj kaj tintantaj pendaĵoj el oro kaj arĝento.

Tiuj virinoj ofte estas tre grasaj kaj sin movas anhelante, kun ŝvito sobfluanta sur la krude ŝminkitaj vizaĝoj, kaj se ili

eksidas surĉevalo por mallonga rajdo necesas ke ili pene estu helpataj sur la selon, kun la ĉevaldorso arkiĝanta sub la pezo.

Ĉirkaŭ ĉio moviĝanta polvas kaj fumas, kaj la muŝoj troviĝas ĉie, svarmas ĉirkaŭ vizaĝoj kaj bestokorpoj, ĉirkaŭ la jurtoj kaj la nutraĵoj kaj la trinkaĵoj, krablas dense kiel vivanta nigra kovrilo ĉiuloke kie io versiĝis, kie restas makulo de humido.

Jes, la Ĥano jam revenis al Karakorum kaj ĉiutage oni vidas lin elrajdi, for inter la vicoj de jurtoj kaj domoj, li sidas kiel kutime iom malrektiĝinte sur la ĉevalo kaj ŝajnas nenion vidi tra siaj okulfendetoj, ŝajnas malĉeesta, sinkinta en si mem, sed tio povas esti trompa impresio.

Li portas nun dum la somero leĝeran veston kun ora zono, surkape blankan feltan ĉapelon kun suprenfaldita ĉirkaŭrando kaj fasko de nigraj agloplumoj, super la oreloj kaj malsupren sur la ŝultroj pendas ruĝaj bendoj por alligi la ĉapelon kiam vento ekblovas.

Li volonte rajdas sola, kaj se iuj lin akompanas tiuj sin tenas kelkajn ĉevallongojn malantaŭ li, kondiĉe ke li ne signas al iu el ili ekrajdi apud li, silente, ĝis la Ĥano eble subite ion diras.

Supren ĉirkaŭ la ĉevalhufoj kirligiĝas la fajna polvo kiu dum la seka somersezono estiĝas el la dezertosablo kaj pendas super la urbo kiel nebulo, metiĝas sur la kupolojn de la jurtoj kaj suprenfumiĝas ĉe ĉiu plej febla bloveto, sterniĝas kiel hela faruno sur ĉiujn objektojn kaj igas la aeron ŝimradi oreo aŭ ruĝe.

La Ĥano devas rajdi longe por elpaŝi el la vasta urbospa-

co, ĝis kie la jurtojn anstataŭas stokejoj kaj bestenfermejoj, kie la akraodoro de homoj, ĉevaloj, brutoj, sterko kaj fermentanta lakto cedas al la pura aero de la dezertebeno kun strioj de sekaj odoroj el naniĝintaj dornkreskaĵoj kaj sunlezi-taj vegetaĵoj.

Ofte la Ĥano haltas antaŭ la dezertgrundo kvazaŭ por enspiri pli profunde, liberigite, dum li gvatas super la ebenvasto kie la varmonebulo flimras kiel bolanta akvo, en arĝenta scintilado kiu igas ĉiujn distajn konturojn dissolviĝi, roko aŭ kelkaj rajdantoj ŝajnas ŝvebi super la grundo, grandigitaj en pe-tole trompa maniero, kaj la Ĥano devas levi sian kapon kaj rigardon por povi vidi super si la bluviolean spacon similan al kolosa tendokupolo.

Karakorum, tio signifas La Nigra Monto, estas urbo kiel nubo sur la tero, volvita en fumoj kaj polvoj, nesupervidebla amasiĝo de malaltaj domoj kaj nigraj aŭ blankefarbitaj feltotendoj, kun malmultaj larĝaj sablostratoj ebligantaj al rajdantoj kaj bovtirataj ĉaroj traveturi.

Tuj okcidente de la urbo Orkhon inerte fluas norden, dum la senpluva sezono kun malabunda akvo, malklare grizblanka kvazaŭ diluita per lakto kaj preskaŭ senmova, fosita kanalo gvidas tra la urbo al riverbranĉo oriente kaj estas malabunda akvodonanto, ŝirmata per severaj preskriboj.

Norde sin levas la ebenaĵo en ĉiam pli altaj ondoj, supren kontraŭ la montoj kiuj siluetigas siajn altajn krestojn kontraŭ la spaco, palbluaj pro distanco per kiu ili kaŝas valojn kun freŝaj fluoj kaj densa arbaro kiu grimpas supren laŭ la deklivoj.

Tio estas la lando inter la riveroj kiuj ekfluas sur la altebenaĵo, kvazaŭ naskiĝintaj el la dezerto mem, kaj norden enfluas inter la montojn, tra ravinoj kaj profunde enranĉitaj riverkuŝejoj: Selenga kaj Orkhon, Onon kaj Kerulen, riveroj kiuj tiriĝas kiel lumantaj arĝentaj vejnoj tra la sonĝoj de la nomadoj, kun nomoj kiuj sonas simile muzikon en iliaj oreloj.

La kiutoj, la tribo de la Ĥano, iam venis tien el okcidente al la paŝtejoj inter Onon kaj Kerulen, kaj post kelka tempo de perfida amikeco kun la karajtoj okcidente tiuj estis venkitaj, iliaj teritorioj kaj klanoj aneksiĝis al la imperio de la Ĥano kaj ilia ĉefurbo Karakorum fariĝis la sidejo de la nova potenco.

Ĝi estis la unua urbo kiun Timuĝin kiel juna tribĉefo vidis, kaj ĝi lin surprizis, vekis lian scivolon, lian senkaŝan maleslimon kaj eble eĉ kaŝitan admiron aŭ envion: tiuj en liaj okuloj senutilaj muroj kun bastionoj kaj turoj, tiuj pavimstratoj kaj malhelaj domoj kiuj ŝajnis al li mallibereje timindaj, tiuj ventblovataj silkflagoj kaj leonoj skulptitaj el ŝtono, tiuj superpompaj palacoj kaj bibliotekoj plenaj de skribaĵoj.

Nun Karakorum malpli estas enfermita urbo ol grandega, aperta orduo, la plej granda orduo en la mondo, senfina tendaro el jurtoj, kie la malnovaj urbomuroj situas forkaŝite, ruiĝante, sen ajna signifo, ĉar Karakorum ne plu bezonas defendon kontraŭ atakantoj, nur venkitaj malamikoj troviĝas ĉiudirekte kaj neniu povas minaci la urbon dum daŭros la regado de la Ĥano.

Dum la okcidenta militkampanjo Karakorum diskreskis, tiel ke la Ĥano grandparte ne rekonas la urbon, ĝi disvastiĝis sur la ebenaĵon ĉiudirekte, kun vastegaj terenoj por staloj kaj ĉirkaŭbarejoj, staplejoj kaj magazenoj, karavanserajloj kaj metiejoj.

Militpredo kaj tributoj el konkeritaj landoj seninterrompe alfluis tien kaj amasiĝis, karavanoj ŝarĝitaj per tutmondaj produktoj kaj riĉaĵoj alvenis kaj daŭre alvenadas praktike ĉiutage, objektoj kies egalajojn la nomadpopolo neniam antaŭe vidis, kune kun homoj plejeble fremdspecaj, maloftaj bestoj kaj belaj birdoj.

Karakorum ne povas ne meti dubemon en la oldnomadan menson de la Ĥano, li estas malcerta antaŭ ĝi en siaj sentoj kaj sia volo, ĝi lin forpuŝas kaj duonvekas en li emon pereigi aŭ forlasi ĝin, sed ankaŭ efikas nedefinite alloge al li per io el tiuj scivolemo kaj miro kiujn li sentis antaŭ ĉio ekde siaj junaj jaroj, kompreneble kun klara kompreno pri la neceso kaj neeviteblo de tiu urbo.

Multo plaĉas al la Ĥano kiam li rajdas tra Karakorum, ĉio kion li kutimis kaj rekonas ekde antaŭe, la svarma vivo kaj fortaodoro de la granda orduo, ĉio kio ankoraŭ estas nomada kaj mongola.

Sed alio al li tro fremdas, vekas lian miron kaj certan ĉagrenon, iritiĝon kian tigro povas senti antaŭ muŝo, fenomenoj kontraŭ kiuj lia instinkto sin defendas kaj pri kiuj lia prudento hezitas: ĉu ne kaŝiĝas en ili ŝtele proksimiĝanta danĝero, minacanta degenero, komenciĝanta dekadenco?

Multloke la nova riĉo kaj pompo tranĉas al li la okulojn, ankaŭ kelkaj el liaj plej fidataj viroj montras feblecon por tiaĵoj, ĉiam pli ili sin garnas kiel eksterlandaj sinjoroj, en silkaj vestoj kaj orbrodaĵoj, ornamoj ĉiaspecaj, pli simile al virinoj ol harditaj viroj kaj bataluloj.

Por ĉiuj laboroj ili ĉiam pli fidus sklavojn kaj militkaptitojn,

iliaj jurtoj fariĝas ĉiam pli lukse ekipitaj, pompegaj kaj komfortaj, multaj eĉ ne plu kontentas per jurtoj sed konstruigas al si domojn, ĉiam pli altajn kaj imponajn simile tiujn eksterlandajn palacojn kiujn ili vidis, tiel ili sin fiksas loke kaj sin ligas al objektoj, tute kvazaŭ Karakorum estus urbo kiel la urboj en fremdaj landoj.

Ili trinkas eksterlandajn vinojn kaj preferas rarajn pladojn al kumiso kaj ŝafviando, ili sin ĉirkaŭas per belaj nenifarulinaj kiuj arte staplas la harojn sur la kapo kaj sin ornamas per longaj, lakitaj ungoj, ili odoras pli forte ol printempaj florbukedoj kaj pli inklinas al rafinitaj korpaj ludoj ol generi infanojn.

La Ĥano ankaŭ vidas la kreskantan komercadon, la amasiĝon de logaj objektoj, de pli malpli senutilaj aferoj, ĝis minacas formiĝi ververaj bazaroj samkiel fore ĉe la islamanoj, malgraŭ ke nur interŝanĝa komerco estas permesita kaj ĉia marĉandado riskigas konfiskon kaj proskripcion.

La pastroj kaj monaĥoj kaj la diversaj specoj de sanktuloj ĉiam pli multiĝas ĉar ŝirmataj dum ili mem tenas pacon inter si, eĉ, ili estas malŝarĝitaj je ĉiuj impostoj: la Ĥano rekonas ilin en la svarmo kaj kapablas ilin distingi, mornajn nestorianojn en longaj nigraj vestoj, islamanojn en vastaj turbanoj kaj ĉemizosimilaj blankaj vestoj, lamaojn en siaj altaj tibetaj ĉapeloj, katajajn buddhanojn en fajroflavaj manteloj, kun razitaj kapoj, kaj taoistojn kun siaj ĝistaliaj, maldensharaj barboj.

La diversaj sanktejoj malĉesas kreski plurloke en Karakorum, grizaj lignokirkoj de la nestorianoj kun spajro kaj kruco, moskeoj de la islamanoj kun malhelbluaj kupoloj kaj altkolaj, blankfarbitaj minaretoj, buddhotemploj kun siaj pom-

paj portaloj kaj orumitaj skulptaĵoj, lamaismaj monaĥejoj kun siaj rotaciantaj paperradoj kaj sonoriloj kiuj tintadas enven-
te.

Fojon post fojo, kiam li vidas ĉiujn tiujn templojn kaj pas-
trojn la Ĥano vekigis al renova pripenso, elprovas ene en si
ĉu li agas ĝuste donante al ili tiun liberon, ŝajne je la kosto de
Tengri, la Eterna Blua Ĉielo, sed li tamen plue restas ĉe sia
konvinko ke ĉiu kredo estu respektata, ĉiuj dioj kaj instruoj
estu konsiderataj egalvaloraj, li ja ankaŭ tre bone scias ke tio
estas saĝa politiko.

Li preterrajdas la multajn gastejojn kaj la vastajn karavan-
bivakojn, kie ĉevaloj puŝiĝas kun kameloj kaj poefagoj, kie eĉ
ne mankas kelkaj elefantoj, kie homoj el ĉiuj anguloj de la
mondo kolektiĝas, en siaj strangaj vestoj, en la rumorado de
nekompreneblaj lingvoj: ho jes, ankaŭ tiuj fremduloj supoze-
ble estas neeviteblaj kaj siamaniere utilaj, devas esti zorgate
por ili, ili sin sentu bonvenaj ĉe la Ĥano en la plej granda im-
perio de la mondo.

Ĉio kio estas laboro kaj utila aktiveco en Karakorum plezuri-
gas la Ĥanon, li ĝin observas kun intereso tamen ne montran-
te tion en rimarkebla maniero, eĉ ne la domkonstruado po-
vas veki lian antipation, kvankam li restas ĉe sia opinio pri la
vanteco de ĉia senmigra loĝado.

Lin delectas la vido de la sennombraj metiistoj, la metika-
pablaj kaj artspertaj viroj kies vivon li savis dum la militkam-
panjoj kaj alkondukis el diversaj direktoj, precipe de tiuj po-
tencaj landoj kiujn li subdevigis oriente kaj okcidente, la lertaj
kataĵoj kaj persoj, turkoj kaj araboj.

Ili fondas feron kaj aliajn metalojn, ili forĝas armilojn kaj laborilojn, martelas oron kaj arĝenton, preparas lanon kaj teksas ŝtofojn, stamfas feltojn kaj preparas felojn, farbas kaj tanas, tordas ŝnurojn kaj kudras tendojn, tajlas botojn el bovaĥtoj kaj ankaŭ ŝildojn, maŝkirasojn, nukŝirmilojn kaj helmojn, ĉarpentas kibitkojn, la grandajn jurtoportajn ĉarojn kun pluraj paroj da masivaj lignoradoj, kaj malpezajn duradajn ĉaretojn por veturigi idolojn kaj valoraĵojn.

Li vidas kiel novaj jurtoj estas konstruataj kaj la urbo seninterrompe kreskas, kiel la muroj el branĉplektaĵoj estas elrektigitaj ĝis pli ol viralteco, kiel la kupolo estas formata el longaj, fleksitaj ĉevronetoj kaj kiel la dika, durstamfita felto, traŝmirita per graso por ĝin akvorezistigi, estas sternata super la lignoskeleto simile la haŭton sur bestokorpo.

La planko estas stamfata dura kun pajlo aŭ sekiĝinta greso, antaŭ ol ĝi estas kovrita per tapiŝoj aŭ feloj kaj feltoj, la fajrujo meze estas metata per ŝtonoj kaj gruztavolo, la fumaperturo en la plafono estas formata per fera ringo kiu kuntenas la branĉoframon kaj kunkudritajn feltopecojn, sur la fajrujo estas metita la granda kuirkaldrono sur sia tripiedo, la kaldrono kiu kaptos fajrerojn per sia fulga ventro kaj ebligas ke vetero kaj gravaj eventoj estos tie legataj anticipe.

Ĉirkaŭ la muroj estas fiksitaj kaprokornoj en konvena alto: tie estos pendigitaj vestoj apud pafarkoj kaj saguoj, manĝovazoj kaj sekigitaj viandpecoj, dum maldekstre en la jurto la grandaj argilkruĉoj staras formetite kun siaj provizoj kaj la tinoj el elkavitaj arbotrunkoj plenigitaj per lakto aŭ kumiso.

Tia ekde antikve estas la jurto de la mongolo, tiel ĝi daŭre estas elrektigata kaj ekipata, kaj ĉiufoje kiam la Ĥano vidas tion ĝi donas al li sekurigan senton, same kiam li vidas la on-

goton, la feltidolon, kiu estas pendigita super la lito por supervidi laboron kaj ripozon, aŭ kiam li vidas homojn elpaŝi el la jurtoj por verŝi sian trinkaĵoferon al la suno, la vento kaj la mondodirektoj: tiel la mondo tamen daŭras spit al ĉiuj ŝanĝoj!

La Ĥano antaŭenrajdas inter budoj kaj magazenoj, kie fojno kaj pajlo, milio kaj rizo estas tenataj en grandaj provizoj, aŭ inter staploj de arbotrunkoj kaj ferbloketoj, haŭtoj kaj lanpakoj, aŭ inter tendoaltaj krestoj de amasiĝinta sterko, kiu konsistigas la precipan hejtaĵon kaj nutras la fajrojn en ĉiuj jurtoj kaj domoj de la urbo.

Kaj jen la kanalo kun alkuplitaj akvocisternoj, tegitaj kvazaŭ de sulketaj palpebroj el pale ŝimverdaj membranoj, kaj tie sobmergitaj kuvoj kun farblikvaĵoj, forte lumantaj en la okulojn, kaj sekigtrestoj kun ĵus farbitaj ŝtofoj kiuj ondiĝas och frapiĝas en la vento simile al tiuj veloj kiujn li vidis sur la akvovojoj de Kataj, jen lanamasoj el kiuj estos preparata felto, jen distreĉitaj haŭtoj de ĉiaspecaj bestoj, de krispaj ĉeval- kaj bovo feloj ĝis denshare rebrilaj aŭ distufe radiantaj peltaĵoj.

Aldoniĝas al tio ĉiuj sonoj kaj odoroj fandiĝantaj en unu solan densiĝintan perceptaĵon de la vivo en la orduo: odoroj de diversaj specoj de bestoj, de ekskremento kaj urino, de intestoj elŝirataj kaj de novbuĉita viando, de brulanta peĉo kaj lako, de lignokarbo kaj fulgo el la forĝejoj, de sekigitaj vegetaĵoj, staplitaj lignospecoj kaj taniloj, kaj la sonoj de la laboro de metiistoj, ĉio kio klingas, klangas, grincas, gruntas, kaj la vokoj de homoj, henoj de ĉevaloj kaj muĝoj de brutoj, kontraste al la fono de la urba rumoro, la lorlo el la granda orduo kvazaŭ el iu enorma formikstako.

Fine, plej rande en la periferio, la staloj kaj la brutfermej-

oj komenciĝas, travintrejoj kaj kolektejoj por la ĉevaloj kun la brulstampitaj markoj de la Ĥano aŭ de la klano sur la lumbo, enfermejoj por la gregoj el brutoj, kaproj kaj ŝafoj, kunpuŝitaj ventro ĉe ventro interne de vastaj terenoj, en la vaporo de siaj fekaĵoj kaj la suprenfumanta polvo, en nuboj de obtuze zumantaj muŝoj.

Tie seninterrompe estas melkataj ĉevalinoj, kaprinoj kaj bovinoj, laŭ malnova ordo tiel dividite ke nur viroj melkas la ĉevalinojn, nur virinoj la kaprinojn kaj bovinojn, sub supervido de elrektigitaj idoloj kiuj ĉiam ricevas gustumi iom el la lakto kaj responsas pri tio ke ĝi sin tenu freŝa en la ledositejoj kaj lignotinoj.

Vira laboro ankaŭ estas per dikaj bastonoj bati la pendigitajn ledosakojn kun ĉevalinlakto, por akceli la fermentadon kaj ŝanĝi ĝin en kumison, dum la virinoj zorgas pri la bovin-kaj kaprinlakto por prepari el ĝi buteron kaj kazeon.

Daŭre por la Ĥano estas ĝuo enspiri la acidetan odoron ĉirkaŭ tiuj laboroj: tiam li scias ke li estas proksima al la praoolda kaj daŭrema en la malnova vivmaniero de la mongoloj.

Sed ankaŭ la ŝanĝojn li vidas, ilin perceptas preskaŭ de tago al tago, novajn morojn kaj kutimojn kiuj enpenetras, tiom da elementoj de fremduloj kaj fremdaj aferoj:

Malsanoj estas kuracataj per ardigitaj pingloj profunde enpikitaj en la korpon, tumoroj estas fortranĉitaj per tranĉilo kaj forĵetitaj al la atendantaj hundoj, ĝemeloj ne plu estas mortigitaj en sekreto per maŝo ĉirkaŭ la kolo, kiel io honta kaj danĝera, sed tio estas turnita en ceremonion kun spektantoj.

Ŝamanoj ne plu fortiriĝas por ekzorci malbonajn spiritojn

el forlasitaj tendumejoj, skribistoj akceptas la karavanojn kaj kontrolas la enstokadon de la varoj en la magazenoj, virĉevalidoj ne plu estas kastritaj de sia posedanto sed de iu malhelhaŭta fremdulo kun virinmanoj, multaj estas ebriaj kiam la lano de la ŝafoj estas tondata kaj donas al la bestoj sangantajn vundojn.

Viando ĉiam pli ofte estas rostata sur ŝtonoj aŭ ferplatoj hejtitaj en la fajro, majstroforĝisto malŝparas sian tempon forĝante birdojn el fero pli grandajn ol agloj, nanoj estas indulgitaj por esti uzataj por specialaj komisioj en militoj, viro ektrovis manĝeblan rezinon de arbo kaj ĝin disdonadas inter la infanoj.

Anstataŭ virinoj kiuj kudras felbotojn per ostaj kudriloj viroj komencis fari tiun saman laboron per kudriloj el metalo, nur iuj unuopuloj ankoraŭ estas lertaj en la arto tajli fiŝkaptajn hokojn el ostoj, diversspecaj ludoj per globetoj, kubetoj aŭ kartoĵoj fariĝas ĉiam pli popularaj kaj devas pli malpli frue esti malpermesitaj.

Konkoj el la maro fariĝis ŝatataj, iras de mano al mano por ke oni aŭskultu la ondomuĝeton en ili, kaj oni miras pri tio same kiel pri la informo ke bestetoj vivis en la konkoj kaj ilin estigis.

Plejparte olduloj sin okupas per surgluado de stirplumoj al sagoj, la plumoj venas de anasoj kaj estas moligitaj per mergado en oleo, ĉiam malpli multaj faras al si ĝenon iri en la kanejojn por kolekti birdovojn por manĝoj, sed ankoraŭ okazas ke iu venas rajdante kun rabita virino antaŭ si sur la ĉevalo, li ŝin trenas en sian jurton kaj multaj aŭskultas por ŝiaj krioj aŭ ŝia silento.

Simioj vekas atenton kaj logas al rido ĉar ili imitas homojn,

inter la kataĵoj estas dirate ke iliaj cerboj estas bongustaj se manĝataj vivaj, fariĝis necese ke virinoj kiuj ploras kaj plendas tro longe post iu morto estu punataj per certa nombro da vipofrapoj, daŭre okazas ke marmotoj estas kaptitaj por esti kuiritaj en sia haŭto kaj senfeligataj dum la manĝado.

Ne pokaj travivis rompinte la spinon kaj estas paralizitaj tiel ke ili devas esti portataj de virinoj el kaj en la jurtojn, mal-sanuloj dormas inter bestoj por saniĝi nun kiel antaŭe, sed ĉevaloj kiuj perdis unu okulon ne plu estas mortigitaj sed estas transigitaj al la trajno, el hundoj kiuj bojas dum la dormo ĉiam malpli ofte la koro estas ŝirita de ŝamano por ke riveligu iliaj sekretoj.

Ĉiam pli da virinoj lasas la ungojn kreski tro longaj, tio atestas pri kreskanta nenifarado kaj pigro, multaj ankaŭ ne kontentiĝas je sia naturaodoro sed aspergas sur sin odorantan akvon el malgrandaj flakonoj, fremduloj venas el ĉiuj direktoj kaj kredas ke ili povas foriri laŭ sia plaĉo, al ĉiuj estas preparataj ripozloko kaj nutraĵo sed ili devas havi permeson por pluri.

La ŝtormo forŝovegas la tegmenton de kelkaj domoj, aspektas sufiĉe komike kaj estas malfacile ne ridi pri tio, tute alia afero estas kiam jurto estas ŝirita de la grundo kaj forturbas dum la perpleksita familio volvas sin en felojn kaj tapiŝojn por tiujn restigi, sed estas rulata en ilin de la vento kaj forportiĝas super la grundo.

Iu venas kun ŝtoniĝintaj dezertrozoj kaj montras ilin, laŭ la koloro ili estas kiel ekskremento kaj sen belo kaj ili sentiĝas pezaj kaj aspraj por la mano, al kio do ili servu, estas parolate pri arboj el fero kiuj nigradas sen folioj tra la jaro, samkiel

estas asertate ke troviĝas montoj el metalo kaj montoj kiuj sangas ĉiumonate kiel virinoj.

Kuras famoj pri fremdaj virinoj kiuj havas la kutimon manpremi la testikojn de la viroj tiel ke la semo elŝprucas trofrue, kelkaj el la fremdulvirinoj asertas ke la viroj fetoras el la buŝo kiel rabobestoj, sed ĉu ili allogiĝas de tio aŭ forpuŝiĝas ŝajnas malcerte, okazas ĉiam pli ofte ke la virinoj ne portas siajn mamojn nature platigitaj sed nenature levitaj de la vesto aŭ de apartaj vandoj, tiel ke aspektas kvazaŭ ili havus pli da lakto ol ili vere havas.

Ofte okazas nuntempe ke batalulo devas esti mortigita ĉar lia armilo rustiĝis aŭ estas malzorgita alimaniere, kelkaj viroj kiuj vidis la maron ŝajnas neniam povi ĝin forgesi sed pludaŭre parolas kaj sonĝas pri la granda akvo, pri ĝia potenco kaj senfino, io kio facile povas vekti maltrankvilon je nenia utilo.

Rajdanto persekutata de vespoj vekas ridon kiam li klopodas rajdi for de ili, tio similas al batalo kontraŭ nevidebla malamiko, la kamelpelistoj estas malestimataj de la rajdistoj, sed la kameloj mem malestimas ĉiujn same kaj aspektas kvazaŭ ili intencus kraĉi sur ilin, tiuj estas bestoj al kiuj malfacilas kutimiĝi por tiu kiu ĉiam kutimis vivi inter ĉevaloj.

Ĉiujn tiaĵojn la Ĥano rimarkas kiam li pasas, nerimarkite de la plej multaj, en sia simpla rajdvesto, kun la ĉapelo sobritita sur la frunton, malrektiĝinte sur sia ĉevalo, sen videbla fiero kaj sen regentosignoj, ĉiam pensante, meditante, planante en si mem.

La juna Timuĝin restadis jam kelkan tempon ĉe la ĥano Daj-Seĉen, parte kiel batalulo kaj ĉevalprizorganto, parte kiel honorata gasto kaj estonta bofilo, kun la rapida Byrte antaŭ la okuloj: tiam venis sciigo ke lia patro kuŝas mortiganta post kiam li estis venenita ĉe vizito al fremda orduo,

kaj Timuĝin urĝe adiaŭis, forrajdis sola kun tri ĉevaloj ne ripozante dum la longa kaj dura rajdo, nur de tempo al tempo ŝanĝante ĉevalon, sed kiam li hejmenvenis al la orduo de la tribo la ĥano estis jam mortinta,

kaj Timuĝin malgraŭ sia juno prenis lokon kiel ĥano en la jurto de la patro, sidis tie sur la blanka ĉevalfelo kun la regentoklabo en sia mano, juna knabo kiu faris sian vizaĝon severa, kaj apud li sidis la patrino, la malhela Ulun kun la nigre fajrerantaj okuloj kaj la larĝaj koksopelvoĵoj.

La malbonsorto ilin frapis dure, la morto de Jesugaj-Bagatur sekvigis katastrofon al la tribo, li ĝin kuntenis kaj vastigis ĝian potencon, tenis aliajn tribojn subigitaj kaj devigis ilin tributi dekonaĵon, granda estis lia famo kiel batalanto kaj ĥano,

nun kiam li estis for la diseriĝo tuj efikis, la subigitaj triboj ribelis, multaj ankaŭ en la propra tribo rifuzis agnoski la junan Timuĝin ĥano kaj komencis foriri en diversaj direktoj, por mem serĉi paŝtejojn kaj militpredon aŭ meti sin sub ŝirmo de iu alia ĥano,

sed la agoforta Ulun raptis al si la regentosignon, la standardon kun la naŭ poefagvostoj, kaj ĵetis sin sur ĉevalon, rajdis post la fortiriĝantaj aroj kaj klopodis haltigi ilin, terenplantis la standardon antaŭ ilin kaj ĵurpetis ilin reiri kun siaj tendoĉaroj kaj gregoj: kelkaj ekhezitis kaj akompanis Ulun reen al la orduo, sed la plimultaj pluiris.

Timuĝin daŭre sidis en la regentojurto, obstine okupis la lokon de la ĥano kaj rifuzis fuĝi, malgraŭ ke li komprenis ke la adversuloj volas lin forekspedi kaj nomumi iun alian ĥano, Ulun ne bezonis persvadi al li kuraĝon, ŝi iradis tie morna kaj malceda, atendente la plej malbonon.

Iam ŝi mem far Jesugaj estis forrabita de la merkitoj, la sovaĝa batalula tribo kiu venis de la tundroj kaj praarbaroj norde, nevola nuptulino kiun la ĥano devis klini kaj cediĝi perforte, ĝis ŝi naskis liajn filojn kaj transiĝis al la luktema sindono de lupino,

sed ankoraŭ ne la merkitoj venis por venĝi sin, sed la malamikaj kaj insidaj tajĝigutoj, gvidataj de sia ĥano Targutaj, kiu kun grandaj rajdantaroj tiriĝis al la orduo de Timuĝin, forpelis la gregojn kaj ekatakis la ĉefulan tendon,

kontraŭstaro estus senŝanca, nur fuĝo eblis, Timuĝin kaj liaj tri fratoj kun iliaj plej proksimaj duonfratoj sukcesis surĉevale eskapi supren sur arbarozajn montdeklivojn, serĉante al si vojon inter rokfendegoj kaj profundaj ravinoj, inter klifoj kaj ŝtonblokoj,

ĝis ili ĉe la alveno de mallumo sin kaŝis en groto, krom Timuĝin kiu sola pluiris supren sur la monton kaj malgraŭ sia elĉerpita ĉevalo sukcesis eviti ke la persekutantoj lin atingu, sed li ne kunportis provianton kaj povis trovi nenion manĝe-

blan, tial la malsato baldaŭ devigis lin fari klopodon trairi la vicojn de la tajĝigutoj,

tiam li estis malkaŝita kaj kaptita, kondukita ĝis antaŭ Targutaj kaj oni devigis lin genui antaŭ tiu, la ĥano ruze ridetis kaj malestime rigardis la kaptiton, ne mortigis lin sed anstataŭe lin humiligis ĉenante lin al kango, peza ligna jugo sur la ŝultroj, kun la brakoj etenditaj kaj ligitaj per feraj katenoj,

post kio li estis metita en severe gardatan jurton sur kibitko, kiu balanciĝante kaj grincante forruliĝis kune kun gregoj kaj batalularoj, li ne povis vidi eksteren sed klopodis elaŭskulti kien ili veturas, de kie venas la vento, ĉu susuras en arboj, ĉu ili veturas tra alta greso aŭ ĉu la sono de akvo indikas riverpason,

li kredis ke li estas certa ke ili parte veturas tra arbaro kaj ke ili trapasis riveron kun akvo kiu atingis ĝis super la radaksoj, kaj samvespere kiam ili jam bivakis li aŭdis kiel la bataluloj foriris al ia celebrado kaj nur unu sola gardisto restis en la tendoĉaro,

li kaptis la okazon, faris subitan salton kontraŭ la gardiston kaj alsvingis la kangan tiel ke tiu falis kaj restis senmova, li eliĝis el la jurto, desaltis de la ĉaro kaj sin ĵetis en arbedaron, elmetite al la lumo de la leviĝinta plenluno,

poste li kuris kiompove rapide tra la arbaro kun la peza kango sur la ŝultroj kaj kun la etenditaj brakoj, kiuj frapis kontraŭ arbotrunkojn kaj riskis fiksiĝi en la vepro, li direktis sin reen al la rivero kiun ili pasis kaj ĝin ĝisvenis antaŭ ol la persekutantoj lin atingis,

li paŝis en la riveron, vadis tra la zono de kanoj kaj mergis sin en la fridetan akvon, tiel ke li ripozis kun la dorso kaj la kango kontraŭ la fundo kaj tenis nur la vizaĝon super la ak-

vosurfaco, la persekutantoj cirkumrajdis sur la bordoj kaj serĉis lin, iliaj hundoj perdis la spurojn apud la rivero kaj la bataluloj ŝajnis nedecidemaj,

sed kiam Timuĝin sekvis ilin per la rigardo, nesingarde kun malfermitaj okuloj, li subite renkontis la rigardon de unu el la persekutantoj, li komprenis ke li estas malkovrita kaj ke la fuĝo al nenio utilis, sed post mallonga hezito la viro forturnis la kapon kaj pluiris kun la aliaj ne perfidante lin,

Timuĝin jam povis rimarki ke la viro ne estas unu el la tajĝigutoj, sed fremdulo kiu restas inter ili, kaj pripensinte sian situacion li decidiĝis por aŭdaca provo, li reŝteliĝis en la lagron kaj sukcesis trovi tiun jurton kie la fremdulo sin tenas,

malseka kaj ŝlima li trenis sin en la tendon, la viro timigite lin algapis en la malabunda lumo de la fajro, la junulo sin ĵetis antaŭ lin kaj petis lian helpon, la fremdulo kiu gastis ĉe la tajĝigutoj trafis en malfacilan situacion, li opiniis ke li ne povas elliveri la junulon, sed riskos sian propran vivon se li helpos lin,

certe estis io ĉe Timuĝin kio igis lin venki sian heziton, li rompis la ferajn katenojn, dishakis la kangojn kaj ĝin ĵetis sur la fajron, lasis la junulon sin kaŝi en ĉaro ŝarĝita per lano, ke li ne estu trovita se la tajĝigutoj eksuspektos kaj traserĉos la jurton,

kiam la danĝero ŝajnis pasinta Timuĝin ricevis manĝi kaj trinki, antaŭ ol forkuri li dankis la viron kaj demandis lin kiu li estas, ricevis la respondon ke li nomiĝas Sorku-Ĉira kaj estas ĉasisto de la Suldu-tribo, la junulo tiam diris kun la digno de juna ĥano ke rekompenco pro lia ago ne malestos,

post tio Timuĝin singarde elŝtelis sin el la jurto, trovis ĉevalon kaj forrajdis rapide de la tendaro de la tajĝigutoj.

Byrte iradis hejme en la jurto de la patro kaj atendis, ŝiaj gri-
zaj okuloj radiis de vivemo, la pintaj mamoj siluetis tra la ve-
sto, ŝi estis tute preta akompani la junan ĥanon kiam ajn li
venos por akompanigi ŝin,

sed tio daŭre malfruis, Timuĝin ankoraŭ ne povis pensi pri
venigi sian nuptulinon, li estis tro okupata por savi sian vivon
en neegala lukto kontraŭ siaj malamikoj.

Reveninte post la fuĝo el la kaptiteco li trovis la tendejon
de la familio forlasita, sen eĉ postlasita signo, nenio krom
stamfita cindro kaj iom da brutfekaĵo ne utiligita,

sed li trovis la spurojn de kelkaj ĉevaloj kaj sekvis ilin, fine
ĝisvenis la familion, la patrinon kun la revenintaj fratoj kaj
duonfratoj, la fratineto Temulun kaj kelkaj grave elĉerpitaj
ĉevaloj,

ili serĉis ĝis ili trovis orduon kie ili havis fidelajn partianojn
kaj komencis post tio cirkumvagadi vizitante diversajn tenda-
rojn por elpostuli la dekonaĵon de la ĥano, kiu estis nevole aŭ
tute ne donata, ĉar ja Timuĝin ne havis potencon iun devigi.

Antaŭ ĉio ili nun devis transvivi per ruzo kaj sinmovado,
eviti la malamikojn, rezigni pri la bonaj paŝtejoj ĉirkaŭ la ri-
veroj kaj teni sin sur la altebeno, Timuĝin en tio sin montris
ak ruza ak persista, li gajnis kreskantan respekton kaj ĉiam pli
multaj lin sekvis, precipe junaj batalantoj kiuj tiriĝis al li pro
liaj aŭdaco kaj agemo,

li ĉiam ripete faris rapidajn atakojn kontraŭ malamikaj kla-
noj, ŝtelis brutarojn kaj prirabis jurtojn antaŭ la okuloj de la
superforto, tuj malaperis kiel ŝtormvento kaj ne eblis kapti
lin, ĉirkaŭis lin aplombo kaj gajo, bruaj laŭtaj ridoj, sovaĝaj

bravaĵoj, ŝtrapacoj kalkulataj kiel nenio kaj subitaj malavaraj festenoj,

sed ĉiam li prokrastis viziti Daj-Seĉen, la potencaĵon, kies filino lin atendis, ĉar li malvolis veni kiel helpopetanto kaj senposedulo, povra mizerulo, kaj el tiu sama motivo li ankaŭ ne turnis sin al la ĥano de la karajtoj, la eĉ pli potenca Togril, la batalfrato kaj alianculo de lia patro, kiu sidis enfortikigita en riĉaj, murĉirkaŭitaj urboj pli okcidente.

Pasis du tri jaroj antaŭ ol li pretis venigi sian nuptulinon, sentis sin sufiĉe forta kaj sukcesa, juna ĥano kiun akompanas batalfortuno, kaj tiam li venis surprize kiel kirlovento, akompanate de plurcentoj da junaj batalantoj, kun multaj ĉevaloj ŝarĝitaj per donacoj, silkaj vestoj, arĝentaj vazoj, peltaj manteloj, kostaj armiloj kaj ornamaĵoj, ĉio rabita de karavanoj en la dezerto aŭ el riĉaj jurtoj,

la rajdantaro sturmis en la orduon de Daj-Seĉen, kriante kaj gestante per la armiloj kvazaŭ temus pri atako, ili estis vestitaj en tanita ledo kaj portis brustkirasojn kun timigaj bildoj en fortaj lakfarboj, ili svingis longajn lancojn kun flirtantaj ĉevalvostoj kaj ornamaj rubandoj, iliaj vizaĝoj estis ŝmiritaj per ŝafsebo kontraŭ la frosto kaj striaj pro ŝvito kaj malpuro,

la hundoj ĵetis sin kontraŭ la entrudiĝantoj sed estis fortimigitaj de la kirliĝantaj ĉevalhufoj, neniu trovis tempon ekkapti la armilojn antaŭ ol la rajdantoj kun laŭta ridado jam subite ekhaltis en polvonubo antaŭ la jurto de la ĥano, Timuĝin saltis de la ĉevalo kaj kuris al Daj-Seĉen, ĵus paŝinta el la tendaperturo, fleksis siajn genuojn antaŭ li kaj poste rapide ekstaris kaj sin ĵetis en lian brakumon.

Poste ekiris la festenoj kiuj daŭris dum tri tagoj kaj noktoj,

ŝafoj kaj ĉevaloj estis buĉataj, viando estis seninterrompe boligata en la grandaj kaldronoj, la fajroj flamis alten, kumiso kaj rizvino estis enverŝataj, la trinkaĵoj superondetis la trinkvazojn kaj fluis malsupren laŭ la mentonoj kaj vestoj, buŝharpetoj kaj flutoj sonigis sian muzikon kaj la viroj dancis unuj ĉirkaŭ aliaj, profunde genufleksante en siaj molaj cervofelaj botoj,

en la tria tago Byrte estis prete vestita en sia edziniĝa kostumo kaj atendis en la jurto, sidis kvieta kaj silenta, aŭskultante la bruon de la festeno kaj de tempo al tempo entiris profundan spiron, sidante en sia ĝispieda vesto el blanka felto kun alta baktago surkape, konusforma betulŝela ĉapeto kovrita per silko kaj glimanta de arĝentmoneroj kaj malgrandaj spegulpecoj, kun la malhelbrunaj haroj plektitaj kaj volvitaj ĉirkaŭ la verto,

ŝi atendis la foriron, streĉita kaj fervora antaŭ tio kio okazos, enuanta pri tiu festeno kiu estis precipe por la viroj kaj preskaŭ ne koncernis ŝin, nur igis ŝin senti sin eksterulo, brule senpacienca nun post sia longa atendado kaj preskaŭ ofendita,

sed la momento ĉiam plu sin alvenigis, kaj tuj kiam ŝi aŭdis ke la forveturo alnunas, ke la gastoj pretas eksidi la ĉevalojn, tiam ŝi elfuĝis el la jurto rapide kiel mustelo malgraŭ ke la longa vestaĵo malhelpis al ŝi kuregi kaj la tintado de la arĝentmoneroj kaj la rebrietoj en spegulpecetoj tuj perfidis kie ŝi estas,

Timuĝin ekkuradis post ŝi, inter la jurtojn, inter virinoj kaj servistinoj kiuj laŭ la moro sin metis en la vojon kaj faris sian plejebulon por lin malhelpi, vokante kaj ridante, sed nenio povis haltigi la junan ĥanon, li atingis sian nuptulinon kaj ŝin

kaptis, tio ne iris tro rapide nek daŭris tro longe, la ceremonio portis honoron al ambaŭ, kaj li portis la baraktantan Byrte al sia ĉevalo, ŝin levis ĝis sur la alta selo kaj svingis sin mem supren malantaŭ ŝin,

tiel Timuĝin elrajdis el la orduo foren al la dezertebeno kun sia edzino, sekvate de sia kantanta kaj vokanta aro da junaj batalantoj.

Novedza kaj aplomba Timuĝin nun decidis viziti la grandĥanon Togril, venis al li konfidplene kiel adoptofilo en lian urbon Karakorum, kunportis taŭgajn donacojn kaj miris pri ĉio kion li ekvidis en tiu ĉefurbo de la karajtoj kun ĝiaj mallarĝaj stratoj interne de la muroj, inter domoj el ruĝbakita argilo aŭ sunpaligita ligno,

sed verdire li tute ne lasis sin blindumi sed sentis sin kritikema kontraŭ multo, li atente malfermadis la okulojn kaj zorge rimarkis ĉion, samtempe li zorgis ke Togril lin trovu pli naiva kaj nesperta ol tiu atendis, sufiĉe nedanĝera kaj malferma por ke la singarda maljuna ĥano permesu al si lin ekŝati.

Timuĝin ne petis helpon, nur forrajdis kun la redonacoj kiujn li ricevis kaj kunportis siajn impresojn, siajn sekretajn pensojn: Togril certe estas supermezure riĉa kun signifa potenco, avara kaj ruza, sed ankaŭ pigra kaj komfortema, maljuna vulpo kiu nenion riskus sen plani en ĉio nur sian propran avantaĝon,

kaj lia urbo al Timuĝin pli malplaĉis ol allogis, enfermita kaj sufoka kun siaj domoj kaj fortikaĵoj, kun sensenca superabundo, eksceso kaj malvirtoj, febligataj viroj ornamitaj preskaŭ kiel iliaj putinaj virinoj kaj ĉirkaŭataj de artefarita bono-

doro, kun akvo malŝparata por senutilaj ĝardenoj kaj flormasoj, kun muroj eble nepenetreblaj sed kredeble venkeblaj alimaniere.

Timuĝin revenis al sia orduo kaj atendis en fido, sed sur la altebena kaj en la rivervaloj regis malkvieto, diversaj triboj denove ekbatalis reciproke kaj subite la teruraj merkitoj venis el norde, ili estis tiel ruzaj kaj rapidaj ke ili fulmatakis la junan ĥanon en lia orduo, ensturmis tie meznokte, hojlante pli terure ol lupoj sur siaj ĉevaloj, ĵetis brulantajn torĉojn en la jurtojn kaj morthakis tiujn kiuj elvenis,

Timuĝin sukcesis eskapi, ĵetis sin sur ĉevalon kaj malaperis en la mallumon sur la ebenaĵo, dum la orduo malantaŭ li brulis kaj la ululoj de tiuj kiuj mortigis kaj de tiuj kiuj estis mortigataj daŭris sonante en liaj oreloj,

en la sekva tago li kolektis siajn transvivantajn batalulojn ĉirkaŭ si kaj kiam ili revenis al la orduo ili trovis la malamikojn for sed la pli multajn jurtojn bruligitaj aŭ prirabitaj, multajn homojn mortintaj kaj kelkajn el la virinoj forkondukitaj, inter ili ankaŭ Byrte, la juna edzino de la ĥano kiun li tiel ĵuse alvenigis.

Nun Timuĝin denove direktis sin al Togril en Karakorum kaj petis pri ties apogo por ataki la merkitojn, kio estis en la intereso de la grandĥano mem ĉar la merkitoj povus sin turni ankaŭ kontraŭ lin, li tial disponigis negrandan armeon por plifortigi la mongolan batalantaron, la merkitoj estis persekutataj sub la gvido de Timuĝin kaj estis surprize atakitaj en sia tendaro en nokto kun lunlumo,

granda konfuzo ekestis, la konfuzvekitaj merkitoj devis lukti surpiede dum la atakantoj alsturmis surĉevale, algalopis

inter la jurtoj, ŝrikadis harstarige, mortpikis per la lancoj, hakis per la glavoj, lasis pluvi la sagojn,

la venko nepris jam dekomence kaj Timuĝin precipe serĉis Byrte, cirkumkure sin ĵetis per sia ĉevalo inter la tendojn kaj vokis ŝian nomon fojon post fojo, ĝis ŝi aŭdis ĝin kaj elkuregis el jurto, li rapide levis ŝin sur la ĉevalon kaj forgalopis el la batalumulto kun ŝi.

Krom esti rabekspedicio, la atako de la merkitoj kontraŭ la orduo de Timuĝin estis planita virinrabo, rankora sinvenĝo pro tiu virino kiun lia patro rabis de la merkitoj kaj faris sia edzino, okazis eĉ ke Byrte estis donita al tiu sama viro kiu perdis Ulun antaŭ jardekoj,

kaj nun Byrte montriĝis graveda per sia unua infano, kiu povus esti de Timuĝin sed same povus esti de la alia viro, la junaj geedzoj neniam priparolis tion unu kun la alia, sed la dubo alestis, ĉe Timuĝin kaj eble ĉe Byrte mem, la neeldirita daŭris starante inter ili, sed estis repuŝata de ilia reciproka fiero,

kiam filo naskiĝis tamen lin bonvenigis Timuĝin kaj li neniam suferis pro la dubo pri sia origino, sed li ricevis la nomon Djutji kiu signifas Gasto.

Dekomence regis tensio inter Byrte kaj Ulun, la juna edzino montris volon kiu ne volonte sin klinis sub tiu de la bopatrino, Ulun ne volis rezigni pri io el sia influo sur la filon kaj Byrte siaflanke ne prokrastis provi realigi sian potencon super la edzo, ĉiu el ili volis turni lin kontraŭ la alian,

nun la pozicio de Byrte estis eĉ fortigita pro ŝia forrabo, ŝi fariĝis eĉ pli valora por Timuĝin post kiam li perdis kaj repre-

nis ŝin, objekto de lia kreskinta fiero kiel viro kaj kiel batalulo, ĉar ke ŝi alapartenis aliulon per forto ne malpliigis lian senton por ŝi, male,

kaj Byrte revenis ne nur kiel estonta patrino sed kiel pli sperta virino, kiu eltoleris superforton kaj suferis ne ruiniĝante, ŝi per tio gajnis kreskintan respekton ĉe Ulun, kiu krome sin sentis malklare kunkulpa pri ŝia sorto, tial ke ŝi mem estis tiu forrabita virino je kiu Byrte estus venĝaĵo kaj kiun ŝi anstataŭus.

Timuĝin daŭre staris inter la edzino kaj la patrino, roko kontraŭ kiu ambaŭ martelis kiel ondoj, ne movante lin sed tamen iom post iom efikante sur lin, kelkfoje unuigante siajn virinvolojn kontraŭ li, kelkfoje efikante en kontraŭaj direktoj, ambaŭ saĝaj kaj klarpensaj, akritaj per sia reciproka malfido kaj sia malfido kontraŭ ĉio kio povus delogi la junan ĥanon, trompi lin aŭ enluli lin en sekurecon,

kaj ĉiam future, ankaŭ estante la potenca Ĥano, li neniam ĉesis aŭskulti ilin ambaŭ, pensi pri iliaj konsiloj kaj eble pesi ilin unu kontraŭ la alia, honori tiujn du plej gravajn virinojn en lia vivo kaj meti ilin antaŭ ĉiuj aliaj, samtempe eble je fojoj fuĝante for de ilia roda volforto, ilia obstine altruda virinreĝemo, kaj spirante pli libere dum siaj multaj kaj longaj militkampanjoj.

Timuĝin sekurigis sian regadon super la diversaj mongolaj klanoj, ŝirmite okcidente de la alianco kun Togril, sed en konstanta batalpreteco kontraŭ tajĝigutoj kaj tataroj kiuj alpuŝiĝis el oriente en la regiono inter Onon kaj Kerulen, daŭrigo

de la oldmalnova lukto inter la nomadoj pri la paŝtejoj en la rivervaloj kaj laŭ la akvofluoj.

Aŭtuniĝis iujare kiam Timuĝin survojis al novaj paŝtejoj en vallongejo, li rajdis fronte de dek tri mil bone ekipitaj bataluloj kaj longaj vicoj de kibitkoj ŝarĝitaj per jurtoj kaj sekvataj de brutgregoj kiuj dravis kvazaŭ malhelaj nuboj super gresriĉaj deklivoj,

la juna ĥano komencis senti sin false sekura en sia forto kaj jam vidis sian vivcelon antaŭ si: unuigi ĉiujn mongolojn sub sia rego kaj certigi sian rajton pri tiu parto de la altebena kaj la rivervaloj kiujn li konas.

Tiam subite revenis kelkaj elsenditaj gvatantoj sur anhelantaj ĉevaloj kaj sciigis al la ĥano ke malamika armeo aperis kaj proksimiĝas kun granda rapido, tio estas tajĝigutoj gvidataj de Targutaj, la malnova malamiko kaj kaptinto de Timuĝin, kaj ilia nombro estis taksata je tridek mil,

Timuĝin povus fuĝi kun siaj batalantoj kaj eskapi sur freŝe ripozintaj ĉevaloj, sed li ne povus preni kun si la tendoĉarojn, la familiojn kaj la gregojn, la posedaĵojn kaj ekzistorimedojn de la klano, kaj rajdi kontraŭ la malamikojn kaj renkonti ilin batale alportus certan malvenkon,

estis nenia tempo por pripensado aŭ konsiliĝo, Timuĝin agis rapide kaj klarvide, kun sia aparta kapablo tuj koncentriĝi kaj akriĝi sin plej ekstreme, li signalis al siaj bataluloj kaj al siaj ceteraj homoj per trumpetsonoj kaj levitaj standardoj,

la kibitkoj estis metitaj tiel ke ili formis vastan, apertan kvadraton kaj tien la gregoj estis kunpelataj, virinoj kaj knaboj armitaj per pafarkoj devis loki sin en la jurtoj sur la ĉaroj aŭ en ŝirmo malantaŭ ili, dum la rajdantoj ekpostenis inter la arbarkovritaj deklivoj kaj la kvadrato formita per la kibitkoj,

kie ili sin formis en taĉmentojn, ĉiu kun cent rajdantoj en linio kaj dek vicoj unuj post la aliaj, tiel ke la tuta batalantaro nombris dek tri formaciojn de po mil viroj.

La malamika armeo antaŭensturmis kontraŭ ilin en pli leĝeraj formacioj, ĉiu taĉmento estis profunda nur kvin liniojn kaj la unuaj du linioj estis bone ŝirmataj per kirasoj kaj helmoj, la unuaj el ferladoj aŭ plektitaj feraj ĉenoj, la aliaj el durlakita ledoj, kaj armitaj per rondaj, facile manovreblaj ŝildoj kaj longaj lancoj kun kvastoj el ĉevalkrinoj,

tiuj antaŭaj linioj subite forcedis ĵus antaŭ la batalkontakto kaj tralasis la tri malantaŭajn liniojn, kiuj konsistis el pli leĝere armitaj, pli movaj rajdantoj, kiuj antaŭengalopis por depafi siajn sagojn kaj ĵeti siajn mallongajn lancojn, antaŭ ol ili rapide ĉirkaŭturniĝis kaj retrorajdis, tiel preparante vojon por la pli pezaj rajdistlinioj.

Sed la pafarkistoj de Timuĝin en la dek liniojn profundaj formacioj renkontis la atakantojn per mortigaj sagoskualoj de pafarkoj fortikigitaj per kornaj garnaĵoj kaj estis mem ŝirmataj de rajdistlinioj kun levitaj ŝirmiloj kaj ledokovritaj ĉevaloj, poste tiuj trabreĉis kun granda pezo, dense kuntenaj ak flankdirekte ak profunde, flanke ŝirmataj de la arbardeklivoj kaj la fortikaĵo el ĉaroj,

la kunteo kaj forto en la atako de la formacioj de Timuĝin disŝiris la multe pli nombrajn sed pli maldensajn rajdistotaĉmentojn, ĝis la ripetaj atakoj transiris en densluktojn kun kriegoj kaj sovaĝa furiozo, kie la bataluloj atakis unu aliajn per lancoj kaj kurbaj sabroj, puŝis la adversulojn el la selo aŭ ilin sobtiris per ĵetitaj ŝnurmaŝoj, dum seninterrompa zumado de sagoj kiuj enfrapiĝis en best- kaj homkorpojn kun duraj batoj kaj stridaj sonoj de vibrantaj sagotigoj,

la luktoj ondis antaŭen kaj reen kun nefebliĝanta furiozo ĝis la vespera krepuskiĝo, kiam Targutaj ordonis retiriĝon kaj fuĝis kun sia restanta armeo, lasante preskaŭ ses mil falintojn, kun sepdek el siaj plej gravaj ĉefuloj kaptitaj.

Per tio Timuĝin gajnis sian unuan grandan venkon, kaj li ordonis bivaki sur la loko, fari fajrojn kaj prepari la viandon de mortintaj ĉevaloj, la kaptitaj ĉefuloj estis kondukitaj antaŭ lin kaj devis genui kiel signo de sia submetiĝo, Timuĝin hezitis en la elekto inter mortigi ilin aŭ preni ilin en sian servon, meze en la triumfo li estis iom desrevita pro tio ke Targutaj mem ne troviĝas inter la kaptitoj, ne spertas la honton sisi humiligata kun kango sur la ŝultroj.

La alianco inter Timuĝin kaj la karajto-ĥano Togril konfirmiĝis, kaj la mongolaj rajdantoj nun batalis ĉe la flanko de la karajtoj por rebati ripetajn atakojn de okcidentaj triboj, kiuj ĝis tiam estis nekonataj al Timuĝin, kaj li daŭrigis ĉiam pli tiri al si junajn aŭdacajn komandantojn kaj batalulojn, dum liaj scioj pri militarto ĉiam kreskis.

Grandan sukceson li atingis kiam prosperis al li persvadi Togril partopreni kun armeo en atako kontraŭ la tataroj oriente ĉe Kerulen, kie ili en tiu tempo sin trovis en milito kontraŭ kataja armeo, sendita de la Ora Imperiestro de Kin, la norda parto de Kataj,

la tataroj trafis inter la katajojn kaj la trupojn gvidatajn de Timuĝin, subite ili trovis sin ĉirkaŭitaj kaj suferis teruran malvenkon, pri kiu la kataja generalo honoris sin, sed kiu tamen kondukis al tio ke Togril estis nomumita Wang-Ĥano, aŭ Princo super la ĥanoj, kaj Timuĝin ricevis la titolon Koman-

danto kontraŭ la ribelantoj kaj krom tio lulilon el arĝento kiel donacon.

Tiu sukceso plurflanke vekis envion kaj timon pro la kreskanta potenco de Timuĝin, multaj triboj pretis sin turni kontraŭ lin por ne fali sub lian regon, kaj lia antaŭa sekvanto Djamuga ekgvidis ilin, la filo de Togril mem subfosis la pozicion de la juna mongolĥano inter la karajtoj, la olda Wang-Ĥano ŝanceliĝis en malplaĉa nedecidemo, trompo kaj perfido ŝvebis ĉie en la aero,

kaj iutage kiam Timuĝin troviĝis en granda ĉaso kun kelkmiloj da siaj bataluloj, ne malproksime de la regionoj de la karajtoj, li eksciis de iuj paŝtistoj ke batalantaro sub la gvido de Djamuga estas survoje, celante surprize supervenki lin kaj rabi al li la vivon,

rapidtuje kun siaj ĉevaloj li forlasis la tendojn sed restigis la jurtojn kaj lasis bruli la fajrojn, kaj kiam Djamuga atakis li trovis nur forlasitan tendovilaĝon kaj devis ekpersekuti, kaj ĉe tio Timuĝin ekhavis la avantaĝon povi elekti terenon lin favorantan por renkonti la alsturmon de la karajtoj,

fariĝis despera lukto por la tre subnombraj fortoj de Timuĝin, ĝis la filo de Togril estis vundita en la vango kaj la karajtoj provizore retiris sin, interrompo kiun Timuĝin tamen tuj povis eluzi por forfuĝi de tie kun siaj batalantoj kaj eskapi en la arbarojn sur la deklivoj de la Khingan-monto, por poste klopodi atingi la ĉeftendaron de la mongoloj ĉe la lago Baljuna, nordoriente de Onon.

Estis printempo kaj Timuĝin restis kun siaj homoj kaj siaj gregoj en la gresozaj regionoj ĉirkaŭ Baljuna, li plifortigis sian armeon per ĉiuj rimedoj, ĝis li en la aŭtuno estis preparita por la granda atako kontraŭ la karajtoj kaj ties aliancanoj,

nerimarkite li kondukis siajn trupojn ĝis Orkhon kaj ĉirkaŭis la tendejon de la malamikoj, atakis surprize el ĉiuj flankoj samtempe kaj daŭrigis la buĉadon seninterrompe dum tri tagoj kaj noktoj: tiam la kontraŭstaro rompiĝis, la trupoj kapitulacis, la Wang-Ĥano kaj lia filo fuĝis, ankaŭ Djamuga estis venkita kaj senpardone persekutata, la Ĥanoj kaj ĉefuloj de la merkitoj kaj najmanoj estis kaptitaj kaj mortigitaj.

Tio estis la turno super ĉiuj turno en la kariero de Timuĝin, la potenco de la karajtoj estis rompita, iliaj urboj kaj paŝtejoj kuŝis malfermaj por la konkerado de la mongoloj, la juna Ĥano rapide proksimiĝis al la celo unuigi ĉiujn mongolojn kaj ĉiujn gentojn sur la altebena sub unu solan regon.

Ekster Karakorum disvastas la dezerto, la arda altebena, foriĝanta en preskaŭ nerimarkeblaj ondoj, kelkloke rompita de ŝtonoza ravino aŭ disaj ŝtonblokoj.

La sablo kuŝas en strioj kaj linioj, konstante ŝanĝiĝanta kaj migranta, suprenŝiriĝas pro ventopuŝoj kaj leviĝas kirle aŭ bloviĝas raslante super la grundo, subite kaj kviete remetante sin en helflavajn striojn aŭ pale rozeajn amasetojn, ofte kun enŝovo de nigra sablo farbanta la ebenaĵon tigrostria, aŭ ĝi povas aperi leopardede makula pro nubombroj, nigraj preskaŭ kiel tuĉo.

Tuj kiam la Ĥano venis ekster Karakorum kaj vidas la dezertovaston antaŭ si li viviĝas kaj galopigas la ĉevalon, li spertas la eternan ĝojon rajdi, senti la ĉevalon sub si kaj ĉirkaŭpremi la vivantan korpon inter siaj femuroj, kvazaŭ fariĝante parto de la besto sur kiu li rajdas, dum li sensas la ventotiron ĉirkaŭ si kaj antaŭensturmas senobstakle, havante nur la ebenaĵon antaŭ si kaj la spacon super si.

La urbo, tiu giganta orduo, baldaŭ estas kvazaŭ glutita de la grundo, forviŝita, sensignifa, kaj la Ĥano estas libera kiel fluganta birdo, sen aĝo, sola kun si mem kaj sia ĉevalo, aŭ eble kun kelke da akompanantoj malantaŭ si.

La tero vastiĝas senlima ĉirkaŭ li kaj apartenas al li kiel ĝi ĉiam apartenis al ĉiu rajdanta nomado, super li volbiĝas la Eterna Blua Ĉielo kun kiu li estas alianca kaj de kiu li lasas sin

gvidi, tiu senfino kie la suno flamas kiel vivdonanto, origino de ĉiuj fajroj, aŭ kie la nuboj turas pli gigante ol ajnaj urboj en la mondo, aŭ kie la steloj flamas kiel popolo migranta en la mallumo kun siaj torĉoj.

La ĉagrenoj forlasas la Ĥanon, la pensoj mergiĝas en la profundon ene en li, li plilongigas la rajdon ne rimarkante la pason de la tempo, kaj se li distance vidas karavanon, rampantan antaŭen kiel milpiedulo sub longa strio el polvo simila al hela fumo, tiam li forvojas de ĝi, sed eble rajdas ĝis proksime al kelkaj kibitkoj, al unu aŭ kelkaj familioj estantaj survoje kun siaj jurtoj sur bovoĉaroj por transmoviĝi al iu nova loko.

Se li renkontas kelkajn virojn celantajn kapti libervagajn ĉevalojn, tiam li ne povas ne interesate observi iliajn farojn, ili venas galopante en la ĉevalaron kaj etendas antaŭ si siajn longajn stangojn kun ŝnurmaŝo ĉe la pinto, kaj la Ĥano scias ĝuste aprezi iliajn lerton kaj forton kiam ili dum plej ebla rapido metas la maŝon super la kapon de ĉevalo, renverstiras ĝin kaj alrapidigas por sekurigi la kapton.

Kelkfoje li ĝisvenas kelkajn jurtojn, eble okaze starigitajn sur la ebenaĵo, aŭ malgrandan orduon kiu ekloĝis tie, kaj distance li vidas la jurtojn blanke palajn kiel vesponestoj aŭ nigrajn kiel ŝtonblokoj, subtilaj strioj de blua fumo suprenkiriĝas tra la fumaperturoj kaj puŝeto de la fumo atingas liajn naztruojn, akra kaj ekscita en la dezertaero.

Se li tiam alrajdas li eble estas rekonita kiel la Ĥano aŭ eble ne, sed la gastamo samas, simpla kaj senhezita, li deseliĝas kaj eniras jurton por ripozi dum kelkioma tempo, aŭ li restas sidanta sur la ĉevalo kaj virino alvenas kaj regalas al li bovleto kun kumiso aŭ nigra teo kun aldonita ranca butero, alia viri-

no venas kun malgranda ligna pleto kun fromaĝkubetoj, kiujn li unu post alia fingropinte pinĉoprenas kaj levas al la buŝo, kaj eble alpaŝas oldulo kun fluto el kano aŭ osto, prenas ĝin per siaj malhelaj, sulkaj manoj kaj ekblovas melodion, krudan kaj klaran kiel verda junko en fluanta akvo.

Preskaŭ ĉiutage la Ĥano elsorbas rekreiĝon kaj novan forton el siaj rajdoj for de Karakorum, eksteren sur la dezertebenon, enen en la liberan mondon de la nomadoj kiu ĉiam konstante restas sama sub la Eterna Blua Ĉielo.

La Ĥano jam antaŭ longe elkomprenis ke pensoj kaj agoj naskiĝas unu el la aliaj, prenkapas unu aliajn kaj sin ŝanĝas reciproke: la penso plilongigas sin en faron, la faro pluetendas sin per siaj efikoj kiel nova penso.

Pensoj kiuj konduku al venontaj agoj povas esprimiĝi en vortoj kaj atingi daŭron per skribo, tial la skribarto ne estas nur senutila kaj vanta.

Tio estas la opinio de la Ĥano, malgraŭ ke li mem ne povas legi nek skribi, li repuŝiĝas antaŭ tiuj lertoj preskaŭ kiel antaŭ magiaj artoj, li ankaŭ trovas tian okupon subnivela al sia digno kiel regento, li estas la batalulo kiu konkeras la mondon kaj ĝin regas aŭtokrate, aliaj povas registri liajn agojn kaj la pensojn kiuj sin unuigas kun la agoj.

Pensoj povas meti fundamenton igante agojn daŭri, povas kontribui farante la konkeritan kaj atingitan daŭrema, povas esti skribataj per vortoj kaj fariĝi leĝoj kiuj konservas siajn forton kaj validon distance preter la vivo de unuopulo.

Jen kio okupas la Ĥanon pli ol eble ĉio alia: stariginte la region de la mongoloj en la mondo la restanta farendaĵo nun

antaŭ ĉio estas zorgi pri ĝia daŭro, perhelpe de pensoj kaj vortoj etendi sin en la venontecon kaj konservi la imperion kontraŭ degenero kaj diseriĝo.

Dum vivo da bataloj la Ĥano lernis fidi nur sin mem, neniam tute fidi aliajn, ne fratojn nek filojn, ne la plej fidelajn kunbatalantojn nek la plej sindonajn sekvantojn: ĉiuj havas feblaĵojn, ĉiuj havas deviajn volojn kaj ĉiuj povas perfidi.

Nur unu volo povas regi, tiu volo kiu elkreskas el li mem sed estas pli ol li mem, volo kiu harmonias kun la volo de la Ĉielo, tiu Ĉielvolo kiun aliaj ol li tiel facile povus misinterpreti, metante sian propran volon en ties lokon.

La volo de la Ĉielo, tia kiel li sola ĝin konas, tial devas esti formulita en klaraj pensoj kaj neambiguaj vortoj, dum ankoraŭ estas tempo, kaj kiu scias kiel longe lia tempo daŭros?

La Ĥano ne kutimas nombri siajn jarojn kaj certe neniu alia aŭdacas memori pri ili, li scias aŭ kredas ke li scias ke li naskiĝis en la jaro de la Porko, ene de la dekdujara bestociklo, sed kiomfoje la jaro de la Porko revenis dum lia vivo, pri tio li ne plene certas: probable li sin trovas ĉe la fino de la kvina jarciklo, sed eble de la sesa.

Tio ne multe lin koncernas, ĉar li diras al si ke neniam aĝo estas fiksita kaj neŝancebla, homoj kiuj vivis same longe kiel li tamen ne estas samaj laŭ aĝo, ĝi devas esti kalkulata de la direkto de la restantaj jaroj kaj sekve neniu konas sian veran aĝon, li mem sin konstante sentas submetita al la ŝanĝoj de la aĝo, foje li ŝajnas al si ankoraŭ juna kaj plena de forto, alfoje li sentas la pezon de la jaroj kaj la malkreskon de la forto.

Sed nemortema li eĉ dum momento ne kredas sin, eĉ ne lia senlima potenco atingas tion ke ĝi ampleksas ankaŭ la pro-

pran vivon, kaj ke neniu alia konas sekreton kiu povas konservi la vivon, tion li zorge certigis al si.

Li scias ke li ĉiam pli sin proksimigas al la nombrolimo de siaj tagoj kaj li faras al si neniajn falsajn imagojn, ŝamanojn kaj ĉarlatanojn kiuj klopodas kredigi al li ion alian li ne aprezas: mongolo scias kiel renkonti la morton, ajne kiam alvenas ĝi.

Jam longe la Ĥano estis okupata elpensi kaj elformi sian leĝaron Jassa, tiel ke la morto ne surprizu lin kun tiu parto de lia vivago neplenumita, kun tiu grandega heredaĵo kiu estas la mongola imperio neŝirmata kontraŭ la disblovo far la ventoj.

La Ĥano estas la unua regento inter la mongoloj kiu rompis la potencon de la ŝamanoj, tiel ke neniu plu staros inter li kaj la Ĉielo: ĝi estis unu el liaj pli gravaj venkoj, kiu faris lin Ĥano super aliaj ĥanoj.

La ŝamanoj anstataŭis pastrojn inter la mongoloj kaj grande influis la popolon, ilin oni pli timis ol iajn mondajn monarkojn, ĉar ili potencis super la spiritoj, tiuj misteraj fortoj kiuj ĉirkaŭas la homon ĉiuflanke.

La ŝamanoj vivis en proksima ligiteco kun Mōngke Kōkō Tengri, tio estas la Eterna Blua Ĉielo, kaj interpretis ties volon, ili tamburis kaj dancis ĝis violenta ekstazo ilin ekposedis kaj la spirito parolis el ilia buŝo, ili vidis futurajn eventojn en la flamoj aŭ braĝoj de fajro, en intestoj de ŝafoj, en flugo de birdoj, en fasko de bastonetoj ĵetitaj sur la grundon.

Revelaciojn ili ricevis en sonĝoj kaj voĉoj parolis al ili el la vento, multajn sekretajn aferojn ili konis kaj scipovis rimar-

kindajn artojn, haltigis sangofluojn per rigardo, kuracis febrojn kaj aliajn malsanojn per mansurmeto aŭ per sekretaj trinkaĵoj.

Ĉiuj blinde kredis la ŝamanojn kaj neniu aŭdacis kontesti ilin, la potenco de ĥanoj komenciĝis kie ilia potenco ĉesis, ili eĉ ne evitis submini la potencpozicion de la ĥanoj kaj vastigi sian propran, en lukto kaŝita sed malgraŭ tio ne malpli amara.

La Ĥano frue komprenis ke nur unu volo devas regi, lia propra en alianco kun la Ĉielo, kaj ke maleblas por li dividi la potencon kun ajniu ŝamano se li atingu kion li alstrebas.

Kiu plej multe lin kontraŭis estis la potenca Tebtengi, majstro de ruzaj intrigoj kiu havis multajn partianojn eĉ inter la plej proksimuloj de la tiame juna ĥano, el kiuj lia stifpatro Munlik kaj ties sep filoj apartenis al la apogantoj de la ŝamano.

La regentovolo de Timuĝin ĉiam alpuŝiĝis kontraŭ tiuj obstakloj, kiuj konsistis el la aŭguroj kaj antaŭdiroj de Tebtengi, la ŝamano enpaŝis inter lin kaj la Ĉielon por nuligi liajn farojn, haltigi lin sur lia vojo fariĝi la regento de ĉiuj mongoloj.

Tebtengi ĉirkaŭe moviĝadis atakante la fraton de Timuĝin, la grandan pafarkiston Kassar, kaj lasis al siaj viroj severe draŝi tiun, post kio Kassar plendis ĉe Timuĝin, kiu tamen ne volis aperte agi kontraŭ la ŝamano.

Pro tio Kassar kolera retiris sin al sia tendejo, kaj Tebtengi aperis ĉe la ĥano kaj klarigis ruze ke li havis revelacion: estis al li rivelite ke Kassar alstrebas fariĝi ĥano kaj se Timuĝin ne likvidos tiun fraton lia imperio baldaŭ ekapartenos al tiu.

La vortoj de la ŝamano impresis la ĥanon kaj vekis lian suspekton kontraŭ Kassar, li ekiris kun kelkaj batalantoj por kaptopreni la fraton, sed Ulun, lia akrevida patrino lin postkuris en ĉaro kaj envenis la jurton de Kassar ĝuste kiam Timuĝin minace alfrontis la genuantan fraton.

Ulun disŝiris siajn vestojn kaj nudigis siajn mamojn, parolis kolere al ambaŭ siaj filoj kaj admonis kiel patrino ilin teni pacon reciproke, Timuĝin silente aŭskultis ŝiajn riproĉojn kaj subite kvietiĝis, ekkomprenis ke li agis el timo kaj permesis al si esti trompita de la ŝamano, li hontis kaj forlasis la tendon.

Tebtengi aŭtem per tio ne kontentiĝis, sed kontinuigis ofendi Temugu, la plej junan fraton de la ĥano, kaj devigis lin genui antaŭ li, la ŝamano, kaj honori lian potencon.

Tiam Timuĝin lasis liberaj la manojn de Temugu kontraŭ la ŝamano kaj aranĝis tiel ke ili renkontiĝis en la regentojurto dum la stifpatro Munlik kaj ties filoj ankaŭ troviĝis tie, tiam Temugu ekluktis kontraŭ la ŝamano kaj komencis mezuri siajn fortojn kontraŭ tiu, sen tio ke la aliaj kuraĝis interveni.

Timuĝin malsereniĝis kaj vokis al la luktantoj ke ili tuj elpaŝu la jurton, ekstere atendis tri fortaj viroj kiuj kaptoprenis la ŝamanon, rompita al li la dorson kaj lin ĵetis sur la grundon inter la ĉaroradoj: jen kuŝis morta la timiga Tebtengi.

Munlik kaj liaj filoj nun siavice volis ataki la junan ĥanon kaj mortigi lin, sed tiu per tioma forto ordonis al ili cedi kaj lasi lin elpaŝi la jurton ke ili nevole obeis kaj lasis lin eskapi.

Timuĝin movigis sian regentotendon ĝis super la kadavro kaj ŝnurligis la aperturon, la kadavro estis levita dum la nokto tra la fumaperturo kaj forigita, en la mateno la malplena ten-

do estis montrata al la ekscititaj homoj kaj Timuĝin klarigis ke Tebtengi kontraŭis la volon de la Ĉielo, kaj tial la spiritoj prenis lian vivon kaj forigis lian korpon.

Post tiu decida paŝo al sendivida potenco, al unu sola ne-splitiĝanta volo, la juna Ĥano neniam plu permesis al ŝamano ricevi pli ol suborditan influon.

Propre la Ĥano ankaŭ fariĝis la plej alta ŝamano, malgraŭ ke li rezignis pri revelacioj kaj profetaĵoj, li lasis la serveman ŝamanon Kokekŭ proklami lin mem anstataŭanto de Tengri surtere, apoteozi lin Bogdo, sendito de la Ĉielo, enkorpigita diaĵo.

Sed kion la Ĥano kredas kaj kion li ne kredas, tion li eble eĉ mem ne precize scias, sed certe li dividas la malnovan mongolan koncepton pri la potenco de la Ĉielo, eble ankaŭ pri la ĉieaj ĉeesto kaj intervenoj de la spiritoj.

Kiu aŭ kio do estas Tengri, la Ĉielo, la Eterna Blua Ĉielo: giganta diaĵo aŭ nedifinita potenco priservata de amaj feinojedzinoj, kies maluloj estas la malicaj naturspiritoj, gvidataj de la fajrodemono Ebliss?

La Ĥano kiu konsideras ĉiujn aliajn diojn egalaj, ĉu li esceptas Tengri kiel apartan dion de la mongoloj, ĉu li gloraltigas Tengri super ĉiuj dioj samkiel Tengri gloraltigis la mongolojn super ĉiuj aliaj gentoj, ĉu la mongoloj estas elektitaj de la Ĉielo ĉar ili ĝin adoras aŭ ĉu ili adoras la Ĉielon ĉar tiu elektis ilin?

Neniu scias kion la Ĥano plej interne pensas pri tiuj aferoj, kion li siaparte kredas aŭ kion li honoras nur ostente antaŭ la popolo, li ja ne kiel la ŝamanoj povas meti sin en ekstazon

kaj paroli per la lango de la Ĉielo, li ne povas vidi ĝian volon en fajro aŭ flugado de birdoj, eĉ ne en la sonĝoj de la nokto: al li nur eblas rigardi en sin mem kaj tie elserĉi la plejinter-nan volon de la Ĉielo.

Jes, li enrigardas sin mem kiel en profundan fonton kie la lumo poiome vanuas en la mallumon, li tie vidas siajn imaĝojn estiĝi kvazaŭ el malrapida kirlmoviĝo kaj klariĝi al bil-doj, kiuj siavice transŝanĝiĝas en pensojn, komence palpaj, difuzaj, ĝis ili poiome prenas ĉiam pli firman formon, fariĝas volo, decido, ago.

Tio estas imagoj kiuj estas inspiritaj en li de la Ĉielo sed kiuj tamen estiĝas en li, elaperas el liaj internaj profundoj kaj prenas lin sub sian potencon, li tamen devas esti vigla kaj zorge atenti ĉiun videteblan komprenon, por ke nenio eska-pu lin kaj la volo de la Ĉielo ne estu misinterpretata.

Li estas la instrumento kaj portas la respondecon de in-strumento, la Ĉielo neniam malpravas kaj la Ĥano kiu estas ĝia interpretanto devas ne fari erarojn, kiuj povus disigi lin de la volo de la Ĉielo kaj konduki al malvenkoj.

Antaŭ malfacilaj decidoj, precipe en premaj situacioj, la Ĥano kutimis retiri sin kaj rajdi sola sur la ebenaĵon aŭ eĉ prefere sur monton, la plej altan en la regiono, por kiel eble plej proksimiĝi al la Ĉielo, kaj tie li genuis kun la zono ĵetita super la ŝultron kaj la vizaĝo suprenturnita, tie li longe rigar-dis supren en la spacon, en la senfinan Ĉielon, kaj alvokis ĝin per laŭta voĉo: Tengri, Tengri! Aŭskultu vian servanton, ilu-minu min pri via volo, gvidu min sur la vojo kaj estu kun mi! Asistu vian Ĥanon kiel vi ĉiam faris kaj donu al li parton de via nesupervenkebla potenco!

Tie sur la altaĵo li restis, ne ĉesis apelacii al la Ĉielo, ĝis li

sentis sin certa pri ĝia volo kaj ĝia helpo en sia entrepreno, ĝis li povis klare vidi la ĝustajn vojon kaj agon.

La fulmotondroj kutimas veni subite kiel atako, nigraj nuboj tiriĝas antaŭ la sunon, mallumo, kvazaŭ duone estus nokto, vastiĝas super la ebenaĵo, kirloventoj suprenŝiras altajn kolojn el polvo kaj sablo, alterne de mortosimila kvieto, preme peza senmoveco.

Arĝenta glitrado kiel de malseka fiŝreto tiriĝas super la grundo, la objektoj ricevas akrajn konturojn kiel glimantaj tranĉileĝoj, dornoveproj kaj sekiĝintaj tamarikoj ekstremas kvazaŭ ili luktus kun nevideblaj malamikoj, flava lumo elfalas el la spaco kiel malsano, brutoj arkigas la dorson kaj circumtretadas, scias neniuloken alvoji.

Servas al nenio forrajdi plenrapide, la fivetero baldaŭ atingas ĉiujn kiuj moviĝas sur la altebena, troviĝas nenia ŝirmo kiun oni povus serĉi kaj se oni trovas ion similan al ŝirmejo ĝi baldaŭ estas sentata kaptilo, plej bone oni renkontas la fiveteron kuŝiĝante plate surgrunde, kiel eble plej malalte, sed tiel kuŝi ŝajnas tamen ne malalte sed elmetite, senŝirmigite.

Kiam la Ĥano tiel estas surprizita de fulmotondro li renkontas tion kiel elprovon de la Ĉielo, kiel forlasitecon de la Ĉielo, mallumon kiu leviĝas el iu suba mondo kaj trastriiĝas de koleraj fulmoj, minacon kiun neniu povas kontraŭbatali, nur elteni, nenion similan al batalo potenco kontraŭ potenco, sed atakon kie nenia defendo eblas, kie forto, kuraĝo, furiozo nenion signifas.

Ankaŭ la Ĥano, la reganto de la mondo, estas devigita descendi de sia ĉevalo kiel ĉiuj aliaj kaj kuŝiĝi sur la grundo sim-

ile al mortinto, sternita kun la vizaĝo kontraŭ la grundo, distance de la ĉevalo, kiu sekvas la ekzemplon de sia mastro kaj ankaŭ kuŝiĝas kun la kapo etendita antaŭen, dum tremoj tiriĝas tra la haŭto kvazaŭ ĝi malvarmus.

La fulmotondro antaŭenruliĝas super la ebenaĵo kiel falegantaj montoj, tondroj kiuj sekvas unu aliajn seninterrompe, en ondoj kiuj rompiĝas unu super alia, krakegoj kiuj tremigas la grundon kaj kvazaŭ falas foren kiel rompiĝantaj turoj, dum la fulmoj tratanĉas el ĉiuj direktoj, plantas siajn blindigajn flamojn simile arbojn runde ĉirkaŭe, disfendas ĉielon kaj teron, branĉiĝas kiel flagrantaj radikoj, lekas kiel ardigitaj serpentolangoj ankaŭ supren el la grundo.

La pluvo venas kiel duraj vipobatoj el akvo, glacie malvarma, ne dividite en gutojn sed ŝprucante en radioj, falante kvazaŭ en formo de kuntenataj akvoflakoj, sobfluante kiel de rompiĝintaj digoj, ĝis akvo stamfas en akvo kiun la tero ne kapablas gluti, akvo kiu disvastiĝas kiel grajne disŝirata surfaco sur la grundo, gargariĝas en unu direkto kaj baldaŭ revenas en alia, povante nenien vojadi.

Sed la akvolavango ne ĉesigas la fulmojn sed anstataŭe ekscitas ilin, pelas ilin antaŭen en furioza lukto inter akvo kaj fajro, la fulmoj flugas kiel navedoj el fajro tra la kruda varpo de pluvo kaj postlasas striojn el blanka vaporo, traklivas la surgrundan akvon per rapidaj tranĉoj kiuj fumas bluviolee.

Dornoveproj ekkrakas kaj staras dum momento traarditaj antaŭ ol ili nigriĝas en la pluvo, tamarikoj falas kvazaŭ trafitaj de gigantaj hakiloj kaj ekbrulas per alta flamo, kaj kiam estas multaj rajdantoj en unu grupo kaj la ĉevaloj kuŝas dense sur la grundo, unu sola fulmo povas salti kiel fulmrapida fiŝo el blindiga lumo de unu ĉevalo al alia, ilin ĉiujn mortigi en

unu sama momento kaj bruligi ilin en nigran karbon aŭ nur paralizi ilin tiel ke ili kuŝas tie baraktante kaj tikante sur la grundo, ŝrias sensaĝe kaj baraktas por ekstari.

Ankaŭ la plej bonaj batalĉevaloj facile ekpanikas dum la fulmotondro, eble ekstariĝas ĉe fulmofrapo kaj forpanikas sur la ebenaĵo, pelataj de la fivetero diversdirekte, baŭmas kaj returniĝas, glimadas kiel malheliĝinta arĝento kun siaj tramalsekigitaj korpoj kaj disŝprucigas akvon ĉirkaŭ si, ĝis fulmo ilin trabalaas kun sia fajrofalĉilo kaj ilin rikoltas kiel tigojn, kie ili faladas en longa vico, tumultas super unu aliaj, mortintoj kaj vivantoj kune.

Vanuante same subite kiel veninte la fulmotondro ĉesas, la mallumo apertiĝas, la fulmoj forpaliĝas, blindiga lumo subenbalaas el la spaco, la lastaj pezaj pluvogutoj plaŭdante falas en la akvon kiu inundas la grundon, la travivintoj levas la kapon, ekstaras kun akvo defluanta, moviĝas en ŝmacantaj vestoj, enspiras la freŝigan aeron kie strioj de la akra odoro de bruligita karno ankoraŭ daŭras.

La sunbrilo igas vestojn kaj korpojn vapori kvazaŭ ili brulus, la akvo estas trinkata de la grundo kiu komencas sekiĝi en palblua nebulaĵo, post kelkaj horoj restas neniam spuro de la akvoinundo krom kelkaj sulkoj en la sablo, la homoj denove vojaĝas, rajdas siajn travivantajn ĉevalojn, plenaj de nova fido, senzorge fajfas.

La granda Ĥano dum mallonga tempo estis ne pli supera ol iu ajn alia mortalo, elmetita al la kolero de la Ĉielo kiel ĉiuj aliaj.

La karajtoj estis venkitaj kaj ilia urbo Karakorum okupita senkontraŭstare, estante regento Timuĝin nun enrajdis kie li antaŭan fojon estis okaza gasto ne tirante al si grandan atenton, ĉiajn rabojn kaj damaĝojn li malpermesis, la restintajn kataĵojn oni konsideru mongoloj, Karakorum ne nur plu ekzistu, sed krome estu konsiderata urbo de la ĥano mem,

Timuĝin ĉirkaŭrajdis la fortikaĵojn, zorge inspektis la murojn el bakita argilo, la palisarojn el dikaj cedrotrunkoj, la ĉirkaŭfosojn kun akvo alkondukita de la rivero, la pordegvolbojn kiujn eblis fermi per pezaj, fergarnitaj pordegoj, la gardistoturojn kun iliaj krenelaj suproj kaj fendoj por pafarkistoj,

kun mikso de miro kaj malestimo li ĉion rigardis: tiom da peno kaj lerto uzitaj por defendopreparoj poste neuzataj, atestantaj pri timo kaj malsekuro ĉe la regento, potenco kaj forto kiuj lin perfidis! dume li mem estis certa ke li neniam fidostiajn fortikaĵojn, ilia sekuro trompas, li nenian uzon havos de ili, sed la oldaj muroj povos resti tie atestante, kia urbo iam estis Karakorum,

Timuĝin rajdis ĝis en la palaco de la grandĥano, kie lia ĉevalo preskaŭ glitfalis sur la spegule rebrilanta marmorplan-ko, sed la pompo ne ŝajnis al li tiel blindiga kiel pasintfoje, ĝi paliĝis kaj komencis estingiĝi, aŭ eble liaj propraj okuloj nun ĝin perceptis aliel,

la orumo, la kostaj inkrustaĵoj, la artobjektoj, la tapiŝoj kiel

arbarmusko profundaj kaj molaj, la gobelinoj kun siaj kolorŝimraj pejzaĝoj kaj batalscenoj, la fontanoj kiuj arte ŝprucigis siajn akvoradiojn kaj kreis sian propran muzikon el lirlanta akvo, la grasaj kaj inertaj orokarpoj buŝfaŭkante ĉe la akvosurfaco kaj defrotante oroskvamojn kontraŭ la ŝtonrandoj de la basenoj: ĉio ŝajnis al li strange indiferenta, tro virinca aŭ infaneca, nenio por bataluloj kaj regentoj,

li provis la tronon de la Wang-Ĥano, kiu sparkis de inkrustitaj gemoj kaj ombriĝis de pavoplumoj, sed li ĝin trovis malkomforta kaj iom ridinda, li rifuzis sidi tie, eble ankaŭ nebule konceptis ke tio estas danĝera, ĝi povus tiri kun si ion el la febleco kaj misfortuno de la antaŭulo,

anstataŭe li ordonis ke lia jurto estu starigita ekster la urbomuro, de tie lia potenco estu praktikata, kaj ĉirkaŭe la nova urbo kresku kaj ĉirkaŭrondu la malnovan, fariĝu granda orduo de la nomadoj, rezidejo de la venkintoj.

La Wang-Ĥano Togril kaj lia malaminda filo jam fuĝadis kun tia hasto kaj timo ke la plej rapidaj persekutantoj de Timuĝin ne atingis ilin, ili malaperis okcidenten inter fremdaj popoloj kaj nur longe poste venis la famo ke ili estis mortigitaj de turka gento, kiu boligis puraj iliajn kraniojn, ilin garnis per arĝento kaj turnis ilin en trinkpokalojn,

sed precipe kontraŭ la perfida Djamuga Timuĝin volis sin venĝi, tiu viro el lia propra klano kaj kreskinta en sama orduo kiel edukfrato, li kiu proklamis sin grandĤano kaj alianciĝis kun la malamikoj de Timuĝin, ekservis ĉe Togril por delogi la maljunan regenton kaj turni ties amikecon por Timuĝin en malamon,

venkita li nun estis, frapita ĝisgrunde, kaj kiel hundo li estu rekondukata al sia mastro kiun li provis mordi, Timuĝin sendis siajn plej rapidajn kaj sindonajn komandantojn post li, tiujn kiuj estis nomataj la Furiozaj Pluvegoj kaj jam estis timataj en tuta Gobio,

kaj Timuĝin mem sidis kiel regento en Karakorum kaj atendis sian malamikon, la Furiozaj Pluvegoj ne trompis liajn esperojn, sed ĉasis kaj kaptis Djamuga, kondukis lin ĝis antaŭ Timuĝin kaj devigis lin sur la genuojn kun lia rompita pafarko ĉirkaŭ la kolo,

sed lia spito tamen ne estis rompita, li fiere kaj malame rigardis al Timuĝin, kiu lin demandis: Kion vi atendas nun, vi kiu perfidis min kaj volis min mortigi? kaj dure li respondis: Nenion alian ol morton, la plej kruelan morton kiun vi povas eltrovi! ĉe tio Timuĝin kapjesis kaj poste aldonis kiel mokan gracon: Sed neniŭ devu aŭdi vin krii kaj lamentadi, kaj via sango ne verŝiĝu sur la grundon! Malgraŭ ĉio vi mortu kiel ĉefulo!

kaj Timuĝin ordonis venigi unu el la grandaj ledosakoj en kiuj oni vipis ĉevallakton en kumison, li metigis Djamuga en la sakon, igis ŝnurligi ĝin fortike kaj pendigi ĝin en vipadotresto, poste kelkaj el la bataluloj enmanigis krudajn klaborojn kaj per ĉiuj fortoj batis la ledosakon, ĝis nenio moviĝas en ĝi kaj la korpo ne plu montras reziston sed sentiĝas kiel mola pasto sub la klaboroj, kaj nenia sono penetris tra la sako, nek eĉ guto da sango,

Timuĝin post tio ordonis ke la sako kun sia enhavo estu enterigita laŭ mongola maniero, sed la mortinto, ĉar perfidulo, ne estu honorata per la armiloj de batalulo apud si, ankaŭ

ne per ĉevalo ripozanta ĉe sia flanko: en la regno de mortintoj li moviĝu piede kaj senarmile simile al almozulo.

Timuĝin nun fine sukcesis en sia strebo unuigi ĉiujn tribojn kaj gentojn en orienta Gobio sub sian potencon, kaj en la jaro 1206 de la kristanaro, kiu estis la jaro de la Tigro en la tria dekdujara ciklo en la vivo de Timuĝin, li estis proklamita Ĝingis Ĥano aŭ reganto de ĉiuj mongoloj, elektita de la Eterna Blua Ĉielo por realigi ĝian volon sur la tero, kun kurultajo aŭ granda asembleo de ĥanoj sub si.

Timuĝin kiu per tio ĉesis esti Timuĝin kaj fariĝis la Ĥano super ĉiuj ĥanoj estis tiam supoze tridektrijara, sperta kaj prezorgema batalulo kiu frue lernis ke batalojn oni gajnas ne per violenta sturmado kaj sovaĝa furiozo, sed per planado kaj ekipiteco, taktiko kaj strategio, kaj kiel Ĥano de ĉiuj mongoloj li devas ĝisekstreme apliki tiun scion por konservi sian batalforton kaj firmigi sian potencon.

Kio antaŭe estis loze kuntenataj rajdistohordoj devis kunforĝiĝi en plane formitajn armeojn, kie malpli grandaj unuoj konsistigis pli grandajn, memdecidajn ĝis certa limo sed trans ĝi absolute suborditajn sub la komuna agado, sub la sola volo kiu eliris de la Ĥano kaj penetris tra la tuta vico de komandantoj ĝis ĉiu unuopa batalulo.

La dekuma sistemo estis konsekvence uzata en tiu organizaĵo: la plej malgranda unuo estis arbano je dek viroj, la pli granda ĝeguno je cent, post tio mingano je mil kaj fine time-no je dekmil, ĉiu formacio sub sia komandanto ĝis la plej altrangaj nojonoj kaj orkhonoj.

La solidareco interne de dekvira arbano estis ekstreme se-

vera kaj konsistigis la bazon de la forto kaj fidindo de la tuta armeo: ili respondecis per sia vivo unu por la alia, neniu vundito estis forlasenda, neniu rajtis cedi aŭ fuĝi antaŭ ol la standardo estis fortirita, nenia rabado licias antaŭ ol signalo venis.

La militoperacoj estis gvidataj de la standardoj per aparta signalsistemo kaj krom tio de trumpetsignaloj, por ke malbona videbleco aŭ surdiga bruo ne malhelpu ke la ordonoj estu perceptataj, sagoj kun fajfantaj kapoj estis depafataj por montri la vojon dum atakoj, grandaj tamburoj el bronzo kaj ledon alsonadis kun tondraj ritmoj kaj la ĉevaloj ekkuris kun kirla rapideco kiu estis nomata luposaltoj.

La nombro de la ĉevaloj estis multoble pli granda ol tiu de la batalantoj, ĉiu kunmovis tri aŭ kvar aŭ ankoraŭ pli da ĉevaloj rezerve aŭ por ŝanĝo dum la longaj kaj penaj rajdomarŝoj, ili kutime estis malaltaj kaj hirtaj sed nekredeble fortaj kaj eltenemaj, ekipitaj per brustoŝirmo el ledon, kaj la duonlonga vosto finiĝis per ligaĵo.

La bataluloj sidis kun supren tiritaj genuoj, en seloj kiuj atingis alten kaj estis arte ornamitaj, ili portis maŝkirasojn el fera plektaĵo kun nekovritaj kubutoj kaj kun longaj ledogantoj sen fingrumoj, pli tarde post la milito kontraŭ Kataj ili estis provizitaj per subkirasaj ĉemizoj el kruda silko kiujn la sagokapoj ne povis penetri, pro kio ili estis facile eltireblaj el la vundoj.

Surpiede ili portis malaltajn botojn el felto aŭ felo, surkapo helmojn el lakita ledon, rondajn kaj formitajn kiel jurtoj, kun supra pinto kie malgranda ruĝa vimplo flagradis, kaj ĉirkaŭ la kolo ili havis ŝirmon el felto kiu kovris la mentonon kaj la orelojn kaj plue la nukon.

En la armilaro estis lanco kaj lazo, mallonga glavo aŭ kurba

sabro, unu aŭ du pafarkoj kaj sagingo, malpezaj sagoj por longaj distancoj, pli pezaj kaj pli penetraj por pli kurtaj, krom tio kelkiam ĵetlanko kaj batalhakilo.

Al la vintra ekipaĵo apartenis feltaj ŝtrumpoj kiujn oni surteris super la botojn kaj duobla peltmantelo kun harflankoj interne kaj ekstere, la provianto kunportata de ĉiu batalulo konsistis el sunsekigita viando, kazeo kiu fariĝis ŝtondura kaj estis solvenda en varma akvo, butero el boligita ĉevallakto kiu premiĝis en ledosakojn kaj neniam ranciĝis.

Afero ne malplej grava estis la organizo de informiĝado, kiu ĉiam pli estis vastigata, kun fiksjaj interligaj stacioj kiuj provizis la rajdmesaĝistojn per novaj ĉevaloj dum ili moviĝis senpaŭze tagojn kaj noktojn, kun la korpo dure vindita kontraŭ la streĉa peno, kaj sonigante etajn sonorilojn por preatentigi ĉiujn ke ili venas: oni vidis la similecon inter ilia rapideco kaj tiun de la sagoj kaj oni nomis ilin sagokurieroj.

La leĝon de la Ĥano mem, Jassa, li komencis enkonduki kaj ĝi iom post iom ĉiam pli perfektigis, fundamenta leĝokolekto kie la volo de la Ĥano mem, lia sperto kaj saĝo unuiĝis kun la plej bonaj tribomoroj, la vivkapabla mongola tradicio.

Jassa severis sed alstrebis justecon, la ordono de obeado rangis unua, la obeo de infanoj sub la gepatroj, tiu de edzino sub la edzo, de unuopuloj sub ĉefuloj kaj komandantoj, de ĉiuj finlaste sub la Ĥano.

Mortpunoj oftis: pro ŝtelo kaj adulto, pro sodomio kaj spionado, pro nigra magio kaj falsa atestado, pro nepermesita rabado kaj malpurigo de akvo, perforto inter mongoloj estis kondamnita kaj la inklino al drinkado hontstampita, ebrio

trifoje monate estis opiniate sufiĉa kaj estis konsiderata home neevitebla.

Troa amasigo de propraĵoj estis kondamnita same kiel ĉi-aspecaj avido kaj voremo, tiujn kiuj posedis multon Jassa devontigis dividi kun tiuj kiuj suferis mankon, ĉia marĉandado estis malpermesita kaj la komercado ricevis la formon de interŝanĝo, maniero doni kaj ricevi donacojn.

Konkeritaj regionoj estis bone traktataj se la loĝantaro ne sin montris malamika, sed en tiaj kazoj ĉiuj viroj en la reganta tavolo estis mortigitaj, la bataluloj estis alprenitaj al la armeo se ili sin tenis lojalaj, lertaj metiistoj samkiel eruditoj, pastroj kaj artistoj estis indulgita kaj prenita en servon, la plej belaj virinoj estis edzinigitaj al bataluloj, aliaj fariĝis sklavinoj, senhejmaj infanoj estis prizorgataj kaj adoptitaj.

Venkitaj gentoj enorditaj en la mongolimperio estis protektataj de Jassa kaj havis samajn rajtojn kiel aliaj, kun plena libereco praktiki sian religion, tiel longe kiel ili ne klopodis subpremi aliajn religiojn: per tio la Ĥano fariĝis protektanto de religia toleremo kaj kontraŭanto de la fanatikuloj.

La potenco de la Ĥano ampleksis ilin ĉiujn kaj ilin unuigis sub lian regon, formis unu grandegan klanon kiu subportis la nevenkeblajn rajdistarmeojn, kaj militfarado estis la plej grava tasko kaj la bazo de la regno, kun konstantaj konkeroj kiel enkonstruita premo, paco restis neimagebla kaj malebla.

Mallongaj ripozperiodoj dum la vintra sezono estis uzataj por ĉasado, ĉasado por bataluloj samampleksa kiel malgranda militekspedicio, danĝera kaj ŝtrapaca, kun eblecoj por la partoprenantoj gajni predon kaj gloron, la armilaro tamen pro sekureco estis tre leĝera, la pli pezaj armiloj devis resti en

la provizejoj pri kiuj respondecis la komandantoj kaj estis disdonitaj nur ĉe ekmarŝo militen.

La armeoj de la Ĥano sin distingis precipe per siaj nekredeble rapidaj moviĝoj, per sia kapablo surprizi kaj ĉirkaŭi kaj sia violento en la atakoj, eltenema furiozo kiu samtempe ŝajnis zorge prikalkulita kaj utiligata, krom tio per aŭdaca memstarco ĉe ĉiu batalulo en kuneco kun neriproĉebla kunagado inter ĉiuj,

tamen tiuj kvalitoj ne estis gajnitaj per unu fojo sed konstruiĝis poieme, ĉiam pli perfektigis konekse kun novaj spertoj dum unu longdaŭra milito post alia, komence en sudo, poste en oriento kaj okcidento.

Jam kiam Timuĝin elektiĝis granda Ĥano li klare vidis la celon de la venonta grandsignifa militentrepreno: ĝi sin direktos al Kataj, tiu kolosa lando oriente kiu pli poste estis nomata Ĉinio, ĉar tie pli fruaj mongolĥanoj suferis malvenkojn kaj humiliĝis, tie ankaŭ la predo estis plej alloga kaj venko nekompareble plej glora,

sed tio estis milito kiu postulis longdaŭrajn preparojn kaj sekurigon de la limoj en aliaj direktoj, pluraj armeoj estis senditaj en diversaj direktoj por vastigi kaj certigi la limregionojn, subpremi ĉiujn malamikaĵojn kaj ribeltendencojn kaj eldevigi tributojn, la plej granda el tiuj entreprenoj estis gvidata de la Ĥano mem kape de forta armeo, kaj ĝi celis la regionon Hsia en la sudo, nomatan rabistoregno, loko de nomadaj tangutoj el Tibeto.

Hsia situis en la Ordos-dezerto, daŭrigo de Gobio, kaj estis ĉirkaŭata de altaj montoj sude kaj oriente, kun la ĉefurbo

Erikaja aŭ Chungsing potence fortikigita kaj ŝirmata de kanalsistemo, kie la akvo de la Huang-ho-rivero trafluadis kaj igis la urbon ak malfacile sieĝebla ak malpli difektebla de la efikoj de sieĝo.

Hsia renkontis la Ĥanon per supernombro da rajdantoj kaj piedsoldatoj, sed la mongoloj kaŭzis al ĝi vicon de malvenkoj dum rapidaj atakoj, rabis kaj bruligis, ebenigis urbojn ĝisgrunde, mortigis aŭ forpelis la homojn, tamen sen decida venko,

nova armeo de kvindek mil soldatoj malhelpis dum du monatoj la rajdantojn de la Ĥano ĝisatingi la ĉefurbon, kaj tiam la Ĥano ekpraktikis milituzon kiun li ankaŭ poste ofte uzis: li ŝajnis fuĝon kaj logis la malamikojn el ties fortikaĵoj, ilin atakis el embusko kaj ilin mortigis,

post tio Erikaja estis sieĝata, sed la mongoloj ne havis forton supervenki la fortikaĵojn el muroj kaj kanaloj, la sturmatokoj ĉiam estis repuŝataj kun rimarkeblaj perdoj, rapideco kaj furiozo de la mongolaj rajdistoj ne povis helpi ilin antaŭ masivaj muroj kaj profundaj akvoduktoj,

la Ĥano eltrovis konstrui baraĵon trans Huang-ho, sub la urbo tiel ke la akvo altiĝis en la kanaloj kaj enondis la stratojn, penetris domojn kaj provizejojn, kie ĝi kaŭzis grandan damaĝon, kuntrenis malsaton kaj malsanojn, sen ke la kontraŭstaro tamen rompiĝis.

Post longa sieĝo la baraĵo tamen rompiĝis, kaj la Ĥano kaptigis multajn katojn kiuj estis elpelitaj el siaj restejoj dum la inundo, oni ligis al iliaj vostoj brulantajn torĉojn antaŭ ol ili estis liberlasitaj kaj ili tiam tuj rifuĝis al la nun ree sekigintaj irejoj kaj enrampejoj, pro kio incendioj okazis multloke

en la urbo, pliigis la konfuzon kaj kontribuis al la rompo de la defendovolo,

la tangutoj kapitulacis, la plej altranga komandanto estis translasita kiel kaptito kaj la reĝo alianciĝis kun la Ĥano, kio sigeliĝis per tio ke unu el la reĝaj princinoj estis sendita kiel edzino al la venkinto, kaj la urbo estis esceptita de detruo pro malavaraj tributoj.

Samtempe ribelo eksplodis fore okcidente, en la regno Karakataj aŭ Nigra Kataj, kiu sin trovis en ruiniĝado sub kataja dinastio, la loĝantaro ĉefe konsistis el uiguraj turkoj, kiuj alprenis katajan kulturon kaj buddhanan religion, la du vasal reĝoj Biŝbalik kaj Almalik jam ribelis kontraŭ la regento en la ĉefurbo Balasaghun sude de Balkhaŝ-lago kaj proklamis sian aliĝon al Ĝingis Ĥano, kiu tuj alsendis armeon kaj enordigis la regionon en sian imperion: per tio li neprevideble vastigis kaj fortigis la limlandon okcidente,

kaj en la jaro de la Ŝafo interne la mongolan dekdujaran ciklon, jaro 1211 de la kristanaro, la Ĥano estis preta por atako orienten kontraŭ Kataj, lia ĝis tiam senkompare plej granda militentrepreno.

La reveno al Karakorum apenaŭ estas hejmenveno por la Ĥano, se li kiel nomado sentas tiriĝon al iu aparta loko tio estas al la regiono de lia origino, la rivervaloj, paŝtejoj kaj montodeklivoj de lia infanaĝo, krom al la propra klano, la propra homtribo,

sed jam antaŭ longe li trovis ke tio estas io pli malpli perdita, precipe ĝi ekzistas kiel imago ene en li sen ia vera similo en la realo, li vidis kaj spertis tro multe, lia mondo tiel senmezure vastiĝis ke la origina mondo malvastiĝis ĝis nerekonblo,

rivervalojn, ebenaĵojn kaj montojn li renkontis en tiel multaj direktoj ke li ne plu povas ilin nete distingi, kaj la propra klano pleje similas al parencaro kiu lin ĉirkaŭas, jam antaŭ longe li unuigis la inter si militantajn mongolojn kaj poste ilin aliancigis kun multaj aliaj gentoj, kiuj nun ĉiuj konsistigas lian popolon, ankaŭ la plej foraj kiuj partas en lia imperio.

Tial la Ĥano nenie povas hejmi aŭ aparte preferi iun lokon al alia, Karakorum li ne elektis pro inklino sed pro hazardo kunefike kun la sinprezenta neceso.

Kiel nomado li ne volas fiksiĝi en iu ajn urbo, sed kiel reganto de la mondo li devas havi ĉefurbon, lokon de kolektiĝo, fiksan punkton, ĉar tion postulas imperio same kiel rado necesigas nabon.

Karakorum kompareblas kun la kalmo en la mezo de ura-

gano aŭ al la plej interna digo kie la fortoj sin kolektas kaj ŝargiĝas antaŭ ol ili liberiĝas, ia granda oazo de paco kaj abundo meze en la dezerta lando, fonto de la ĉiamrenovaj militkampanjoj elirantaj de tie.

Ne ripozon nek liberiĝon de regadzorgoj signifas Karakorum al la Ĥano, nek tempon dum kiu li ne plu bezonus pensi pri militoj kaj konkeroj, nur pri paca firmigo de sia regado: ne, eĉ tro bone li scias ke lia restado en Karakorum ne povas longdaŭri, ke la bataloj neniam finiĝos, ke lia ĉeesto kaj interveno baldaŭ estos postulataj aliloke.

La Ĥano tion trakomprenas pli bone ol ajniu: la imperio devas esti konstante refirmigata kaj vastigata por ne regresi, la leĝo de militado senindulgas kaj ne koncedas spirpaŭzon, paco kaj trankvilo signifus diseriĝon de la regno, sinkon de la popoloj en pigron kaj komforton, dum samtempa ekflagro de internaj antagonismoj kaj luktoj: tio validas por ĉiuj popoloj sed pleje por la lia, la militemaj mongoloj, por kiuj iom longa paco estus fatala, amasiĝo de sovaĝaj instinktoj sen ellaso, violentaj pasioj sen celo kaj malŝargo.

Vivo kaj morto dependas unu de alia, kie la vivo kreskas forta la morto devas rikolti same forte, la mongoloj estas gento de la liberaj ebenoj kaj neniam povas radiki kiel arboj, neniam resti en senmovo: tiam ili senigus sin de sia rajto de unuenaskito al vagado, al vivo sur ĉevaloj kaj en jurtoj, al vastoj kun greso kaj brutaro, ruliĝantaj ĉaroj, moveblaj tendvilaĝoj.

Sub Jassa, tiu leĝo kiun li estas establanta por la futuro, la regado de la mongoloj restos kaj malhavos similaĵon surteran, ĉar tia estas la leĝo de la luktopova moviĝado, diktata de la volo de la Ĉielo, per severaj sed justaj ordonoj, konstanta

kaj sana alternado inter ŝargo kaj ellasiĝo, inter violento kaj volupto, inter necesa ripozo kaj same necesa sturmasalto.

Tia estas la konvinko de la Ĥano, samtempe ricevita heredo kaj konfirmita sperto, tamen ne sen kontraŭdiroj kaj hezitoj kiuj sin montris ĉiam pli nete dum la imperio kreskis kaj la mondo sin vastigis.

Ofte dum siaj ĉiutagaj rajdoj la Ĥano pensas pri Jassa, rigardas en sin mem kaj ĝisatendas ke la vortoj elfontiĝu, ke ili kuŝu pretaj sur la lango por elparoli, la ĝustaj vortoj kun tiu forto kiu ilin portos antaŭen dum multaj generacioj kaj ne permesos ilin misinterpreti aŭ disipiĝi.

Kiam li do revenas, saturita de siaj vortoj, li tuj vokas skribiston kaj eksidas sola kun li, neniu rajtas ilin ĝeni, neniu rajtas aŭskulti, kvazaŭ ĉirkaŭŝvebas mallaŭta flustro la jurton de la regento: La Ĥano diktas sian leĝon.

Iujfoje la skribisto estas Tatatunga, la lerta kaj alte fidata turko, kiu enkondukis la mongolan uigurskribon: skribarto kiu sugestas pri serpentoj sinuantaj ĉirkaŭ flutoj kaj nodligantaj sin mem kaj ankaŭ subite elŝovantaj kornon aŭ akran dornon, skribo kiu artlerte desegnatas per pinta peniko mergita en tuĉo.

Sed Tatatunga estas tre okupata homo, konservanto de la grandsigelo kiun li inventis por bono de la Ĥano kaj krom tio juĝisto kun tasko sekvi la preskribojn en Jassa kaj zorge apliki ilin en la realo, krome li estas viro oldiĝanta, ĝenata de peza ventro.

Lia anstataŭanto tial ofte estas Ŝigi-Kutuku, lia disĉiplo plej eminenta, ne malpli lerta skribisto ol Tatatunga mem, krom tio multe pli juna kaj rapida, zorgata de la Ĥano kiel infaneto ekde kiam li ĉirkaŭkrablis inter mortfalintaj tataroj post

batalo, iu milita trovinfaneto de fremda sango sed kreskinta kaj edukita inter mongoloj.

La Ĥano sidas en sia kutima rajdpozo kun suprentiritaj kruroj kaj kun la okulfendetoj kuntiritaj, nur la lipoj sin movas dum lante kaj nete li prononcas siajn vortojn, siajn formulojn de la leĝo, kaj li nenion ŝanĝas, nur donas al la skribisto tempon noti la vortojn antaŭ ol li daŭrigas per la sekva frazo.

Kiam la Ĥano estas preta li montras per kapklino ke la skribisto povas foriri kaj etendas la manon por la pergamenrulo, li rigardas la ĵus registritan tekston zorge, sed je distanco de preskaŭ braklongo, malmiope, kaj ŝajnas kvazaŭ li ĝin legus, ĝin primeditus.

Eble dependas de profunde sidanta malfido pri la magia arto de skribado, eble de lia malfido kontraŭ ĉiu homo krom li mem, sed li ne permesas al la skribisto laŭtlegi la tekston kiun tiu skribis, sed alvokas alian kiu prezentas la skribon al li, malrapide, frazon post frazo, kaj la Ĥano zorge aŭskultas, aprobe kapsignas, certas nun ke ĉio estas korekte komprenita kaj notita, legebla por iu ajn kiu majstras la arton kaj scikapblas la lingvon.

Tiel Jassa kreiĝas simile al lante kreskanta konstruaĵo, muro kie ĉiu vorto estas ŝtono ekokupante sian difinitan lokon, sed flanke de Jassa la Ĥano diktas ankaŭ pli ĝeneralajn, utilajn vortojn de saĝo por tiu kolekto kiu nomiĝas Bilik.

Pri la batalulo havas por diri ĉi tion Jassa:

La batalulo ne pensu pri sia vivo, tio estas la plej bona maniero eviti sian morton.

Kiu pensas pri sia vivo facile ĝin perdos, kiu ne zorgas ĉu li mortos pli verŝajne travivos.

En la batalo ĉiu estas la aliaj, li sin konservas perdigante sin inter la batalkamaradoj.

En la batalo la plej bona batalulo estas dividita en du, unu berserke batalas ekster sinrego, la alia lin prigardas kaj konservas la sinregon.

La forta batalulo ne postulu same multe de la pli malfortaj kiel de si mem, li estu ilia ŝparita forto.

La batalulo spiru profunde kiel dormanto meze en la batalo, tio donas al li eltenivon kaj longigas lian brakon.

La batalulo neniam subtaksu sian adversulon, sed el sia malsupereco li ĉerpu forton kaj ruzon por supervenki lin.

Por faligi bovidon oni ne uzas samgrandan forton kiel por faligi bovon.

Kompati malamikon estas kvazaŭ meti vipurojn sub la vestojn.

Estas pli saĝe mortigi tuj ol pli tarde.

Al kiu eblas vivi iom longe, tiu ofte kredas ke li entute ne bezonos morti.

Malamiko kiu povas uziĝi kontraŭ malamiko per tio ne fariĝas unu el la niaj.

Kiu perfidas unu povas samfacile perfidi alian, tial neniam lin fidu.

Kiu sin submetas ne plu estas malamiko, li gajnis sian vivon, sed farinte nesingardan movon li povos ĝin perdi.

La batalulo ne pensu pri predo antaŭ ol li jam venkis en la batalo.

Predado neniam estas rajto sed ĉiufoje donaco.

Konkeritajn virinojn la batalulo ne devas elmeti al malnecesa perforto, ili soltas naski al li filojn kiuj gloros lian nomon.

Armiloj kiuj neniam trinkis sangon baldaŭ ĉesas esti armiloj.

Kie la batalulo pasis, tie la greso la plej bone kreskas.

La Ĥano elrajdas el Karakorum, ekipita por iom longa marŝo, akompanata de kelkaj konfidenculoj kaj je ioma distanco de trupo da bataluloj, tiajn marŝojn daŭrantajn kelkajn tagojn kaj noktojn li de tempo al tempo faras.

Enpense li tiam kaj ofte ankaŭ alitempe revenas al la neevitebla estonta milito, la kampanjo suden por obeigi la aplomban kaj ribelan Hsia, kun plilongiĝo orienten por la fina interpuŝiĝo kun la du Kataĵo-regnoj.

Li sentas ke lia tempo forfluas, fluas for kiel manpleno da sablo inter la fingroj, tio lin faras jen senpacienca, kvazaŭ li volus rapidigi la eventojn kaj meti ĉion en la pasintecon, jen penseme kvieta, primedita, kvazaŭ li volus resti ĉe ĉiu momento, kapti ĝin per la manoj kaj ĝin reteni.

Li rajdas kun sia akompanantaro supren laŭ la valo de Orkhon, havas la riveron enlime de proksima vidkampo tamen ne sin tenante apud la bordo, kaj en la dua tago ili atingas tiom foren ke la ĉevaloj hufas en alta, ankoraŭ freŝa greso kaj la ombro falas sur ilin de arboj kreskantaj ĉiam pli dense kaj pli alten.

Inter la pli malhelaj koniferoj kun ties rektaj trunkoj la betuloj staras kun denstufaj kronoj kie kelkaj folioj jam komencis flaviĝi kaj sobŝvebi teren, dum la trunkoj blankas laktee,

iujfoje nigramakulaj, kun ŝelo skvamiĝanta kaj flagranta en la vento.

Kapreoloj forfuĝas de la rajdantoj, scivoleme haltas kaj sin returnas por vidi, kun fervore flarantaj muzeloj, kaj pezaj arbaraj birdoj krake ekflugas inter la arboj tiel ke la ĉevaloj ĵet-movas la kapon.

Ofte ili transrajdas riveretojn kiuj blankŝaŭme sin ĵetas deklive malsupren kaj inter la ŝtonoj ili povas vidi trutojn kiuj forsaltas, urso kiu provas kapti fiŝojn en la malprofunda akvo montras la dentojn kontraŭ ili antaŭ ol li peze forpiedas.

Ili alvenas oblongan lagon kiu spegulas la bluan spacon kaj montras striojn en la akvo post roto de cignoj kiuj fornaĝas kun la koloj leĝere klinitaj, ne turnante la kapon.

La Ĥano ofte aŭdis pri pli granda lago pli norde, kie la fajfantaj demonoj tenas sin kaj vekas la subitajn puŝventojn, sed tio estas ie trans tiu loko kie Orkhon kunfluas kun Selenga, kaj tiel foren li neniam iris laŭ tiu direkto.

Li pensas pri tio ke ĉi tiu regiono estas strange netuŝita kaj senhoma, kvazaŭ transira regiono inter malsamaj gentoj kaj vivformoj, la nomadoj de la altebenoj malofte penetras tien kaj la ĉasistaj triboj sin tenas pli interne en la sovaĝaj terenoj.

Li primeditas ĉu eble estas tro malmulte da homoj en iuj partoj de la mondo kaj tro multaj aliloke, ĉu ne estus ebla ia egaligo: vera imperio povas vastiĝi nur en iom popolataj regionoj, potenco ĉiam signifas potencon super homoj, sed kie tro multaj troviĝas la potenco ankaŭ povas signifi malmultiĝi ilin.

La Ĥano ne certe scias kial li faras tiun marŝon supren laŭ la valo, enen en la arbarregiono, sed estas kvazaŭ li ion ser-

ĉus aŭ kvazaŭ io lin tirus tien, eble nur iu memoro el la infaneco lin pelas, iu duone forgesita impresado de tiu regiono.

Li ofte haltas kaj ĉirkaŭrigardas de la ĉevaldorso, nenion dirante, eble de iu tia valo inter arbokovritaj deklivoj venis iu branĉo de lia klano, kaj eble iu dormetanta instinkto vekigis en li.

Areto da altaj arboj kiuj kreskas aparte sur malgranda altaĵo nun lin tiras al si, li haltas antaŭ tiuj arboj kaj ilin zorgesplore rigardas, poste li descendas la ĉevalon kaj iras inter la rektajn, kolonsimilajn trunkojn.

Estas larikoj kun siaj kronoj svingiĝantaj unuj kontraŭ aliaj alte en la spaco, la suno tie vidiĝas kiel flugilflirtanta birdo el fajro inter la branĉaro kun la fajnaj, verdaj pingloj, la trunkoj staras tie kiel martelitaj el kupro, la ventsusuro en la kronoj atingas la grundon kiel ritma muĝetado.

La Ĥano longe staras tie en la arbareto, kun suprenturnita vizaĝo, kvazaŭ ravite: li aŭskultas, enspiras la freŝan odoron de la arboj, dum li samtempe sin turnas enen en si mem, eble al leviĝanta memoro, malklara rememoro pri io.

Daŭras longe antaŭ ol li revenas al siaj akompanantoj, sed tiam lia decido estas farita kaj li ĝin sciigas decidvorte, tiun arbareton sur la kolino li elektas sia estonta ripozejo, tie li entombiĝu mongolmaniere, akompanate de ĉevaloj kaj servistoj kiel decas al Ĥano,

kaj la arbareto post nun estu protektata, armita gardo deĵoru ĉe ĝi tage kaj nokte tiel longe kiel daŭros la imperio de la mongoloj, sed neniu ŝtono aŭ enskribo atestu pri li kiu tie ripozas, nur tiuj altaj arboj kiuj atingas Ĉielen kaj susuras pro ventoj el ĉiuj direktoj.

Post tempo de deca silento post la vortoj de la Ĥano ili ĉiuj denove eksidas ĉevalen kaj ekiras revoje al Karakorum.

Pri la rilato inter fajro kaj akvo la Ĥano notigas en sia kolekto de saĝo, en Bilik:

Fajro kaj akvo estas neunuigeblaj fortoj kiuj ne estu direktitaj unu kontraŭ la alia.

Fajro kaj akvo ambaŭ estas same necesaj por la konservo de la vivo, kaj por la gentoj sur la altebenoj ambaŭ estas same karaj kaj devas esti utiligataj ŝpare, la fajro pro la malmulta disponeblo de hejtajo, la akvo pro sia malabundo.

Fajro purigas same kiel akvo, sed en malsamaj manieroj: fajro purigas for la nevideblan, akvo la videblan.

La fajro obeas la volon de la Ĉielo, sed ankaŭ afinas al la demono Ebliss: el tio venas la duobla naturo de la fajro, ĝia netaksebla beno kaj la danĝero kiun ĝi samtempe ĉiam enhavas.

La fajro pro tio ĉiam devas esti gardata, nutrata singarde, simile sovaĝbestan idon kies malsovaĝon oni ne povas fidi.

La fajro estas vira, tial ĝi precipe estu prizorgata de virinoj.

Neniu tranĉilo kaj neniu armilo proksimu la fajron, vian do en kaldrono boligita super fajro ne estu tranĉata de tranĉilo.

Estas je mortpuno malpermesite estingi fajron per akvo, ĝi estu sufokita aŭ elstamfita.

Sama malpermeso kaj puno validas kontraŭ urinado en fajron same kiel ene en jurto aŭ en fluantan akvon.

Tiel same ĉiu alia malpurigo de akvo estas malpermesita,

neniu rajtas baniĝi en fluanta akvo aŭ igi trinki siajn brutojn tie, ĉar ambaŭ malpurigas.

Vestoj ne estu lavataj, ankaŭ ne vazoj uzataj en la mastrumado, tio estas sennecesa malŝparo de akvo.

Ĉe fulmotondrado validas apartaj preskriboj, ĉar la fulmotondroj prezentas okazajn ellasiĝojn de la demona furiozo de Ebliss, permesitajn de la Ĉielo: terura kunsturmiĝo inter la fajro kaj la akvo.

Kio faras la fulmotondrojn tiel teruraj al la homa naturo estas ĝuste tiu kunsturmiĝo inter la malkongruaj fortoj fajro kaj akvo.

La plej kuraĝaj bataluloj ne malofte raptiĝas de paniko dum fulmotondroj kaj ili sensaĝe sin ĵetas en plej proksiman akvon, en riveron aŭ lagon.

Akvo aŭtem ne ŝirmas kontraŭ la tondrofajro sed anstataŭe ĝin tiras al si, samkiel la pluvego ŝajnas elvoki la fulmojn kaj aldoni al ilia furiozo anstataŭ estingi ilin.

Tial al neniu licas proksimiĝi al akvo dum fulmotondro kaj kiu havas okupon ĉe akvo tuj ĝin ĉesigu kaj foriĝu de tie.

Ordinara fajro ne povas kontraŭrimedi la tondrofajron, male ĝi provokas la fulmon kaj ĝin tiras al si, tial la fajro ene en jurtoj estu estingita ĉe fulmotondro kaj neniu fumo devas elscendi tra la tendaperturo, ĉar ankaŭ la fumo povas altiri al si la fulmon.

Jurtoj ne estas plej bona restejo ĉe fulmotondroj, ili facile elmetiĝas al trafoj kaj ekbrulas, precipe antaŭ ol la pluvo atingis tramalsekigi la feltoŝtofon sufiĉe.

La plej sekure ĉe ĉiuj fulmotondroj estas sin plate meti sur la grundon, diste for de ĉiuj elstaraj objektoj, precipe arboj sed ankaŭ altaj rokoj.

Bestoj estas pli vundeblaj de la fulmo ol homoj, precipe ĉevaloj kiuj havas abunde sangon kaj plenas de varmego, tial bataluloj kaj aliaj rajdistoj forlasu siajn ĉevalojn dum fulmotondro, tiel ke ili ne estos faligitaj de la fulmo kune kun ili.

Tiel la homo en multaj manieroj devas kontribui por teni apartaj fajron kaj akvon, dum li ĉiam ilin ambaŭ uzas en ĝusta maniero por povi vivi.

Kataj estis dividita en du regnojn militantajn inter si: la norda Kin-regno kaj la suda Sung-regno, la unua nomata La Ora kaj ĝia regento La Ora Imperiestro, ĝin ŝirmis okcidente kontraŭ atakoj de nomadaj hordoj la granda muro kaj norde vasala ŝtato sub la princo de Liao.

Pluraj el la plej fidataj armeestroj de la Ĥano iuperiode estis en la servo de la Kin-imperiestro dum ties bataloj kontraŭ la Sung-regno, kaj dum tiu tempo ili havigis al si valoregajn sciojn pri la lando kaj revenis por rakonti pri la fantastaj riĉaĵoj tie atendantaj konkeranton, pri la grandegaj kaj pompaj urboj, pri lando kiu estis en sia tuto floranta ĝardeno kaj samtempe prirampata kiel formikejo de nigraharaj homoj, pri riveroj kaj kanaloj kie flosantaj domoj moviĝis per veloj, pelataj de la vento.

Centoj da dissenditaj gvatistoj same revenis de Kin kaj povis informi pri la fortikaĵoj de la urboj kaj pri tiuj apartaj fortresoj kiuj ŝirmadis la montpasejojn, pri armeo kiu nombris duonan milionon da soldatoj, el kiuj tamen nur kvarono estis rajdantoj kaj ekipitaj per pafarkoj, pri la bolanta malkontento en la norda vasala regno kie la feraj viroj de la Liao-dinastio estis pretaj ribeli kontraŭ siaj katajaj subpremantoj.

La Ora Imperiestro konsideris ankaŭ la mongolojn unu el siaj suborditaj popoloj kaj la Ĥanon sia Komandanto kontraŭ La Ribelantoj, kaj kiam la olda imperiestro mortis lin sukce-

dis filo kiu sin nomis Wai Wang kaj postulis ne nur imposton de la mongoloj sed ankaŭ ke la Ĥano ceremonie per genuado sin submetu antaŭ la elsenditaj dekretoj de la imperiestro.

Kiam la printempo en la jaro de la Ŝafo ekfloris super la altebenoj la Ĥano ekmovis siajn militfortojn, li dispartigis ilin en tri armeojn por marŝi tra Gobio laŭ malsamaj vojoj kaj ataki la Kin-regnon el tri direktoj samtempe, la Ĥano mem komandis la mezan armeon, ĉiuj abunde disponis pri transportkameloj kolektitaj en suda kaj okcidenta Gobio dum la kampanjoj de la lastaj jaroj, kaj ĉiu rajdsoldato kiel kutime havis plurajn ĉevalojn, fortajn kaj bone nutritajn post la abunda printempa paŝtiĝado.

Komence en la frusomero la armeoj de la Ĥano jam pasis tra la dezertregiono kaj atingis la grasajn paŝtejojn en Ongüt, ĝuste antaŭ la montĉeno kun la granda muro kiu ŝirmis la Kin-regnon kaj Chung-tu, la imperiestran ĉefurbon.

De siaj gardoturoj la katajoj povis vidi la tri armeojn proksimiĝi el malsamaj direktoj tra la altebeno, komence videblaj kiel grandegaj nuboj el polvo, disvastigante sin kiel gigantaj drakoj, sed la mesaĝoj tiam sendataj al la imperiestro estis malfavore ricevataj, li ne lasis sin ĝeni dum sia pentrado sur silkoŝtofo aŭ en siaj tre ceremoniaj ĉaspartioj, kiom koncernis lin kaj la Oran Regnon kelkaj barbarhordoj proksimiĝantaj?

La sekretaj partianoj de la mongoloj inter la limgardistaro malfermis unu el la pordegoj en la granda muro por la armeo de la Ĥano, kiu enmarŝis renkontante nenian grandan kontraŭstaron kaj sin dividis en malsamajn taĉmentojn por ventumilforme disvastiĝi en la landon, ili atakis la imperiestrajn trupojn en pereigaj kuratakoj, antaŭensturmis super la pied-

soldatoj kaj falĉis ilin per sagosvarmoj, depafitaj dum plena galopo, la fortikigitaj urboj submetiĝis aŭ estis enfermitaj, la kamparo estis prirabata, la vilaĝoj brulis, la rikoltoj estis distretitaj, bestoj kaj homoj mortigitaj, en la riveroj flosis kadavroj kaj la akvo ruĝiĝis pro sango.

La soldataroj de la Ĥano penetris ĝis antaŭ la ĉefurbo, kie la imperiestro Wai Wang estis kaptita de paniko kaj volis fuĝi, sed estis devigita resti kaj flaminspiri la siajn al rezisto, la Ĥano cirkumrajdis kun sia gvardio sur grandkreskaj, nigraj ĉevaloj kaj inspektis el ekstere la imponajn fortikaĵojn, la altajn murojn kaj batalturojn, la akvoplenajn ĉirkaŭfosojn kaj masivajn defendkonstruojn kun iliaj ŝtonĵetaj katapultoj kaj fajroŝprucaj tuboj.

Ili rajdis tra ĝardenoj inter floroj kaj fruktoj de specoj kiujn ili neniam antaŭe vidis, la ĉevaloj distretis maturajn melonojn kaj kukurbojn, ruĝece oreaj fruktoj falis nombre sur ilin de la arboj, kaj ili tramarŝis papavokampojn kiuj flimris per sia silksimila ruĝa brilo antaŭ ili, akvo glitrante fluis en longaj fluiloj kaj ĉie sin levis konstruetoj, apertaj pavilonoj kun rande suprenvolbitaj vitroverdaj tegmentoj kaj kolonoj pentritaj sangoruĝaj kun inkrustaĵoj el oro.

Atente kaj samtempe penseme la Ĥano rigardis ĉion tra siaj okulfendetoj, lia volo konkeri estis nemalpliĝinta kaj nerompebla, sed la tasko kontinue kreskis antaŭ li, Kin estis grandega regno, tamen ne nur per sia vasteco, ĉar la distancoj al la ĉefo de rajdantoj ne ŝajnis tre grandaj, sed per sia denseco, sia nekredebla kundensiĝo de homoj, siaj konstruoj kaj kultivata fertilo, sia konsterna kombino de forto kaj feblo, masiva potenco kaj fragila delikato.

La Ĥano malinsistis sieĝi Chung-tu kaj retiris siajn trupojn,

post kio la remaŝo tra Gobio okazis komencaŭtune, venkinto kiu jes certe ĉifoje ne povis plenumi la konkeron, sed pleniĝinto de utila sperto kaj de neŝanceblebla rezoluto reveni.

Ankaŭ poste la Ĥano neniam ĉesis surpriziĝi en Kataj: io estis tro granda, alio tro malgranda, sed la okulo ofte estis trompata kaj kio komence ŝajnis malgranda estis granda kaj inverse, la distancoj ne estis fidindaj, ili ofte ŝajnis sensignifaj sed erarigis per sia kundenseco, kvazaŭ grandaj regionoj estus kunpakitaj, kunfalditaj, plenigitaj ĝisekstreme,

pejzaĝoj kaj urboj sin penetris reciproke, perdis sin en labirintoj kun florkovritaj muroj kaj grestegitaj remparoj kiuj sin turnis ronde unu ene en kaj post alia, tiel ke irvojo estis kvazaŭ rubando volvita en ŝnurbulon, kaj la enirejoj de la palacoj estis ŝirmataj ne de gardistoj sed de ŝildoj surpentritaj per drakoj kaj leonoj, tiel ke infanoj povus ilin renversi kaj enpenetri tien, sonoriloj sonoris feble kaj fajne kvazaŭ florkalikoj povus tinti, sed tio ne estis averto sed nur por belsono, por orela ĝuo,

kaj la grandegaj gongoj de la temploj ne anstataŭis batalamburojn, iliaj eĥiĝantaj klangoj ŝajnis esti nur por teni la diojn maldormaj, dioj kiuj ofte vere aspektis senhelpe dormemaj aŭ dormantaj kun siaj peze pendaj palpebroj, kaj se subite fajro disflamis en la mallumo kaj turnis sin en kirliĝantajn florojn, falantajn stelojn, sunojn krevantajn, tio nenion signifis, estis nur por amuzo dum iu ĝardena bankedo,

lanternoj pendis arbe kaj brulis nekonsumiĝante malgraŭ ke ili estis el papero kaj swingiĝis en la vento, tutaj salonoj

estis plenaj de paperrulaĵoj kiuj estis libroj, ili kolektiĝis tie dum jarmiloj kaj necesus mil homvivoj aŭ pli por ĉiujn tralegi, oni asertis ke troviĝas rakontoj tiel longaj ke multaj jaroj estus bezonaj por ilin sekvi de komenco ĝis fino, pentraĵoj estis volvitaj sammaniere kiel la libroj kaj povis komenci per urbo kaj daŭrigi per kamparo, supri al montoj, kaj ree reveni al la urbo,

ĉevaloj aperis sur la ebenaĵo, tiel grandegaj ke ili povis porti dekojn da rajdantoj kaj tiel grasaj, ke ili apenaŭ aspektis kapablaj kuri, sed proksimiĝinte oni povis vidi ke ili estas el ŝtono kaj pentritaj verdaj aŭ ruĝaj, ili staradis samloke dum multaj generacioj kaj la greso kreskis sovaĝe ĉirkaŭ ili, nemanĝite,

ĉie troviĝis tro multaj homoj, ili ŝajnis vagi hazarde ĉiudirekten sed tamen evidente havis siajn difinitajn celojn, ili hastadis sed de tempo al tempo tion forgesis kaj ekmeditis malĉeeste aŭ haltis en grupoj kaj interbabilis, per kvakaĉa lingvaĵo kiel birdoj, povis ankaŭ impresi kiel aŭtune kolektiĝintaj migrobirdoj,

ili estis malgrandaj eble ĉar ili estis multaj kaj por ke ĉiu havu spacon por si, viroj kaj virinoj preskaŭ neniom sin distingis unuj de la aliaj, ĉiuj aspektis kiel virinoj, feblaj kaj rondetaj, la viroj kun samgrandaj mamoj kiel la virinoj, ili ankaŭ ĉiuj portis harplektojn kaj ofte ombrelojn kun pentritaj birdoj, sed la virinoj havis malgrandigitajn piedojn, kuntiritajn kiel pugnetoj kaj malfacile perireblajn, tio estis signo de belo kaj altaprezata,

vera viro povis trovi la katajajn virinojn tro malgrandaj, sed kiuj ilin provis asertis ke ili havas tutsufiĉe grandajn sinojn, foje eĉ tro grandajn tiel ke ili lernis forte kunteni la femurojn

kiam ili subkuŝas viron, sed ili ankaŭ volontis pluraj kune servi unu saman viron, kunagante kiel bonaj fratinoj,

iliaj soldatoj estis komikaj kaj ne facile konsiderindaj serioze, aspektis kvazaŭ ili estus promenontaj kun siaj sandaloj kaj ombreloj, siaj mallongaj grasaj membroj kaj faldozaj silk-ĉemizoj, ili faris terurajn grimacojn kiujn ili ŝajne ekzercis, kvazaŭ temus pri timigo al infanoj, kaj ofte ili havis eĉ ne po unu ĉevalon sed malrapide sin movadis piede, ili ankaŭ facile estis timigataj de ĉevaloj kvazaŭ ili ne havus kutimon pri tiuj sed timis ilin kiel sovaĝbestojn, tiel ke ili ofte ĵetis siajn armilojn kaj fuĝis, sed metitaj viro kontraŭ viro ili luktis ne malbone kaj bone sciis kiel morti,

la soldatoj havis ne pli grandan reputacion ol ke ili devis cedi vojon al viroj en longaj vestoj kaj al virinoj en portseĝoj, kantistoj kun kastritvoĉoj estis multe pli aprezataj, la potenco ofte troviĝis ĉe viroj kiuj aspektis mildaj kaj senfortaj, fragilaj, kun longa maldensa barbo, kaj kun tiel longaj kaj larĝaj manikoj ke ili malfacile povis trovi siajn proprajn manojn, ilia nobleco montriĝis ĝuste en tio ke ĉiam ili estis okupataj levi la manojn antaŭ si kaj reskui la manikojn,

viroj kiujn trafis la leĝa severo estis punataj per tio ke ili estis eksponitaj nudaj en bambuaj kaĝoj, kie kiu ajn volante povus aliri kaj ilin piki per pintaj bastonoj aŭ kraĉi al ili en la vizaĝon, insulta humiligo kiu devas esti pli terura ol mortpuno,

multaj okupiĝis pretigante strangajn objektojn, skatolojn kiuj lokiĝis ene en skatoloj, tajlitajn bildojn en vicoj kie ili ĉiam plu malgrandiĝadis, fine fariĝis tiel malgrandaj ke oni apenaŭ povis ilin distingi per la okuloj sed tamen perfekte similaj al la pli grandaj, kaj kiel malo al la malgrandaj objek-

toj troviĝis la superhome grandaj, dioj kaj grandsinjoroj skulptitaj el grandegaj arbotrunkoj kaj klarkolore pentritaj, kuŝantaj sanktuloj longaj je dek ĉevallongoj, blindige orumitaj, kaj leonoj fanditaj el bronzo aŭ fero kun kapoj kiuj estis multoble pli grandaj ol la korpoj, larĝe ridantaj kun homsimilaj dentoj, aŭ furiozantaj drakoj kiuj ŝajnis pretaj disŝiri sin mem per siaj sennombraj brakoj, siaj dornoj kaj krifoj kaj elŝoviĝantaj ruĝaj langoj,

tute sendanĝeraj monstroj kiuj malgraŭ sia grandeco ŝajnis faritaj por amuzi infanojn, samkiel la sanktaj temploj faris infanecan impreson de ŝercaj troigoj kun siaj grimacantaj bataluloj aŭ dioj kun grandaj ventroj kaj juvelornamitaj umbilikoj, jen timigado kiel komikaĵo, ŝajnkruela kaj ŝajndanĝera por konfuzi simplajn estaĵojn aŭ fortimigi spiritojn kiuj evidente estis taksataj same naivaj kiel homoj,

la basenoj estis iaspecaj speguloj por la pigruloj kun ties pentritaj boatoj kaj klingantaj instrumentoj, la akvolilioj tie floris kiel densaj tapiŝoj, blankaj aŭ ruĝaj sur la tuĉe nigra akvo, la orkarpoj estis braklongaj kaj grasaj, ili sin inerte movis kaj lasis sin glatumi sur la dorso de gracilaj, blankaj fingroj kiuj neniam tenis armilon nek eĉ melkis ĉevalinon aŭ bovinon, pontoj altarke volbis, ruĝlakitaj, kaj ŝajnis ne destinitaj por surirado, ili estis tro malvastaj kaj tro krutaj ak por rajdantoj ak por ĉaroj,

blankaj vermoj estis nutrataj per folioj kiel malgrandaj brutetoj, ĝis ili enŝpinis sin en silka fadeno kiu dissolviĝis kiam ili mortis en bolanta akvo kaj estis eltirata de virinoj kaj infanoj kun ŝvelintaj manoj, ruĝaj kaj vundozaj kiel viandbuloj, dolĉa vino estis varmigata super fajro kaj trinkata el bovletoj tiel malgrandaj ke oni apenaŭ povis teni ilin fingropinĉe, oni

ilin malplenigis kiel birdo trinkas kun levita beko, unu post unu, sen pli da prokrasto ol ke la dolĉa gusto retenis sin en la buŝo, tiel milda ke la ebrio venis kiel surprizo,

birdojn por manĝi oni bredis en malvastaj kaĝoj por ke ili sufiĉe grasiĝu, ankaŭ hundoj estis grasigataj en kaĝoj kaj estis manĝataj rostitaj, kun kapo kaj vosto, sed senhaŭtigataj, kun delikatgusta orbruna krusto, kaj rotojn da porkoj oni tenis en kortoj kie ili sin rulis en ŝlimo kaj ekskremento, ilia viando estis tiel grasa ke ĝi fandiĝis enbuŝe sed poste bruligis la gorgon,

artaj pavilonoj kie vivis neniu elstaris inter svarmoj da malaltaj kabanjoj kun malheliĝinta pajlotegmento, la homoj kiuj prilaboris la teron iris mem kun malgrandaj pajlotegmentoj surkape, ili tretadis en akvo kaj ŝlimo kun nudaj piedoj kaj kruroj, tiuj blankaj grajnetoj kiujn ili tiel volonte manĝis kreskis en akvo kaj estis kolektataj en amasetojn similajn al restantaj neĝamasoj ĉirkaŭ la kortoj, ĉie ili devigis la grundon kaj la arbojn porti rikoltojn kaj fruktojn, tiuj tro multaj homoj vivis sole por estigi nutraĵojn por si mem kaj inter si,

ili ankaŭ ĉiam estis okupataj portadi ĉion imageblan, unuope aŭ pluraj kune, kun longaj stangoj sur la ŝultroj, tiel ili portadis korbojn kun fruktoj kaj sakojn kun greno aŭ rizo, vinon en felsakoj, buĉitajn bestokorpojn kaj vivantajn animalojn kun kunligitaj kruroj, faskojn da birdoj, vazojn kun orfiŝoj en akvo kaj vazojn kun nur akvo, ŝarĝojn el branĉoj kaj verdaj kreskaĵoj, kaj multaj portis inter si malgrandajn domegojn en kiuj sidis unu aŭ pluraj homoj, ŝirmataj per sobpendanta ŝtofo,

viroj kiuj portadis kun preskaŭ nudaj, ŝvitbrilaj korpoj kaj razitaj kapoj, virinoj kiuj portadis kun nudigitaj torsoj kaj ba-

lanciĝantaj mamoj, fojfoje kun la ventro ŝvelinta de feto naskiĝonta, la pejzaĝo mem estis elformita por portistoj, konstruita aŭ elfosita far homaj manoj kun terasoj el agroj unuj super aliaj kaj ŝtuparoj en la grundo kie la portistoj sor- aŭ sobtretadis kun siaj ŝarĝoj de tio kio estis rikoltita supre aŭ sube, kun la fumo de la kabanoj sinuantaj supren kiel longaj ŝnuroj de teraso al teraso,

sed aliloke la grundo estis eltrivita, tro malalta kaj tial minacata de inundoj kiuj ŝanĝis la pejzaĝon en malprofundajn lagojn kie homoj sin transportis en plataj boatoj aŭ pene vadis sinkintaj ĝiskokse, la riveroj tie fluis alte kiel la ŝvelintaj vejnoj sur la mano de oldulo, ili estis tenataj en siaj fosaĵoj per terdigoj, pri kies konstanta fortikigado multaj okupis sin por ke la akvo ne trabreĉu,

jes, ĝi estis lando kiu facile brulis kaj same facile inundiĝis de akvo, komence la fajro darfis furiozi kaj bruladis tiel disten kien povus okulo vidi, kampoj kaj rikoltoj, arboj kaj brutoj, vilaĝoj kaj eĉ homoj kiuj fuĝantaj renkontis la fajron kaj komencis bruli, poste la riverdigoj estis malfermitaj kaj la akvo venis, la inundo estingis la fajrojn kaj dronigis la ruinojn, ĝis nur nigriĝintaj arbokronoj elturis kaj la muroj de unu aŭ alia granda konstruaĵo, eĉ ne la boatoj sur riveroj kaj kanaloj eskapis, ili sendistinge brulis, malaltaj sed alte ŝarĝitaj aŭ elektigitaj kiel potencaj domoj, kaj antaŭenflosis kiel vagantaj fajroj sur la akvo, antaŭ ol ili estingiĝis en fumo kaj vaporo,

Kataj do estis rimarkinda lando kiu ĉiam vekis la miron de la Ĥano, tiom por malkovri tie kaj tiom por neniiĝi.

La Ĥano kondukis la militon kontraŭ la Kin-regno dum kvin jaroj, retiriĝis antaŭ la vintro kaj revenis printempe, ĉiufoje kun renovigitaj fortoj kiuj siavice renkontis novajn katajajn armeojn, fortaj fortikaĵoj kaj urboj estis okupitaj, reperdiĝis al la katajaj kaj estis rekonkeritaj, fojon post fojo, kaj grandaj partoj de la lando estis vandalitaj ĝis nur aroj da korvoj gakis super ruinamasoj kaj dezertigitaj kampoj.

Sed daŭre la ĉefurbo Chung-tu nevenkeblis, ĝiaj fortikaĵoj rezistis ĉiujn atakojn, ĉiun sieĝon, kaj obstine rifuzis la proponojn de la Ĥano pri traktadoj, interne de la muroj tamen fatalis antagonismoj, la imperiestro Wai Wang estis ekzekutita de la plejalta armeestro Chichung, kiu poste mem estis murdita, pluraj altrangaj generaloj perfidis kaj transiris al la mongoloj.

En sia kolero pro la obstina kontraŭstaro la Ĥano dezertigis ĉiam pli grandajn partojn de la lando, ekstermis la popolon, mortigis la brutojn, bruligis la kampojn kun rikoltoj kaj ĉio alia, lasis la kanalojn ruiniĝi kaj la riverojn trabreĉi siajn digojn, revenis kun tri armeoj en vastaj ĉirkaŭprenaj operacoj, tute ĝis Huang-ho kaj ĝis la marbordo, ale al Koreio.

La Ĥano turnis katajajn kontraŭ katajajn, devigis ilin konstrui por li ĉiuspecajn sieĝomaŝinojn kaj enmeti ilin en la batalojn, ŝtonĵetajn katapultojn, gigantajn arbalestojn kiuj estis streĉataj de pluraj paroj da bovoj, fajrosputajn tubojn kun siaj radioj el brulanta nafto, kaj ĉie dum la sturmatakoj tiuj katajaj devis lukti por sia vivo inter atakantoj kaj atakatoj.

Fine la nova imperiestro Huan-tsung akceptis trakti pri paco je la kondiĉoj de la Ĥano, li transdonis unu el la filinoj de Wai Wang kune kun abundaj donacoj de oro kaj silko, de ĉevaloj kaj gejunuloj, sed kiam la mongoloj jam retiriĝis la

imperiestro hastis translokiĝi al la suda ĉefurbo Ta-liang trans Huang-ho, ago de sekurigo kiun multaj katajtoj komprenis kiel poltronecon kaj perfidan rezignon pri la nordaj partoj de la regno.

Malfido invadis la Ĥanon pro la manovro de la imperiestro kaj li preparis sin por ankoraŭfoje enmarŝi en Kin, li venis fronte de mongola armeo pli granda ol iam kaj resieĝis Chung-tu, kiu tiel plene izoliĝis disde la ĉirkaŭanta lando ke la malsato devigis la katajtojn malfermi la pordojn de la urbo antaŭ ĝiaj sieĝantoj, sinrezigno al kiu kontribuis la foresto kaj supozata perfido de la imperiestro.

La mongoloj ĉifoje terure sin venĝis pro la longa kontraŭstaro kaj malsincera pactraktado, ili amasigis la kadavrojn surstrate, predis kaj bruligis, ĉion frakasis ĝisgrunde, kaj ĉiuj iliaj soldatoj ricevis sian parton de la grandega militpredo, la Ĥano mem reportis kun si al Karakorum inter alie grandan nombron da eminentaj eruditoj, artistoj kaj specialistoj, kaj inter ili li aparte fiksas sian atenton al viro de nobla familio, Je-liu, kiu posedis grandan scion en tiel disaj kampoj kiel medicino kaj astronomio, matematiko kaj administrado, eĉ estis liaj digno kaj fiero tiaj ke li tuj gajnis la fidon de la Ĥano kaj ricevis altan postenon kiel ties konsilisto.

La Kin-regno sub la imperiestro Huan-tsung reduktiĝis al la regiono sude de Huang-ho kie ĝi rebatis plurajn invad- kaj ribelprovojn, fortikigis la novan ĉefurbon kaj rifuzis sin submeti al la regado de la mongoloj, samtempe ĝi daŭre kaj konstante konfliktis kun sia suda najbaro, la Sung-regno.

Nun la Ĥano regis la tutan nordan katajan regionon kaj li taskis al armeo sub la armeestro Mukali daŭrigi la militon, dum li mem kun la ceteraj trupoj reiris al Karakorum, en la

jaro 1216 de la kristanaro, la jaro de la Rato en la mongola kalendaro kaj la kvardeknaŭa vivojaro de la Ĥano.

Periferie de Karakorum troviĝas aperta spaco por ludoj, ludoj de bataluloj kaj plenkreskaj viroj, kiujn spekti ankaŭ la Ĥano ŝatas, sidante sur sia ĉevalo: tio estas konkursoj de arkpafado, rajdado kaj luktado, lancoĵetoj, hakilĵetoj kaj pilkĵetado (per peza pilko ŝtopita per ĉifonoj kaj lignosplitoj).

Precipe ĉe festoj, post multa drinkado, la ludoj violentiĝas, ofte kostas rompitaĵn membrojn aŭ dorsojn, dum la ridoj kaj vokoj bruas kaj senditoj de diversaj fremdaj landoj estas logitaj aŭ eĉ devigitaj partopreni, rolante komike pro embaraso kaj timo inter la furiozemaj mongoloj, sen ke la Ĥano intervenas nek ion diras, lia vizaĝo konservas decan senmovecon kaj senesprimon, sed iujfoje li glatumas la lipharojn per la reversa flanko de sia mano.

La granda fortoprovo konsistas en luktado kun urso, nigra, ne tre granda urso kun muzelingo kaj tonditaj ungoj, kiu ekstaras sur la postaj piedoj kaj per la antaŭaj ĉirkaŭprenas la luktanton, tiu siavice estas vestita en urso felo kaj ŝirmata per fortikaj botoj kaj gantoj, pro tio la ludo ne estas tro malegaleca.

La urso certe estas pli forta ol la plej forta el la viroj, sed ĝi ne komprenas same lerte uzi siajn fortojn, ĝi ekpenas tiom ke la dentoj grincas, dum la luktanto streĉas sin nur modere por kontraŭstari ĝis li trovas la ĝustan okazon, tiam li abrupte

impetas por renversi la urson sur ĝian dorson kaj ĝin reteni en tiu situo.

La rimedo de la urso estas daŭrigi la ĉirkaŭtenon ĝisekstreme, meti siajn tutajn pezon kaj forton en la prenon per la kruroj, ĝis la ripoj de la kontraŭulo krake rompiĝas aŭ la dorso discedas kun frakasa sono, akompanata de krio de la viro antaŭ ol li pendas mortinta aŭ paralizita en la ĉirkaŭpreno de la urso.

La urso kiu iujfoje estas venkita sed neniam severe lezita premiĝas per pelvo da mielo kiam ĝi supervenkis aŭ mortigis viron.

La liutludisto Oribar ne havas piedojn, portata de virinoj li estas kondukata al la regentotendo kiam la Ĥano ordonas, li estas viro magra sen barbokresko, la ripoj strias bruston kaj dorson tiel ke lia korpo havas certan similon al muzikinstrumento.

Oribar ne estas brila kantisto, lia voĉo ne klaras nek fortas, sed li senkomparas kiel liutludanto, la manoj sin movas kiel flagrantaj birdoj kaj la tonoj sonas el la liuto kun rara profundo kaj puro.

La Ĥano volonte aŭskultas la liutludadon de Oribar, kelkfoje nur ĝi lin delektas kaj tiam li sidas pli nepenetreble absorbata en si mem ol iam, dum Oribar kaŝe rigardas lin, preta obei eĉ plej etan movon de lia mano.

Jam longe regas neeldirita akordo inter la Ĥano kaj la liutludisto, akordo kiu ankaŭ enhavas kaŝitan konflikton, kie ambaŭ havas ion pro kio la alian danki.

Oribar neniam estis batalulo kaj vera viro, li restadis inter

la virinoj kaj praktikis fingroludon sur diversaj instrumentoj, sed ĉiam sentis la ŝarĝon de sia nevireco kaj sin konsolis per drinkado, ĉiutaga ebriiĝo.

Post ol la Ĥano militis kontraŭ la nigrahara popolo oriente li kiel pacosignon inter aliaj donacoj de la imperiestro de Kin akceptis kostan liuton, orumitan kaj rare belsonoran, al la Ĥano ĝi tre plaĉis kaj li kelkfoje ĝin donis al Oribar por ke tiu ĝin ludu dum horeto.

La Ĥano tre domaĝis la belegan instrumenton kaj komprenigis al Oribar ke kostos al li la vivon se la liuto iamaniere difektiĝos, li ankaŭ ne havis permeson ĝin preni el la regentjurto.

Sed Oribar estis kaptita de tia avido por la mirinda liuto ke li ne povis kontraŭstari la tenton unu fojon ĝin kunporti, sen ke iu ajn ŝajnis rimarki.

Li estis jam iom ebria, kaj dum li ludis por si mem per la liuto, enfermita en sia propra jurto, li drinkis eĉ pli, ĉar ju pli malsobra li fariĝis des pli bone li ludis aŭ opiniis ludi.

Li tiom raviĝis de sia propra muziko, li pleniĝis de tia feliĉo ke li ne povis sin teni ene en la jurto, li stumbladis eksteren por ludi sub la nokta ĉielo, por la luno kaj la steloj.

Li faris dancopaŝojn por si mem laŭ la muziko kaj sin sentis feliĉega, sed subite li falstumblis kaj falis vizaĝantaŭe, kun la liuto en ĉirkaŭbrako, kaj li aŭdis frakasan sonon, restis kuŝanta simile al mortinto kie li falis kaj ne povis tute kompreni la misfortunon kiu okazis.

Venonttage li ŝteliris pala kaj tremanta en la jurton de la Ĥano kun la ruinigita liuto en siaj manoj, sin ĵetis antaŭ la regenton kaj ploris pli senhonte ol virino.

Violenta kolero kaptis la Ĥanon, kaj li diris kun mallaŭta

voĉo inter la dentoj: La ora liuto ne havis egalajon, nun vi pagos per via vivo ĉar vi ĝin ruinigis!

Oribar despere petis por sia vivo kaj kulpigis sian ebricon, li amis la orumitan liuton super ĉio kaj ne povis kontraŭstari la tenton ĝin kunporti por ludi por si mem.

La Ĥano regajnis sian ekvilibron kaj diris: Pro tio vi pagu per viaj manoj kiuj prenis la liuton, tiel ke vi povos nek ludi plu nek porti drinkaĵon al via buŝo!

Sed Oribar petis same malespere por siaj manoj kiel por sia vivo, li povos rezigni drinkadon, sed kiel li povos elteni ne ludante, kaj tiam la Ĥano respondis ke li anstataŭe oferu siajn piedojn, ĉar ĉiukaze li tre malbone staras sur ili kaj ne bezonas ilin por ludi.

Tiel fariĝis, la piedoj de Oribar estis dehakitaj, li vojaĝis kun la virinoj en ĉaro, ne plu povis rajdi sur ĉevalo, li estis portata de virinoj inter sia propra jurto kaj aliaj, povis nur rampante sin movi sur la grundo, sed ludi kaj drinki li povis pli bone ol iam.

Sorĉisto venas el norde, akompanata de du luphundoj, li estas vestita en krude stinkanta felo kaj havas nigrajn, grasbri-lajn harojn kiuj pendas ĝis sur la vangoj, kaj liaj okuloj glimas kiel inkrustaĵoj el spegulvitro.

La hirtharaj hundoj sin premas dense al li, ĉirkaŭrigardas per flamaj okuloj kaj montras siajn akrajn dentojn ĉiudirekte, tamen neniun atakas.

La sorĉisto estas kondukata inter la fajroj sur la aperta spaco antaŭ la regenta tendo, li etendas disfingre la manojn kon-

traŭ la flamoj kaj ili kvazaŭ recedas kiam li pasas, la hundoj kaŭrante lin sekvas sen eĉ iom bruliĝi.

La sorĉisto postulas alpaŝon ĝis antaŭ la Ĥano por montri siajn artifikojn, li asertas ke ili sufiĉe rimarkindas ankaŭ por la plej granda el ĉiuj regentoj, kaj li akceptas la riskon perdi sian vivon se li malplaĉos al la Ĥano.

La artifikoj aŭtem ne povas esti elfaritaj ene en la regentojurto, tio devas okazi ekstere sur la grundo kaj post sunsubiro.

La Ĥano sin montras neatendite degna kaj ekĉeestas socie kun siaj ĉefuloj, ili eksidas sur la dismetitaj benkoj kaj la sorĉisto salutas la Ĥanon per genuiĝo ĝisgrunde, la hundoj ĉe lia flanko montras siajn blankajn dentvicojn.

La Ĥano signas al li komenci, tino enhavanta fumante varmegan sangon alportiĝas kaj la hundoj ĝin fervore lekadas, poste la sorĉisto bruligas fajron sur la grundo, kaj ĝi brulas kun rare verdebluaj flamoj.

La sorĉisto ekkaŭras antaŭ la hundoj, rigardas gape al iliaj flaveflamaj okuloj kaj rapidritme batadas tambureton inter la genuoj, la hundoj iom ĝemas kaj rampante ekkuŝas sur la grundo.

Poste ili ekstaras rigidkrure, la haroj hirtas sur iliaj dorsoj, la sorĉisto tamburas ĉiam pli sovaĝe kaj raŭke vokas funde en la gorgo, la hundoj proksimiĝas al la bluverda fajro kaj lante enpaŝas la flamojn.

La hundoj aspektas ekflami kaj bruli, kun flavruĝaj flamoj inter la bluverdaj, kaj iliaj korpoj inkandeskas kiel fero en fajro, dum ili sin tordas, sin movas, transformiĝas, ŝvelas.

Kaj nune ne plu hundoj sed monstroj kreskas kaj transformiĝas antaŭ ĉies okuloj, turniĝas en flamantajn leonojn

kun kolosaj kapoj kaj disantaj buŝfaŭkoj, ili sin turnas unu kontraŭ alia kaj komencas lukti, unu alian disŝiri.

Tiam unu leono transformiĝas en potencon serpenton kiu sinuas ĉirkaŭ la alian por ĝin dispremi, sed tiu siavice turniĝas en drakon kun dorna korpo kaj multparaj kruroj kaj piedoj kun longaj ungegoj.

La monstrobestoj daŭrigas sian ferocan lukton unu kontraŭ la alia sen ke iu ŝajnas kapabli venki la alian, anstataŭ disŝiriĝi aŭ rimarkeble vundiĝi ili nur ŝanĝas formon, kvazaŭ ili posedus sennombrajn vivojn en kiujn ili povus fuĝi.

La sorĉisto staras antaŭenklinite kaj algapas ilin, tamburadas seninterrompe kaj intermite ekvokas, la ŝvito fluas en rojetoj suben de lia malhela vizaĝo.

Ĉiuj streĉe spektadas la montradon, dum silento kaj senmovo, kaj se iu ĵetas rigardon al la vizaĝo de la Ĥano li povas nenion malĉifri el ĝia sfinkseco.

Kiam la monstrobestoj en la fajro jam turniĝis en timige-gajn monstrojn kiajn povis antaŭe vidi neniu krom eble en sonĝo, la sorĉisto transiras fine al lantiĝanta tamburado kaj la flamoj komencas malkreski.

Dum la fajro estingiĝas la hundoj reprenas sian formon, ili kaŭre alglitas al sia mastro, iliaj feloj aspektas eĉ ne iom bruligitaj.

La sorĉisto fleksas siajn genuojn antaŭ la Ĥano, kies vizaĝo malsereniĝis, kaj nur post mavaŭgura silento li diras al la sorĉisto: Vi bone scias ke sorĉado estas prohibita en Jassa kaj tamen vi kuraĝas veni antaŭ min kiel sorĉisto!

La viro respondas: Ho granda Ĥano, tio ne estas sorĉado, nur arto kiun mi volis montri al vi kaj priesperis, ke vi en ĝi trovu plezuron!

Sed la Ĥano severmalmilde decidas: Tio ne estas arto kion vi montras sed potenco, danĝera kaj demona potenco! Vi estu pelata el mia regno kaj viaj hundoj estu mortigitaj!

Post tio la Ĥano ekstaras kaj eniras la regentotendon, forlasante la sorĉiston al sia verdikto.

Jen estas la sanktaj ĉevaloj kiuj elektiĝas ĉe sia naskiĝo far la ŝamanoj, sen ke estas klarigite kial kaj pro kiuj motivoj, eble la tempopunkto decidas, la konjunkcio de steloj aŭ renkonto de ventoj, eble la maniero mem de naskiĝo aŭ iu signo sur la novnaskita ĉevalo, perfekta stelo sur la frunto aŭ rimarkinda desegno sur la felo.

Unufoje elektitaj tiuj ĉevaloj estas objektoj de timema prizorgado, ne licas ilin rajdi, ne permesatas ilin surmeti per selo aŭ bridrimenoj, ne puni nek eĉ forpeli: ili devas resti liberaj kaj netuŝitaj en ĉio, se ili forkuras tio estas malbonŝance, sed ili ne estu kaptitaj, nur libervole ili akompanas en bataloj kaj militoj, se ili tiam vundiĝas aŭ estas mortigitaj estas malfavore, alie ili alportas prosperon kaj fortunon.

Ŝtelistoj aŭ rabistoj kiuj eble pro mispaŝo forkondukas la sanktajn ĉevalojn renkontas severan faton, ili senindulge estas persekutataj kaj ĉasataj, mortigitaj tuj post atingo, aŭ renkontas la punon alimaniere se ili eskapas.

La spiritoj rajdas tiujn ĉevalojn, la spiritoj kiuj troviĝas ĉie, vojaĝas nevideblaj kie homoj vojaĝas, la spiritoj kiuj povas esti bonmensaj kaj feliĉgeneraj, sed ankaŭ facile povas ofendi kaj turniĝi malicintencaj, malamikaj.

Eble la Ĥano mem dividas tiun kredon pri la sanktaj ĉevaloj apartenaj al la spiritoj, li respektas ilin kaj ne intervenas

kontraŭ la elektoj far la ŝamanoj de tiaj ĉevaloj, eble li zorgas ke ne estu tro multaj da ili.

Piede de la monto Burkhan Khaldun troviĝas fonto, ĝi estis konata al la mongoloj ĉiam, ĝi netuŝite fluadas eĉ en la plej varmegaj someroj kaj neniam frostiĝas dum la vintroj, ĝi ankaŭ posedas la rimarkindan kvaliton ke ĝia akvo sin tenas malvarma dum la someroj kaj varma dum la vintroj.

Ĉiujare komence de la vintra malvarmo ĉevalo estas oferita al la fonto, blanka ĉevalo sen ajna makulo, kaj la sango verŝiĝu en la fonton, kiu koloriĝas ruĝa dum mallonga tempeto, ĝi sorbas la sangon kaj poste ĝi estas tiel klara aŭ eĉ pli klara ol antaŭe.

Ĝi estas fonto sen fundo, ĝia radiko el akvo enatingas la internon de la tero, eble tute ĝis la senfinaj akvoj sur kiuj flosas la tero, kaj sobrigardante en ĝin oni vidas nur sin mem kaj la mondon ĉirkaŭe, etige spegulataj en la profundo, ĝis oni ombas per la mano super la okuloj kaj distingas la ruĝecajn flankojn kiel kolosan gorĝon abismantan krutmalsupren.

Ekde antikve estas malpermesite provi mezuri la profundon de la fonto, tio estus alpaŝi ĝian sekreton tro proksimen kaj neniu scias kio tiam okazus, sed se iu ĝin farus li estus punmortigita, kio aŭtem neniam devis okazi.

Ĉevaloj kaj brutoj ne rajtas trinki ĉe la fonto, tio estus malpurigo ĝin kaj la bestoj mortus pro la malvarma akvo, eĉ homoj devas singarde trinki de ĝi, lante, klinite super la fonto, kun la lipoj al la akvo: en la plej varmegaj tagoj ĝi longe poste malvarmigas la ventron, sed en la vintra malvarmo ĝi varmigas.

Iu aŭ alia kiu tro avide trinkis el la akvo de la fonto mal-saniĝis, eĉ mortis, ĉar frapis lin severa kramfo: tia estas la puno pro senrespekto kaj hasta avido.

La Ĥano mem dum sia tuta vivo fojon post fojo revenis al tiu fonto piede de la monto Burkhan Khaldun, li scias kiel trinki el ĝi en la ĝusta maniero kaj ĉiam ĉerpas novan forton el ĝia akvo.

Estas nun, dum ĉi tiu tempo de paco kaj atendo en Karakorum, ke songoj pli kaj pli ĝenas la Ĥanon, la nokto ne donas al li veran ripozon, li ĵetiĝas kaj vokas dum la dormo, spiras pene kaj subite vekiĝas malseka pro ŝvito kun forte batanta koro, songo kiun li ĵus mezis ne emas lin forlasi, ĝi ŝajnas al li saturita per sekreta signifo kaj gluiĝas en lia memoro.

Ne malofte vekiĝas en li nerezistebla bezono rakonti la songon al iu, tuj aŭ en la posta tago, por tiel ĝin samtempe pli bone reteni ak pli facile liberigi sin de ĝi, sed li ne sendas por skribisto, li ne volas ke la songo estu notita, ĉar tio povus fari ĝin tro reala kaj doni al ĝi pligrandigitan signifon, pliigitan potencon, kaj eble tiaj skribitaj songoj ankaŭ povas esti misuzataj iel aŭ aliel.

Anstatue li sendas por iu kiu nur aŭskultas kion li rakontas pri sia songo, iu al kiu sin konfidi, iu kiun li tiakaze fidas, fojfoje la saĝan katajon Je-liu kiun li alvokas meznokte, por ricevi lian helpon ekspliki la songon aŭ por iagrade forigi la mirindon, minacon aŭ timon en ĝi.

Fojfojojn li sin turnas al iu el siaj plej fidataj ŝamanoj, alifojjn li preferas sin konfidi al virinoj, eble al la inteligenta Byrte aŭ al la rava Khulan, sed neniam al iu el la filoj aŭ al la

lertspertaj armeestroj, kiom ajn li taksas ilin ili apartenas al alia plano kaj siajn songojn li ne volus ellasi al ili.

La Ĥano neniam antaŭe estis trafita de songoj de tia forto kaj persisto, li demandas al Je-liu de kio ĝi povas dependi, ĉu ĝi estas signo de aĝo, ĉu tiuj songoj ion apartan signifas, ĉu ili eble aŭguras aŭ avertas pri io grava kio okazos, aŭ ĉu simple ilin kaŭzas la nenature paca vivo tie en Karakorum.

Je-liu respondas ke la songoj povas havi ĉiujn tiujn kaŭzojn samfoje aŭ certajn el ili malsamfoje, li opinias saĝe observi ilin kaj provi ekspliki ilian kaŝan lingvaĵon, iuj eble estas pure okazaj kaj al ili mankas profunda signifo, pri aliaj povas fakte male.

Sed kiel estiĝas la songoj, demandas la Ĥano, de kie ili venas, ĉu ili sobsendiĝas de la Ĉielo mem aŭ ĉu ilin inspiras anstataŭe la disvagaj demonoj, mavovolaj spiritoj, aŭ ĉu ili originas el la interno de la homo mem, el liaj memoroj, aŭ ĉu ili eĉ venas de la intestoj?

Plie, opinias Je-liu, povas esti unu kaj alia, songoj povas havi tute malsamajn originojn kaj instigojn, ilin oni devas provi elserĉi aparte en ĉiu kazo, songojn oni nur ne kredu ke ili estas kiaj ili ŝajnas esti, ili estas plenaj de mistifikantaj kontraŭoj kaj trompaj transformiĝoj, ili ŝatas kaŝi sian veran sencan aŭ havi plurajn signifojn samtempe.

La Ĥano: Ĉu la songojn oni povas kompari kun iaspeca malsano, simile la febron kiu hantas onin per teruraj halucinoj, kaj se tiel, ĉu ekzistas iu kuracilo kontraŭ ili, ĉu oni iel aŭ aliel povas eskapi la songojn?

Je-liu: Ekzistas ja rimedoj por doni pli profundan dormon, sed tio ne necese efikas al la songoj, eble ili pli estas signo de

sano ol malsanaĵo, ili estas ellaso de io, interna agado kiu certe estas grava, eble necesa.

La Ĥano komprenas la diritan tiel ke ne estus saĝe eviti la sonĝojn eĉ se tio eblus, kaj li konkludas ke liaj nunaj sonĝoj rilatas al ŝanĝiĝoj ene de li mem, li nun komencis primediti aŭ eĉ pridubi multon, kio pli frue estis memevidenta al li, la violenta agado forfluis, almenaŭ por kurta tempo, kaj anstataŭe la ekzamenaj pensoj venis, preskaŭ kiel alŝteliĝanta dubo pri lia propra vivago, pri la senco en ĉio kion li faris.

Ĉi tiu estas unu el la ofte revenantaj kaj plej maltrankviligaj songoj de la Ĥano:

Li sin trovas meze de batalo kiu ondas antaŭen reen sen atingi decidiĝon, la sagoj stridas kaj strias la aeron kiel pluvo, la polvo leviĝas en densaj nuboj ĉirkaŭ la atakantaj rajdantoj, ĉevaloj baŭmas unu kontraŭ alia, bataluloj estas engaĝitaj en violenta lukto, ŝrias kun apertaj buŝoj aŭ nudigas forte kunmorditajn dentojn, multaj ĵetiĝas teren, kapoj foruliĝas en torento da sango aŭ pendas duone dehakitaj de la kolo.

Tio estas vidoj bonekonataj al la Ĥano, nenio aparta distingas la batalojn de la songo ab tiuj de la realo, li ne sentas timon, teruriĝas de nenio, sed male estas plena de la kutima raviĝo pro la batalo, de intensiĝo de ĉiuj fortoj, speco de frida varmego, bridata feroco, stato en kiu la tempo kvazaŭ vastigas sin, ĉiu momento fariĝas neordinare palpebla kaj travidebla, portata de volo kiu kunestas en ĉiu moviĝo,

sed dum ĉiu momento estas strange vastigita kaj daŭra, la tempo en sia tuteco iras tre rapide, estas kvazaŭ la suno sin movus salte sur la ĉielo, la tago apenaŭ atingis la meztagan altecon antaŭ ol ĝi rapide sinkas vesperen, la malhelo baldaŭ falos kaj la bataloj ĉesos,

tiam li ekvidas unu el la armeestroj de la malamiko veni al si kontraŭen, evidente la plej eminenta el ili, unu kiu opini-

as sin lia egalulo, kaj subite frapas lin la penso ke li mem estas tiu kiu venas renkonte al li mem, li sin rekonas tute kaj trae, kvazaŭ li vidus spegulaĵon de si mem: la Ĥano atakas la Ĥanon, kaj tio lin plenigas per timo kian li neniam antaŭe sentis,

li staras antaŭ la sola kiu vere povas egalmezuri kun li, la sola kiun li ne povas venki, ĉar se li venkus tio signifus ke li venkus sin mem, kaj se la alia venkus tio signifus samon!

Eble ĝuste tiu maleblo lin paralizas, inokulas al li tiun timon stari antaŭ si mem, la fortoj lin forlasas, liaj membroj plumbiĝas, li apenaŭ povas levi la glavon kaj eĉ malpli apliki decidan frapon,

li estas senŝirma antaŭ la alia, senhelpa kiel infaneto, kaj povas nur atendi la mortigan baton direktotan al si, neniu sin enmiksas aŭ intervenas, ambaŭ troviĝas aparte kvazaŭ longdiste de la cetera batalo,

sed tiam li rimarkas ke la alia havas saman malfacilaĵon kiel li, estas same senforta kaj senhelpa, nur malfacile povas levi la glavon, liaj frapoj apenaŭ perceptiĝas kontraŭ la ŝirmilo kiun li tenas antaŭ si,

kaj tiel ili luktas unu kontraŭ la alia, ĉiam pli lante, kun ĉiam plia peno, kvazaŭ ili estus mergitaj en tenacan ŝlimon aŭ trasaturitaj de strange peziganta akvo, iliaj hako kaj frapoj ne atingas aŭ ne penetras, ili povus same efike lukti per molaj vergoj kiel per akraeĝaj glavoj,

estas lukto kiu ne povas decidiĝi, kiu povos daŭri eterne, sen ke unu povos venki la alian aŭ eĉ kaŭzi al li rimarkeblan lezon —

La Ĥano vekiĝas ŝvitumita kaj anhelanta el la sonĝo, daŭre sentas kvazaŭ la korpo estus plumbepeza kaj paralizita, sed

tamen trovas ke li kapablas sin movi, kapablas eksidi, leviĝi el la lito, voki la gardiston.

Kaj li sendas por Je-liu, ne eviteblas ke li estas ĝenata meznokte, por tio konsilisto de la Ĥano estu preparita kaj Je-liu ŝajnas la sola kun kiu li povos paroli pri tiu songo.

Je-liu venas kaj riverencas laŭ sia ĝentile kataja maniero, kun la manoj en la longaj manikoj krucitaj sur la brusto, ne montrante ajnan signon de surprizo pro horo kaj sen ajna spuro de tio ke li ĵus dormis.

La Ĥano rakontas la songon, zorge, kun ĉiuj detaloj, Je-liu atente aŭskultas, kaj kiam la Ĥano finis ambaŭ sidas silentaj dum tempeto, poste la Ĥano diras:

Kion vi opinias ke ĉi songo signifas, saĝa Je-liu, kial ĝi min ekscitas tiel forte, kial mi sentas tian timon renkonti min mem, kial mi paralizigas kaj perdas mian forton?

Je-liu: Ĉu licas al mi kontraŭdemandi, ho Ĥano: ĉu vi neniam en via songo dubas ĉu vi vin mem renkontas, kaj ne iun alian kiu vin similas sed ne estas vi?

La Ĥano: Ne, tiu penso neniam venas al mi, mi scias ke li estas mi mem tuj kiam mi vidas min venanta kontraŭ min, ĝuste tio estas timiga kaj paraliza, se estus iu alia kiu nur similus al mi mi tuj atakus kaj venkus lin.

Je-liu: Tio do povas signifi ke vi timas neniun alian ol vin mem, nur vi mem povas minaci vin mem kaj paraliza viajn fortojn, nur vi mem povas turni vin kontraŭ vin mem kaj supervenki vin.

La Ĥano: Sed kion tio signifas, kiel mi povus turni min kontraŭ min mem, mi ja ne povas dividi min en du personojn kiuj ambaŭ estas mi kaj kontraŭluktas unu la alian?

Je-liu: Tio povas esti la lingvaĵo de la songo por diri al vi ke

hezito vin minacas, ke du kontraŭaj voloĵ komencas movi sin interne de vi, ke via vivo kaj viaj faroj deglitas de vi en du malsamaj direktoj.

La Ĥano enpense glatumas per la mano la frunton, sed nenion diras, kaj Je-liu daŭrigas:

Sed la sonĝo ankaŭ povas signifi ion alian: ke vi sentas proksimiĝi la tempon kiam vi devos translasi vian potencon en aliajn manojn, ke ĉagrenas vin tio, kiel tio iros, ke vi timas ke la potenco, kiun vi translasos, turnos sin kontraŭ tion, kion vi kreis kaj neniigos ĝin.

La Ĥano denove glatumas la frunton sed plue silentas, kaj Je-liu reparolas:

Tamen la sonĝo povas koncerni eĉ ion alian, mi hezitas diri tion, ho Ĥano, sed tio estus ke vi timas ke iu alia estiĝos aliloke kiu povos sin kompari kun vi, kiu estas al vi simila aŭ tiel egala en ĉio ke vi ne povos venki lin.

La Ĥano meditas la vortojn de Je-liu, silenta kaj senmova, poste li ektemas kvazaŭ li malvarmus, skuas sin kaj ekrigardas al la kataĵo per longa, serĉa rigardo, poste li ordonas vinon kaj malplenigas pokalon, alordonas sian ĉevalon kaj elrajdas sola en la meznokto.

Je-liu, la erudicia katajo, estis alta kaj magra viro, kun maldensa blanka barbo kiu atingis ĝistalie, li jam estis iom aĝa homo sen ke la aĝo ŝajnis efiki sur lin, lia voĉo havis profundan bronzan klanton kiu surprizis kaj ŝajnis veni de iu alia ol li, li estis vestita en ĝisplanda silka vesto sen brodaĵoj kaj la larĝaj manikoj pendis ĝis super liaj manoj en kataja maniero.

Li estis tute neimpresita de la elmontroj far la ŝamanoj, lia kapablo antaŭvidi kaj interpreti diversspecajn signojn superis ilian kapablon kaj li sciis multon kion ili malsciis, ankaŭ ne la famaj mongolaj armeestroj kaj bataluloj imponis lin, kaj tiun fanfaronan aroganton kiun ili tiel volonte montris al li, li renkontis kun frida indiferento.

La Ĥano zorge aŭskultis kion diris Je-liu kaj impresiĝis de lia klara argumentado, la mongolaj komandantoj volis igi la Ĥanon permesi al ili ekstermi la plimulton de la loĝantaro en la kataja regiono kaj transformi ĝin en paŝtejojn por la gregoj, sed Je-liu turnis sin kontraŭ ilin kaj montris al la Ĥano per siaj kalkuladoj kiel pli profite estus konservi la loĝantaron, meti sur ĝin impostojn kaj utiligi la produktojn de la lando.

La Ĥano lasis sin konvinki, li havis la kapablon vastigi siajn pensmanierojn dum lia kono pri la mondo vastiĝis, li lasis al Je-liu starigi organizon en Karakorum por prizorgi la efektivigon de ĝenerala impostado kaj enpostenigis kreskan-

tan nombron da katajaj, uiguraj kaj mahometanaj skribistoj en sian servon.

La konsiloj de Je-liu eĉ ludis rolon por la maniero de la Ĥano estontece vastigi kaj firmigi sian regadon, en kiu la taktikaj paŝoj proksime kunefikis kun la militaj, tiel estis sendita negranda armeo sub komandanto Djebe, nomata la Sago pro sia rapideco kaj agoforto, por rebati konkeronton kiu de okcidente provis penetri en Karakataj, kaj ĉe tio estis gajnita la favoro de la islama loĝantaro per la religia toleremo kiu estis gardata ene de la mongolregno, la gvidanto de la invadantoj estis venkita kaj senkapigita, post kio la regno de la Ĥano etendis sin ĝis la montĉenoj de Pamir kaj la valoj de Syr-Darja.

Iom pli frue ol la mongolregno de la Ĥano la Kharasmo-regno estiĝis pli okcidente, sub turkaj regentoj, kiuj de la persa nukleo vastigis la regnon ĝis ampleksi grandajn partojn de Afganistano kaj norda Hindujo, Korasan kaj Transoksiano, diste norde de la Aral-lago kaj ĝis la Kaspia Maro, dum ĝi samtempe minacadis la Kalifejon en Bagdado okcidente kaj pretendis esti la plej elstara probatalanto de Islamo.

La regento de la kharasmoj estis tiutempe la ŝaho Alladdin Muhammed, aroganta kaj vanta viro, rafinece ĝuavida, kun gusto por ĝis dekadenco rafinita kulturo, intrigema kaj ruza politikisto, sed samtempe aŭdaca batalulo, kiu volonte sin nomis la nuda glavo de Islamo.

La multaj urboj de la Kharasmo-regno preskaŭ ĉiuj estis oazaj urboj en la valoj, arte akvumitaj, superpompe florantaj, nestoj de blindiga lukso, erudicio kaj arto: Samarkand, Bukhara kaj Gurganj ĉe Amu-Darja, Otrar kaj Jand ĉe Syr-Darja,

Merv, Balkh, Nishapur kaj Herat proksime al pli sudaj riverbranĉoj.

La Ĥano de la mongoloj komence provis establi bonajn rilatojn kaj pactraktaton kun la Kharasmo-regno, li sendis al la ŝaho skribaĵon en kiu li tiun salutis, deklaris ke li bone konas ties potencon kaj ties disvastan regnon, kaj lin nomis iom dusence sia plej amata filo, finis menciante siajn proprajn konkerojn, sian militan forton kaj esprimante sian deziron ke ambaŭ landoj vivu pace unu kun la alia.

La ŝaho ion protektan kaj kaŝe ofendan trovis en la skribaĵo, li faris ŝajnpakton kaj ĝisatendis okazon ĝin rompi, la Ĥano sendis riĉe ŝarĝitan karavanon al Kharasm, sed ĝi estis haltigita en Otrar kaj elrabita, post kio ĝiaj kvarcentkvindek karavananoj estis ekzekutitaj.

La Ĥano nun sendis tri senditojn al la ŝaho postulante punadon de la kulpantoj, sed la ŝaho rifuzis kaj atencis la senditojn, la Ĥano tiam tuj sin preparis por milito kontraŭ la Kharasmo-regno, li serĉis gvidon ĉe la Eterna Blua Ĉielo kaj trovis ke ĝia volo koincidas kun lia propra: ne povas esti du sunoj sur la ĉiela firmamento, li diris, nek du regentoj sur la tero!

Al la ŝaho de Kharasm li sendis la kurtan mesaĝon: Vi elektis militon. Kio nun okazos, ĝi okazos kaj kiel ĝi finiĝos, scias sole nur la Ĉielo.

Triajare post la reveno de Kataj la Ĥano ekkampanjis en la nova milito, printempe li kunvokigis ĉiujn siajn batalfortojn en valon en okcidenta Gobio, malgranda armeo estis sendita sudokcidenten por transiri la altajn montpasejojn, dum la

ĉefarmeo sin tiris antaŭen en pli nordokcidenta direkto super Altaj, venkante la plej malfacilajn naturobstaklojn: pezaj militmaŝinoj estis kuntransportataj dismuntite en partojn kaj ŝarĝitaj sur poefagoj kaj kameloj, trabopontoj estis konstruataj super riverravinoj kaj abismoj, vojoj estis farataj tra alie nepenetreblaj arbarveproj kaj ŝtonaj interkrutaĵoj.

Somere la Ĥano staris ĉe supra Irtysj kun la ebenaĵo direkte al Aral antaŭ si, li havis armeon de centkvindek mil rajdsoldatoj kaj dekmil katajaj specialistoj, kiuj prizorgu sieĝomaŝinojn kaj fajroĵetilojn, kaj tiu armeo nun marŝis tra la dezertostepo rekte kontraŭ la forte fortikigitan urbon Otrar ĉe Syr-Darja, kiu estis sieĝata de trupo kaj falis nur post ses monatoj, dum la ĉefarmeo sub komando de la Ĥano plumarŝis direkte al Bukhara kaj Samarkand.

La ŝaho de Kharasm estis ŝanceliĝa kaj hezita en siaj decidoj, li ne tute fidis siajn bunte kunmetitajn trupojn kaj tenis ilin dislokitaj, enkvartire en la fortikigitaj urboj, kiujn li opiniis nekonkereblaj, dum la lando cetere estis lasita sen defendo, la ŝaho ankaŭ ne havis klaran koncepton pri tio kie la mongoloj atakos kaj li movis sin nervoze inter diversaj urboj, dum li samtempe en sia sinbloviteco subtaksis la adversulon en danĝera maniero.

Bukhara kaj Samarkand falis kun timiga rapido ĉe la atako de la mongoloj, la muroj certe ne povis esti sturmitaj kiom ajn ili estis premataj per sieĝaj maŝinoj kaj mortmaltimaj rajdatakoj, sed la trupoj samkiel la loĝantaro en tiuj urboj estis forte dissplitita en sia defendovolo kaj nur manke lojalaj al la ŝaho, la turka garnizono en Bukhara elbreĉis kaj lasis la ur-

bon okupi la mongoloj, kiuj mortigis aŭ forpelis la loĝantaron, bruligis kaj rabis, dum en Samarkand la loĝantoj elmarŝis kaj estis mortigitaj, post kio la enfermita garnizono estis devigita kapitulaci kaj la urbo estis detruita.

Same okazis al la ceteraj urboj en Kharasm, la Ĥano prezentis al ili sian ultimaton: nenio estu detruita kaj la vivoj de la loĝantaro estu ŝparitaj se ili libervole sin transdonos kaj submetos al lia regado, ĉar tia estas la volo de la Ĉielo kaj se oni ĝin spitas la sekvoj estos teruraj, sed la aplombaj urboj fidis sian forton kaj rezistis, eltenis pli malpli longajn sieĝojn, tamen unu post alia cedis antaŭ la senindulgaj mongoloj kaj estis nivelitaj ĝisgrunde.

Ĝuste tiu rezisto kontraŭ la volo de la Ĉielo kaj lia propra potenco faris la Ĥanon malamanto de urboj, detruante senkompara de urboj, konkeranto kiu sin gloris disrompante la urbojn pro ties provoka orgojlo kaj ekstermante ilian pompon, postlasante nenion krom ŝtonamasoj kaj skeletoj, kie greso povos kreski kaj luphordoj povos denove hurli.

La abunda predo estis forportata per senfinaj karavanoj orienten tra la dezertebenoj, centmiloj da kaptitoj estis pelitaj samdirekte, por sklaviĝi aŭ fariĝi utilaj kiel metiistoj kaj specialistoj ene de la senĉese kreskanta mongolimperio, sed la palacoj estis detruitaj, la bibliotekoj bruligitaj, la hortoj dezertigitaj, la irigaciaj instaloj disfrapitaj, tiel ke la urboj estis inunditaj aŭ aridigitaj tiom ke la dezerta sablo enbloviĝis kaj kovris ilin.

La Ĥano trovis ĉie tro multe da homoj, multe pli ol li povis imagi: homoj kiuj mortmalestime rezistis aŭ terurite fuĝis, plendis kaj lamentis en rezigno, konstante baris la vojojn, neregeblaj kaj nefideblaj, homamasoj pri kiuj li ne tute sciis

kion fari, li povis nur meti ilin antaŭ la elekto inter senkon-
diĉa submetiĝo aŭ morto, kaj li baldaŭ malkovris ke la mor-
tintoj estas multe pli fideblaj ol tiuj kiuj sin submetis, la mor-
tintoj signifis pacon kaj trankvilon kaj kreskantan greson, la
transvivantoj estis avidaj kaj perfidaj, inklinaj al ribeloj, kaj
kontraŭstaris lian potencon diversmaniere.

La kolero de la Ĥano tute aparte validis por la ŝaho Mu-
hammed, kiu perfidis siajn interkonsentojn, montris sin
trompa kaj malestima, kiu oferis urbon post urbo en senŝan-
ca kontraŭstaro kaj malgraŭ sia prifanfaronata kuraĝo nur
fuĝis de loko al loko ne partoprenante en la defendo: sen-
taŭga regento kaj malestiminda adversulo, kiu meritis neni-
on krom esti ĉasata kiel besto kaj mortigita.

La Ĥano apartigis iujn el siaj plej reputataj armeestroj kiuj
kun sia trupoforto ekmarŝis por ĉasi la ŝahon, persekuti lin
kroze-kruce tra lia propra regno, frakasis ĉian kontraŭstaron
en sia vojo, okupis aŭ ĉirkaŭiris la urbojn, ĝis la ŝaho estis nur
terurita fuĝanto ĉasata sur insulon en la Kaspia Maro, kie li
mizeraĉe mortis, sola kaj paŭpera.

La plej aĝa filo de la ŝaho, Djelal-ed-Din, sukcedis lin kaj
tuj sin taŭgigis kiel elstara stratego, li revekis la reziston kon-
traŭ la mongoloj kun novigita forto, sed la trupoj plu estis
kunigitaj de tro antagonismaj elementoj, lia kontraŭbatalo
nur longigis la militon kaj amarigis ĝin, tiel ke la brilaj urboj
Herat, Merv kaj Balkh kune kun la fama Bamijan de la budd-
hanoj renkontis tiun saman faton kiun havis ĉiuj aliaj, dum
buĉado de milionoj da homoj.

Printempe la trupoj marŝis laŭ Amu-Darja tra la stepregiono ale al la urbo Urgenĉ, la grundo estis vastdistance malsekigita kaj marĉa pro inundoj, la ĉevaloj sinkis ĝisventre kaj malrapidis, cikonioj ekflugadis antaŭ ili klakigante siajn ruĝajn bekojn, mortiĝantaj fiŝoj baraktis en sekiĝantaj akvostrioj aŭ kuŝis mortintaj en la fango kaj stinkis,

Urgenĉ situis ioman distancon okcidente de la rivero, la deklivoj ĉirkaŭe ruĝis kvazaŭ de verŝita sango pro papavoj kreskantaj en densaj tapiŝoj eĉ supren laŭ la remparoj kaj fortikaĵoj, la masonaĵoj estis el sekigita argilo armita per trunkoj, ŝtonoj ne troviĝis en la regiono kaj la soldatoj de la Ĥano ne povis kun granda efiko funkciigi siajn ĵetmaŝinojn dum la sieĝo, akvosaturitaj lignoblokoj estis mankhava anstataŭo de ŝtonoj, anstataŭe ili devis sin servi per la fajroĵetiloj kiujn la kataĵoj plibonigis elpafante tra la tuboj radiojn el brulanta nafto kiu abundis en la ĉirkaŭo, la nafto elfluis el la grundo kiel fontoj de nigra, gluiĝema oleo,

Urgenĉ estis urbo de origino de la kharasmoj kaj plej forta fortikaĵo nordokcidente, ili sin defendis kun furiozo kiu povus egali la atakojn de la mongoloj, sed akvo ne povis estingi la fajroradiojn kiuj trabreĉis la murojn, kiuj eĉ la grundon boligis per sia varmego kaj paŝon post paŝo repelis la defendantojn, dum tiuj forĵetis siajn brulantajn ŝildojn, rulis sin surgrunde por estingi la flamojn en siaj vestoj, havis la

harojn debruligitaj de sur la kapo aŭ blindaj ŝanceliĝis kun konsumitaj okuloj,

la mongoloj penetris en la urbon kie la fajro preparis vojon kaj la bataloj kontinuus en la mallarĝaj stratoj, kiuj estis blokita al la rajdantoj tiel ke ili devis forlasi la ĉevalojn kaj batali surpiede, viro kontraŭ viro, armilo kontraŭ armilo, malrapida kaj pena penetro por la bataluloj de la Ĥano: nur post plurtaga seninterrompa lukto la restantaj defendantoj liveris sin kiel kaptitoj kaj eblis transdoni la okupitan urbon al la fajro por purigo,

sed la regento kaj batalgvidanto jam sukcesis fuĝi, kio faris la Ĥanon furioza, ĉar tiu estis neniu alia ol la filo kaj sukcedanto de la mortinta ŝaho, Djelal-ed-Din, pli taŭga viro ol la patro kaj tial ankaŭ pli danĝera, la Ĥano tamen rezignis persekuti lin kaj ĉesigis siajn militajn entreprenojn dum la somero, li kaj liaj mongoloj suferis pro la varmego en la malaltejo kaj tiris sin supren al pli alte situantaj regionoj kie Amu-Darĵa dividis sin en du riverojn, la Ĥano tie ordonis ke granda ĉaso okazu dum iliaj ĉevalgregoj liberos paŝtiĝante, la bataluloj okupu sin per alio ol bataloj sen tamen degeneri al pigro kaj lukso,

rajdistoj estis elsenditaj por elekti kaj marki la terenon por la ĉaso, kun gurtajo aŭ finpunkto elektita dekojn da mejloj for, la ĉaso estis giganta manovro en kiu la trupoj retenis siajn formaciojn kaj sian armilaron, ili estis dislokitaj laŭ la formo de luna serpo kaj metis siajn provizorajn tendarojn, ĝis la ordono de la Ĥano pri ĉaskomenco sonis en la regiono kun klakantaj trumpetsignaloj, la duoblaj vicoj de rajdantoj ekmoviĝis, akompanataj de ĉevalportataj tamburoj kaj multaj

viroj manipulantaj cimbalojn, por ke la peza tondrado kaj la akra tintado pelu ĉiujn bestojn el iliaj kaŝejoj,

la rajdantofrontoj sin trapuŝis kun zorge konservita kunteno, neniu besto rajtis sin forsavi, sed ne estis permesite uzi armilojn, neniu besto estu mortigitaj, nur estu pelataj antaŭen, forŝovataj per lancostangoj kaj ŝildoj, eĉ se batalulo mortus ne estis permesite ekuzi armilon, tio estus krimo kontraŭ la severaj reguloj de la ĉaso kaj granda mokindaĵo,

la tereno estis malfacile penetrebla, kun densaj veproj, klijfoj kaj krutaĵoj, malvarmaj fluoj kiuj torentis inter ŝtonoj aŭ sekiĝintaj rojsulkoj kun elstarantaj arboradikoj kaj perfidaj kavaĵoj, ne malofte iu timigita aŭ incitita besto sin ĵetis antaŭen por trarompi la fronton de rajdantoj, kolerega urso, lupo kun hirtigita felo, apro kun danĝeraj dentegoj, tigro kiu siblis inter malkaŝitaj dentoj, kaj tio kio ilin repelis estis ne tiom la batoj kiom la sovaĝaj vokoj, la muĝado de la tamburoj kaj la kraktintoj de la cimbaloj, la oreloj de la bestoj retrofleksis sin pro malagrablo kaj timo antaŭ tiuj sonoj, muro el fibruado kiun ili ne kapablis trairi,

la noktmalhelo interrompis la ĉason, la bataluloj ekbivakis kaj ĉendis fajrojn kun interspacoj de nura ŝtonĵeto, gardistoj sin konstante movis inter la fajroj, la viroj dormis skipe kaj alternis je difinitaj horoj, la silento estis konservata kaj la bestoj tiom sin proksimigis kiom ilia timego antaŭ la fajroj permesis, iliaj okuloj flamis kaj ardis en la obskuro kie ili sin movis maltrankvile, hurlante, murmurante, graŭlante,

tiel la ĉaso daŭris tagojn kaj noktojn, tra la somero, dum kvar monatoj, dum la frontoj de rajdantoj sin movis antaŭen lante sed senindulge kaj ĉiam pli sin fermis en ĉirkaŭmovo kiu formos cirkulon kun la difinita finpunkto meze, la bestoj

ĉiam pli kunpremiĝis de ĉiuj flankoj kaj fariĝis ĉiam pli mal-facile ilin forpeli, ili jam divenis la enfermitecon, la danĝeron kiu sin proksimigis ĉiam pli, ili unuj aliajn ĉasis kaj mortigis nur kiam la malsato fariĝis tro turmenta, ili preskaŭ tute perdis sian reciprokan timon, cervoj kaj kapreoloj cirkumkuris inter tigroj kaj leopardoj, lupoj kaj leporoj glitis tra la veproj kune, la fremdaodoro de homo ĉiam ilin atingis kaj enspiris al ili profundan maltrankvilon, liaj vokoj kaj bruoj tenis ilian timon viva,

la frontoj de la ĉasantoj densiĝis, duobliĝis, kaj fariĝis pli maleble ol iam trapenetri ilin, la bestoj ĉirkaŭvagis en io kio jam estis kaptiteco kaj atendis sian faton, tamen ankoraŭ ne subigitaj sed pretaj por unu lasta lukto, en furiozo kiu kondukos al morto aŭ libero,

fine la gurtajo estis atingita, la ĉirkaŭrondiĝo plenumita kaj stringita ekstreme, la bataluloj ekhaltis kaj atendis la signalon de la Ĥano, li dum la tuta pelĉaso cirkumrajdis inter ili, sekvis la farojn de la komandantoj kaj viroj, distance aŭ tute proksime, ofte ilin surprizante, observante ĉion, enmemorigante ĉion, muta kaj minaca sen interveni en ion ajn,

estis la Ĥano kiu komencis la kulminacion de la ĉaso kiel preskribis la moro, li preterrajdis ĉiujn aliajn, rajdis sola inter la bestojn, kun glavo kaj pafarko ĉemane atingeblaj, li elserĉis kelkajn el la plej danĝeraj bestioj, urson kiu levis sin sur la postaj piedoj kaj nudigis la dentojn, tigron kiu kaŭriĝis salt-prepare, fortikan apron kiu renkontis lin en la atako, la Ĥano streĉis sian arkon kaj sendis siajn siblantajn sagojn kontraŭ unu besto post la alia, faligis ilin aŭ vundis ilin, persekutis la vunditajn kiuj provis eskapi, atingis ilin kaj frapis ilin per la glavo,

post kiam li sufiĉe montris sian kuraĝon kaj sian lerton la Ĥano retiris sin kaj lasis al la aliaj daŭrigi la mortigadon de la bestoj, li okupis lokon sur altaĵo proksime, daŭre sidante sur sia ĉevalo, por de tie supervidi tion kio okazis, kiel la bataluloj ĵetis sin antaŭen kaj faligis ĉiujn bestojn kiuj krucas ilian vojon, per sagoj, per lancpikoj, per glavfrapoj, dum la blekegoj kaj hurloj de la bestoj miksiĝis kun la mallongaj vokoj de la viroj, la tamburoj kaj cimbaloj nun silentis,

furiozantaj bestoj atakis kaj renversis ĉasistojn sur la grundo, ruliĝis kun ili en mortiga manbatalo, sen ke unu venus helpe al alia kiel la bataluloj faris en realaj bataloj, tio estus insulto kontraŭ la atakito, lia gloro postulis ke li mem venku en la lukto kontraŭ la bestoj aŭ lasu sin vundi, mavtrakti, eble ĝismorte,

nur kiam la tago proksimiĝis al sia fino kaj la ĉefparto de la ĉirkaŭitaj bestoj estis mortigitaj estis tempo por unu el la junaj nepoj turni sin al la Ĥano kaj peti lin donaci al la restantaj bestoj ilian liberon rekompence pro ilia kuraĝa lukto, la Ĥano konsentis kaj la ĉaso estis ĉesigita per resonantaj trumpetfanfaroj, la predo estis kolektita, ŝargita sur ĉevaldorsoj kaj kondukata al la tendaro,

poste ĉiuj kolektiĝis ĉirkaŭ la Ĥano kiu sidis en sia malfermita tendo kaj sciigis ilin pri siaj impresoj de la ĉaso, kritikis mispaŝojn, mallaŭdis mankojn, esprimis sin aprobe pri aparte kuraĝaj aŭ lertaj bravaĵoj, deklaris fine ke la plezuro de la ĉaso nun pasis, la somervarmo jam cedis kaj la veraj bataloj denove komenciĝos, ankoraŭ restas la tasko kapti la filon de la ŝaho kaj subpremi la restantan kontraŭstaron en la Kharasmo-regno,

kaj la bataluloj estis en plej bona humoro antaŭ la perspek-

tivo de novaj bataloj kaj venkoj, kun raboj kaj ĉiaspeca predo, ili estis fortigitaj anstataŭ lacaj de la longa ĉaso kaj la gregoj de elripozintaj, bone nutritaj ĉevaloj atendis ilin.

La Ĥanon atingis famo pri olda saĝa katajo laŭdire vivanta en la Alaŝan-montaro apud la limo al Hsia, ermito kiu restadas en malfacile alirebla groto kaj rifuzas rilati kun la ekstera mondo, oni lin opinias nemortebla kaj laŭserte li instruas ke potenco estas senpotenco kaj senpotenco la vera potenco.

Eble tiu afero pri la potenco pli ol tiu pri la senmorteco vekas la interesiĝon de la Ĥano, li vokas al si ĉefulon super mil soldatoj kaj ordonas al tiu venigi la saĝan katajon al Karakorum, li respondu per sia vivo ke la oldulo venu ĝis antaŭ la Ĥano kaj nenio lin ĝenu survoje, la vojaĝo lin ne lacigu nek kaŭzu al li ĉagrenon.

La ĉefulo rajdas kun siaj mil soldatoj tra la dezerto suden kaj venas al la montaro Alaŝan, senmalfacile li trovas vojmontriston al la restadejo de la vastfama saĝulo, tamen ili devas halti antaŭ apika monta muro: tie supre apud rokŝtupo la oldulo vivas en sia kaverno, neniam li desupras, kiuj volas lin viziti devas grimpi supren riskante sian vivon.

La montomuro tamen bagatele obstaklas antaŭ la viroj de la Ĥano, dekvira grupo tuj komencas sin movi supren, dum la cetera trupo atendas sube, al la dek grimpantoj la supreniro estas pli malfacila ol ili prekalkulis kaj ili devas fari temporaban ĉirkaŭiron, ankaŭ la rokŝtupo supre montras sin tre streta kaj malfacile irebla.

La oldulo sidas ĉe la aperturo de sia kaverno, kun suprenturnita vizaĝo kaj fermitaj okuloj, ŝajnas ke li ne rimarkas la venon de la vizitantoj aŭ li nur ne lasas sin ĝeni de ili, ili tie staras silentaj kaj lin rigardas sen ke li faras plej etan movon.

Sin turnas la ĉefulo al li kaj diras: Ni vin salutas de la granda Ĥano, al kiu atingis la famo de via saĝo kaj kiu deziras vin renkonti!

La oldulo ne sin movas nek apertas la okulojn kaj nenion respondas antaŭ ol pasis kelka tempo, tiam li milde diras, per febla voĉo: La famo pri la granda Ĥano siavice atingis eĉ ĝis ĉi tie ĉe mi, sed mi havas nenion por diri al li kaj ne deziras lin renkonti.

La viroj de la Ĥano ŝokiĝis, sed regas sin, kaj la ĉefulo diras: La potenco de la Ĥano estas tiel granda ke neniu povas ion nei al li, lia deziro estas ke vi akompanu nin al lia urbo Karakorum kaj donu al li parton de via saĝo.

La oldulo respondas: Potenco estas nenio alia ol senpotenco, neniu povas min devigi al io, ĉar morto ne ekzistas por mi, sed mia instruo diras al mi ke mi nenion kontraŭstaru, ke tio estus nur vana kaj detrua, mi tamen preferus ne fari laŭ la deziro de la Ĥano, mi jam ne forlasis ĉi tiun kaverton de kiam mi antaŭ longe venis ĉi tien kaj mi volas resti ĉi tie ĝis mi eniros la ĉiomon.

La ĉefulo diras ke la volo de la Ĥano estas la sola leĝo de la mondo kaj ke ili devas lin konduki kun si al Karakorum, sed li komprenas ke la oldulo ne povas degrimpi la monton kaj apenaŭ rajdi ĉevale tra la dezerto.

Li konsideras ĉu ili povos lin porti malsupren, sed trovas la riskon tro granda, anstataŭe li igas kunligi iliajn ĵetŝnurojn, volvas la oldulon per kelkaj vestoj kaj fiksligas lin, sen ke li

faras plej etan reziston aŭ eĉ malfermas la okulojn, poste ili lin singarde mallevas suben laŭ la vertikala montmuro kaj poste mem malsuprengrimpas.

La oldulo ne povas rajdi, neniam sidis sur ĉevalo, kaj ili devas havigi portseĝon al li, tian kian nobelaj kataĵoj kutimas uzi, ĝi fiksĵungiĝas inter du ĉevaloj akompanataj de kvar rajdantoj, du ambaŭflanke de la du portantaj ĉevaloj, kaj la oldulo estas levita en la portseĝon, merĝas inter silkaj kusenoj sub la baldakeno, sen ke li ankoraŭ apertas la okulojn eĉ kiam la kurtenoj estas fermŝovitaj ŝirme kontraŭ suno kaj polvo.

Ekiras la trupo revoje tra la dezerto, la ĉefulo zorgeme elektas la plejeble bonan vojon kaj ne vojaĝas tro rapide nek tro lante, la unua konsidere al la fragila oldulo, la lasta konsidere al la pacienco de la Ĥano.

La ĉefulo ofte enrigardas la portseĝon, demandas la oldulon ĉu li ion deziras, sed la oldulo respondas nur per leĝera kapskuo ne malfermante la okulojn, li estas tre magra kaj minca, tiel sekiĝinta ke neniam li ŝvitas eĉ guton, kaj li konsumas nenion krom iom da akvo kaj rizo.

Lia eltenforto tamen sin montras neatendite granda, neniam li plendas pri la vojaĝo kaj ne ŝajnas tre laciĝinta, nek elĉerpita de la dezertvarmego aŭ portseĝa skuado, la ĉefulo tamen fojon post fojo timas ke la oldulo jam mortis kaj postlasis nur sian elsekiĝintan korpon, ĉar li ne sin movas nek malfermas la okulojn, li devas paroli al li kaj trankviliĝi de lia respondo.

Fine li ne povas deteni sin demandi la oldulon ĉu tiu nenion vidas, ĉu li neniam malfermas la okulojn, kaj la respondo venas laŭ lia milda kutimo: Ne malfermante la okulojn mi

vidas ĉion kion mi bezonas vidi, la videblaj objektoj nur ombroj kaj konfuzas la luminiĝon.

La ĉefulon ĉiam pli kaptas iaspeca timo pro tiu rimarkinda homo, emananta forto de li malgraŭ lia fragileco, forto simila al sekreta elradiado kiu ne havas rilaton kun la forto de la korpo, mildeco kiu sentiĝas pli densa kaj pli nepenetrebla ol muro.

Ne renkontinte eĉ plej etan reziston la ĉefulo tamen trovas la taskon unu el la plej malfacilaj kiujn li iam plenumis, li timas ke la oldulo iamaniere vanuos antaŭ ol ili atingos Karakorum, eble senspure kiel ventopuŝeto, eble postlasante la signifan oldan korpon sen vivo, sekan kaj malpezan kiel branĉofasko.

Kaj se io okazos al la oldulo, se li mortos aŭ vanuos, tiam lia propra vivo estos forperdita.

La Ĥano fervoras renkonti la saĝan kataĵon tuj kiam ties alveno anonciĝas, sed li sin regas kaj lasas al li antaŭe ripozi neĝenite unu tagon kaj unu nokton post la vojaĝo, poste la oldulo estas kondukita ĝis antaŭ la regento en ties jurton kaj al li estas ofertita arĝenta seĝo tute proksime al tiu.

La aĝa kataĵo ŝajnas ankaŭ ne nun levi la palpebrojn, tamen vidas kaj leĝere klinas la kapon kiel signo ke li perceptas la ĉeeston de la Ĥano, la Ĥano siaparte rigardas tra preskaŭ nerimarkeblaj okulfendetoj en la profundaj haŭtfaltoj, kaj tiamaniere ili silente rigardas aŭ perceptas unu la alian dum kelka tempo.

La Ĥano diras: Mi vin dankas pro tio ke vi venis la longan vojon ĝis ĉi tie, mi esperas ke la vojaĝo ne estis tro ĝena kaj

traktis vin malbone, sed via famo pro granda saĝo atingis min kaj mi volis vin renkonti.

La oldulo: Via deziro ne ebligis al mi elekton, ho Ĥano, ĉar mia instruo diras al mi neniam ion kontraŭstari, sed mi tuj klarigis ke mi havas nenion kion diri al vi.

La Ĥano: Ĉu en tio konsistas via saĝo, nenion kontraŭstari kaj nenion havi por diri?

La oldulo: Vi min ĝuste komprenis, ho Ĥano, ion kontraŭstari kondukas nur al antagonismoj kaj konfliktoj, el kiuj venas nenio bona, sed kiu ne kontraŭstaras tiu ĉirkaŭas kaj supervenkas tion, al kio li cedas, ĉar tio pro mankanta kontraŭstaro perdas sian forton.

Kaj mi havas nenion por diri al vi ĉar neniu ilumino povas transdoniĝi de unu homo al alia, kion oni diras estas komprenata laŭ la sperto kaj iluminiteco de la aŭskultanto, tial ĉiam miskomprenata, kaj kial paroli por esti miskomprenata?

La Ĥano: Viaj vortoj ŝajnas sagacaj, sed mi volus pli bone kompreni la penson malantaŭ ili, ĉu vi do volas respondi kelkajn demandojn kaj eble komence diri al mi vian nomon!

La oldulo: Mi ne havas nomon, ĉar mi tion ne bezonas, samkiel vi mem, ho Ĥano, ne uzas vian nomon, kaj mi, mia parte, antaŭ longe ankaŭ forgesis tiun nomon kiun mi eble posedis, estas jam pli ol sufiĉe ke oni min nomas la olda saĝulo, ĉar mi ne bone scias ĉu mi povas nomiĝi olda kaj scias jam tro bone ke mi ne estas saĝa, nur eble mi faris ian unuan paŝon al luminiĝo.

La Ĥano: Via instruo ŝajnas konsisti en tio ke vi malatribuas al vi ĉion, kaj samtempe ĝi estas instruo kiun vi ne zorgas diskonigi, sed ĉu tio ne estas maniero malatribui al si la instruon mem?

La oldulo: Ĝi estas tao, la instruo kiu pli bone estas koni-gata per nediskonigado, ĉar taon oni povas kapti nur kiel me-taforon, kvankam ankaŭ tiam manke: tao ne estas strebo nek estomaniero, ĉar la strebado elkludas la atingon kaj neniu povas posedi taon ne perdante taon.

La Ĥano: Daŭrigu, parolu plu!

La oldulo: Tao nome estas la malo de ĉio kio estas io difi-nita, tao nuligas, egaligas, estas forto kiu povas esti utiligata al nenio, potenco kiu sin montras nur en la foresto de poten-co.

Taon oni plej bone povas kompari kun la akvo: neniam ĝi sin levas supren, ĉiam ĝi serĉas vojon malsupren, al la pleje-ble profunda situo por tie trovi sian ripozon, sian ne-agadon, tiun veran ekziston kiu similas memnihilion: la akvo ne pre-zentas kontraŭstaron, ĝi cedas sed nur por ĉirkaŭi kaj pleni-gi, ĝi povas diseriĝi en plej malgrandajn gutojn sed ne ĉesas senŝanĝe esti si mem kaj ree kunserĉiĝi, ĉiam parto de sama nedetruenda tutaĵo.

La Ĥano: Sed ankaŭ la akvo havas sian kontraŭstaremon, ĝi subportas ŝipojn grandajn kiel domoj, ĝi povas disrompi potencajn digojn kaj antaŭenĵetiĝi kun eksterma furiozo: ĉu ankaŭ tiam validas tio kion vi nomas tao?

La oldulo: Ne, tao ne kontraŭstaras, nenion disrompas, la akvo estis nur metaforo sufiĉe proksima al tao sed tute ne identa kun tao.

La Ĥano: Laŭdire vi instruas ke potenco estas senpotenca kaj senpotenco estas la vera potenco, kiel mi komprenu tion?

La oldulo: Mi tion ne instruas, ĉar mi nenion instruas, sed mia kompreno diras al mi ke tiel estas: la potenco senpoten-cas se ĝi metiĝas antaŭ la vera senbezono, se ĝi nenion povas

forrabi de mi, se nenion mi posedas kaj al nenio kroĉiĝas, ĉar kiel ĝi tiukaze povus elmontri sian potencon?

La Ĥano: La potenco povas rabi al vi la liberon kaj enfermi vin en karceron!

La oldulo: Nek libero nek karcerero ekzistas por tiu kiu estas indiferenta al ambaŭ.

La Ĥano: La potenco povas rabi al vi viajn okulojn tiel ke vi nenion plu vidos!

La oldulo: Ne se mi sendependas de miaj okuloj kaj vidas pli klare sen ili.

La Ĥano: La potenco povas rabi al vi nutraĵon kaj trinkaĵon tiel ke vi mortos pro malsato kaj soifo.

La oldulo: Se por mi la morto ne troviĝas ankaŭ la vivon forrabi de mi ne eblas.

La Ĥano: Vi do estus nemortebla kaj nenio povus vin mortigi eĉ se via kapo estus dehakita kaj via korpo estus disŝirita?

La oldulo: Por mi ne plu estas diferenco inter vivo kaj morto, mia luminiĝo de tao nuligis tiun diferencon.

La Ĥano: Ĉu vi celas ke vi korpe ne povas morti aŭ ke vi iel vivos post la morto?

La oldulo: Diferenco ne ekzistas, ĝi estas nur miskoncepto kiun tao plene travidas kaj disblovas kiel nebulon, ĉar la potenco senpotencas kaj la senpotenco estas la vera potenco.

La Ĥano: Mi povus havi emon provi tiun taon pri vi por vidi ĉu vi tamen ne trovos diferencon inter vivo kaj morto!

Dirante tion la Ĥano elingas sian kurtan glavon kaj la akran klingon direktas al la kolo de la olda kataĵo, premas la eĝon kontraŭ la faltozan haŭton, preta por puŝo, sed la oldulo

eĉ la palpebrojn ne movas, li ŝajnas tute senscia pri la mort-minaco.

La Ĥano retenas la glavon sampozicie, direktitan kontraŭ la gorgon de la oldulo, ĝis lia propra mano ekstremitas kaj li retiras la glavon, ŝovas ĝin en ĝian ingon, konvinkite ke li povus mortigi la saĝulon sen ke tiu eĉ levus la palpebrojn.

La interparolo inter la Ĥano kaj la olda kataĵo kontinuas alian tagon kiam ili sidas kune en la jurto de la regento.

La Ĥano: Vi pravas, se ĉiuj kiel vi apatius antaŭ la morto la potenco ne ekzistus, estas do la timo de la homoj antaŭ la morto kiu ebligas la potencon kaj kuntenas la regnojn: ĉu do timo estas io bona kaj kuraĝo io malbona?

La oldulo: La kuraĝo samkiel la potenco estas formo de timo kiu sin turnas kontraŭ aliaj, sed kuraĝo kaj timo per si mem estas nek bonaj nek malbonaj, nur rilate unu al la alia ili povas esti bonaj aŭ malbonaj, kaj se unu ne troviĝus ankaŭ la alia ne troviĝus kaj la mondo estus pli bona.

La Ĥano: Se la morto nenion signifas tiam ankaŭ mortigi nenion signifas, mi mortigis pli da homoj ol aliu ajn en la mondo, tio do nenion signifus kaj min nek meritigus nek malmeritigus?

La oldulo: Mortigi atestas pri timo, pri manko de vera kuraĝo, ĉar kiu nenion timas ankaŭ ne bezonas enspiri al aliaj timon kaj li ne mortigas, li havas tiun specon de kuraĝo kiu permesas al ĉiuj vivi, li venkas estante tiu malpleno kiun la aliaj plenigas, estante tiu malĉeesto de ago kiu igas aliajn agi.

La Ĉielo al neniu deziras bonon, la Ĉielo indiferentas kaj ne havas volon, ĝi rigardas al ĉiuj estaĵoj kiel al hundoj el pajlo;

kio reale estas, tio ĉiam ekzistas kaj ne povas ne plenumi sin, la Ĉielo estas nur senfina malpleno, ne monto kiu vane provas plenigi la malplenan.

La vojo de la Ĉielo estas ebenigi, malpliigi la abundon kaj plenigi la mankon, supervenki la pli altan regionon sorbante ĝin en sian malaltecon, elproduktante la grandan per la malgranda, efiki ne efikante simile al la rado kiu nur rondiras sed permesas al la ĉaro ruliĝi antaŭen.

La Ĥano: Sed kion permesas la Ĉielo, ĉu tio ne estas ĝia volo, kaj kio okazas, ĉu tio estas io alia ol la realo?

La oldulo: La Ĉielo estas pacienca kaj atendas, kaj tio kio okazas ĉiam montriĝas esti io alia ol tio kio ŝajnas okazi, kio ŝajnas reala ĉesas en nerealo kaj falas, la efikanta estas tio kio ne estas, estadon oni ne povas distingi de iĝado.

La Ĥano: Vi ŝajnas celi ke ĉiu strebado estas misfaro, ke ĉiu faro enhavas sian malsukceson, ĉiu ago sian memnihiligan malon?

La oldulo: Ho Ĥano, la saĝulo efikas ne volante tion kaj alstrebante nenion, li ne agas por atingi nek por plenumi, sed nur por malplenigi kaj prepari spacon, li ne regas, ne posedas, li malavancas kaj cedas, kaj per tio li akiras gravecon.

La Ĥano: Sed kion vi do volas ke regento faru: nur lasi fali la manojn kaj rezigni, ne praktiki potencon, ne gardi ian ordon, ne rebati siajn malamikojn, nur lasi ĉion dissolviĝi kaj flui kiel akvo, diseriĝi kaj fariĝi nenio, aŭ esti trafita de konkerantoj kaj fremdulregado?

La oldulo: La regento lasu la immanentajn leĝojn regi kaj ne eldevigu ilin el ilia stato de ekvilibro, li fidu la fortojn immanentajn en ĉio kaj lasu al ili esprimiĝi, lia eminento konsistu en tio ke li sin retenas kaj lasas al ĉio efiki laŭ sia naturo, li regu

ne regante, sed cetere mi havas nenion per kio vi respondi, ho Ĥano!

La Ĥano: Mi divenas al kio vi celas, vi saĝa kataĵo, sed mi ne povas ĝuste travidi la sekvojn se mi agus kiel vi diras, mi tamen komencas kompreni kio estas ekvilibro, ĉio konsistigas ekvilibron kiun atingi estas malfacile kaj kiun reteni estas eĉ pli malfacile.

Mi maltimas la morton, same kiel vi, tamen alimaniere, mi uzis la mortotimon de aliaj kaj sur tiu timo mi konstruis mian imperion kaj mian potencon: ĉu ne restos la timo antaŭ la morto tiel longe kiel estos la deziro vivi, tiel ke la instinkto vivi daŭre konservas mian imperion kaj mian potencon?

La oldulo: La volo vivi kaj la timo antaŭ morto estas unu kaj sama, kiu ne sin liberigis de la vivovolo ankaŭ ne povas liberiĝi de mortotimo, la saĝo komenciĝas per la scio ke la vivo en sia plejinterna esenco ne sin distingas de la morto, ke ambaŭ enestas kiel partoj en unu sama esto, kiu estas tao, la nekaptebla, la eterne vanuema.

La Ĥano: Estas famo pri vi, saĝulo, ke vi ne povas morti sed vivos eterne, eble en tio sin kaŝas via sekreto, tial vi ne timas la morton kaj opinias ĝin unu kun la vivo?

La oldulo: Ho ne, Ĥano, mi delonge vivas kvazaŭ mi ne vivus, mi kiom eblas estas morta jam en la vivo, kaj tial la morto malfruas, sed ĝi venos fine kiam la limo inter vivo kaj morto plene nuliĝis, mi mem ne rimarkos kiam tio okazos, sed ĉi tiun korpon, kiun mi ankoraŭ prilogaŝas, oni trovos malplena kaj forlasita kiel tiun kokonon kiun papilio forlasis.

La Ĥano: Mi, miaparte, ne plu adheras al la vivo por mi mem, sed por zorgo pri la imperio kaj pro penso pri miaj posteuloj: se mi povus gajni ankoraŭ kelkajn jarojn mi povus

venki la restantajn malamikojn kaj establi la plejble bonan ekvilibron.

La oldulo: La malamikojn vi neniam finklude povos venki, iu definitiva ekvilibro neniam estiĝos, tial vi neniam povos vivi sufiĉe longe, eĉ se vi gajnus novan junecon foje post refoje.

La Ĥano: Ĉu vi konas iun tian eblecon al renova vivo, ĉu tio fine estas via plej interna sekreto?

La oldulo: Ho ne, Ĥano, mi neniun ajn sekreton el ajna speco posedas, ĉio ĉe mi estas aperta, malplena, kiel vi vidas, nenion mi havas por diri al vi, nenio mi estas, tial por mi same facilas morti kiel vivi.

La Ĥano: Mi longe ĝisatingis sur mia vojo, vi ankoraŭ pli longe sur la via, ni ne povas iri la saman vojon, ni havas nenion por diri unu al la alia, pri tio ni jam sufiĉe malŝparis vortojn, nun mi vin rekompencos ĉar vi venis al mi, se vi rekompencon volas akcepti, kaj vi povas resti ĉi tie se vi tion deziras aŭ reiri al via monto sammaniere kiel vi venis.

La oldulo: Mi obeis al tao kaj ne rezistis vin, ho Ĥano, ĉio fariĝis kiel mi prediris kaj via plenumita deziro sorbiĝis en sablon, mi reiros kiel mi venis, mi nenion bezonas kaj nenion deziras, nur unu mankon mi spertis ĉi tie, ho Ĥano: la abismo ekster mia kaverno kiu min memorigas pri la profundo, pri la falo kiu atendas tiun kiu ne vivas sufiĉe malalte.

La du viroj leĝere klinas la kapon unu al la alia kaj la saĝa olda kataĵo forestiĝas.

Sub la altaj montoj la somero sufoke premis, la varmego pezis kiel ŝarĝo sur ĉiuj, la ĉevaloj lasis pendi la kapon, konstante la homoj soifis akvon, trinkis tro multe kaj ŝvitis abunde, tio rapide faris ilin lacaj kaj nevolemaj, grandaj nigraj birdoj soris en la ĉielspaco super ili, pendis tie kvazaŭ per ŝnuretoj kaj cirkulis atendente mortintojn, naŭzaj haladzoj venis el ĉiuj direktoj, eĉ la fajroj mavodoris, nenio efektive purigis, nek fajro nek akvo,

skorpioj kun levitaj pikiloj elkrablis el inter la ŝtonoj, serpentoj malaperis kiel nigraj vipoj aŭ levis sin por ataki tiel ke oni devis ilin hakmortigi, la skeletoj de bestoj kaj homoj ofte kuŝis tiel dense sur la grundo ke necesis rajdi sur ili, ostoj kaj kranioj krakis kiel sekaj branĉoj sub la hufumoj, skelete magraj homoj forfuĝis kiel eble rapide kaj sin kaŝis kie ajn eble, foje kun la kapo en malalta arbedo aŭ kaŭre malantaŭ malgranda ŝtono, ofte la ĉifonoj defalis ilin fuĝantajn tiel ke ili plukuris preskaŭ nudaj, kaj iliaj haroj estis tiel grizaj de polvo kiel ilia haŭto,

la polvo kuŝis kaj atendis ilin ĉie, profunde kiel neĝkovraĵo, mola kaj laciga, kirliĝis pro plej eta movo kaj longe ŝvebrestis en la aero antaŭ ol ĝi sin remetis ripoze, ne sufiĉis teni la lipojn kunpremitaj, la polvo malgraŭe penetris en la buŝon, en la pulmojn, ĝi sentiĝis kiel subtile jukanta lano en la brusto, la polvo ofte ankaŭ malhelpis ilin klare vidi kaj tial mal-

paciencigis ilin, ili devis grimpi rokojn por vidi antaŭ si, ĉirkaŭ si, kaj por scii kie ili troviĝas,

urboj kiuj ĵus submetis sin denove ribelis, la popolo estis kvazaŭ blindigita kaj plenigita de freneza furiozo, necesis multa mortigado por ilin resubpremi, la kadavroj malbone brulis, la stinko de sango fariĝis repuŝe senvaria, ankaŭ infanojn ili devis mortigi por ke tiuj ne kresku fariĝante venĝontoj, eĉ la brutoj povis esti kontraŭstrebaj kaj malamikaj, ankaŭ tiujn ili devis mortigi, arbaroj fariĝis ĉiam pli maloftaj, baldaŭ ili rimarkis unuopajn arbojn, kiel orientilojn, kiel ombrodonantojn,

la homoj malhelis kvazaŭ la suno ilin bruligus dum senombraj generacioj, ilia hararo estis aspra kiel ĉevalaj krinoj kaj oleumita ĝi rebrilis blunigre, la okuloj estis strange grandaj kaj elstaraj, molaj kiel fruktoj sen ŝtonoj, nigraj kun ruĝa glimo aŭ brunaj kiel ĉe hundoj, la korpoj de la viroj estis malfortikaj kiel tiuj de ne plene kreskintaj junuloj aŭ virinoj, ili ligis striktajn ŝtofojn ĉirkaŭ la koksoj kiujn ili balancis tiel ke tio efikis alloge kaj tial forpuŝe, ili ĉiuj sin banis en akvo kiu estis griza pro malpuraĵo kaj graso, ili prenis tiun akvon super la kapon kaj ĝin elŝprucigis havinte ĝin en la buŝo,

la kharasmo-princo Djelal-ed-Din kolektis novajn trupojn sed sin fortiris sen batalo, sufiĉis lin persekuti ĉiam pli distan-
ce orienten, krom rajdantojn li havis kamelojn kaj certan nombron da elefantoj, mortintaj ĉevaloj estis ofte trovataj sed neniam kameloj, ma jen kaj jen elefanton kun la gorgo tranĉita sed kun la korpo nelezita, tio ŝajnis neklarigebla, foje refoje la trupoj de la ŝaho evidente internmilitis, mortfrapitoj estis trovataj, malgrandaj grupoj venis por aliĝi al la Ĥano, perfi-

dintoj kiuj estis akceptitaj kaj darfis akompani la armeon, ĝis nokte dum dormo estis tranĉita la gorĝo,

sed tutne ĉiuj mortintoj trovitaj estis morthakitaj, multaj estis nigramakulaj pro malsano kaj ŝvelintaj, la malsano alsaltis ankaŭ la homojn de la Ĥano, sidantaj surĉevale ili subite ekvomis aŭ falis surteren, tordis sin dolorspasme, stinkis pro sia propra elfluanta fekaĵo kaj devis lasiĝi morti aŭ restariĝinte postveni laŭ povo,

ĝi ne estis bona lando, ĉio estis perfida kaj mava, regebla nur kun granda ĝeno kaj ne inda la penon, la riĉaĵo mem estis forpuŝa kun sia serpentosimila trembrilado de valorŝtonoj kaj kostaj metaloj, kun siaj palacoj el ruĝatra ŝtono kiu ŝajnis konsisti el sablo kungluita per sango, la homoj kuŝis sur la grundo kaj dormis tiel ke ne eblis ilin distingi de mortintoj, nudaj infanoj rajdis sur ŝlimgrizaj bubaloj kiuj sin movis lante kaj lasis sin timigi de nenio, bubaloj tiris ankaŭ nekovritajn ĉaretojn kun rondaj lignoplatoj por radoj, laŭte grincantaj pro sekeco, laŭ la riverbordo amasiĝis stakoj da brutfekaĵo kiu ankaŭ floris en la akvo, tio tamen ne malhelpis homojn baniĝi tie nek plenigi siajn akvokruĉojn tutapude, tiu lando bezonus severajn akvoleĝojn,

fine al la kharasmo-regento necesis batali kiam li atingite staris kun rivero antaŭ si, ĝi nomiĝis Induso laŭ la lando kaj fluis inter altaj rokobordoj, torente kaj ŝaŭme, surprize freŝa rivero en ĉi sufoka lando, ĝi venis elfore de tiuj tre altaj montoj kiuj kelkfojojn videtiĝis tra la varmofumo, ĉifaj monteĝoj kovritaj de neĝo, senrealaj kiel ĉielaj vizioj,

la kharasma armeo konsistis el kvindek mil viroj kaj ekpoziciis inter riversinuo kaj montaltaĵo kun la kruta riverborda roko dorse, ĝi sidis en sia propra kaptilo kaj devis venki aŭ

nihiliĝi, nenia fuĝo eblis, se povis Djelel-ed-Din ne fidi siajn soldatojn li ja aŭtem povis kalkuli pri ilia mortangoro,

la Ĥano avancis ŝirmate de la nokta obskuro kaj la atako ekiris ĉe la matena krepusko, la flankaj trupoj antaŭensturmis el ĉiu flanko dum la Ĥano sin tenis meze malantaŭe kun la standardo kaj sia gvardio el dek mil nevenkeblaj rajdsoldatoj, la maldekstran flankon haltigis la kontraŭatako de la kharasmoj kaj la montkrutaĵoj malhelpis la dekstran flankon progresi, la kharasmoj povis alsturmi la pli malfortan mezon kaj Djelal-ed-Din mem glavfrapis al si vojon ĝis la standardo por renkonti la Ĥanon en senpera lukto, sed estis repelata de la gvardio dum la Ĥano sin okupis per ĉirkaŭira atako eldeks-
tre,

liaj trupoj en senlima fortekspansio transiris la montaltajon, tra krutaj ravinoj, laŭ rokŝtupoj kie ĉevaloj kaj viroj falis malsupren, sed permesis al nenio sin haltigi kaj atingis post tagiĝo trans la monton kun la ĉefa taĉmento netuŝita, por sin ĵeti kiel lavango sur la kharasmojn, kiuj samtempe renkontis atakon de la Ĥano mem kun liaj dek mil rajdsoldatoj, la armeo de Djelal-ed-Din fendigis en du partojn kaj li mem kun malgranda restanta trupo premiĝis al la riverborda roko, kie troviĝis neniu ebleco krom sin ĵeti malsupren aŭ mortpafiĝi de la mongoloj,

Djelal-ed-Din lastmomente spronis sian ĉevalon, elsaltigis ĝin en la abismon, lia vesto enaere dispetalis kiel blanka floro kaj sin sternis ĉirkaŭ li kiam li trafis la akvon, li eskapis la danĝerajn rokojn en la rivero kaj naĝante atingis la alian bordon kun sia ĉevalo, tie li denove surseliĝis por fuĝo en Panĝabon, la Ĥano siaparte haltigis sian ĉevalon ĉe la krutaĵo kaj vidis kiel eskapis la princo, kion ajn pensante li lasis tion oka-

zi, ne sendis svarmon da sagoj post li kaj maltujis ordoni persekutadon,

la Ĥano atingis turnpunkton, gajnis tiun venkon, kiun li alstrebis en tiu direkto, kaj sturmite la urbon Peŝavar iom pli supre apud la rivero li komencis retiri sin, eble li jam satis je konkeroj kaj eble liaj venkoj jam komencis ekgusti amare, ankaŭ Hindujo povus lin fortimigi per sia nenombrebla homsvarmego kaj neeviteblo mortigi multe pli amasege ol antaŭe, li ankaŭ ne devis sin venĝi tie, nek sin glorigi,

eble ankaŭ kunmotivis la varmego kaj laco, li sentis sian aĝon kaj volis neniam reveni al tiuj regionoj, eble li trovis tion tasko por iuj el liaj posteuloj konkeri la landon trans Induso, kaj eble supervenkis lin sento pri la senfineco de la mondo, ke la konkerado ĝin neniam trovos finon, ke nenia vivo kaj nenia potenco sufiĉos, ke la tasko maleblas kaj devas lasiĝi.

Kiam la Ĥano revenis al Samarkand renkontis lin dezerteco ĉie, la kanaloj estis lasitaj al ruiniĝo, la akvo staris morta aŭ inundis, malnova ŝlimo sekiĝis sur la grundo, ŝlimo estis fiksiĝinta sur la branĉoj de la arboj, putrintaj fruktoj kuŝis en la sovaĝiĝinta greso, la pontoj ne estis rekonstruitaj, homoj laŭiris la pontoruinojn piede, portante aŭ trenante siajn ŝarĝojn, alie la transiro devis efektiviĝi en boatoj aŭ per bargoj kiuj estis stangopuŝataj antaŭen,

la vivo nur hezite revenis al la urbo, maldensa popoliĝo de metiistoj kaj malriĉaj urbanoj, kiuj cirkumpaŝadis sur stratoj ŝtopitaj per rubaĵoj kaj falintaj muroj, fajroj brulis en fulgaj anguloj sub aperta ĉielo, infanoj en ĉifonoj forkuris kiel timaj katoj kaj kaŝis sin en stratetoj kaj ruinoj, tra rompitaĵoj muroj

oni povis envidi en kortojn kie arboj ankoraŭ staris verdaj ĉirkaŭ elsekiĝintaj fontanoj kaj la tegaĵo el blua fajenco lumis kiel peco de sobfalinta ĉielo,

la Ĥano enrajdis la urbon, tra la ruinigitaj kaj forlasitaj palacoj, la profanitaj moskeoj kaj haloj de erudicio, sovaĝiĝintaj katoj siblante elsaltis antaŭ li, amaso da blankaj pavoj rezidis en la salonoj kaj ŝriis kun etenditaj koloj aŭ sidis vice suprenflugintaj ĝis sur la supro de fulgomuaritaj muroj, maljunuloj ŝajnis dormi kie ili sidis klinitaj super malfermitaj Koranoj grandaj kiel ŝutroj kaj rande nigritaj de brulo, la oraj turoj kaj la spacbluaj kupoloj staris skvame destegitaj kaj fendigitaj kvazaŭ ili aĝiĝis centojn da jaroj dum tiu kurta tempo, kaj korvoj cirkumflugadis inter ili, raŭke grakantaj kaj mavaŭguraj,

pordegoj el artaj ferforĝaĵoj kuŝis ŝovitaj flanken, vandoj el vuale aĵura marmoro faŭkis per malhelaj truoj, rathordoj malaperis intense raslante en la angulojn, el la pompo de la haloj restis nenio krom mizeraj spuroj, stumpigitaj ornamoj, disĵetitaj splitoj,

kaj ĉe la vido de ĉiom da tiu dezertiĝo kaptis la Ĥanon deprimio, morniĝanta humoro, li subite komprenis kiel fragila kaj mortema estas ĉio kreita de homoj, regnoj kaj urboj estas ne pli ol araneaĵoj kiujn forbalaas la vento, riĉeco kaj pompo malaperas rapide kiel akvo fluas en la teron, ankaŭ la grandegaj homamasoj forbloviĝas kaj vanuas kiel forkirliĝanta sablo, la nura daŭraĵo estas la greso sur la grundo kiu estiĝas nove kaj renove, kaj la sola eterna estas la Blua Ĉielo supre,

iris do la Ĥano por renkonti la popolon kiu kolektiĝis, ĉiuj tiuj mizeraj travivintoj, senhejmuloj kaj rifuĝintoj, kiuj venis por sin ĵeti antaŭ lin, teruritaj kaj senhavaj, dependaj de lia

volo por sia vivo, kaj ili kunportis donacetojn kiujn ili metis antaŭ lin, la lastan ornamaĵon kiu restis al ili aŭ kelkajn belajn fruktojn, raran birdon, aŭ eĉ fiŝojn kiujn ili ĵus kaptis en la rivero,

kaj la Ĥano rigardis kun bonvolo tiujn simplajn donacojn, li surpaŝis ŝtuparon kaj parolis al la popolo, klarigis al ili ke ilia urbo same kiel multaj aliaj urboj renkontis sian sorton sekve de la orgojlo kaj malprudento de ilia regento, ili ribelis kontraŭ la volo de la Ĉielo kaj la Ĥano estis tiu rimedo al kiu estis konsentite okupi la Kharasmo-regnon, forpeli la ŝahon kaj liajn sukcedantojn, kaj pro tio la popolo devis suferi kun siaj mastroj ĝis ĉiu kontraŭstaro estis rompita,

sed nun nova epoko jam komenciĝis, ili ĉiuj eniris la regnon de la Ĥano kaj li konsideras ilin siaj infanoj, ĉiuj kiuj estis sen perfido ne plu devas timi, iliaj urboj estos rekonstruitaj, iliaj landoj denove floros, viroj el iliaj propraj vicoj estos elektitaj estri laŭ la justa kaj neatencebla leĝo de la Ĥano,

parolo kiu ne igis la homamason laŭte jubili, sed male klini sin kiel la greso pro la vento kaj lante susuri pro komenciĝanta espero,

kaj la Ĥano elrajdis el Samarkand, for de tiu urbo por ĉiam, kaj li lasis alvokon disiri per siaj plej rapidaj kurieroj ĉiudirekten: kolektiĝo al kurultajo, renkontiĝo kaj interkonsiliĝo inter ĉiuj Ĥanoj kaj orkhonoj en lia imperio, la lokon li difinis kiam li rajdis orienten laŭ Syr-Darja, la rivero kiu tiris sian verdozonon tra la lando,

ĉiuspecaj birdoj tie ekflagris amase, sovaĝbestoj multspecaj fuĝis antaŭ la rajdantoj, la greso kelkloke estis tiel alta ke ĝi atingis ĝis super la ventro de la ĉevaloj, la aero estis milda

sed freŝa, la valo havis abundan spacon por dekmiloj da jurtoj, por trupoj kaj ĉevalgregoj,

ili komencis kolektiĝi tien el ĉiuj anguloj de la mondo, la brilaj armeestroj, la famaj batalantoj, la jam longe fidelaj bataluloj de la Ĥano, liaj propraj gloraj filoj kaj parencoj, la subĥanoj super foraj triboj kaj limregionoj, senditoj kaj sciabundaj viroj de Kataĵo kaj Koreio, Tibeto kaj Karakataj, Mezopotamio kaj la regionoj ĉirkaŭ la Nigra kaj Kaspia maroj, arbaro el standardoj, flagoj kaj vimploj, grandegaj vicoj de kubitokoj kiuj venis super altebenaĵoj kaj montpasejoj, kun ruĝpentritaj radoj kaj silksubŝtofitaj jurtoj, la tirbovoj havis orumitajn kornojn aŭ estis ornamitaj per buntaj rubandoj, la ĉevaloj reglimis kiel speguloj kaj portis arĝentgarnitajn selojn,

la ĉefuloj kaj la armeestroj venis en orbroditaj vestoj, en zibelmanteloj kaj lupfelaj manteloj, kun silkĉemizoj sube kaj gemoj kiuj sparkis ĉirkaŭ la kolo kaj sur la fingroj, akompanataj de laktoblankaj kameloj de Korasan, duonsovaĝaj ĉevalgregoj de la montvaloj, poefagaj bovoj de Tibeto kun ruĝaj okuloj kaj feloj kiuj pendis ĉirkaŭ ili simile al longharaj, treniĝantaj ŝaloj kaj la larĝaj brustoj anhelantaj pro la tro densa aero de la malaltejo,

la kurultaja tendo altis super la svarmo kun sia grandega blanka kupolo, duoblaj fajroj brulis antaŭ la enirejo suda kiel preskribis la ritualo, sed la sentineloj permesis al ĉiuj eniri, certaj ke neniu senrajtulo aŭdacos pasi, sennombraj ĉarŝarĝoj kun donacoj estis alkondukataj kaj malŝarĝataj ekstere, trezoroj de ĉiuj konkeritaj landoj, kostaĵoj kaj rimarkindaĵoj, tutnudaj ebonenigraj junuloj, sveltaj kaj oblikvokulaj junulinoj de suda Azio, gracilaj hindinoj kun perloj en la nazloboj kaj ruĝa marko sur la frunto, linkosimilaj junaj virinoj de la mon-

toj, persaj kaj arabaj princinoj kaj kortegaj damoj kun glacie
fiera teniĝo kaj longaj, pintaj, forte pentritaj ungoj, katajinoj
kun vizaĝoj kvazaŭ fajlitaj el eburo, trotetante per piedoj kiuj
similis al ĉevalhufetoj en siaj silkaj ŝuoj, amorantinoj kaj kro-
medzinoj kaj sklavinoj en abundo por ĉiuj, dancistinoj kaj li-
utludantinoj kaj akrobataj serpentohomoj, kiuj vringis sin
ĉirkaŭ si mem tiel ke kapo kaj postaĵo ŝajnis ŝanĝi lokojn,

sangaj viandpecoj flamis sur rostostangoj aŭ estis kuirataj
en kaldronoj, vinoj de diversaj koloroj estis trinkataj el spar-
kantaj pokaloj, la Ĥano sidis en sia altigiteco sur la ortrono de
la detronigita ŝaho Muhammed kun lia krono kaj scepro ĉe
siaj piedoj, kaj ĉiufoje, kiam li levis la pokalon la jubilo eks-
plodis ĉirkaŭ li, sed kiam li fine ordonis silenton per man-
movo kaj komencis paroli, li eldiris pripensitajn kaj seriozajn
vortojn,

nur pretere li menciis kiel ion memevidentan siajn venkojn
en la militentrepreno finita post tri jaroj da bataloj, nun gra-
vas konservi la fruktojn de la venko kaj konfirmi la regadon
en la konkeritaj regionoj, nur absoluta obeo al lia leĝo Jassa
povos konservi la unuecon kaj igi ilin venki ĉiujn tentojn kaj
danĝerojn, li ne plu mem povos gvidi ĉiujn militojn kaj entre-
prenojn, sed ili devas esti plenumataj laŭ lia volo kiu ankaŭ
estas la volo de la Ĉielo, kaj li alvenigis filojn kaj ĥanojn, ar-
meestrojn kaj senditojn, por direkti siajn vortojn al ili unu
post alia,

liaj tri pli junaj filoj staris tie flanko ĉe flanko, imponaspek-
taj, fieraj, plenaj de forto kaj potenco, sed la pli aĝa ankoraŭ
ne alvenis, la morna kaj malhela Djutji kun la necerta origi-
no, la Gasto kun siaj memduboj kaj sia obstina sentimo, laŭ-
dire lia veno estis prokrastita pro la bataloj diste okcidente

sur la rusaj stepoj, kaj la Ĥanon nun kaptis subita malfido kaj kreskanta kolero, li prenis la foreston de la filo kiel intencan malobeon kaj spiton, deklaris ke la alvoko al kurultajo validas pli ol iu ajn milito kaj egalas ordonon kiu devas esti senkon-
diĉe obeata, Djutji igis perdota sian vivon per sia malĉeesto kaj la Ĥano ordonis ke li estu mortigita,

sammomente alvenis sagokuriero kun la informo ke Djutji subite malsaniĝis kaj tial ne povis sin prezenti, la Ĥano heziteme nuligis sian ordonon kaj sendis la tre konfidatan orkhonon Subutaj por esplori la aferon,

la kurultajo daŭradis, raportoj estis diritaj de komandan-
toj de diversaj regionoj, la orkhono Djebe kun Subutaj estis komisiita kapti la fuĝantan ŝahon Muhammed kaj poste daŭrigi per konkerekspedicioj ĉirkaŭ la Kaspia Maro, tra la Aralaj stepoj ĝis Ukrainio kaj Krim, kie Djutji kunigu sin kun ili en la penetro enen en Ruslando, el oriente Mukali en Kataj sendis anstataŭanton kaj mem falis je tiu sama tempo en la bataloj tie fore, la Ĥano destinis lian filon Boru lia anstataŭanto por daŭrigi la militon kontraŭ la Kin-regno sude de Huang-ho, informoj enkuris pri ribelo kaj perfido en Hsia apogata de la suda Sung-regno, kio montris ke la ĉeesto oriente de la Ĥano mem fariĝis ĉiam pli urĝa kaj jam venis la tempo ekmarŝi reen al Karakorum,

antaŭ ol la kurultajo finiĝis tamen fine Djutji venis socie-
te kun Subutaj, la perdita filo genuis antaŭ la Ĥano kiu levis lin kaj metis siajn brakojn ĉirkaŭ li, profunde kontenta pro lia submetiĝo kaj lia kunportita donaco de cent mil bonegaj ĉevaloj de Kiptjak, li nun rigardis ĉiujn kolektiĝintajn filojn: flanke de Djutji la nekontraŭstarebla dura konkeranto Tjagataj, la memfida kaj joviala Ogotaj kun sia febleco por vino kaj

virinoj, la klara kaj aŭdaca Tuli, nomata la Spegulo, kiu malgraŭ tio ke li estis la plej juna tamen rangis kiel la plej alta estro de la armeo,

kaj la Ĥano sin turnis al ili por disdividi la taskojn inter ili post certe longa kaj zorga konsiderado de sia elekto: Djutji reiru okcidenten por daŭrigi la batalojn ĉirkaŭ Volgo, Tjagataj iru suden por defendi la konkeritan Kharasman regnon, Ogotaj responsu pri la dezertebejoj de okcidenta Gobio kaj la ordo inter ties batalemaj triboj, dum Tuli akompanu la ĉefan armeon orienten,

per tio la plej gravaj decidoj estis faritaj kaj la plej granda kurultajo de la Ĥano estis finita per kromaj festenoj, antaŭ ol ĉiuj ekmarŝis diversdirekte.

La Ĥano tamen en rimarkinda maniero prokrastis la reiron al Karakorum, restis en montvaloj somere kaj aranĝis ĉasojn en la arbaroj vintre, ŝajnis kvazaŭ li malvolus reveni por ekstrakti la atendantajn taskojn, la daŭrigotan organizadon de la mongolimperio kaj la militentreprenojn kontraŭ Hsia kaj la du Kataj-regnoj kiuj baldaŭ devas efektiviĝi.

Dume li serĉis konsilojn kaj apogon de erudiciuloj, profundigis en diversaj problemoj en alia maniero ol antaŭe, fariĝis inklina al fundaj interparoloj kaj diskutoj, dediĉis sin al pripensado kaj superrigardo post la multa kaj violenta okazaĵo, sed ankaŭ kun sia kutima efikeco zorgis pri la plukonstruado de la karavanvojoj, de la kuriera servo kaj pri la progresanta transportado de militpredo, tributoj kaj komercaĵoj orienten ale al Karakorum, al la nuklelando de la mongolimperio.

Eble la malrapida marŝo reen por la Ĥano signifis la idealan nomadvivon kaj li adheris al ĝi kiel eble plej longe, antaŭsentante ke ĝi estas la lasta moratorio antaŭ ol la regtaskoj denove urĝos post la hejmvreveno, jes, antaŭ ol la aĝiĝo grave sentiĝos kaj la ĝojo de la sensoj obtuziĝos, siaparte li jam fariĝis pli modera rilate ĝuojn, li kontraŭstaris la allogon de ebriigaj trinkaĵoj kaj inter ĉiuj belaj virinoj li sin tenis precipe al sia akompana favoratino, la merkitino Khulan, kiu havis sian propran grandioze ekipitan jurton tiratan sur kubitko de dek paroj da laktoblankaj bovoj.

Renkontis lin dum la reiro la nepoj Hulagu kaj Kubilaj, kiuj tiam havis dekunu kaj naŭ jarojn de aĝo, ili estis filoj de Tuli kiu estis alte en favoro ĉe li kaj li trovis ilin nekutime viglamentsaj kaj lernemaj, donis al li grandan plezuron paroli kun ili, li instruis ilin arkpafi kaj batalludi, rakontis al ili pri siaj travivaĵoj kaj ŝanĝiĝis de severa Ĥano al joviala avo.

Dum la lasta granda vintra ĉaso okazis al la Ĥano io kio profunde lin impresis, li hazarde sin trovis antaŭ la aliaj dum la persekuto de apro kaj subite la besto atakis, la ĉevalo ektimis kaj deĵetis sian rajdanton, la Ĥano sin trovis kuŝanta sur la grundo sen armilo en atingo kaj rigardis al la apro, li estis senhelpa kaj perdita, atendis nur ke la furioza besto sin alĵetos kaj lin traboros per siaj dentegoj,

sed nenio okazis, la besto staris tie kvazaŭ ĝi estus ŝtoniĝinta, kvazaŭ subigita per la rigardo de la Ĥano aŭ perpleksita de ties situo sur la grundo, ĝis ĝi kun elsnufo skuis sian kapon kaj retiris sin en la veprojn.

La Ĥano vidis tion kiel signon de la Ĉielo, memorigon pri tio ke lia tempo baldaŭ estos finita, sed ne ĝuste ankoraŭ, al

li estis permesita mallonga moratorio por sekurigi sian imperion kaj prepari sin antaŭ sia propra fino.

Rajdante, rajdante, rajdante antaŭen super la ebenaĵoj, tamburado de ĉevalhufoj kontraŭ la grundo, raslado de sekiĝinta greso, raslado de sablo, krepitado de ŝtonsplitoj, krepitado de salkrustoj, sufoka polvo, bruliga suno, suno kiu lante migras trans la ĉielo dum la rajdo kontinuas kvazaŭ sur sama loko, kuro kiu kondukas al nenie, ŝtormvento kiu senmovas, tago kiu lante sin turnas de sia komenco ĝis sia fino simile al bestokorpo kiu rostiĝas super fajro,

ĉevalŝanĝo, fojon post fojo ĉevalŝanĝo, la anhelanta ŝvitdronigita rajdbesto ŝanĝita kontraŭ alia, kelkaj kurtaj interrompoj, strio da sekigita viando por maĉi aŭ kazeo por dissolvi en akvon, se akvo troviĝas, kaj konstante la akvo gustas je urino kaj la buŝo sentiĝas amara kiel absinto, rajdante, rajdante, tagon post tago, la noktoj estas ensinko en plumbopezan dormon, simile falon en senfundajn abismojn, aŭ pludaŭran rajdon en la imago, rajdadon kiu ne povas ĉesi, ne finiĝi,

rajdante, rajdante, la grundo kiu preterfluas sube, oblikve fronte, malklare videtiĝanta tra la polvo, la okuloj preskaŭ fermitaj, kvazaŭ rajdi inter nuboj, rajdi en la spaco, la tero ne plu estas tero, nur etendiĝo, distanco, kaj la distancoj neni-alio ol tempo pasanta, rajdante tra tago post tago, de plenluno kaj poste ĝis plenluno denove, nove kaj renove, tempo kiu

povas mezuriĝi nur per distancoj kaj la distancoj per tempo, unu same nereala kiel la alia,

kaj la laco, la soifo, la malsato, la turmento de la penado, tiuj ombrosimilaj akompanantoj kiuj konstante sin trovas meze inter ili, tiel ordinaraj ke ili preskaŭ fariĝis nerimarkeblaj, la plumbopezo en la membroj, la bruldoloro en la haŭto, la frotanta ŝvito, la doloro de la skeleto mem sub la karno, la volo ilin senindulge pelanta, ne kiel siblanta vipo super ili sed kiel sprono ene en ili, ĉiu penso forbalaita, nur forto kiu ilin devigas antaŭen, rajdante, rajdante,

kaj post la senfino de la ebenaĵoj la turiĝantaj montoj, nigraj, karnoruĝaj aŭ blankmakulaj pro sablo aŭ neĝo, la pasejoj kun la glaciaj ventoj, la ŝvito kiu frostiĝas kaj faras la vestojn karapaco el glacio, la skeletoj de mortintaj gregoj kiel restaĵoj de arbaro, ak viroj ak ĉevaloj kiuj sangas elnaze kaj lekas en sin la sangon per la lango por ke ĝi ne perdiĝu, la ĉevaloj kiuj lamas kun vundozaj piedoj kaj postlasas sangospurojn en la neĝo, la hufoj kiuj estas volvitaj per strioj el haŭto de mortfalintaj ĉevaloj,

kaj la nokto kiam bataluloj kaj ĉevaloj fosas sin en la neĝon flankon ĉe flanko, la mateno kiam ili apertas vejnojn en la femuroj de la ĉevaloj kaj trinkas de la varma sango, la salgusta soifo kiun ili estingas degeligante neĝon en la buŝo, sangotrinkantoj, neĝomanĝantoj, tiel ili venkas la montojn kaj rajdas pluen, rajdas, rajdas, rajdas:

tio estas unu el la ripetaj songoj de la Ĥano.

Kaj jenan songon la Ĥano rakontas al sia konfidata ŝamano Kokekü:

Mi rapide rajdas super ebenaĵo, sidas antaŭenklinite sur la ĉevalo kaj vidas la grundon preterflui, urĝo estas kaj la vojo longas, aliaj rajdantoj rajdas flanke de mi kaj malantaŭ mi, mi aŭdas kaj sensas ilin ne vidante ilin.

Tiam falas kapo kvazaŭ dehakita dum la kuro, ruliĝas antaŭ mi kaj sub la hufojn de mia ĉevalo, mi nur atingas vidi ke ĝi estas neordinare granda, minimume duoble pli granda ol ordinara kapo, kaj la sango fluas el la detranĉita gorĝo, la lango sin movas en la aperta buŝo kaj la okuloj premiĝas el siaj kavoj.

Mi ĵetas rigardon al la rajdanto apud mi: estas li kiu perdis la kapon, sed li rajdas pluen kvazaŭ li nenion rimarkis, la sango torentas el la dehakita kolo kaj fluas longstrie malsupren laŭ la korpo, ankaŭ malsupren sur la ĉevalo.

Mi retrorigardas al la ceteraj rajdantoj kaj ili ĉiuj estas sen kapoj, kolhakitaj dumrajde, nerimarkite, de nevidebla malamikoj, sen voko aŭ sono, kaj ĉiuj rajdas pluen kvazaŭ nenio okazis, flanke de mi, malantaŭ mi.

Mi levas la manon kaj palpe esploras pri mia propra kapo ĉu ĝi situas ĝustaloke, kio okazis al la aliaj tamen ne okazis al mi, sed mi ne povas ne mirdemandi kiel finiĝos ĉi tiu rajdo: ĉu mi luktos sola kiam ni atingos la celon aŭ ĉu tiuj bataluloj sen kapoj tamen batalos?

Kiam mi nun rigardas antaŭen mi trovas ke la ebenaĵo ne estas malplena kiel antaŭe, ni rajdas antaŭen inter amasoj da ŝtonoj kaj restaĵoj el muroj fulgitaj de fajro, inter arboj kiuj staras ne nur senfoliaj kiel dumvintre sed blanknudaj, skelet-similaj.

Ni venas al rivero kie la akvo estas nigra kaj morta, ni rajdas tra ĝi kaj la akvo atingas la ĉevalojn apenaŭ ĝis la ventro,

sed ili tamen nur pene faras al si vojon kvazaŭ ili paŝus en ŝlimo kaj en la nigra akvo ili agitas sangokolorajn vorticojn.

Tuj poste ni proksimiĝas al urbo, miaj senkapaj bataluloj ĉiam plu min sekvas, kaj la sango nun ĉesis flui el iliaj dehakitaj koloj, koaguliĝis en malhelan tegaĵon, kvazaŭ la vundoj estus ŝmiritaj per gudro.

La urbo vidiĝas ĉiam pli granda kaj potenca, solide fortikigita per muroj kaj turoj, mi ne scias ĉu ĝi estas malamika aŭ ne, ĉu ni konkeru ĝin aŭ nur enrajdu ĝin, neniuj homoj vidiĝas, la pordegoj estas apertaj kaj neniuj haltigas.

Evidente la urbo jam estas konkerita kaj neniuj travivis tie, tio tamen ne okazis antaŭ longe ĉar ĉie sur la stratoj kuŝas mortintoj, kelkloke amasigitaj unuj sur aliaj, kolektiĝintaj en kunŝovaĵojn el korpoj ĉe la domomuroj.

Kun sono kiel de zumanta kordinstrumento svarmoj el grandaj muŝoj ekflugas dum mi rajdas antaŭen kaj mi sentas la dolĉetan, naŭzan fetoron de putranta karno, nekovritaj kadavroj: elmonro de la morto al kiu malfacilas kutimiĝi.

Mi nun ankaŭ rimarkas ke mi moviĝas sola tra la urbo, miaj bataluloj sen kapoj nerimarkite min forlasis, postlasiĝis, sed mi mem ne pensas ke mi returnu min, mi estas plene okupita krei vojon por mi tra la stratoj, la ĉevalo paŝas kun malfacilo inter la korpoj aŭ trans ilin, paŝas sur torakoj kiuj krakas frakase, sur ventroj kiuj malpufiĝas kaj eligas ĝemojn aŭ siblajn sonojn.

Mi trafas arojn da vulturoj kaj korvoj kiuj manĝas de la kadavroj, ili ŝiras per la bekoj en tripoj kaj karnoĉifonoj, estas tro pezaj por ekflugi aŭ tro avidaj por forlasi sian predon, ili flugilflagras kaj saltas ĉirkaŭ la ĉevalo kun siblantaj bekoj, en fetoro kiu fariĝas ĉiam pli abomena.

Fine mi atingas ĝardenon kaj enrajdas tra la altaj, orumitaj kradpordoj, laodoro de rozoj penetras en la fetoron de kadavroj, ruĝaj rozoj kreskas tie en densaj veproj, sed pli proksime rigardante ilin mi vidas ke gutas sango kaj rampas vermoj.

Malantaŭ la ĝardeno altas palaco kiu devas aparteni al la regento mem, la pordovolboj el marmoro levas sin kiel malpezaj brodaĵoj, la kupoloj lumas en bluverdo kiel pavbrustoj, mallarĝaj turoj etendas sin supren kiel blankaj membroj.

Sed ĝuste kiam mi proksimiĝas aro da birdoj leviĝas per peza flugo, vulturoj kaj korvoj kiuj flugilfrape ekflugas ĉirkaŭ la palaco, eksidas ĉie, sur kupoloj, kreneloj kaj turoj, obskurigas ĝian pompon, kovras ĝin per nigraj birdokorpoj.

Kaj el unu el la pordegoj venas kapo ruliĝanta kontraŭ min, ege pli granda ol ajna homkapo, la kapo de la kolhakita regento, ankoraŭ viva, demone ridanta kun blankfajreraj dentoj.

Tiam mi vekigiĝas, strange ekscitita kaj sentas la kadavrofetoron kiel mavan guston en la buŝo -

Kion vi opinias pri tiu sonĝo, diras la Ĥano sin turnante al la ŝamano, ĉu vi vidas iun sekretan signifon en ĝi aŭ ĉu vi kredas ke ĝi estiĝis nur el stomaksukoj kiuj levis sin ĝis en la buŝon?

La ŝamano respondas: Eble la sonĝo venas de la Ĉielo, ho Ĥano, kaj devas esti komprenata kiel signo!

La Ĥano: Parolu, ŝamano, diru kion vi pensas!

La ŝamano: Eble ĝi estas signo de tio ke la ekvilibro inter vivantoj kaj mortintoj estas ŝancelita, tial vi trovas vin ĉirkaŭata de bataluloj kun dehakitaj kapoj, tial la urbo estas ple-

na de fetoraj kadavroj, tial troviĝas sango en la rivero kaj en la rozoj, tial la kadavrovoraj birdoj regas ĉie.

La Ĥano: Tio do indikus ke mi mortigis tro multajn, ke la Ĉielo turnis sian volon for de tiu eksceso en mortigoj, ĉu tion vi celas, ŝamano?

La ŝamano: Neniu kredas ke vi timas la mortintojn, ho Ĥano, neniu kredas ke la mortintoj havas potencon super vi, kaj via sonĝo ja eĉ ne havas timon sed enuon, abomenon, fetoron de morto!

La Ĥano: Sed kion mi faru al homoj krom mortigi ilin, kiam ili estas tro multaj kaj ne volas submeti sin, ne volas sekvi miajn leĝojn, kaj kion mi faru kun mia propra popolo se ne lasi ilin militi, lasi ilin mortigi kaj mortigi, kiel alie ili povus vivi kune kaj obei la leĝojn en mia imperio?

La ŝamano: Vi sekvas la volon de la Ĉielo, ho Ĥano, la vivantoj ne tro multiĝu, sed ankaŭ la mortintoj ne estu tro multaj, ekzistas ekvilibro gardenda kaj via sonĝo parolas ĝuste pri tiu ekvilibro.

La Ĥano: Ĉu tio estas ĉio kion vi povas diri al mi, ŝamano?

La ŝamano: Tio estas ĉio, ho Ĥano, sed ĝi certe valoras pri-mediton.

La Ĥano ĉasas en maldensa arbaro kun altaj, rektaj trunkoj, la sunlumo falas makule sur la grundon simile al tapiŝo kun artisma desegno.

La Ĥano trovas sin antaŭ la aliaj ĉasistoj, li retenas la ĉevalon kaj ĉirkaŭrigardas, plaĉata de tiu arbaro kiu estas aperta sed ĉirkaŭas, tamen ne sufoke enfermante.

Ĝuste tiam li vidas beston ekkuri inter la arboj, ĝi estas

kolore klarruĝa, pleje similas al cervo sed estas granda kiel ĉevalo, kaj sur la frunto ĝi havas unu solan kornon, rekte elstaran kiel lanco.

Estas besto tia kian neniam antaŭe vidis la Ĥano, kaj li hezitas dum momento ĝin ĉasi, sed poste lia emo fariĝas tro forta, li devas predigi tiun rimarkindan beston kaj ĝin pli proksime esplori.

Li pelas sian ĉevalon kaj ekĉasas la beston, ne estas malfacile ĝin postsekvi kiam ĝi videtiĝas inter la arbotrunkoj, ruĝflimra kiel flirtanta flago, ŝajnas ke ĝi ankoraŭ ne rimarkas ke ĝi estas ĉasata kaj ne plirapidas.

Sed la Ĥano malkovras ke li tamen ne atingas ĝin, kiom ajn li penigas la ĉevalon la distanco restas sama, lia fervoro ankoraŭ pli kreskas, li firme decidiĝis ke li atingu tiun beston.

Tiam la besto komencas ŝanĝi la direkton kvazaŭ por lin erarigi, ĝi ĉiam pli cedas flanken, ĝis li ĝin persekutas en la kontraŭa direkto kompare kun antaŭe, li eĉ rimarkas ke la besto lin kondukas ĉirkaŭe en vasta cirklo kaj daŭrigas tion, kvazaŭ ĝi ludante rondkuradas lin.

La Ĥano provas transversi la kurdirekton de la besto sed ĝi tamen ne cedas de sia kurvojo kaj li ne venas rimarkeble pli proksime, la besto mokas lin kaj li komprenas ke li ne povos atingi ĝin, tamen li ne povas persvadi sin lasi la persekuton.

Tiam okazas strange ke la besto haltas, sin turnas kaj atendas lin, kun la kapo alte levita kaj la sola korno ŝoviĝanta supren kiel glimanta lanco.

La Ĥano retenas la ĉevalon kaj lante proksimiĝas, zorge observante la beston, kiu siaparte fikse rigardas lin per grandaj, malhelaj okuloj kaj forte radianta rigardo.

Ĝi montras nenian timon, nek signon de malamikeco aŭ

pretecon por atako, la Ĥano tiom surpriziĝas ke ankaŭ ne li siaparte decidiĝas ekuzi la pafarkon aŭ la lancon.

Kiam li venis jam tute proksime li haltas kaj la besto klinas la kapon kvazaŭ ĝi salutus lin, poste ĝi diras per voĉo kiu ne similas al voĉo de homo sed tamen estas belsonora kaj klara:

Kial vi min persekutas, ho Ĥano, mi nenion faris kontraŭ vi kaj vi ne havas kaŭzon provi mortigi min, vi kredas ke via potenco permesas al vi mortigi ĉion kaj ĉiujn laŭ via plaĉo, sed en tio vi malpravas!

La besto lin rigardas kiel egalulo, fiere sed ne provoke, kaj la Ĥano trovas nenion strangan en tio ke li respondas al la besto:

Mi neniam vidis vian egalulon, ĉu vi estas besto aŭ dia estaĵo, ĉu vi igis min persekuti vin por diri al mi ion gravan, tiam parolu kaj mi ne mortigos vin!

La besto: Vi ne povas min mortigi, tiel diste eĉ ne via potenco etendiĝas, nek iam vi povos min atingi kiam mi fuĝas, tion mi jam montris al vi, kaj kion mi havas por diri al vi tio konsistas en tio kion vi nun spertas, mi aperas sub multaj nomoj sed neniu el ili estas propre la mia: mi estas la neatingebla!

La Ĥano: La neatingeblan mi ĉasis dum mia tuta vivo kaj mi atingis ĝin fojon post fojo kaj per tio faris ĝin la atingita, kiel mi povas scii ke vi vere estas la neatingebla kaj ne nur kredas esti aŭ nomas vin tia?

La besto: Ho Ĥano, vi ne havas sufiĉan potencon, ne sufiĉan forton kaj ankaŭ ne sufiĉan tempon por min atingi, ĉu vi ankoraŭ ne komprenas ke la mondo estas tro granda kaj la vivo tro multvaria por ke via volo sola povu regi super ĉio kaj atingi al ĉio!

La Ĥano subite koleriĝas pro tiu parolo, kaptas la pafarkon kaj pafas sagon kontraŭ la besto, sed malgraŭ la mallonga distanco la sago forcedas en sia flugo kaj ne trafas, li provas per nova sago, sed ĝi same ne trafas.

La besto: Vi vidas ke tio estas vana, viaj sagoj ne povas min atingi, nun reiru kaj ne plu ĉasu min, ho Ĥano, ĉar se vi daŭrigos, tio kondukos nur al via propra misfortuno!

La besto iom klinas la kapon kvazaŭ adiaŭante, sin turnas per rapida moviĝo kaj haste malaperas inter la arboj, la Ĥano tie sidas kaj rigardas longe post kiam ĝi jam malaperis, ĝis li komencas rajdi revoje.

La Ĥano trovas sin sur la pinto de alta roko, li povas stari aŭ sidi tie sed apenaŭ fari paŝon, estas nur kvazaŭ malvasta platformo aŭ suprenlevita trono tie supre.

Kiam li rigardas malsupren la roko ŝajnas vertikala en ĉiuj direktoj, sin levas kiel kolono en la spaco, alte super la suba mondo, neniuebleco ŝajnas ekzisti por movi sin for de tie, kiel li venis tien estas demando kiu ne sin prezentas.

Strange ke li ne sentas vertiĝon antaŭ la profundoj ĉirkaŭ si, estas kvazaŭ li jam kutimus je sia situo tie supre, ĝi ankaŭ ne tre ĝenas lin krom tiel ke ĝi absurde limigas liajn eblecojn de moviĝo.

Li povas vidi diste super la mondo, fore li distingas aliajn altojn kaj rokpintojn, sed neniuebleco ŝajnas komparebla kun la lia.

Ebenaĵoj kaj dezertvastoj etendas sin foren tiel diste kiel atingas lia rigardo, kun strioj de arbaro ie tie, kun lagoj kiel

enkrustitaj pecoj el vitro kaj riveroj kiel mallarĝaj serpentantaj fadenoj, blankaj kvazaŭ el lakto.

Sur la vastoj malrapide tiriĝas malhelaj makuloj simile al ombroj de nuboj, povas esti gregoj aŭ homgrupoj, eble rajdantaroj, ili preskaŭ nenion signifas je tiu distanco, moviĝas tiel malrapide ke daŭras tutajn tagojn malkovri iliajn moviĝojn.

Plej fore la mondo malaperas en lumanta brilo kiu devas veni de la maro, la granda akvo kiu ĉion ampleksas per sia senfineco: tiel la Ĥano perceptas ĝin.

Super si li havas la orbitantan sunon, la nubojn kiuj amasiĝas aŭ dissolviĝas, la grandega spaco kiu ankaŭ estas la Eterna Blua Ĉielo.

Estas egale al kiu direkto li sin turnas, li vidas unu saman mondon, kaj ĝi ŝajnas havi la formon de renversita pelvo kie li meze sidas levite sur sia roko.

Tie li do sidas kaj vidas la mondon sub si, kvazaŭ regante ĝin sed ne povante interveni en ion ajn, ne povante tuŝi alion ol la rokon sur kiu li sidas, ne povante sin formovi.

Li sin trovas meze de ĉio kaj tamen eksterece pro sia altleviteco, tio estas potenco kiu samtempe estas senpotenco, kaj tujsubite kaptas lin intensa kolero, li salte leviĝas en furiozo, sed devas tuj poste sin ekregi por restigi sin sur la rok-pinto.

Li povas nur furiozi, bati ĉirkaŭ si, krei en la malplenon sen ke eĉ eĥo lin respondas, ĝis li subite perceptas la ridindon en sia situo, sidiĝas kaj mallaŭte ridas ĉe si mem.

Fine li pensas ke li sidas bone tiel kiel li sidas, neniel verŝajnas ke iu povas ĝislevi sin tien kaj minaci lian pozicion, la mondon li havas sub si kaj ja tamen ne eblas ion fari pri ĝi.

La Ĥano rimarkas nubformaciojn kiuj similas al urboj en la spaco, blankaj, alte turantaj, kun potence volbantaj kupoloj kaj krenelaj mursuproj, urboj tiaj kiajn li multfoje vidis surtere similtajn al sobiĝintaj nubamasoj.

Ili tamen enspiras al li strangan maltrankvilon, ili tro similas al urboj kaj malfacilas ilin konsideri nur kiel nubformojn, ili ŝajnas konstruitaj sur nevideblaj terasoj aŭ levitaj en la aeron, ŝvebantaj aŭ pendantaj tie, malgraŭ ke ili donas impreson de granda pezo.

La Ĥano trovas ke li rajdante sur sia ĉevalo rapidege proksimiĝas al unu el tiuj urboj en la spaco, aŭ eble ankaŭ ĝi vojas ale al li simile al drivanta nuboj, kaj ŝajnas al li ke li jam veturas sub ĝin kiel tra giganta, malhele faŭkanta pordo.

Li nun povas distinge sensi la enorman pezon de la ŝtonamasoj de la urbo super si, kaj li aŭdas ekmuĝon kiel de tondro aŭ implodego de monto, supermezure peza tondro kiu foruliĝas samtempe en kontraŭaj direktoj.

La Ĥano sentas heziton, havas duonintencon reiri kaj forrajdi de tiu minaco en la spaco, sed lia volo levas sin kontraŭ ĝi, spitema kolero ekregas lin: la Ĥano permesas al nenio timigi sin kaj neniam cedas!

Ĝuste tiam la urbo en la spaco komencas fendiĝi kun potencaj krakegoj, fendoj ekdisas zigzage kiel nigraj fulmoj, profundaj abismoj sin malfermas kaj la urbo komencas disfalegi.

Blokoj kvazaŭ formitaj el ŝtoniĝinta neĝo falas unuj sur aliajn kaj ruliĝas foren sur la grundo diversdirekte, la turoj kaj la muroj ŝanceliĝas kaj falas, strange malrapide, kvazaŭ he-

zitante ĝis la fino, la kupoloj apertas sin kaj kliviĝas en apartajn pecojn, staras tie faŭkante antaŭ ol ili falas.

La grundo violente tremas kaj fendiĝas siavice, longaj fendoj rapidaj kiel vipofrapoj apertas sin antaŭ la Ĥano, apud li, ĉirkaŭ li, kaj timigas la ĉevalon fari subitajn saltojn por ilin eviti.

Tiel la spacurbo disfalas ĉirkaŭe, ĝis ĉio fariĝas kvieta kaj sole leviĝas kvazaŭ blanka nebulo super la ruinoj, neniu estulo vidiĝas, ne vivantoj nek mortintoj, estas kvazaŭ ĝi estus forlasita, nelogata urbo.

Kaj la Ĥano sin trovas nevundita meze de la detruo, eĉ ne estas ĵetita de la ĉevalo, ne trafita de plej malgranda fragmento, kaj li antaŭenrajdas inter la amasiĝoj de kunfalintaj blankaj muramasoj, kiuj pli similas al ŝtoniĝinta neĝo ol al ŝtono.

Li sentas glacian malvarmon disemani de la blankaj ruinoj kaj komencas fridotremi pro malvarmo, feliĉe li kunportas la duoblan peltmantelon kaj ĝin surtiras.

La Ĥano vekiĝas pro stranga, balanciĝanta moviĝo, li estas en sia jurto, sia regentotendo, sed neniu venas kiam li vokas, li pensas ke devas esti violenta ŝtormo kiu igas la jurton moviĝi tiel, aŭ eble ne, la jurto estas metita sur kubitko kiu evidente antaŭenruliĝas sur malebena grundo.

Li stariĝas por vidi kie li estas, kaj nun li perceptas sonon kiel de plaŭdanta akvo, pensas ke tio devas esti tiu sono kiu estiĝas kiam la kubitko antaŭentiriĝas tra alta greso, se ne temas pri travadejo en rivero.

Kiam li malfermas la jurton kaj eliras li certe jes staras sur la platformo de kubitko kaj antaŭ si li havas du vicojn de blan-

kaj bovoj, kun dek bestoj en ĉiu vico kiel decas al regento vojaĝanta.

Sed ne estas alta greso tio kion travadas la bovoj, ĝi estas akvo, tamen verda preskaŭ kiel greso, kaj la bovoj estas mergitaj ĝis la dorso en tiu akvo, kaj la kibitko flosas en la akvo tiel ke nur la plejsupra parto de la radoj vidiĝas.

Kaj kiam li levas la rigardon li anstataŭ ondanta gresebeno vidas akvovaston kiu ondas, senfine en ĉiuj direktoj!

La Ĥano perpleksiĝas kiam li komprenas kion li vidas: li devas troviĝi sur la maro, sur la senlimaj akvoj trans la firma tero de la mondo, sola kun la maro kaj la Eterna Blua Ĉielo.

Sola, ĉar neniu krom li troviĝas tie, neniu en la jurto nek sur la platformo, neniu pelas la bovojn kaj la bovoj moviĝas ne pli ol la ondoj movas ilin, lulante ilin unu kontraŭ aliaj en lanta ritmo, kie ili flosas en la maro kaj eble jam estas mortaj.

Nenio estas por vidi krom akvo, akvo, senfinaj akvovastoj kun ondoj kiuj sekvas unu aliajn sen rompo, ondoj kiuj lavas la dorsojn de la bovoj kaj la flankojn de la kibitko.

Kaj jen supre la Ĉielo kiu unuigas sin kun la maro ĉiudirekte simile al enorma tendokupolo, la Eterna Blua Ĉielo, la sola al kiu li nun povas sin turni, alvoki el sia soleco, por provi esplori ĝian volon.

Sed kiom ajn li penas per tuta sia kapablo li trovas nenian respondon, estas kvazaŭ la Ĉielo ne troviĝus tie super la maro, nur estus malpleno, malĉeesto, kaj li desiluziite komprenas ke la Ĉielo ne havas volon, alion ne havas ol teruran, senfinan neniecon, kaj li estas lasita sola kun si mem, balanciĝante kun sia jurto kaj sia tendoĉaro tie sur la maro.

La Ĥano vidas du grandegajn serpentojn kiuj meandras ĉirkaŭ unu la alia, la korpoj estas dikaj preskaŭ kiel tiu de plenkreskinta viro, kvadratitaj kiel teksita ŝtofo, glitaj kaj tamen sekaj tiel ke ili grincas unu kontraŭ alia, artikas simile al kirasoj el ŝtalaj skvamoj kaj ruliĝe movas siajn ringoformajn muskolojn.

La serpentoj estas tiel dense kunvolvigitaj ke ili ŝajnas kiel unu sola implikita nodo, malgraŭ ke ĝi ne agrafas sin mem sed lante glitas, ŝoviĝas, ŝanĝiĝas, sen ke oni certe povas distingi la volvojn kiuj apartenas al unu aŭ al la alia korpo.

Ili movas sin en ondoj, kurbiĝas kiel potencaj arboradikoj, volvas sin ĉirkaŭ unu alia, duone sin denove rektigas, la plantaj kapoj premas sin kontraŭ la grundon, kvazaŭ sin kaŝas antaŭ la kontraŭulo, dum la malgrandaj okuloj nigre fajreras kaj la fendhavaj langoj ludas.

Subite unu el la serpentoj faras rapidan movon per la kapo kaj mordas la alian veste, sukcesas kapti ĝin kaj komencas ĝin gluti, laboras intense per la kolmuskoloj kaj sekrecias brilantan mukon por glitrimedo, la faŭko enorme malfermiĝas, la okuloj elpremiĝas el siaj kavoj pro la penego.

La alia serpento tuj respondas per sama movo kaj komencas siavice vori la voston de la adversulo, la korpoj duone elsinuas el sia strikte streĉita nodo, nun la serpentoj precipe okupas sin glutante plejeble multe da unu alia, ili ĉiam pli premas sin antaŭen, ĉirkaŭas ĉiam pli unu alies korpon, kvazaŭ en nesubpremebla strebo kuniĝi, fandiĝi al unu sola serpento.

La Ĥano havas la serpentojn tute antaŭ si kaj ne povas fortiri la rigardon de ili, ili estigas en li intensan abomenon kaj

samtempe tremigan deziron vidi kio okazas, la serpentoj ŝajnas pelataj de fanatika volo neniigi unu alian, penas nelacigeble engluti unu alian, en malamega avido kiu devas finiĝi per mempereigo.

Baldaŭ ili tie kuŝas preskaŭ senmovaj, nur unuopaj glutotikoj iras kiel kramfo tra ili, ili glitas ankoraŭ iom unu en la alian, la korpoj kuŝas malstreĉaj aŭ streĉiĝas denove sen ke la serpentoj propre plu povas forte reaktivi, la elpremiĝantaj okuloj jam ĉesis fajreri, duonestingitaj.

La serpentoj evidente ne povas dekroĉiĝi, ili unuiĝis en unu solan korpon kiu formas fermitan ringon, ankoraŭ iom kurbanta kaj sinuanta, malrapide mortiĝanta en tiu reciproka pleniĝado, ĉies duono de la du korpoj glutita de la alia, kun la buŝegoj kunĉenitaj kvazaŭ per ia buko meze.

Poste daŭras longe antaŭ ol la Ĥano povas liberigi sin de la hanta impreso de la serpentoj kun ĝia truda kaj tamen strange kaŝita signifo.

La Ĥano trovas sin kuŝante sternita sur la altebeno, tiu ebendado kiun li tiel bone konas kaj trarajdis sennombrajn fojojn, sed nun la ĉielspaco sinkigis sin malsupren super la grundo tiel malalte ke li ne povas ekstari kaj iri, eĉ ne antaŭenklinite, apenaŭ rampante, kaj eĉ malpli li povus rajdi se li havus ĉevalon.

La spaco super li ne estas la blua ĉielo, nek malalte ŝvebantaj nuboj, ĝi pli similas al alia ebengrundo, sed subeturnita, kun spuroj de bruligita greso kaj strioj el sablo, kiuj tamen ne malfiksiĝas kaj falas, sed reste tenas sin sur la subeturnita grundo.

Kiam la Ĥano ĉirkaŭrigardas li vidas ke estas same en ĉiuj direktoj, sama malalta distanco inter la suba kaj la supra ebena, sama mallarĝa aperturo ale al la horizonto, kiu enlumas per streta strio de klara taglumo.

Li povas movi sin antaŭen nur krablante, pene rampante kiel serpento aŭ lacerto, aŭ per speco de naĝaj moviĝoj kiel fiŝo aŭ akvoanimalo, tio iras lante kaj estas tre ĝene, moviĝinte kelkan distancon li devas ripozi kaj elspiregi.

Li ankaŭ ne povas rimarki ke li ien ĝisvenas, ĉie aspektas same, li ne scias kiun direkton li elektu, kio troviĝas antaŭ li aŭ malantaŭ li, eble li sin movas cirkle kaj revenas samloken ne sciante tion.

Eĉ se li scius sian celon kaj povus direkti sin al ĝi eble daŭrus multajn jarojn antaŭ ol li ĝin atingus, eble vivdaŭron, aŭ eble necesus pluraj vivoj.

Li sambone povas resti kie li estas, sterni sin kaj ripozi, spiri kiom eblas, kaj atendi.

Sed kion li atendu, kio do povas okazi tie en la malvasta spaceto inter la ebenlandoj kiuj estas turnitaj unu al la alia: ĉu ili eble interproksimiĝos ankoraŭ pli kaj malrapide frakasos lin inter si, aŭ ĉu ili male malfermiĝos pli kaj pli tiel ke li povos stariĝi, ekstarinte sin movi, eble fine trovi ĉevalon kaj forrajdi?

Fariĝas tamen neelteneble por la Ĥano nur kuŝi senmove, eĉ se li turnas sian vizaĝon al la grundo kaj klopodas forgesi la alian grundon dense super si.

Li devas daŭrigi la krablodon antaŭen, kiel ajn pena kaj senkonsola tio estas, tiam li almenaŭ estas okupata de io kaj pleniĝas de la peno, ne seninterrompe pensas pri sia situacio.

Kiam la Ĥano vekiĝas estas sufoke en la jurto kiel antaŭ

tondroŝtormo kaj li kun peno spiras, li salte leviĝas kaj ĵetas sin el la tendo, elen sub nudan ĉielon por kapti aeron, spacon, liberiĝon.

Unu el la plej altrangaj ŝamanoj alpaŝas ĝis antaŭ la Ĥano kaj plendas: Ĉu vi scias, ho Ĥano, ke la ŝamanoj de vi kaj de ĉiuj veraj mongoloj estas ĉiam pli forpuŝataj de fremdaj instruoj kaj ĉiaspecaj herezoj?

Ni ŝamanoj ja tamen estas la solaj kiuj gardas la kontakton kun la Eterna Blua Ĉielo, tial neniuj pastroj aŭ predikantoj de ajna speco povas nin anstataŭi, niaj revelacioj kaj interpretoj de signoj estas la solaj kiuj povas klarigi la volon de la Ĉielo kaj doni la ĝustan gvidon por ĉia agado.

Sed nun kun ĉiam pli insolentaj pretendoj tiuj fremduloj aperas kun siaj misdoktrinoj kaj distordas la menson de la popolo, nin ŝamanojn ĝuste tiuj trompistoĵ brulmarkas kiel trompistojn, ili nomas niajn el praoldaj tempoj hereditajn metodojn kaj konojn superstiĉo aŭ sorĉado, ili venas kun siaj propraj dioj kiuj estas nur mortaj idoloj kaj ne potencaj, nevideblaj, ĉieĉeestaj spiritoj kiel tiuj kiujn ni magias kaj subigas.

Ili disrompas la oldan kredon de la mongoloj kaj provas ĝin anstataŭigi per novaj, fremdaj elpensoj, kaj la sekvo estas ke multaj ŝanceliĝas kaj ne scias al kio sin tenadi, kelkaj eĉ priridas niajn magiojn kaj revelaciojn, esprimas sin moke kaj rifuze pri ili.

Tio ne povos daŭri sen tio ke la vivfundamento de la mongoloj ŝanceliĝos, tia senkredo kaj misvago minacas nian po-

polon en ĝia plejinterna esenco, apertas la vojon al disfalo kaj degenero, al kio vi, ho Ĥano, ne povas rilati indiferente, via interveno kontraŭ la fremdaj misdoktrinoj estas necesa, kaj en la nomo de ĉiuj ŝamanoj mi vin admonas ke vi ekzilu aŭ ekzekutu iliajn predikantojn.

Aŭskultinte la longan paroladon de la ŝamano la Ĥano respondas nure: Mia promeso al la fremduloj ke ili libere rajtu praktiki siajn religiojn firmas, kaj mi riproĉas vin, ho ŝamano, ke vi mem ne sufiĉe firmas en via fido je la Eterna Blua Ĉielo kaj je la forto de ĝia volo!

La tensio inter la malsamaj religioj en Karakorum fariĝas ĉiam pli forta, ili ĉiam pli intense strebas supervenki kaj forpuŝi unu la aliajn, kaj tial ili elrektigas ĉiam pli multajn kaj pli okulfrapajn kirkojn, moskeojn kaj templojn.

La kristanoj venintaj el okcidente estas malmultaj sed rimedriĉaj, ili konstruas katedralon kun multaj spajroj similaj al suprendirektaj glacikonusoj, kaj interne en ĝi tronas madono kiu plenigas la tutan altaran muron, skulptita kaj pentrita per oro kaj ĉiellazuro, kaj bonnutrita diinfano kiu etendas sin por ŝvelpufa patrinmamo.

La nestorianoj, la orientaj kristanoj kiuj estis forpelitaj el Bizancio, ĉiam plu kontentiĝas per kelkaj kirkoj el ligno, sufiĉe modestaj, grizverdaj pro vento kaj vetero, kun unu sola spajro ornamita per simpla lignokruco, eĉ ne orumita sed nigregudrita, sed kompanse renkontas la vizitantojn interne de la kirkoj viraltaj krucoj el arĝento, kiuj brilas blindige en la lumo.

La islamanoj havas siajn moskeojn, rondpufaj kaj blankegrizaj kiel vesponestoj, apud ĉiu sin levas minareto kontraŭ la ĉielo kiel dia brako, blanka kaj ronda, kun spaco por la muzino plej alte sub kronanta lunserpo el oro.

La buddhanoj elrektigis multajn templojn en kataja stilo, kun suprenfleksitaj tegmentoj simile al ĉapelrandaĵoj, kun ruĝpentritaj kolonoj kaj gigantaj, skulptitaj lotusfloroj, ruĝaj

aŭ blankaj, kaj iliaj Buddhostatuoj estas skulptitaj el potencaj trunkoj de cedroligno, orumitaj, rekte starantaj kun la nesondebla plenlunvizaĝo ridanta supre sub la plafono aŭ sternite kuŝantaj, dormantaj sub mallevitaj palpebroj.

La lamaaj pastroj el Tibeto konstruis siajn templojn en terasoj kvazaŭ ili estus elrektigitaj sur montdeklivoj, la preĝturniloj rotacias tie kun flirtantaj paperrubandoj, la fandita butero brulas en pelvetoj tage kaj nokte, la pastroj svarmas kiel abeloj ĉe abelujo, altaj kvazaŭ ili iradus sur stilzoj en siaj ĝispiedaj vestoj kaj konuse eltiritaj ĉapeloj, supersŭtitaj per magiaj signoj, serpentoj kaj drakoj, disradie dornaj sunoj, duonlunoj kaj stelfiguroj.

La temploj de la taoistoj estas ornamitaj per eternaj floroj kaj homfiguroj en nur natura grandeco, gardantaj prapatroj, saĝaj instruistoj kaj justaj registoj.

Tiu konkurado inter la religioj per la grandeco kaj pompo de la konstruaĵoj tamen ne sufiĉas, ili devas ne nur superbrili unu aliajn sed ankaŭ superlaŭti unu aliajn, uzi vokojn aŭ klangojn en sia servo.

La okcidentaj kristanoj havas la plej fortajn kirksonorilojn, tondrajn bronzaajn bruilojn kiuj sonas kaj sonoras laŭtakte aŭ misritme unu kun la aliaj, ĉe sunsubiro, ĉe matenkrepusko kaj multfoje dum la tago, tondrado kaj resonado kiu igas la aeron vibri, la objektojn tremi, birdojn maltrankvile ekflugi.

La nestorianoj havas pli fragilajn sonorilojn kiujn ne eblas kompari kun la pezaj bronzklangoj, ili sonas pli simile al battoj kontraŭ lado kaj martelado kontraŭ fero, sed kompanse ili plifortiĝas per tamburoj, iu pli kaj pli rapida frapado sur tamburoj, rulsona bruo kiu similigas ilin al la ŝamanoj kaj plezurigas la menson de la mongoloj.

La islamanoj rezignas pri aliaj sonefektoj krom la homvoĉo, de iliaj altaj minaretoj leviĝas la voĉo de la muezino ĉiujn matenojn kaj vesperojn, penetra kaj tirata, proklamante en la lingvo de la profeto mem ke Allah estas granda kaj ne niu dio estas krom Allah.

La buddhanoj martelas siajn pendantajn gongojn el bronzo, tondranta resonado kvazaŭ ambicianta vekti la dormantajn diojn mem, kaj la lamaoj blovas en obtuzaj bronzluroj aŭ poefagaj kornoj, longajn blekantajn sonojn kiuj altiĝas kaj refalas, sin tordas kvazaŭ en spiralo kaj penetras ĉiujn kontraŭojn, dum la taoistoj male utiligas la silenton, ke ĝi parolu por ili, aŭ igas etajn arĝentsonorilojn klingi en la vento, delikate kaj tintileske.

La Ĥano ekzilis ĉiujn tiujn kirkojn kaj templojn al la periferio de la urbo, nur kiam li hazarde rajdpasas tie nepras al li vidi tiujn vantajn konstruaĵojn kaj elmeti sin al la tondrado kaj tintado kaj vokado de ili, sed ankaŭ distance liaj oreloj estas sentemaj kiel tiuj de tigro por tiuj ĝenaj sonoj, li vidas ankaŭ ke la turoj kaj spajroj superas la regentojurton en alto, sentas miskontenton pri tio sed tamen rezignas interveni.

Poste li rimarkas ke tiuj konstruaĵoj glorantaj diversajn diojn ofte estas elmetitaj al fulmofrapoj, fojon post fojo okazas ke iu el ili ekbrulas, kaj la plej altan moskeon grave damaĝas fulmo, la lunarko el oro fandiĝas kaj falas grunden kiel dornoza bulo, la turo fendiĝas desupre ĝisgrunde.

Tiam la Ĥano trovas ke la fremdaj diodomoj tiris al si la koleron de la Ĉielo, iliaj dioj estas senpotencaj kontraŭ Tengri kaj ne povas protekti siajn proprajn rezidejojn, la Ĥano nun ordonas ke la altaj turoj kaj spajroj estu forigitaj, kaj ĉar la

tintado en sonoriloj kaj alispecaj klangoj kaj vokoj povas ĝeni la benignajn spiritojn de la aero kaj altiri al si la malignajn, ankaŭ ĉiuj tiuj sonoj estu malpermesitaj kaj silento regu.

Pastroj kaj aliaj reprezentantoj de variaj kredoj paŝas ĝis antaŭ la Ĥano kaj akuzas unu la aliajn:

La islamanoj diras: Ho Ĥano, vi devas interveni kontraŭ tiuj malfidelaj hundoj kiuj malkonfesas Allah, la solan veran dion, proklamitan de lia profeto Muhammed, tiuj hundoj kiuj per siaj falsaj dioj kaj herezaj doktrinoj prineas kaj primokas ĉion kio estas sankta!

Plej malbonaj el ili ĉiuj estas la kristanoj de okcidento kiuj adoras tri malsamajn diojn kaj insolentas aserti ke ili estas unu sola dio, krome ili adoras virinon kiun ili asertas esti la patrino de dio, abomenaĵo sen komparo, ili ankaŭ rompas ĉiujn diajn ordonojn, preĝas en riproĉinda maniero ne lavinte siajn manojn, sin donas al avaro kaj drinkado, kontraŭstaras ĉian fratecon inter homoj kaj kondamnas ĉiujn krom malgranda nombro al eterna brulado en la fajro de la infero.

Neniu idoldoktrino estas pli danĝera ol tiu kristanismo, kaj pro tio ni insistas ĉe vi, ho Ĥano, ke vi malpermesu ilin en via regno, ekzilu ĉiujn kristanojn aŭ eĉ prefere ekstermu ilin per fajro kaj glavo!

La okcidentkristanoj diras: La idaro de la diablo mem parolis, Islamo estas la plej ruiniga el ĉiuj herezoj, ilia Allah estas falsa dio kiu estiĝis por spiti al Kristo kaj delogi la sensciajn, ĉiuj kiuj sekvas lin certe jes brulos eterne en la fajro de la infero!

Vi, ho Ĥano, devas scii tion same bone kiel ni, vi batalis

kontraŭ tiu bando kaj ĝin venkis, kune ni devas oponi tiun ĉiam same danĝeran kaj militavidan Islamon, por finfine meti finon al ĝia potenco kaj ekstermi ĝiajn adeptojn de la tera surfaco!

Ni kristanoj nin levas antaŭ ĉio kontraŭ tio ke al Islamo estas permesate dissemi ĝian damaĝon ĉi tie en Karakorum, meze en via imperio, ho Ĥano, kaj ni postulas ke vi tuj ekstermu tiujn skorpiojn kaj vipurojn aŭ almenaŭ permesu al ni ekbatali kontraŭ ili!

La nestorianoj diras: Ni estas la veraj kristanoj, ne tiu feĉo de la okcidentaj landoj kun iliaj lascivaj papoj, iliaj amasigitaj riĉaĵoj kaj ilia senmezura potencavido, sed ni kiu agnoskas la sanktan Nestorion, la fondinton de la sola vera kristanismo, kaj ni kondamnas tiujn falsajn kristanojn kiuj malkonfesis nin kaj nin forpelis de la okcidentaj landoj, ĉi tien al tiuj ĉi regionoj kie ni trovis azilon en via regno, ho Ĥano.

Nun ili eĉ ne detenas sin de penetro en niajn vicojn kaj de pludaŭra persekuto, tiaj kristanoj estas eĉ pli abomenaj ol la islamanoj, sed eĉ tiuj ne havas aferon ĉi tie inter ni, dum ni nestorianoj jam longe kapablis vivi en paco kun la ŝamanoj de la mongoloj, kiel dekretas via leĝo, ho Ĥano, kaj ni faras peton al vi ke vi forpelu tiujn fremdajn herezdoktrinojn de Karakorum kaj de via tuta orienta imperio!

La ŝamanoj diras: Ĉiuj tiuj fremdaj instruoj penetrantaj de la randoj de la mondo forĵetindas, ankaŭ tiu nestoriana instruo pretendanta hejmi ĉitie, ĉar ĝi estas nenio alia ol apenaŭ maskita kristanismo kaj ĝi vivas per tio kion ĝi ŝtelis de ni ŝamanoj, sed ĝi malhavas same tiel kiel ĉiu alia fremda instruo iun veran komprenon pri tio kio esencas, iliaj revelacioj kaj aŭguradoj estas nenio alia ol mizeraj postimitoj, nur ni

ŝamanoj kapablas enspekti sonĝojn kaj rivelitajn viziojn kaj prevedi kio okazos, deturni la misfortunon, agordi milde la spiritojn, establi rilaton kun la Eterna Blua Ĉielo.

Ho Ĥano, prefere ol lasi ilin kun ilia korupto inter ni, estus forpeli ĉiujn tiujn instruojn de tie ĉi, el via regno, ke la Ĉielo ne koleru kaj turnu sian bonvolon for de ni!

Post tio ankaŭ buddhanoj, lamaaj pastroj, taoistoj kaj ankoraŭ aliaj pledantoj por malsamaj religiaj kredoj alpaŝas kaj akuzas unu la aliajn, kondamnas unuavice siajn plej proksimajn konkurantojn, sed krom tio ankaŭ ĉiujn aliajn instruojn krom la propra, la religioj de oriento kaj okcidento tamen estas tro fremdaj reciproke por sin turni unu kontraŭ la aliaj kun vere fanatika pasio, ili unu la aliajn konsideras tiel lontanaj kaj absurdaj formoj de superstiĉo kaj devojiĝo ke ili opinias unu aliajn relative sendanĝeraj, samkiel ili ankaŭ ne aparte atakas la inocentan kaj senkleran paganismon.

Kiam la Ĥano pacience kaj ne sen glimeto de ironia interesiĝo en la okulfendetoj jam aŭskultis sufiĉe longe pri la variaj plendoj li ekvortas:

Vi reprezentantoj de la diversaj instruoj de okcidento kaj oriento ĉiuj estas malamikoj reciproke kaj nur mia potenco malhelpas vin ĵetiĝi sur vin reciproke, forpeli kaj neniigi unu aliajn, vi interbatalas pri viaj dioj kaj instruoj, vi ne volas konsenti unu al la aliaj ian ajn scion aŭ komprenon, eĉ ne la rajton ekzisti, ĉiu el vi kredas sin senerara kaj posedanta la solan veron.

Sed mi diras al vi ke iom da kompreno kaj vero troviĝas ĉiuloke, ili ne estas rezervitaj al unu sola instruo, kaj tial mi ne permesas ke unu instruo estu metita antaŭ alian, ke iu dio estu respektata pli ol alia, ĉar super ili ĉiuj staras la neimage-

bla plejalta dio, kiun ajn nomon ni donas al li kaj kiun ajn koncepton ni faras al ni pri li: mi mem kiel mongolo sekvas la komprenon de mia popolo kaj adoras Tengri, la Ĉielon, sed mi ne trudas mian kredon al iu alia.

Kaj nun mi ordonas al vi ĉiuj teni pacon unu kun la aliaj, lasi al ĉiu havi sian kredon kaj adori tiun dion kiun li elektas, tio estas skribita en mia leĝo, en Jassa, kaj kiu ribelas kontraŭ ĝiaj ordonoj estu forpelita de mia regno aŭ perdu sian vivon!

Post la parolo de la Ĥano sekvas profunda silento, ekscititaj kaj koleraĵ la pastroj kaj predikantoj komencas forpasi el la regentotendo, subigitaj sed pafante malamajn rigardojn unuj kontraŭ aliaj.

Al la Ĥano en Karakorum alvenas sendito kun skribo de la Papo en Romo, kaj post traduko la enhavo estas prezentata al la Ĥano, kiu aŭskultas kun malsereniĝanta mieno.

La skribo lin adresas kiel cezaron de la mongoloj, poste la Papo informas kiu li mem estas: La spirita mastro de la kristanaro, la anstataŭanto de la sola vera, ĉiopova kaj triunua Dio sur tero.

Ni eksciis, diras la skribo, ke viaj hordoj severe vandalis en pluraj kristanaj landoj kaj kaŭzis grandan perdon de homvivoj, malĝojon kaj mizeron, kaj ankaŭ signifajn perdojn de proprietaĵo: ni nun vin avertas plej severe kontraŭ daŭra praktikado de tiaj fiagoj kaj elverŝado de kristana sango kio venos sur vian kapon kiel eterna damno, dis kiu nur ni povos vin liberigi.

Aliflanke ankaŭ venis en nian scion ke vi per via militado

kaŭzis signifan malvenkon al la senpiaj anoj de Islamo, ke vi venkis plurajn el ĝiaj plej potencaj regentoj konkerante iliajn regnojn, ke vi ĉe tio donis liberecon al multaj kristanoj konfesi sian kredon kaj ke vi penetris ĝis proksime al la sankta urbo Jerusalemo, kiu bedaŭrinde ankoraŭ ĉiam estas sub la manoj de la malamikoj de la kristanaro.

Por via propra bono, cezaro de la mongoloj, ŝajnas al ni el neceso postulate ke vi faru aliancon kun ni, metu vin flanke de la kristanaro kaj kune kun niaj senkomparaj militarmeoj kaŭzu al Islamo la finan malvenkon, liberigante la sanktan urbon Jerusalemon kaj por ĉiam metante finon al la minaco venanta de ĝiaj malamikoj.

Ankaŭ estas nia alta volo ke vi, cezaro de la mongoloj, vin prezentu ĉe ni en Romo ĉe la sankta trono por kisi la ringon sur nia mano tiel sigelante la pakton inter ni, ke vi ĉe tio konfesu vian kredon je la sola vera Dio kiu posedas ĉiun potencon en la ĉielo kaj sur la tero ekde la komenco de la tempoj ĝis ilia fino.

Ni parolas en la nomo de la sola vera Dio kaj admonas vin, mongolcezaro: pripensu ke la eterna beato de via animo samkiel la futura ekzisto de via imperio dependas de via decido!

Apenaŭ la skribo estis legita, kiam la Ĥano ordonas ke la sendito estu enkondukita, la viro en sia longa nigra pastrovesto timigite falas genue antaŭ la regento, kiu demandas al li ĉu li konas la enhavon de la skribo.

Post jesa respondo de la sendito la Ĥano kun mavaŭgura sinrego eldiras: Kaj tamen vi aŭdacas ĝin transdoni al mi, ĉu vi kredas ke oni senpune povas ofendi la Ĥanon, ĉu via ignoro kaj tiu de via papo estas tiel granda?

La palaj lipoj de la sendito tremas kaj li kuraĝas nenion re-

spondi, la Ĥano lin observas tra kunpremitaj okulfendoj, fine li diras: Laŭjuste tio devus kosti al vi la vivon, sed mi sentas inklinon respondi la skribon de via papo kaj korekti liajn mis-sciojn, poste vi povos reporti la respondon al li.

La Ĥano signas al sia skribisto kaj post momento da pensado li komencas dikti respondon al la Papo en Romo:

Vi, Papo, vin turnas al mi evidente ne bone sciante kiu mi estas, mi tamen regas super la pli granda parto de la mondo, ankaŭ super multaj kristanoj, ne farante diferencon inter ili kaj aliaj, dum via kristaneco ampleksas kelkajn landojn plej fore en la okcidento, tro sensignifajn por logi al konkero.

Tial ne decas al vi, kiu estas la pli malforta, oferti al mi aliancon por kontraŭmiliti la anojn de Islamo, mi ne estas malamiko de la islama kredo, kiun male mi protektas same kiel mi protektas ĉiujn aliajn religiojn, kaj viaj ŝvelpufaj vortoj pri via ĉiopotenca Dio ŝajnas senenhavaj kiam vi kun lia apogo eĉ ne povis konkero de liaj malamikoj tiun urbon kiun vi nomas sankta.

Mia dio estas Tengri, la Eterna Blua Ĉielo, kaj se li ne estas la sola li tamen evidente estas pli potenca ol la via kaj ceteraj dioj en la mondo, mi lin taksas plej alte pro tio ke li estas la dio de mi kaj mia popolo, sed mi pro tio ne forkondamnas aliajn diojn sed permesas ties adoron interne de mia imperio.

Ne decas al vi, Papo, pro io min riproĉi aŭ eldiri minacojn, ankaŭ ne postuli mian sinprezenton en via urbo por kisi vian ringon kaj deklari min konfesanto de via Dio.

Anstataŭe vi mem povas veni ĉi tien al mia urbo Karakorum kaj meti vin kaj la kristanaron sub mian protekton, tiel

ke paco povu regi inter niaj landoj kaj al ĉiu Dio estu aljuĝita tio, kio al li apartenas!

Per tio la respondo de la Ĥano estas preta kaj li ordonas ke ĝi estu skribita en diferencaj lingvoj, ankaŭ en tiu de la Papo mem, kaj estu provizita per la sigelo de la Ĥano, ke ĝi estu tuj sendita per la atendanta sendito.

Flanke de la religiaj aferoj la Ĥano devas ankaŭ ekstrakti la problemojn de la kreskanta komercado, kaj li sin turnas al Je-liu:

Kiel vi scias, multescia kataĵo, la moro inter la mongoloj ĉiam estis preni kaj doni, ne praktiki interŝanĝan komercedon kaj marĉandadon, eĉ malpli rekte aĉeti kaj vendi, tiaĵon oni konsideris humiliga afero, signo de avido kaj ŝrumpinteco de koro.

Ĉiam estis memevidenta rajto inter la mongoloj kaj ankaŭ alte taksate rabi kaj predi tuj kiam ili estis sufiĉe fortaj aŭ ruzaj por sukcesi en tio, tamen nur kiam temis pri malamikoj kaj fremduloj kun kiuj ili ne estis aliancaj.

Tiun rajton preni akompanis la devo doni, kaj kiu multon prenis havis devon multon doni, tio ĉiam estis neskribita leĝo, kaj kiu ricevis donacojn donis eĉ pli valorajn donacojn rekompence, tiamaniere ne tro amasiĝis posedaĵoj, ili ne restis ĉe unu aŭ alia, sed migris inter homoj, kaj tio inter la mongoloj okazis anstataŭ komercado.

Sed vi mem, saĝa Je-liu, tre favoras komercedon kaj diverspecan traktadon, ĉar ĉiam ankoraŭ vi ja estas kataĵo, kaj nun mi volas aŭdi kion vi havas por diri pri tiu afero, ĉu la komer-

cado estu permesata disvastiĝi interne de la mongola imperio kaj komenci forpuŝi la malnovan moron?

Je-liu respondas: Ho Ĥano, la mongola moro estis perfekta dum la klano estis malgranda kaj nomada, sed nun interne de la vastampleksa imperio fariĝis ĉiam pli maleble ĝin sekvi, pro tio ke labortaskoj kaj artlertoj sin dividas je senkompare pli da manoj kaj en vaste diferencaj direktoj, tiel ke diversaj produktoj devas transportiĝi inter diversaj lokoj kaj trovi distribuon laŭ malsamaj bezonoj.

Interne de la klano ĉiu familio produktis kion ili antaŭ ĉio bezonis kaj ceterajn aferojn ili povis havigi al si rabante kaj predante aŭ eble ricevi kiel donacon, sed nun interne de la granda imperio necesas ke ĉiu per interŝanĝo povu akiri kion li bezonas, kaj tial fariĝis necesa alte evoluinta interŝanĝa komercado.

Tia interŝanĝa komercado devas esti perata kaj zorgata de apartaj komercistoj aŭ interŝanĝistoj, tiuj devas krediti al si konvenan profiton el sia laboro kaj pro tio la prezo de varo altiĝas dum ĝi migras de la faranto al la akiranto, tiun prezon oni ne ĉiam povas ekzakte determini kaj tial ĝi devas fariĝi objekto de marĉando, konkurado inter la interesoj de la vendanto kaj la aĉetanto.

Sed ĉar ofte estas malfacile rekte interŝanĝi varojn unuj kontraŭ aliaj necesas iu regulebla valoro kiel interaĵo, tial jam longe inter la kataĵoj estas uzata tio kion oni nomas mono, vi mem ilin vidis, ho Ĥano, tiujn monerojn el metalo stampitajn per bildoj kaj enskriboj, al viaj bataluloj ili ofte trafis en la manojn kaj tiuj ne rare malestime forĵetis ilin kiel senvalorajojn, sed tion ili faris pro malsaĝo, ĉar la moneroj ne estis senvaloraj estante interŝanĝeblaj kontraŭ varoj.

La Ĥano: Via ekspliko estas lerta kaj bone klarigas pri kio temas, vi do konsilas al mi ne nur lasi la interŝanĝan komercadon daŭri, sed ankaŭ ĝin kuraĝigi kaj lasi ĝin kreski, eĉ enkonduki tiujn monerojn pri kiuj vi parolas kaj kiujn mi vidis uzataj, ak inter katajoj ak inter kharasmoj, moneroj el oro aŭ arĝento aŭ iu pli simpla metalo kiujn tiuj popoloj tiel alte taksis ke ili ne malofte oferis por ili la vivon.

Sed se mi nun estus preta fari tiun paŝon, de kie venu la moneroj kaj kiel ilia valoro estu determinita, kiel oni igu la mongolojn kaj la aliajn popolojn akcepti ilin kiel kompenson por laboro aŭ varoj, kiel la interŝanĝo per ili okazu trans la limoj al aliaj regnoj, kaj kiel oni malhelpu ke homoj komencu kolekti monerojn en siaj kestoj kaj degeneri al avido?

Je-liu: Pli da oficistoj kaj skribistoj estus necesaj, la oficistoj devus rangi super la komercistoj kaj kontroli ilin, sed la oficistoj siavice respondecu antaŭ la regento kaj estu kontrolataj de li, en tiu maniero vasta imperio povas resti submetita al la volo de la regento kaj esti devigita en ĉio obei ĝin.

La moneroj devus esti submetitaj al sia propra buroo, kiun mi mem volonte prenos sur min starigi, se vi tiel deziras, ho Ĥano, kaj ĉiu monero portu vian bildon kaj skribon, samkiel via sigelo, ĝi estu cifere markita per sia valoro kaj tiu valoro estu sama en la tuta imperio samkiel ekster ĝiaj limoj, valoro kiu estu garantiata per via bildo, ho Ĥano, kaj validu kiel etendo de via potenco.

La Ĥano: Mia decido poiome maturiĝu, mi jam povas vidi la avantaĝojn de moneroj kaj komercado, sed mi ankaŭ timas la sekvojn, la imanentajn reefikojn, kaj multaj demandoj ŝajnas al mi neresponditaj, eble tio estas paŝoj kiuj devas atendi ĝis miaj posteuloj ilin realigos, sed tiel nemortala kiel vi

Ŝajnas, saĝa Je-liu, vi kredeble estos tiu kiu starigos vian buroon por la moneroj!

En siaj noktaj sonĝoj la Ĥano ofte marŝas kun sia armeo tra plej senindulga dezertregiono: la aero flimras pro varmego antaŭ ili simile al fluanta akvo aŭ sin etendas foren kiel bluantaj lagoj, kiuj tamen restas neatingeblaj, vanuas dum oni sin proksimigas,

neĝkronitaj montĉenoj desegniĝas pintmalsupren kvazaŭ ili ripozus sternitaj sur siaj dorsoj el neĝo kaj turnus la malhelajn ventrojn ĉielen, rokoj alsupras kiel altaj pordoj aŭ kolosaj statuoj, nigraj kvazaŭ de fulgo aŭ fajrere blankaj de salo,

sed ankaŭ alta greso elkreskas sur la ebenaĵo antaŭ ili, lumas plejfreŝe verde kaj vidiĝas movi sin en la vento ondante sub la ventotiroj, hela aŭ malhela: greso tiel tenta ke la ĉevaloj ripete trompiĝas,

la Ĥano kaj liaj bataluloj tamen ne lasas sin trompi aŭ perpleksi, ili scias ke tio estas ludo de la malignaj aerspiritoj por veki falsajn esperojn kaj disrompi la forton de rezisto: la dezerto tamen restas dezerto kaj neniam mirakloj okazas.

Kiam ili alvenas realajn lagojn ankaŭ tiuj montriĝas trompaj, blindige blankaj de salo aŭ ŝtoniĝintaj en vitratrajn surfacojn, la ĉevaloj antaŭenpaŝas tra kraketantaj salhaldoj kaj se akvo troviĝas ĝi estas peza kaj rigida pro salo, netrinkebla: kvazaŭ la Soifo mem fariĝus io forpuŝe konkreta,

ankoraŭ aliaj akvoj povas ŝimri per fortaj koloroj simile al enormaj dissternitaj pavovostoj, sed nur pro veneno kaj pu-

tro ili lumas, moke kaj timige, simile specon de inflamaj vundoj flujaj de puso,

ankaŭ la rokoj povas esti timigaj, ĉifitaj kiel praoldegaj vizagoj, plenaj de klivoj post la alternoj inter frido kaj varmego, foje ruĝaj kiel ardanta fero, ruĝestria kvazaŭ priverŝitaj per sango, aŭ verdaj kvazaŭ ŝtoniĝinta vegetaĵo, foje dornozaj kiel dornoveproj, suprenturante kiel arbaroj el lancoj.

Ne, neniam mirakloj okazas en la dezerto, sed tamen estas iujfoje trovata la malplej antaŭvidebla: iutage en la soifdezerto kiam bataluloj kaj ĉevaloj anhelas, elĉerpitaj ĝislime, subite kuntiriĝas nigra nuboj, la fulmoj preskaŭ seninterrompe tranĉas tra la densiĝanta tenebro kaj hajleroj grandaj kiel birdoj komencas fali, alte ili resaltas sur la grundo kaj tondras kiel pretersturmanta ĉevalgrego,

la viroj ŝirmas siajn kapojn per la ŝildoj kaj kaŭras sube dum la ĉevaloj ekkuŝas kapinterkrure, ŝriante pro la doloro kiam la hajleroj ilin trafas kiel pluvo de ŝtonoj elĉiele,

sed poste la dezerto kuŝas kovrita de hajlerokumuloj, la viroj povas ilin kolekti kaj lasi degeli, tiel ili havas akvon por sensoifigi homojn kaj ĉevalojn: puran kaj klaran akvon sen ajna gusto de ĉielo aŭ tero.

Aŭ alian fojon kiam la malsato ilin severe atakas kaj ili moviĝas tra montara pasejo kie ĉio estas nur nigraj rokoj kaj sablo, sen eĉ verda tigo aŭ arbedo, sen spuro de io vivanta: tiam subite la hundoj komencas hurli kaj fosi en la sablo, rifuzas forlasi la lokon kiam la rajdantoj pasas, la Ĥano mem rimarkas kaj signas halton,

kelkaj viroj komencas fosi en la sablo kie la hundoj hurlas pro fervoro, ĉirkaŭmakzele salivŝaŭmaj pro espero, kaj sub tavolo da ŝirmanta sablo ili trovas gregon de ĉevaloj, den-

skaŭre unuj apud aliaj, evidente frostmortintaj dum ŝtormo kaj superŝutitaj de sablo; ili ĉiam plu estas frostaj kaj duraj kiel ligno, sed defrostite la viando estas freŝa kaj nutra kvazaŭ ĝi estus ĵusbuĉita.

Dum unu el siaj rajdoj sur la dezertebeno la Ĥano haltas apud iuj sekiĝintaj tamarikoj kiuj kreskas apud kelkaj rokoj, li deĉevaliĝas kaj eksidas tie kelktempe, absorbiĝinte en pensoj.

Li kolektas salivon en la buŝo kaj kraĉas inter la rokojn, veziketo el salivo fiksiĝas sur ŝtonbloko kaj nekutime glimas, kiel guto el hidrargo.

Tio kaptas la atenton de la Ĥano, li sin klinas antaŭen kaj rigardas la kraĉvezikon, komence ŝajnas al li kvazaŭ li enrigardus vivantan okulon, kie li renkontus rigardon kiu ion esprimus, li nur ne povas difini kion.

Poste la kraĉveziko sin ĉiam pli grandigas kaj li vidas ke ĝi estas plena de moviĝo, simile malgrandajn vivoformojn kiuj orbitas unuj ĉirkaŭ aliaj, tre rapide, eligante glimantan flaron kiu preskaŭ blindigas la rigardon.

Samtempe li enrigardas profundon similan al fonto en kiun falas forta lumo, kaj ĉio tie ene rotacias kiel akvovortico dum samtempe la etaj moviĝadoj unuj ene en aliaj daŭradas.

La vido impresas la Ĥanon per sento de vertiĝo kvazaŭ li falus suben en tiun kirlan profundon kaj malaperus tie, li perceptas tion kiel allogon kaj minacon, li devas sin fortiri per subita ekmovo, tiel ke tuj vidiĝas nenio alia ol ordinara kraĉveziketo.

Tiam lia atento fiksiĝas al rokaĵo antaŭ li, ĝi komencas flimri kvazaŭ vidata tra varmonebulo, ĝi perdas siajn densecon kaj nepenetreblon, solviĝas kaj tralumiĝas ĉiam pli.

La rokaĵo similas al glitranta akvo, kuntenata de nevideblaj muroj aŭ neperceptebla forto, sed samtempe ĝi ĉiam pli sendensiĝas, ŝajnas konsisti el nur malgrandaj, ŝvebantaj partikuloj aŭ el svarmo da ekstreme malgrandaj insektoj.

Al la Ĥano estiĝas la koncepto ke li povus pasi tra la roko kaj ĝi ne obstaklus pli ol akvo aŭ nebulo.

Li ne aparte surpriziĝas pro la penso, estas kvazaŭ li ĉiam sciis ke la objektoj penetreblas, kaj tuj kiam oni vere ekkomprenas tion ili ĉesas rezisti.

Estas nur iaspeca forgeso kiu malheligas kaj ŝtonigas la mondon, donas al ĝi ĝiajn mortajn barojn kaj kontraŭojn ĉie, tio estas scikompreno kiun la homo perdis kaj tio devigas lin batali kaj strebi por penetri antaŭen, supervenki la obstrukcojn.

Tiel ŝajnas al la Ĥano dum li longe sidas absorbite en sia travivaĵo, ĝis li kvazaŭ vekiĝas, la rokaĵo jam fermis sin, la tamarikoj staras tie kiel antaŭe kaj en ilia loboza ombro atendas la ĉevalo.

Poste la Ĥano demandas al Je-liu pri ties opinio: Ĉu la firmaj objektoj, ankaŭ la plej pezaj kaj plej duraj, propre estas kunmetitaj kaj penetreblaj?

Je-liu respondas: Jam longe troviĝas tia penso, ho Ĥano, ke nenio vere estas tia kia la homo perceptas ĝin, sed io tute alia, por nia percepto nekonata kaj neatingebla.

Roko eble nur ĝis certa limo sin distingas de akvo aŭ aero en sia denso, eble ĝi konsistas el partikuloj tiel etaj ke la okulo ne kapablas ilin percepti, la rezisto konsistas en ilia kuntene-

co kaj ilia nombro estas pli granda ol tiu de la sableroj en la dezerto.

Ankaŭ aero kaj akvo devas konsisti el tiaj partikuletoj, nur malpli densaj kaj tial sen tiel granda rezisto, sed kiajn denson kaj pezon ili tamen posedas rimarkiĝas kiam la aero moviĝegas kiel forta vento aŭ kiam la akvo portas ŝipojn pli pezajn ol domoj.

La Ĥano: Ĉu do povus esti tiel ke la mezuro de la homo validas nur interne de lia propra mondo kaj ekster ĝi povas troviĝi aliaj mondoj kiujn ni ne konas kaj ne povas atingi?

Je-liu: Ho Ĥano, tiel pensi certe estas vera saĝo, povas troviĝi mondo de senfine grandaj mezuroj en kiu ni estas parto ne perceptante ĝin, kaj povas troviĝi senfine eta mondo kiu estas parto de ni sen ke ni kapablas ĝin percepti.

La Ĥano: La mondo de la homo do povus esti tre eta aŭ tre granda kompare kun tiuj aliaj mondoj, tio estas tre eta kaj tre granda samtempe, ekstreme limigita kaj preskaŭ senfina samtempe?

Je-liu: Tiel povas esti, ho Ĥano.

La Ĥano igas alvoki faman tibetan miraklofaranton, la viro estas tre altkreska, neniu en la regentojurto lin atingas pli ol ĝis mezbruste, lia ĝispieda vesto estas pompa kaj lumas kiel peco da sunbrilo en flavo kaj ruĝo, kun enteksitaj drakoj kaj stelfiguroj.

Li komencas montrante al la Ĥano du rimarkindajn objektojn: unu estas ronda globo, la alia estas vitra kaliko kun arĝentea likvaĵo, la globo estas blankegriza kaj aspektas tute modesta, sed kiam la Ĥano ĝin prenas en la mano ĝi estas tiel

malpeza ke li perpleksiĝas, jes, senpeza preskaŭ kiel se ĝi estus el plumoj.

La tibetano admonas la Ĥanon provi fendi la globon per sia glavo, sed kiam la Ĥano direktas hakon kontraŭ ĝin fajreras ĉirkaŭ la eĝo, la glavo resaltas kaj eĉ plej eta noĉo ne vidiĝas sur la globo.

Kio estas tio kio ne havas pezon kaj pli duras ol ŝtalo, demandas la Ĥano kaj la tibetano respondas: Tio estas stelmaterio ho Ĥano, tiu globo falis de la ĉielo kiel falstelo, tiel malpezaj kaj samtempe tiel duraj la steloj devas esti por sin teni ŝvebantaj kaj por ne eluziĝi!

La vitra kaliko kun la likvaĵo male surprizas per sia pezo, por ĝin levi necesas fortoj de viro, kaj tamen ĝi estas likva fluido, duone travidebla, la tibetano verŝas kelkajn gutojn da ĝi sur la polmon de la Ĥano kaj ili havas pezon kiel grandaj plumbobuloj.

La Ĥano demandas kio ĝi estas kaj la tibetano respondas: Tio estas la pezfluido kiu troviĝas en la interno de la tero, estas ĝi kiu tenas la mondon en ĝia loko kaj igas la ĉielon rondorbiti ĝin, mi mem kun granda peno suprenlevis ĝin el la interno de vulkano.

Kaj al kio uzeblas tiuj rimarkindaj aferoj demandas la Ĥano kaj la tibetano respondas: Al nenio, ho Ĥano, ilia tasko nur estas riveli al ni la nekonatan!

Poste la tibetano antaŭ la Ĥano faras elmontron de sia kapablo levi sin de la grundo kaj sin teni libere ŝvebanta en la aero.

Li ne etendas sin supren nek faras movojn per la brakoj por imiti leviĝantan birdon, li nur staras tie malstreĉiĝinte kun fermitaj okuloj kaj atendas, poste li malrapide suprenti-

ras la krurojn sub si kaj restas sidanta en la aero kvazaŭ sur nevidebla seĝo.

La Ĥano signas al batalulo ke tiu svingu sian glavon sub la ŝvebanto, sed la glavo renkontas nenion, la tibetano netuŝite restas sidanta en la aero.

La Ĥano estas kontenta kaj kapklinas, tiu miraklofaranto estas kapabla kaj ne malestiminda, sed ankoraŭ restas lia plej eminenta prezento: li sin metos en dormon, igos la spiriton forlasi la korpon kaj sin transporti tre disten, por poste denove reveni kaj per la vekiĝinta viro prirakonti kion ĝi vidis.

La Ĥano diras: La ĝusteco de tio kion via spirito spertos estu kontrolata, tial ĝi elserĉu Boru, la filon de Mukali, fore en la Kin-regno kaj post la reveno ĝi povu priskribi la ringon kiun li portas sur sia maldekstra mano!

La tibetano nenion obĵetas kontraŭ tiu postulo, li nur rimarkigas ke la Kin-regno estas granda kaj multa tempo povos pasi antaŭ ol lia spirito trovos la filon de Mukali tie, li tial petas permeson ripeti la provon se ĝi ne sukcesos unuafoje.

Li kuŝiĝas kaj endormigas sin, kuŝas tie senmova kaj spiras preskaŭ nerimarkeble, la Ĥano kaj ties homoj lin observas tre atente, pasas horoj kaj la viro neniajn signojn montros de vekiĝo.

Kiam tio finfine okazas estas tute kvazaŭ li vekiĝus el ordinara dormo, li frotas al si la okulojn, ĉirkaŭrigardas, eksidas kaj diras: Eble tio daŭris longan tempon, mi mem ne scias, sed se jes, la vojaĝo mem ne postulis tempon sed la serĉado de la filo de Mukali en la vasta Kin-regno!

Kaj la ringo, diras la Ĥano, ĉu vi vidis la ringon kaj ĉu vi povas ĝin priskribi?

La tibetano priskribas la ringon sur la maldekstra mano de

Boru kaj la Ĥano kapklinas: ĝi estas la ringo kiun li mem donis al la filo de Mukali kaj pri kiu li scias ke tiu ĝin portos ĝis sia morto, dubo ne estas, kaj la tibetano jam konvinkis la Ĥanon pri sia rimarkinda kapablo.

La Ĥano diras: Vi estas lerta miraklofaranto, tibetano, sed kiel kuriero vi ne povas servi ĉar vi ne povas kunporti mesaĝon, ne buŝan nek skriban, sekve via artaĵo estas senutila, vi tamen ne estas trompisto kaj vi darfas reiri al via lando sen perdi la vivon!

Kaj la ĉiutaga vivo kontinuas en Karakorum, la Ĥano daŭre povas senti ĝojon ĉe naskiĝo de ĉevalido, observi kiel ĝi liberiĝas de la naskiĝmembrano, estas purlekata de la ĉevalino, ŝanceliĝe stariĝas sur siaj altaj stilzosimilaj kruroj kaj denove resinkas, restariĝas kaj serĉas sian vojon al la mammo kun la varmega, forta lakto,

li aŭdas multescian viron aserti ke gigantaj bestoj ekde praoldaj tempoj ripozas profunde en la tero, ilia specio estas malaperinta ekde tiu forfora epoko dum abundis akvo en la altebena, kiam kanoj kaj filikoj kreskis alte kiel arbaroj, kaj la karno de tiuj animaloj estus ankoraŭ manĝebla se ĝi estus retrovita, tiel bone ĝi estas ŝirmata sube en la tero,

li vidas akvosercantojn eliri, sed iliaj instrumentoj estas malcertaj kaj iliaj montroj ne fidindaj, kie ili indikas fosadon oni ofte trovas nenian akvon kaj oni devas forlasi la vakajn kavojn en la grundo,

aliaj viroj havas lertecon profundiĝi en abismojn kaj esplori la fundojn de ravinoj, rare ili trovas interesaĵojn, sed ili lernis kapti skorpiojn kaj serpentojn per la manoj ne suferante lezojn,

salon oni devas mezuri per mezuriloj kaj fortenti de akvo, sed la salo mem estas senmezura laŭ la naturo kaj ŝajnas ne eviti akvon, ĝi sin miksas kun la akvo kaj ŝajnas konsumiĝi de ĝi ĝis montriĝas ke la salo anstataŭe konsumis la akvon, salo

estas necesajo kiu certaloke fariĝis malbenaĵo, la nura vido de ĝi dolorigas la okulojn, memorigas pri neĝo en akra sunbrilo, kiu blindigas kaj larmigas la okulojn ankaŭ de bataluloj,

la rapidecon de la sagokurieroj oni devas prijuĝi parte konsiderante la venton, ĉu ili iras kiel laŭventaj aŭ kontraŭventaj rajdantoj, tio ofte malfaciligas takson kiuj el ili estas plej meritaj, kelkaj el ili montriĝas tro uzi siajn sonorilojn sur sia vojo, aliaj kutimas tro ofte montri la metalplaton kun sia rajtigo kiun ili portas en ĉeno ĉirkaŭ la kolo,

estis eltrovite ke glacibloko povas transvivi la plej varmegan someron se ĝi estas kovrita per dika tavolo de folioj, abeloj ĉe kaveto en la grundo ofte indikas mielon elfoseblan, akridoj povas troviĝi meze en la dezerto kaj provizi bonvenan manĝoregalon, sed se ili tro multiĝas ili vekas malapetiton kaj ne plu manĝeblas,

grundoj kiujn dezertigas fajro kelkiam povas esti priŝutitaj de serpentoj kiuj karbiĝis en la flamoj aŭ kuŝas tie bonrostitaj, tiel ke ilia karno bongustas kaj tentas ankaŭ tiujn kiuj aliam ne estas serpentomanĝantoj kiel la kataĵoj,

post neĝoŝtormo oni ne malofte devas eliri kaj elfosi ŝafregojn, kiuj kuŝas neĝkovritaj, dense kunpremitaj sub la kumuloj, la neĝo degelis ĉirkaŭ ili pro la varmo kaj ofte apertiĝis aertruoj tiel ke la ŝafoj ne sufokiĝis sed travivis,

preni la varman sterkon de la bestoj en la manoj estas rimedo kontraŭ malĝojoj, kaj imagi, ke la steloj de la vintra nokto estas rajdantaro survoje, donas forton, sed neniu volonte eliras sur la neĝon dum la plenlunaj noktoj kiam lupohurloj silentigas la hundobojn,

la olduloj estas honorataj per tio ke oni tiras maĉpecojn el sia propra buŝo kaj enmetas en iliajn, junulo kiu sin ornamas

per ruĝpentritaj ŝafkornoj volas montri sian virecon, kaj junulinoj kiuj klinas sin antaŭen vidante ŝtonon ĵetiĝi malkaŝas sian seksmaturecon,

virino ofte malkvietas kiel folio en la vento antaŭ ol ŝi fekundiĝas, ŝi povas vidi viron fari certan movon kiu humidigas ŝian sinon kaj fleksigas ŝiajn genuojn, okazas foje ke virinoj naskas en tendoĉaro dum okazanta batalo kaj tia nasko okazas neordinare facile,

la ombro de foliaro kiu sin movas kontraŭ muro estas vido kiu longe povas resti en la memoro, eble ĝi memorigas pri la flagrado en la felto de la jurto kiam ventoblovo ĝin kaptas, troviĝas ankaŭ tendoj tiel malpezaj kaj maldikaj ke la ombro de la preterkurantaj nuboj ilin penetras,

la ŝtormo povas subite alporti tutajn plenbrakumojn da floroj de fore, sen ke ili perdis eĉ sian odoron,

en iu mateno la ebena povas esti ŝutita de cignoj, tiel dense ke ili nur malfacile povas disetendi la flugilojn kaj leviĝi fluge, iujfoje eĉ la tero mem vidiĝas malfermiĝi kaj peni naski oni ne scias kion, sed tio kio similis vaginon refermas sin denove sen tio ke io okazis,

sablo aŭ akvo povas mezuri la tempon, ankaŭ en la malhelo dum la nokto, se vazo havanta truon en sia fundo permesas lantan forfluadon,

viro povas ami blankan kaj nigran ĉevalojn same, ili fariĝas por li kiel tago kaj nokto, ambaŭ same nemalhaveblaj,

ĝis antaŭ nelonge ŝlosiloj estis objektoj nekonataj kaj oni ridis pri seruroj,

komercistoj elmontras nigrajn ŝtonojn kiuj povas esti ĉenditaj kaj brulas, ili asertas ke ne temas pri sorĉo, sed tio eble dependas nur de tio ke ili scias ke sorĉo estas punata.

Atingas la orelojn de la Ĥano ke unu el liaj virinoj estas al li malfidela, li provas memori la akuzatinon sed apenaŭ kapablas, li kredas ke li ŝin vizitis nur unufoje, sed sciigas sin pri ŝia jurto kaj neatendite enpaŝas tien.

La virino iom surpriziĝas, sed li ne povas nete vidi ĉu ŝi ŝajnas ĝoja pro la vizito aŭ embarasita, kaj kiam li subite sentas deziron al ŝi, eble ĝuste pro la suspekto, li repuŝas ĝin kaj foriras parolinte kelkajn sensignifajn vortojn kun ŝi.

Li ankaŭ elserĉas la indikitan viron, junan batalulon, kuraĝan kaj bonreputan, kaj la Ĥano falas en heziton kiel li sin tenu: laŭ Jassa malfidela virino perdigis sian vivon, sed la Ĥano povas amnestii ŝin kaj tio ne malofte okazas.

Ĉikaze temas aŭtem pri unu el la virinoj de la Ĥano mem, ŝia malfidelo estas krimo kontraŭ li mem kaj ne facile povas lasiĝi senpuna, tio povus esti komprenita kiel malforto ĉe li se ĝi koniĝus, eble kiel signo de oldiĝo.

Sed tamen estas ja nur afero de akuzo kaj ne necesas ke li elesploru la veron, li povas deturni ĝin, preventi ĝin, tiom pli ke la virino propre estas por li indiferenta kaj li havas nenian uzon de ŝi.

Li venigas la virinon kaj la indikitan batalulon samtempe, soliĝas kun ili en la regenta jurto, kaj el ilia maniero terurite paliĝi li elkomprenas ke la akuzo devas esti vera, sed li diras:

Vi, batalulo, distingis vin per kuraĝo kaj lerto, tial mi volas premii vin donacante al vi unu el miaj propraj virinoj, ŝi estas juna kaj alloga, kaj mi kredas ke vi trovos plezuron en ŝi!

La batalulo kaj la virino sobfalis antaŭ la Ĥano, pretaj preĝi

por sia vivo, kaj nun ilin kaptas konfuzo, ili senhelpe rigardas unualian.

La batalulo povas nur balbuti: Ho, Ĥano, via boneco estas senlima, mi malindas tiun donacon kaj ne scias kiel mi povos vin danki!

La Ĥano diras, pli malmilde nun: Nenia danko necesas, batalulo, sed kun la donaco iras kondiĉo: vi foriru al servado plej fore okcidente kaj kunprenu la virinon, kaj vi neniam kalkulu kun tio ke vi revenos!

La batalulo: Jen kondiĉo kiu plenigas min per ĝojo, ho Ĥano, kaj faras la donacon eĉ pli bonvena!

La Ĥano faras geston ke ili povas foriri, kvazaŭ senpacience, malrestas vortoj dirindaj kiujn perdi pri tiu afero, la batalulo kaj la virino tuŝas la plankon per la frunto, stariĝas kaj foriĝas kune.

La Ĥano kontentas pri sia ago, sed dediĉas iom da penso al tio kiel la batalulo kaj la virino perceptas tion, ĉu ili travidas lian agon aŭ ne, ĉu ili sentos lian indulgon kiel ŝarĝon sur si, lian donacon kiel akuzon unu kontraŭ la alia, lian scion kiel restantan minacon super si kiel ajn foren ili foriros.

La deziro de la Ĥano pri virinoj ne plu revenas tiel ofte, sed kiam la deziro estiĝas li ankaŭ posedas la kapablon, nenio el tio okupas liajn pensojn, li tamen rimarkas ke lia deziro ĉiam pli komencas direkti sin al novaj virinoj, prefere junaj virinoj, dum li preteriras aliajn.

La merkitinon Khulan li dum longe preferas antaŭ aliaj, ŝi lin akompanis dum la lastaj kampanjoj kaj vivis kiel reĝino en sia propra silke subŝtofito jurto kun servistinoj kaj sklavinoj,

belega kaj fajra virino ŝi estas kaj flamo ĉe kiu li povis sin varmigi, ne nur elserĉi pro volupto.

Sed nun estas kvazaŭ ŝi ne plu logas lin, malcertas ĉu tio pleje dependas de li aŭ de ŝi, li daŭre ŝin vizitadas, sed sentas al ŝi nenian deziron, ili nur sidas kune en konfido, preskaŭ samkiel li kunestas kun sia unua edzino Byrte.

La Ĥano vizitadas jurtojn de aliaj virinoj por kontentigi sian deziron, li ankoraŭ ne atingis ekkoni ĉiujn virinojn apartenajn al li, preterpase elektitajn de li mem aŭ donitajn al li kiel donacoj, lin atendantajn en siaj jurtoj kaj prohibitajn al aliaj viroj, katajinojn kaj turkinojn kaj persinojn de nobla deveno, tre junajn kaj malpli junajn, belajn aŭ alimaniere neordinarajn, rafinitajn kiel eburaj forĝaĵoj aŭ vivajn kiel junaj ĉevalinoj, elaste sveltajn aŭ ŝvele fortikajn.

La Ĥano ne bone scias kiujn li preferas, li tiriĝas de unu al alia speco de virino, strange ŝanĝiĝema, eble iom desrevita pri ĉiuj, aŭ eble pri si mem, ofte sen deziro reveni al tiuj kiujn li unufoje vizitis, li ofte pensas ke la virinoj ne plu estas tiaj kiel antaŭe, sed ankaŭ — propre ne volante tion rekoni — ke ankaŭ li mem ne samas kiel antaŭe, kaj la volupto de viro ja tamen plejmulte dependas de li mem.

Kion do serĉas la Ĥano ĉe la virinoj, ĉu li bezonas tiun ĝuon kiu tamen duone desrevas lin, ĉu li ne same bone povus rezigni ĝin, ĉu li volas vidi pli da filoj naskiĝi kaj kreski ĉirkaŭ li dum liaj tagoj de maljuneco, aŭ ĉu li serĉas pruvon antaŭ si mem kaj aliaj pri sia restanta vireco, sia nemalkreskinta forto?

La demandoj ankoraŭ ne atakas lin serioze dum ankoraŭ deziro kaj kapablo egalas, sed subite la kapablo lin perfidas

malgraŭ ke la deziro restas, kaj tio lin konsternas kaj humiligas, fariĝas problemo kiu okupas lin.

Li iras de unu virinjurto al alia, kun la maltrankvilo de olda urso kiu ne povas trovi sian vintroneston, li sidas tie rigardante la diversajn virinojn, ofte foriras nenion dirinte, aŭ li tuŝas ilin, sentas iliajn korpojn kontraŭ la sia, ekkuŝas apud ilin aŭ sur ilin: la deziro hantas lin sed la kapablo plu mankas.

Li igas siajn virinojn malrapide sin desvesti antaŭ li kaj moviĝi dance aŭ sin klini en tentaj pozoj, sed ankaŭ tio ne efikas, nur intensigita deziro sen kapablo: severa humiligo por viro kiel li, la Ĥano kiu potencas decidi pri sennombraj homvivoj, kiu povas havigi sennombrajn virinojn el ĉiuj flankoj de la mondo, kaj li ne kapablas ilin uzi, ne perĝui ilin!

Li permesas al la virinoj provi ĉiujn siajn artojn kun li, li kiu ĉiam malestimis kaj kondamnis tiaĵojn, sed tio kondukas nur al duonfaritaj agoj kiuj ne satigas lian deziron kaj malbone kaŝas liajn defetojn, tiam li povas kaptiĝi de obstina antipatio kontraŭ iu virino kiu humiligis lin per tiuj ekscitoj kiujn li mem permesis, li brutale ŝin forpuŝas kaj eble ekzilas ŝin de Karakorum por ĉiam.

Eĉ okazas ke venas al li la penso ke li lasu mortigi ŝin aŭ mem mortigu ŝin, ĉar ŝi transpaŝis lian skribitan leĝon, sed ĝustatempe li sin retenas, tio estus lasi sin tiri tro disten kaj estus memkontraŭdira, li estas la Ĥano kaj ne decas al li perdi la sinregon.

Li tamen ne longe restas viktimo de tiu obsedo, li ne estas tia ke li lasas eĉ sian propran deziron regi lin, li rifuzas lasi sin peli al frenezaĵoj kaj ridindigi sin, li mobilizas sian tutan volforton kontraŭ tiu deziro sen kapablo, bridas kaj forpuŝas ĝin.

Kaj tiam, post kelka tempo, montriĝas ke lia febleco estis

maldaŭra, ke li venkis ĝin, la deziro kaj kapablo reunuiĝis, li povas denove trovi ĝuon ĉe siaj virinoj, sed li komprenis la averton, ĉiu fojo nun estas donaco anstataŭ memevidentaĵo, disponaĵo kiun li ne disipu.

Pri la rilato inter viroj kaj virinoj la Ĥano lasas skribi:

La plej elstara tasko de la viro laŭ la volo de la Ĉielo estas fari militon, tiu de la virino estas naski filojn kiuj fariĝu bataluloj kaj filinojn kiuj nasku novajn filojn.

Krome estas la tasko de la virino labori por la familio, prizorgi la jurtojn kaj la gregojn, prepari feltojn kaj ledojn kaj aliajn necesajojn, tiel ke ŝi ĉiel povu helpi kaj apogi la viron en lia militado.

Estas juste kaj ĝuste ke la viro prenas al si tiujn virinojn al kiuj li havas deziron kaj bezonas, tiel ke li povu ilin fekundigi kaj generi multajn filojn kaj estontajn batalulojn.

La virino ne posedas egalan rajton preni al si aliajn virojn se la viro kiun ŝi havas povas ŝin fekundigi, sed se li ne povas ŝi havu liberon serĉi aliajn virojn.

Estas nature ke filo havas deziron al la virinoj de la patro, sed nur se la patro mortas kaj postlasas siajn virinojn la filo estas libera por transpreni ilin, tamen esceptante tiun virinon kiu lin naskis kaj estas lia propra patrino.

Se troviĝas pluraj filoj la rajto transpreni la virinojn de la patro unuavice iras al la plej aĝa filo, sed tiu povas laŭ sia libera volo rezigni pri iu, iuj aŭ ĉiuj virinoj favore al la pli junaj fratoj.

Prave kaj rajte ekzistas tia ekvilibro inter viroj kaj virinoj ke tute junaj viroj vole inklinas al iom nejunaj kaj maturaj viri-

noj, dum malpli junaj kaj maturaj viroj ofte preferas tute junajn kaj nespertajn virinojn.

Kiam virino fariĝas tro maljuna por naski infanojn estas riĉoĉinde plu verŝi sian semon en ŝin, la samo validas por junulino tiel juna ke ŝi ankoraŭ ne estas fekundigebla.

Belaj virinoj, kiom ajn dezirindaj laŭ sia eksteraĵo, ofte estas pli fridaj ol malpli belaj, ne malofte donas malmultan ĝuon kaj rezultigas desreviĝon al kiu malfacile eblas sin adapti.

Tiu virino kiu donas la plej grandan ĝuon prefere estu elserĉata en la mallumo, ĉar ne unuavice la okuloj devas ŝin ĝui kaj la vido ofte konfuzas.

Unu virino aŭtem ne donas samspecan ĝuon al malsamaj viroj, male estas tiel saĝe aranĝite ke virino kiu ŝajnas al unu viro malmulte aŭ tute ne ĝuinda povas doni plej grandan plezuron al alia.

Kion la viro ĝuas laste kaj fine, ne tiom estas la virino, kiom sian propran imagon kaj sian propran forton, se lia imago estas sufiĉe viva kaj lia forto sufiĉe granda kiu ajn virino donas al li ĝuon.

Estas riĉoĉinde se viro uzas aliajn aperturojn de virino ol tiun tra kiu ŝi koncipas, tio signifas misverŝitan semon sen utilo kaj atestas pri laca deziro kiu bezonas ripozon.

Ne nur riĉoĉinde sed je puno de morto prohibite estas por viro uzi alian viron anstataŭ virino.

Bataluloj ne darfis adheri al siaj ĉevaloj kaj tentiĝi uzi ilin anstataŭ virinoj, tiam ili fordisipas sian forton senutile kaj perdas la ĝustan furiozon en la bataloj.

La milito rezultigas rajton perforti virinojn en lokoj konkeritaj, tio konsistigas valoran allogon kaj instigon en la milita-

do, sed tiaj perfortaĵoj ne estu praktikataj troe nek fariĝu konstanta kutimo, ĉar tiam ili subminas la forton kaj deziron de la batalulo.

La viro ĉiam prizorgu ke li konservu la ĝustan rilaton inter sia forto kaj sia deziro, ĉar tro multe da unu kaj tro malmulte da alia kondukas al malfeliĉo.

Malgranda kurultajo kunvenas aŭtune en Karakorum por fari la finan decidon pri la milito kontraŭ Hsia, Djutji kaj Tjagataj, la filoj de la Ĥano, plene okupiĝas en la okcidentaj landoj kaj ne bezonas sin prezenti, ankaŭ ne Boru, la filo de Mukali, kiu gvidas la militon kontraŭ la Kin-regno, partoprenas aŭtem Ogotaj kaj Tuli, la ĉefkomandanto de la armeo, kune kun nombro da ĥanoj kaj orkhonoj.

Informiĝantoj kaj senditoj diversspecaj jam aperis kaj raportas pri la situacio en Hsia, pri la daŭraj transpaŝoj kontraŭ la valida pacpakto, pri atakoj ĉe la limo kaj razioj kontraŭ karavanoj, pri jam longe mankantaj tributoj, pri perfidaj aliancoj kaj preparoj por milito sub la malnova malamiko Aŝamgambu, gigantkreska tibetano kiu estas ĉefkomandanto de la tangutoj.

Ĉion tion la Ĥano jam longe scias, sed nun solidiĝas la pruvoj kaj tiu kolero kiun la Ĥano longe retenis manifestiĝas, li ne plu hezitas konigi la decidon: la preparoj por la milito kontraŭ Hsia tuj komenciĝu kaj estu finitaj printempe, la Ĥano mem gvidos la entreprenon kaj ankoraŭfoje iros al milito fronte de siaj fidelaj mongolaj bataluloj, la venĝo plenumiĝu sen ajna cedo kaj granda predo estu hejimportata!

La decidaj vortoj estas diritaj, jubilo leviĝas ĉirkaŭ la Ĥano, komandantoj kaj ordinaraj bataluloj interpuŝiĝas en la regentojurto, vino estas enportata en pokaloj kaj ĉiuj trinkas pri la

decido de la kurultajo, por la venonta milito kaj la certa venko.

Nur la Ĥano mem ne liberiĝas de certa misagordo, li klopodas fajrigi sian koleron kaj kaptiĝi de ĝi, sed ĝi estas kolerokiu ne same fortas kiel antaŭe kaj ne komplete plenigas lin, li diras al si ke temas pri ĝusta venĝo kaj sekve sankta devo, sed tamen restas ioma hezito kaj disspliteco en li.

Li sentas la pezon de sia aĝo, eble ne rekonante tion al si mem, li retropaŝas antaŭ la penado de nova militkampanjo, eble ankaŭ havas antaŭsupozon ke li ne revenos de ĉi tiu milito, sed samtempe persvadas sin ke li preferas morti en la milito ol en sia jurto ĉi tie en Karakorum, la sola kio restas al li kiel olda mongola batalulo estas fali en batalo.

La Ĥano vokas al si Je-liu kaj konsiliĝas kun li pri siaj zorgoj.

Eble mi ne revenos de la milito kontraŭ Hsia, diras la Ĥano, kaj tial ĉio devas esti ordita por la futuro antaŭ ol mi ekmarŝos.

Miaj posteuloj estu severe admonataj ke ili tenu Jassan, mian leĝon kiu kunĉenas la pasintecon de la mongoloj kun ilia futuro, kiu malpermesas ĉiujn malĝustaĵojn kaj malhelpas ĉiam degeneron, tiel ke la karaktero de batalemo ne cedu al komforta vivado kaj febliĝo.

Jassa estu recitata antaŭ ĉiu konsiliĝo, ke neniu forgesu ĝiajn ordonojn kaj tentiĝu neglekti ilin, Jassa elstarigas ke plej grave el ĉio estas ke nenia malakordo leviĝu inter miaj posteuloj, ke la regno ne splitiĝu nek la konkordo endanĝeriĝu, ke ĉiuj en interkonsiliĝo elektu plej altan ĥanon inter si kaj senrezerve submetiĝu al lia volo.

Sed nun, saĝa Je-liu, temas pri tio kiun el miaj filoj mi destinu sukcedanto, plej alta ĥano post mi, kaj mi volas aŭdi vian opinion pri miaj kvar filoj rilate al tio.

Je-liu elskuas siajn longajn, magrajn manojn el la vastaj silkmanikoj, glatumas sian longan sed maldensan barbon dum tempeto da silento, dum la Ĥano atendas lian respondon.

Ho Ĥano, li diras, viaj filoj ĉiuj estas grandaj viroj, kuraĝaj bataluloj, kutimintaj gajni venkojn, kaj via regno sin trovas en kapablaj manoj sub ĉiu el ili.

Tial la problemo estas kiel ili plej bone povos kunlabori, kiuj povas submeti sin al unu el ili kaj kiu tiu estus en tia kazo, jen kion decidos iliaj malsamaj temperamentoj kaj karakteroj, ne nur leĝo kaj saĝo.

Djutji, via plej olda filo, ho Ĥano, havas sombran humoron, suspektemas kaj estas rankora, plej ene li malcertas pri si kaj devas konvinki sin pri sia valoro farante konstante aŭdacajn prodaĵojn, malgraŭ sia kuraĝo li ne estas ŝatata armeestro, li ne komprenas ĝuste, kiel favorigi al si siajn batalulojn, li facile ekflamas pro kolero kaj perdas la sinregon: Djutji tial ŝajnas al mi ne tre rekomendinda kiel plej alta ĥano kaj konservanto de la konkordo en la imperio.

La Ĥano kapklinas konsente kun preskaŭ fermitaj okuloj kaj Je-liu daŭrigas:

Tjagataj, via due plej olda filo, estas la plej dura kaj la malplej fleksebla, la fera volo kiu cedas pro nenio, la nesuperebla murbreĉilo kiu penetras la plej fortajn fortikaĵojn, konkerinto de multaj urboj, instrumento en ĉiu situacio fidinda, sed ĝuste lia neflekseblo ŝajnas al mi maltaŭgigi lin kiel plej

altan regenton, li ne povas cedi kiam tio estas necesa kaj pli facile splitas ol unuigas.

Ogotaj, via tria filo, havas la plej grandajn pezon kaj korpan forton, li estas joviala kaj ŝercema, kolero kaj impulsoj foras de li, li ne estas dura kaj necedema instrumento kiel liaj fratoj, sed laŭ sia naturo li estas peranto kaj repaciganto, tamen li havas feblecojn kiuj povos fariĝi fatalaj por plejalta Ĥano, li tiriĝas al malmodero en ebrio kaj volupto, li povas dependiĝi de siaj deziroj, tio pezas kontraŭ li, ho Ĥano!

Tuli, via plej juna filo, estas la plej brila komandanto, la pensanta kaj plananta militisto kiu neniam perdas sinregon aŭ superrigardon, li estas la memevidenta gvidanto de la plej grandaj kaj malfacilaj kampanjoj, sed li estas tre fiero kaj malfacile sin submetas al iu, li certe estus eminenta regento, sed la konkordon li povas maltrafi.

La Ĥano rompas la parolon de la kataĵo, ne sen certa indigno: Ĉu tio signifas ke vi neniun el miaj filoj trovas konvena por esti plejalta ĥano, ja ŝajnas ke vi per via prijuĝo elkludis ĉiujn?

Ne, ho Ĥano, respondas Je-liu, mia pritakso estas ĉirkaŭira kaj ĉirkaŭprena movo, kaj nun mi venas al la decida konkludo: malgraŭ certaj hezitoj la elekto laŭ mia opinio devas trafi Ogotaj, pro la kaŭzo ke li estas la sola kiun la aliaj tri fratoj povas akcepti obei kiel plejaltan ĥanon.

Ogotaj estas ŝatata de ili ĉiuj, li defias kaj ĉagrenas neniun, li estas la malplej batalema kaj ne konvenas por militaj taskoj samkiel la aliaj, tial li malplej multe mankus en la militado, kaj ankaŭ tielas ke inter li kaj la aliaj regas malplej da tensio, estas dube ĉu Djutji, Tjagataj aŭ Tuli submetus sin al iu

alia el ili ol Ogotaj kaj obeus ties volon, sed kun Ogotaj tio plene eblas, tio estas mia konkludo, ho Ĥano!

La Ĥano longe sidas meditante antaŭ ol li diras:

Mi dankas al vi, vi ĉiam same saĝa Je-liu, via prijuĝo venas tre proksime al la mia kaj fortigas en mi la decidon kiun mi devas fari: Ogotaj do fariĝos plejalta Ĥano, regante super la regno de tie ĉi en Karakorum, Djutji ricevos liberajn manojn finplenumi tiujn konkerojn al kiuj li jam direktas sin en la nordokcidento, Tjagataj estros en la jam konkeritaj sed malfacile regeblaj sudokcidentaj landoj, kaj Tuli penetros pluen en oriento por submeti al si la du Kataĵo-regnojn, Kin kaj Sung, sed ili ĉiuj estos nepre devigitaj ĉe alvoko reveni al Karakorum por kurultajo kaj la volo de Ogotaj estos la plej alta, la decida kaj la kuntena: tiel eblos regi la regnon kaj miaj filoj tenos pacon unu kun la aliaj!

Je-liu riverencas antaŭ la Ĥano, liaj manoj denove malaperis en la vastajn manikojn kaj li nenion aldonas.

Dum la preparoj por la nova milito kaj atende al la printempo la vintra periodo nun venas, kun violentaj neĝoŝtormoj super la altebeno kaj severa, ĉiopenetra malvarmego.

La ŝtormo fajfas kaj siblas tra Karakorum, traskuas jurtojn kaj domojn, ŝajnas eĉ la grundon mem tremigi, furiozas tagojn kaj noktojn, malheligas la taglumon per kirliĝanta neĝo kiun la rigardo ne povas penetri, enskurĝas neĝon en ĉiujn fendojn kaj kavaĵojn, amasigas haldojn altaj ankaŭ ene en la dense konstruita urbo.

Kiam la spaco puriĝas venas la fridokvietaj, serenaj tagoj kiam la jurtoj staras tie kvazaŭ gisitaj el fero, kiam la fumo

el la aperturoj scendas rekte supren simile altajn, sveltajn arbotrunkojn antaŭ ol ili larĝigas siajn kronojn el fumo kiuj koloriĝas kupproruĝaj de la oblikva sunbrilo, dum la lignodomoj staras blankbrile vilaj de frosto kaj fridofendoj elkreas kun akraj knaloj.

Inter jurtoj kaj domoj iras stretaj padoj en la neĝo, elfositaj simile al ravinoj kun vertikalaj flankoj, ne malofte havante plenan viralton, kaj ĉirkaŭ homoj kiuj moviĝas tie ŝvebas la spiro kiel palblua fumo kaj refraktas la sunradiojn tiel ke etaj pluvarkoj desegniĝas antaŭ ili.

Vespere difuziĝas rozea ruĝiĝo super la neĝo kaj transiĝas en la ombro en malhele violean koloron, la spaco fariĝas vitre verda kaj fragila kvazaŭ krio povus ĝin fendi, la mallumo igas la mondon moliĝi iom simile al felto, sed tuj ĝi traboriĝas de steloj akraj kiel lancoj.

Kiam la arkta lumo ekflamas la mongoloj horortremas kaj deturnas la vizaĝon por maldevi vidi ĝin kiam ili venas el la jurtoj por ĵeti sian akvon sur la neĝon aŭ alion elfari, ili pensas ke la Ĉielo koleras aŭ batalas kontraŭ danĝeraj potencoj, tiaj kiaj leviĝas el la arbaroj norde.

La arkta brilo similas al radioj el glacio kaj fajro, nenatura, timiga kunligiĝo de flamoj kaj frido, atestante pri malhoma mondo kie la sango estas gelinta kaj paliĝinta kiel neĝo, kie eĉ ne haron eblas fleksi sen ke ĝi rompiĝas kiel frostiĝinta tigo.

Kaj foje estas kvazaŭ la ĉielventro mem malfermiĝus, ĝiaj intestoj sinuas unuj ĉirkaŭ aliaj en terurplena ludo aŭ lukto, kaj la ŝamanoj elpaŝas por sekvi tiujn interŝirojn kaj luktojn en la spaco, esperante povi interpreti iliajn signifojn kaj ellegi venontajn eventojn el ili.

Simile al ŝamano la Ĥano havas kuraĝon eliri en la arktluman nokton kaj renkonti la vidon de la glaciigaj fajroflamoj kun suprenturnita vizaĝo; kion iu homo eltenas vidi tion ankaŭ li eltenas kaj li repuŝas la antikvan mongolan teruron, ĉar kion ajn tiuj bataloj de la lumflamoj en la Ĉielo povas signifi ili neniam laŭscie damaĝis ajnan homon, kaj malgraŭ sia minaceco ili neniam sin sinkigas ĝis sur la tero por ĝin konsumi en glacifrida fajro.

La Ĥano denove konsiliĝas kun Je-liu kaj diras: Vi sciuj, saĝa kataĵo, ke la milito kiu nun venas ne donas al mi saman ĝojon kiel ĝi pli frue farus, tamen ĝi estas justa kaj neevitebla, kaj ankaŭ ne troviĝas dubo pri la fino, la Ĉielo volas ĉi tiun militon kaj ĝin postulas, kio do estas tio, kio tamen al mi malplaĉas iamaniere?

Je-liu respondas: Mi ĝin komprenas tiel, ke tio dependas de maturiĝinta sperto, profundiĝinta scio, ho Ĥano!

La Ĥano: Vi ne diras "oldiĝo" kaj "fridiĝanta sango", vi interpretas mian strangan heziton kiel signon de saĝo kaj sin-rego, sed eble ĝi nur dependas de tio ke mi tenis min en kvieto tro longe, ekkutimis al la paco kaj komforto ĉi tie en Karakorum, tiaĵoj ne utilas al olda batalulo.

Aŭ ĉu vi volas diri ke mi jam komencis pridubi eĉ mian strebon mem, la militon kiel la naturan vivoformon de la mongoloj, la militon kiel rimedon konservi kaj vastigi la imperion, la eblecon penetri ankoraŭ pli foren kaj konkeri ankoraŭ pli de la mondo, ĉu tiel vi pensas?

Je-liu: Ĉar vi ĝin diras, ho Ĥano, mi konfesas ke ĝuste tion mi pensas, sed ĝi eble estas tio kion ankaŭ vi mem pensas,

kion vi komencas diveni kiel la veron malantaŭ ĉiuj brilaj venkoj, malantaŭ ĉia grandiozo kaj riĉeco kiujn la milito alportis, jes, kion vi plejinterne komencas demandi vin estas, ĉu ĉi tio povas kontinui, ĉu ĉiam al viaj filoj kaj nepoj troviĝos novaj landoj kiujn vandali kaj prirabi, ĉu ili ne fine devas prirezigni la militon kiel precipan rimedon kaj anstataŭe plivalorigi la pacan agadon, la kultivadon, la laboron, la komercedon!

La Ĥano: Vi estas aŭdaca dirante tion, kataĵo, kaj eble vi pravas ke tiu tempo alvenos, sed ĝi ankoraŭ ne venis, eble tio estas problemo kiun miaj nepoj aŭ iliaj filoj devos alfronti, sed mia mondo ne povas kaj ne devas ŝanĝiĝi, mi vivos kaj mortos kiel vera mongola batalisto!

Je-liu: Kaj tamen, ho Ĥano, la mondo kontinue ŝanĝiĝas kaj la ŝanĝiĝojn ne eblas haltigi, vi mem kontribuis al ili pli ol iu alia, estas kvazaŭ malfiksi ŝtonon supre sur monto, ĝi ruliĝas suben kaj tiras kun si aliajn ŝtonojn kreskante al lavango kiun nenio povas haltigi.

La Ĥano: Mi alstrebis unuigi ĉiujn mongolojn kaj enigi ilin en potencon regnon, mi poste vastigis mian strebon tiel ke ĝi koncernas ĉiujn parencajn gentojn, eĉ tiujn pli forajn popolojn kiuj volis submeti sin al la imperio kaj parti en ĝi, tiel mi kreis unuecon kaj konkordon en granda parto de la mondo, tio alportis potencon kaj forton, obeon sub justaj leĝoj, sub Jassa, kaj eblecon de florado kaj kresko.

Je-liu: Tio certe jes estas granda faro, ho Ĥano, sed pripensu ke ĝi ankaŭ postulis grandegan prezon, ĝi kostis al senombraj el viaj mongoloj kaj ceteraj soldatoj la vivon, viaj armeoj trasuferis nekredeblajn mizerojn kaj ŝtrapacojn, kaj tamen tio estas neniaĵo kompare al tio kion ĝi kostis al la ven-

kitaj popoloj, sennombrajn vivojn, neimageblajn suferojn, ruinigitajn urbojn, vandalitajn landojn!

La Ĥano: Vi scias sambone kiel mi ke tia estas la kuro de la mondo, se miaj soldatoj mortis aŭ penis ĝisekstreme, ili ankaŭ spertis la feliĉon batali kaj morti kiel veraj mongoloj, senti sin fieraj kaj nevenkeblaj, hejmortante venkojn kaj predojn sensimilajn.

Kaj la venkitoj, ili nur portis la konsekvencojn de sia malmikeco, ili submetiĝis al la dura leĝo de la milito, mi rompis ilian reziston, kaj tio ne eblus sen perdo de multaj vivoj, nihiligo de multaj urboj, dezertigo de vastaj landpartoj, sed ĉu io el tio okazus sen la apogo de la volo de la Ĉielo?

Je-liu: Ho Ĥano. Kiu fine povas distingi inter la volo de la Ĉielo kaj la sukceso de fortulo, kiom longe la fortulon akompanas fortuna tiom longe akompanas lin la volo de la Ĉielo, sed tuj kiam lin renkontas malprospero la Ĉielo sin turnas for de li, kiu do povas diri kie komenciĝas unu kaj finiĝas la alia?

La Ĥano: Vi aludas ke la volo de la Ĉielo envere ne estas alia ol mia propra, sed tio ja estas levi dubojn kontraŭ la Ĉielo kaj blasmomi kontraŭ ĝi!

Je-liu: Tute ne, ho Ĥano, ĉar via volo estas la volo de la Ĉielo tiel longe dum vi servas la Ĉielon kiel ĝia instrumento, kio ajn okazas ja estas la volo de la Ĉielo, sed se vi maladekvatas kiel ĝia instrumento kaj misagas, tiam tuj sin turnas la favoro de la Ĉielo for de vi.

La leĝo de la ŝanĝiĝoj mem estas la leĝo de la Ĉielo, neniu kaj nenio ĝin eskapas, el tio sekvas ke kiom ajn penopostulaj estas konkeroj de regnoj kaj submetoj de gentoj, la konservado de la novaj imperioj kaj la regado de iliaj gentoj estas eĉ pli postulaj, potenco kaj timo ne sufiĉas, morto kaj perforto

fiaskas, la sola kio en la daŭro de la tempo donas sukceson estas kontentigi la vivbezonojn de la gentoj, tiaj kiaj ili elkreskas sub la donitaj cirkonstancoj kaj per tio igi ilian internan volon strebi samdirekte kun via propra.

La Ĥano: Sed la potenco povas supervenki per nihiligo, la morto povas venki tutajn popolojn per ilia ekstermo!

Je-liu: Tio tamen neniam longe estas la volo de la Ĉielo, la pendolo baldaŭ retrosvingiĝas, la gentoj denove leviĝas kaj denove starigas reziston, kiun en la daŭro ne eblas supervenki, la milito ne povas daŭri nur por si, esti sia propra celo, tiam ĝi sin turnas kontraŭ siaj praktikantoj kaj konsumas sin mem, la vera tasko de la milito estas nur konservi kaj fortigi la pacon.

La Ĥano: Jen vi parolas kiel vera kataĵo, kvankam vi tiel longe vivis inter mongoloj!

Je-liu: Kataĵ ĉiam faris militojn, sed samtempe ĉiam havis pacon, unu ne elkludis la alian sed prekondiĉis ĝin, modera militado ĉe la limoj aŭ ankoraŭ pli prefere ekster la limoj, kaj paco kiu floris interne en la granda regno, tia estas la arto de la sukcesa ekvilibro kiu pli ol io alia servas la volon de la Ĉielo.

La Ĥano: Eble tio validas por kataĵoj, sed ĉu tio estas por mongoloj?

Je-liu: La mongoloj renversis tiun ekvilibron sed starigis novan, alio ne eblis, kaj tiam validas sama leĝo!

La Ĥano: Sed la mongoloj neniam povos fariĝi kiel la kataĵoj, ili estas rajdgento, nomadoj, bataluloj, ili ne povas vivi en urboj kaj kultivi teron kaj labori per diversaj metioj, tio estas kontraŭ ilia libera naturo, tio signifus ilin sklavigi kaj

disrompi, tiam ili prefere luktos ĝisfine kaj mortfalos kiel veraj bataluloj!

Je-liu: Ĉiuj gentoj ne bezonas vivi same, multaj ne povas vivi kiel mongoloj, ili ne estas nomadoj kaj ne batalpovaj sammaniere, ili volas vivi en urboj kaj vilaĝoj, malnomadaj sur la tero kiun ili kultivas kaj fidelaj al siaj taskoj kiel metistoj, laboristoj, oficistoj, erudiciuloj, komercistoj,

kaj la tasko de la mongoloj inter ili povus esti fari la neeviteblajn militojn por konservi la pacon, per justaj leĝoj kaj saĝa regado konservi la unuecon en la granda imperio, tiel ke agado kaj akceptebla bonstato troviĝus por ĉiuj, kune kun mezuro da saĝa kompreno kaj vivarto.

La Ĥano: Via saĝo kiel ĉiam estas laŭdinda, Je-liu, kaj mi volonte vidus ke miaj posteuloj povus atingi ion tian kian vi anticipas, mia tempo baldaŭ finiĝos kaj mi povas nur meti la fundamenton al la estonta regno, mi faris ĝin miamaniere kaj devas tiel daŭrigi.

Nun venas la milito kontraŭ Hsia, kaj neniam duboj aŭ hezitoj min detenos ĝin konduki ĝis ĝia fino, sed trans Hsia situas la grandaj katajaj regnoj, Kin daŭre ankoraŭ ne estas definitive venkita, kaj se Sung nun militas kontraŭ Kin same kiel niaj soldatoj sub Boru, tio tamen ne malhelpas ke ni post mallonge devas ataki Sung, por ĝin konkeri kaj apartenigi al nia imperio, laŭ nia penso ke nur unu volo povas regi sur la tero kiel en la Ĉielo, sed tio estos la afero de miaj posteuloj kaj tiun tagon mi ne vidos.

La Ĥano profundiĝas en pensojn, faras signon al Je-liu ke la interparolo finiĝis, ke li volas esti sola.

Por siaj posteuloj la Ĥano lasas skribi:

Jeno validas por miaj filoj, nepoj kaj ties posteuloj tiel longe kiel restos la mongola imperio:

Neniam forgesu ke vi estas de mia sango, estas via devo al mi fari por vi mem honoron.

Neniam verŝu reciproke vian sangon, lasu al nenia skismo kaj malkonkordo sin trudi inter vin.

La imperio devas resti unu kaj nedividita por ke batalo ne leviĝu inter ĝiaj malsamaj partoj kaj por ke ĝi ne pro tio fariĝu viktimo de siaj malamikoj.

Sole nur unu volo povas regi, sed ĝi povas esti realigata de pluraj kiuj en klara kompreno pri ĝia celo sin submetos al ĝi.

Milito estas kaj restos la precipa tasko, ke la imperio konserviĝu kontraŭ eksteraj kaj internaj malamikoj, vastiĝu kaj fortikiĝu.

La limoj neniam estas donitaj kaj finitaj tiel longe kiel troviĝos mondo ekster ili.

La tasko de la obeodevaj gentoj estas sekvi la volon de la regento kaj plenumi ĉiujn tiujn laborojn kaj praktiki tiujn lertojn kiuj estas utilaj por la imperio.

Sub tiu kondiĉo ili ĝuu plenan justecon kaj ĉiujn tiujn privilegiojn kiujn alportas la imperio.

Militado prizorgos ke neniu popolo kreskos tro forta kaj fariĝos danĝero por si mem kaj por aliaj.

Militado ankaŭ prizorgos ke la viroj restos viroj kaj la virinoj virinoj.

Senmodero en ĝuoj aŭ vivado punas sin mem kaj saĝulo ilin evitas.

Sekvu la allogojn kaj provu la ĝuojn ĝis certa limo, sed ne lasu ilin preni potencon super vi.

Ĝuoj strebas rabi al viro lian liberon, ne submetu vin al ilia sklaveco sed forŝiru vin en bona tempo.

Sed ankaŭ ne lasu la allogojn amasiĝi kaj fariĝi tro potencaj, neniu rivero povas esti digita tiel ke ĝi ne serĉos al si elfluon.

Ankaŭ la rezisto kontraŭ ĝuoj povas fariĝi sklaveco, la fortulo ne bezonas submetiĝi al tio.

Ekzistas ekvilibro inter maloj kiu ne povas multe ŝanceliĝi sen ke oni falas.

La kolero havas taskon ĉe viro, sed la bridado de la kolero havas same grandan taskon.

Se tempo sufiĉa restas, lasu al ĉiu decido maturiĝi kaj la volo sereniĝi, neniu forta ŝtormo estiĝas tuje.

Viro ne devas afliktiĝi pro tio kion li faris, tio lin malfortigas kaj servas al nenio, sed li povas turni sian malkontenton kiel purigan koleron kontraŭ sin mem ĉar li ne sufiĉe klare vidis.

Aŭtenta viro restas simpla kaj justa en sia interno, li rigardas sin mem kiel se li estus iu alia.

Regento devas esti malpenetrebla kiel roko kaj ĉirkaŭanta kiel akvo.

Printempe, unu jaron post la reveno al Karakorum la Ĥano denove fortiriĝas, al la milito kontraŭ Hsia, la khatunon Byrte li lasas rezidi en la regentojurto kun la filo Ogotaj apud si kaj ekrajdas fronte de siaj elektitaj gvardianoj, ĉiuj sur blankaj ĉevaloj, kun la standardo levita sur sia stango kaj kun multaj militsignoj kiuj flagras kaj klakas en la vento.

Eĉ ne unufoje la Ĥano rerigardas, neniu povas rimarki ĉu li forlasas Karakorum mankosente aŭ senpeziĝe, ĉu li intuas ke li neniam plu revenos tien aŭ ĉu male li atendas ke li tie pasigos sian maljunecon, sen dubo la venonta milito lin plene okupas, tiu fina konflikto kun malnova kaj perfida malamiko.

La Ĥano kaj lia gvardio rajdas orienten, direkte al la bordoj de Kerulen kie la armeo estas kuntirita sub la plejalta komando de Tuli, cent kvindek mil bataluloj kun duobla aŭ triobla nombro da ĉevaloj kaj trajno pli ol kutime ampleksa, portata de kameloj kaj tirata de poefagoj, kun abundaj provizoj kaj pezaj sieĝomaŝinoj.

Dum tiu marŝo la Ĥanon trafas akcidento, ĝuste dum li spronurĝe rajdas sur malebena tereno lia ĉevalo stumblas kaj falas, li mem trafas sub la ĉevalon kaj ricevas ĝian tutan pezon sur sin, li kunmordas la dentojn kontraŭ akra doloro kaj restas kuŝanta sur la grundo kiam la ĉevalo jam restarigis sin, konvulsie, ne povante apogi sin sur unu kruro.

La Ĥano ne permesas al la urĝe descendintaj viroj ĉirkaŭantaj lin, ke ili helpu al li stariĝi, lia vizaĝo malheliĝis pro doloro kaj pro kolerego kiu frapas internen, la viroj staras tie, lasinte fali la manojn, neniu kuraĝas proksimiĝi al la Ĥano kiu nun montras al la ĉevalo kaj faras geston.

Tiam ili rimarkas ke la ĉevalo rompis unu kruron kaj ili komprenas ke la Ĥano deziras ĝian mortigon, unu el ili elingas sian glavon kaj ĝin puŝas profunden en la bruston de la ĉevalo, poste li elŝiras la ankoraŭ vivantan, sangoŝprucantan koron kaj ĝin etendas al la Ĥano.

Tiu prenas la ĉevalkoron per unu mano kaj ĝin forte premas, li tion faras adiaŭe al sia ĉevalo kaj ankaŭ helpe kontraŭ siaj propraj doloroj, la sango fluas inter liaj fingroj kaj falas strie sur la grundon.

Post tio la Ĥano diras inter kunpremitaj dentoj: Helpu min sur alian ĉevalon kaj ni rajdos plu! kaj la viroj alkondukas ĉevalon, metas sur ĝin la selon de la Ĥano kaj lin levas sur ĝin, la ŝvito fluas sur lia vizaĝo, sed li nur premas la ĉapelon pli suben sur la frunto kaj komencas rajdi antaŭen, fronte de la gvardio kiel antaŭe.

Liaj doloroj estas tre duraj, sed li eltenas ilin, ĝis li subite ne povas teni sian urinon, ĝi komencas flui laŭ la internflankoj de la femuroj, sed li ne konsideras ĝin, nur firme decide plurajdas.

La kolero kiu frapis internen kaj sin turnis kontraŭ li mem lante cedas spacon al postaj konsideroj: Kial tio okazis al li kaj kial ĝuste nun, al li, kiu falis de ĉevaloj sennombrajn fojojn dum sia vivo kaj neniam leziĝis, ĉu tion kaŭzis la rigido kaj pezo de la oldeco aŭ ĉu estis pura hazardo?

Sed ĉu ekzistas hazardoj kiuj signifas nenion pli, nenion

kaŝas malantaŭ si: ĉu la akcidento estas antaŭsigno, mavaŭgura omeno antaŭ la venonta milito, aŭ ĉu ĝi havas sian fundon en iu restanta hezito en li mem, en kaŝita disspliteco de la volo, kaj tial fundamente estas proprakulpa akcidento?

Vespere oni devas levi la Ĥanon de la ĉevalo kaj lin porti en la tendoĉaron kiun oni ĝiskondukis, li havas fortan febron kaj la ŝvito fluas ĉiam plu, la vizaĝo flamas ruĝa kaj li forte soifas, dum la nokto li malbone dormas kaj sin turnadas ĝemante sur sia kuŝejo, matene li ordonas ekiron, tamen ne ascendas sian ĉevalon sed restas en la lante antaŭen ruliĝanta kibitko.

Sub la komando de Tuli la armeo ekmarŝas kaj sin tiras suden tra Gobio per rapidaj moviĝoj, la Ĥano kun parto de sia gvardio pli malrapide sekvas, li daŭre havas dolorojn kaj febron, kiuj indikas ke li ricevis internajn vundojn ĉe la falo de la ĉevalo, li estas devigita veturi kuŝe sternita sur sia kuŝejo en kibitko.

La ŝvito daŭre prifluas lin, li ne povas teni sian urinon, la muŝoj svarmas ĉirkaŭ li kaj ne eblas ilin forĉasi el la tendo, kiom ajn li trinkas soifo lin turmentas kaj liaj membroj komencas ŝveli, li iritiĝas kaj danĝeras kiel vundita rabobesto, kuŝas tie kun kunpremitaj dentoj kaj fermitaj okuloj, eĉ ne ĝemo eliĝas krom dum la intermita, maltrankvila dormo.

Khulan, la merkitino, ne akompanas lin ĉifoje kaj li rifuzas al si mem sendi por ŝi, li apenaŭ eltenas kelkajn junajn katajinojn kiuj konstante troviĝas ĉemane en la tendo, ili kapablas preskaŭ tute senrimarkigi sin mem dum ili samtempe singlar-

de flegas lin, forviŝas lian ŝviton kaj urinon, ŝanĝas liajn vestojn, donas al li trinki.

La Ĥano eĉ ne pensas pri reiro aŭ rezigni sian partoprenon, lia volo nur akriĝas de la misfortuno kaj malhelpo, nun pli ol iam la milito devas realiĝi je ĉia prezo, ĉu tio kostos al li la vivon aŭ ne, ĝisfine li mem partoprenos, tion postulas lia gloro kiel batalulo kaj mongolo kaj la plej altranga el ĉiuj ĥanoj.

Li luktas kontraŭ la doloroj, la senĉesa dolorego super la koksoj, kiu ĉe ĉiu skuiĝo de la kubitko sendas kvazaŭ blankajn fulmojn de doloro tra li, kaj ne malpli li batalas kontraŭ la febraj halucinoj, la konfuzaj vidoj kaj trudfantazioj kiuj plenigas lin, nebule nerealaj kaj tamen altrudaj, tiel lacigaj kaj malfacile forĉeseblaj.

Ĉiutage venas kurieroj, la plej rapidaj el la sagokurieroj, kiuj komunikas al la Ĥano la raportojn de Tuli pri la avancado de la armeo kaj la faroj de la malamiko: komenca interpuŝiĝo okazas ĉe la limo al Hsia, kie tanguta soldataro ĉefe konsista el tibetanoj kaj turkoj, estas venkita kaj grandparte mortigita.

La trupestro de la tangutoj, la ruza tibetano Aŝamgambu, post tio kuntiras sian defendon al la plej forte fortikigitaj urboj kaj kiom eble evitas renkonti la mongolarmeojn en aperta batalo, Tuli uzas la kutiman mongolan taktikon, rapide transbreĉas la fortikaĵojn per terura alsturmo aŭ kontentiĝas ĉirkaŭante izoli la urbojn kaj poste urĝe daŭrigi la marŝon.

La due plej granda urbo en la Hsia-regno falas post duraj bataloj en kiuj murrupiloj, katapultoj kaj fajrojetoj transbreĉas la fortikaĵojn, la ŝprucantaj naftoflamoj apertas breĉojn

tra kiuj la rajdantoj de Tuli penetras inter falintaj muroj, brulantaj traboj kaj haldoj da nigriĝantaj kadavroj.

Samtempe la farto de la Ĥano pliboniĝas tiom ke li povas lasi la kibitkon veturi tagojn kaj noktojn seninterrompe, kun ŝanĝoj al ĉiam novaj tirbovoj, dum la vojon antaŭ li ebenigas granda labortaĉmento kaj matoj estas sternataj sub la radoj ĉe la malfacilaj lokoj, la Ĥano nun ankaŭ povas lasi sin porti ĝis la platformo de la kibitko kaj de tie rigardi super la lando tra kiu li veturas.

Jam la Hsia-regno, la malaminda, estas konkerata, kaj la Ĥano povas ĝoji vidante prirabitajn kaj bruligitajn urbojn kaj vilaĝojn, substamfitajn agrojn, ruinigitajn digojn, transbordiĝintajn akvojn kun flosantaj korpoj de homoj kaj bestoj, li ĉiam preterveturas fulgitajn ŝtonamasojn, karbiĝintajn trabojn, hundojn kiuj hurlante fuĝas, porkogregojn satŝtopitajn de kadavroj kaj tiel pezmovajn ke ili lasas al la rajdantoj sin sobtreti provante mordi la kruojn de la ĉevaloj.

Poiome la Ĥano ĝisvenas al Tuli kaj la ĉefparto de la armeo, proksimiĝas la aŭtuno, la foliaj arboj jam komencas flaviĝi kaj la noktoj ekfridiĝas, la distaj monteĝoj lumas blankaj de novfalinta neĝo, la tangutkomandanto fine komprenas la neceson renkonti la mongolarmeon en aperta batalo antaŭ ol la vojo apertiĝos al Erikaja, la ĉefurbo, kaj ankaŭ ĝi enfermiĝos aŭ falos ĉe la alsturmado.

La interpuŝiĝo okazas sur ebenejo ĉe Huang-ho, kie la transbordiĝinta akvo ĵus glaciigis, kio igas la ĉevalojn gliti kaj faras la atakojn malfacile fareblaj, la mongoloj tiam volvas ŝtofon aŭ felojn ĉirkaŭ la ĉevalhufoj tiel ke ili pli bone kontraŭstaras la glitiĝon, ili povas ataki la tangutojn kun supera rapideco kaj forto, kiuj kaŭzas ke tiuj ĵetiĝas de la ĉevaloj en

sendefendan amasaĵon kaj estas buĉataj, la sango fluas vaporo-
rante sur la glacien kaj frostiĝas al malhelruĝa kovraĵo.

La restoj de la tangutarmeo kiu eskapas kun sia trupestro Aŝamgambu estas senĉese persekutata, forĉasiĝas ĝis inter la Alaŝan-montoj, tie ili estas atingitaj kaj mortigitaj aŭ dispeli-
ĝas en malgrandaj aroj kiuj malaperas laŭsupren sur la mont-
deklivoj, Aŝamgambu mem estas kaptita kaj kondukata al
antaŭ la Ĥano, estas devigita sterni sin antaŭ ties piedoj je sia
tuta longo, post tio li estas verdiktita al morto pro partopre-
no en la perfido de la Hsia-reĝo kaj ceremonie ekzekutita pro
konsidero al siaj batalistaj meritoj.

La Ĥano kaj lia armeo travintras en Hsia, Erikaja estas sieĝata sed rezistas la sturmprovojn, tiam la mongoloj kontentiĝas tenante la urbon enfermita kaj lasante al la mal-sato plenumi sian laboron kontraŭ la enloĝantaro interne.

La Ĥano ne saniĝas sed sentas sin pli bone en la vintra klimato, ankaŭ havas la avantaĝon de ripozo dum la sieĝado, li eĉ faras provojn eksidi sur ĉevalo kaj fari kurtajn rajdojn, sed tiam la doloroj revenas kaj la febroy fortiĝas, lia korpo estas ŝvelinta kaj peza, ĉiu peno fluigas de li ŝviton.

Li devas uzi sian tutan volforton por regi sian soifon kaj anstataŭe enbuŝigi manĝaĵon, kio naŭzas lin, virinoj ne plu logas lin, kontraŭe vekas en li abomenon, sed li eltenas ilian flegadon.

Multaj kuracpovaj viroj kolektiĝas ĉirkaŭ li kaj faras sian plejblon por kuraci lian lezon, sed ili ne akordas pri tio, en kio ĝi konsistas nek kiel ĝi estu traktata, ili provas diversspecajn dekoktaĵojn, apertas vejnojn, pikas per pingloj, preskribas banojn en tre varma aŭ tre malvarma akvo, la doloro tamen restas kaj ne lasas sin forpeli.

Saman malsukceson suferas tiuj ŝamanoj kaj miraklistoj kiuj ricevas permeson provi sian kapablon pri la Ĥano, por ekzorci tiun malican spiriton kiu kroĉiĝis al lia korpo, ili bruligas aferojn kun fortaodoro en la fajro antaŭ li, ili prezentas sorĉdancojn dum tamburado kaj sovaĝaj krioj, ili frotas lian

korpon per vivantaj bestoj kiuj poste estas mortigitaj, sed nenio helpas.

La Ĥano ankaŭ nenion atendas de ĉiuj tiuj penoj kaj klo-podoj, eĉ se li ne volas lasi ilin sen provo, li sentas ĉiam pli klare ke liaj tagoj iĝas limigitaj, ke tiu korpo kiu lin tiel bone servis kaj tiom eltenis nun jam perdis sian forton kaj trovas sin en malkomponiĝo, nur restas al li morti kiel vera mongolo, sen timo kaj lamentado.

Frue dum la vintro venas sagokuriero de okcidente kun la sciigo ke Djutji mortis pro malsano ie sur la sudrusa stepo, la Ĥano mute akceptas la mesaĝon kaj enfermas sin en sia jurto, dum tri tagoj sin montras al neniuj kaj sin donas plene al sia funebro: ĝi venas al li tro forte kaj li mem konceptas ĝin kiel signon de febleco, iome hontigan kaj humiligan.

Jes, Djutji mortis, lia unuenaskito, la malhela Gasto, kiun jam de komence ĉirkaŭis duboj kaj kiu mem perceptis ilin, absorbis ilin kiel specon de duboj pri si mem, viro kiu estis spita kaj kontraŭema, ĉiam provante ion pruvi al si mem aŭ al aliaj, ho, la mavhumora kaj malfeliĉa Djutji, la sola, la morne fermita, la sufere splitmensa, timata ankaŭ de siaj propraj bataluloj, sen kapablo veki sindonon!

Djutji, la plej aĝa el la filoj de la Ĥano, ankaŭ estas la unua el ili kiu mortis, kiu antaŭpaŝis la patron al alia mondo, sed ne kiel batalulo falinta en batalo, sed mortinta pro malsano, antaŭtempe, senbrile, same kiel la patro mem mortos kiam ajn, tamen oldiĝanta, se neantaŭvidita favoro ne gracos al li morton en batalo dum la militiro.

Djutji tamen ankaŭ ne fordistingis de la luktado, lia vivo longe estis kontinua militado, bataloj ondadis reen malreen, atakoj, persekutoj, ŝajnaj retretoj turnitaj en novajn atakojn, ĉiam

kreskantaj konkeroj: meze dum tiuj bataloj Djutji ekmorbis kaj mortis, en porokaze starigita bivako.

Ne, la Ĥano diras al si, nenio mankas en lia gloro kiel batalulo, neniam sciigo pri malvenko venis de li, tiuj multaj kiuj lin pridubis kiel li pridubis sin mem faris tion senkaŭze, ankaŭ la Ĥano ofte sentis sin malcerta antaŭ Djutji, kiu tro rimarkeble volis paŝi proprajn padojn kaj sekvi propran volon, sen ke li aperte aŭ rekte spitis la patron, sed tamen restigis senton de nefideleco.

La Ĥano memoras kiel necesis venigi Djutji al la granda kurultajo ĉe Syr-Darja, kiel li fine alvenis, pli bonvena ol ĉiu alia, kaj kondukis kun si sian senkomparan donacon, la cent mil ĉevalojn de Kiptjak: tiam proksimis la danĝero, en la kolerero de sia desreviĝo la Ĥano estis jam decidinta pagigi lin per la vivo pro lia senobeo, sed kiel pezigis tio lian koron!

Kaj mezfunebre pro la morto de Djutji la Ĥano samtempe spertas iaspecan faciligon: la danĝero pro tiu ĉagrena filo pasis, ne plu tiu povos sin turni kontraŭ la patro kaj lin vundi en liaj sentoj, perfidi lian patran amon, kaj lia ĉeesto ne plu minacas la konkordon inter la filoj kiuj sukcedos lin, estos nun pli simple kaj pli facile.

En la kvara tago la Ĥano reapertas sian jurton kaj elpaŝas kvazaŭ nenio okazus, li informas pri sia decido meti la filon Batu de Djutji en ties lokon, kun ĉiuj rajtoj kiel plej superan komandanton super la nordokcidentaj partoj de la imperio.

La Ĥano kuŝas en sia jurto kaj subite rimarkas ke ĝi travideblas, la lumo penetras kvazaŭ la dika feltajo estus nur diafana vualo, ĝi eĉ ne obstaklas al la birdoj kiuj nun rekte traflu-

gas ĝin, kaj la birdoj ridas preskaŭ home, provoke, moke, li vidas iliajn longajn langojn en la apertaj bekoj kiel ruĝajn flamojn,

la rido lin turmentas, tranĉas en lin tiel ke li turnas sin sur la kuŝejo, sed li ne kapablas ekstari, kuŝas tie kvazaŭ katenita, eĉ ne povante iun alvoki, la birdoj malĉese flugadas tra la tendo ridante ĉiam pli insolente, kaj post la birdoj kun flamlangaj bekoj venas noktobirdoj kaj rabobirdoj, nigraj kun taŭzita plumaro aŭ duonnuda korpo, kaj anstataŭ birdokapo ili havas malgrandajn ŝrumpintajn homkapojn, kurbajn nazojn, elstarajn okulojn, longajn buŝojn kiuj fendiĝas en trompa, raŭke klukanta rido,

ili venas lante flugantaj per kurbigitajflugiloj, flagre eksidas kvazaŭ en nevidebla arbo, ĉirkaŭkrifas nevideblajn branĉojn, sidadas tie kaj ridas, klinas sin antaŭen kaj ridas kvazaŭ ili vomus, multiĝas pli kaj pli, giganta arbobranĉaro plenfarĉita de birdoj, kaj ili suprenvenas rampante ĉirkaŭ li, birdoj kiuj grimpas simile al lacertoj, scendas kaj pendas oblikve aŭ kapmalsupren, ridante per siaj abomenaj vizaĝetoj, sulkozaj kiel fetoj, nefinitaj kvazaŭ elprenitaj el la utero pretempe, nude ruĝaj kvazaŭ senhaŭtigataj aŭ brogitaj,

sed kiam kulminas la neeltenivo la birdoj pro io timiĝas kaj komencas forfuĝi, flugilfrapas kaj forflugas ŝrik-ridante, oldulinaĉe, en naŭza fetoro de putra karno, kaj nun li aŭdas tamburadon kontraŭ la grundo, obtuza tamburado kiu rapide fortiĝas, duriĝas, kvazaŭ de sennombraj ĉevalhufoj kontraŭ sekiĝinta grundo, tamburado kiu pli kaj pli eksimilas ridon, antaŭen ruliĝantaj kaskadojn de ŝtonsimile bruanta rido,

kaj subite la ĉevalgregoj estas super li, uraganas super li kiel ŝtormo el korpoj kaj kruroj kaj hufoj, kun flirtantaj krinoj

kaj vostoĵoj kiuj sparkas kiel fajroj, jes, kiuj baldaŭ fajriĝas kaj diskrevas en longaj flamoj, la jurto lin protektas ne pli ol ŝirita araneaĵo, kaj nun li vidas la disfenditajn muzelojn de la ĉevaloj kiuj tiel alproksimas ke la salivŝaŭmo disĝutas super lia vizaĝo, kaj el la buŝegoj eltoentas la rido, henosimilaj ĉevalridoj kiuj intensiĝas al feroĉaj blekoj, samtempe koleraĵoj kaj mokantaĵoj,

kaj sammomente la ĉevalkapoj fariĝis virinkapoj kun grandaj, vastapertaĵoj buŝoj kiuj retondre ridas, kun akraj dentoj aŭ kun maldensaj dentostumpoj en ruĝaj palatoj, ridas tirate, kelkfoje preskaŭ vitrotinte, forrulo kvazaŭ amasoj da enormaj vitroperloj,

kaj nun estas kapoj kiuj ruliĝadas sur la grundo, forturbantaĵoj kiel velkaj folioj, sed kavece krakante pro siaj interpuŝiĝoj, ankaŭ ili ridantaĵoj kun sangaj dentoj kaj langoj, kun nigraj truoj por buŝoj, putrintaĵoj kaj konsumitaĵoj, sed ankoraŭ nehaltigeble ridantaĵoj, kapoj kiuj vivas postmorte kaj ridas je ĉio, je li, la Ĥano, je la potenco kaj regado, je la militoj kaj bataloj, je la hororoj kaj teruroj, je la vivo kaj morto, je ĉio, ĉio, ĉio, nenio alia ol rido ĉie, ridado kvazaŭ ŝtormo tra la mondo, dezertiga, forbalaa,

kaj la ridoj transiĝas en fajron kiu ridas, dancantaĵoj flamojn kiuj ridas, saltas pro ridado kaj faras longajn kapriolojn, antaŭenflugas super la mondo, venas ŝtorme super la ebenaĵoj, superpasas la montojn, eltrinkas lagojn kaj riverojn, konsumas kaj karbigas arbarojn en urĝo, postlasas brulantaĵojn urbojn ĉiudirekte, gregoj el ĉevaloj kaj brutoj kuregas antaŭen brulante, kunfalas kaj nigriĝas, ŝtonblokoj brulas ardante kaj fendiĝas, la jurtoj brulas kaj estingiĝas kiel kandeloj aŭ

sobvelkas nigriĝante kiel floroj, fajro kiu ridas la lastan ridon, flamoj en ridanta danco super la mondo -

En la printempo Erikaja daŭre estas enfermita kaj obstine rezistas, tamen la Ĥano ne ĝisatendas la malvenkon de la urbo sed komencas movi la ĉefparton de la armeo suden, ale al la rivervalo ĉirkaŭ supra Weiho.

Tio estas la limregiono kie Hsia- Kin- kaj Sung-regnoj renkontiĝas kaj de tie eblas al la armeoj de la Ĥano ŝoviĝi antaŭen diversdirekte, Hsia estas konsiderata jam venkita kaj nun necesas praktiki premon kontraŭ Sung por havigi al si senobstaklan tramarŝon kontraŭ Honan, la plej sudokcidentan provincon de Kin, kaj elmeti la Kin-regnon al vasta ĉirkaŭferma operaco.

Sed antaŭ ol tiu plano povas efektiviĝi venas mesaĝo de la reĝo de Hsia kun peto pri paco, la malsato kaj la fortiĝanta somervarmego fine rompis la kontraŭstaron en la sieĝata ĉefurbo, la Ĥano tuj faras pactraktaton kiu signifas ke Erikaja estu transdonata senkondiĉe kaj ke la reĝo mem post ne pli ol monato troviĝu ĉe la Ĥano por deklari sian submetiĝon.

Dume la malsano de la Ĥano pligraviĝas, la somervarmego kontribuas al kresko de la turmentoj kaj febro, li komprenas ke la fino nun proksimas kaj li kunvokas la plej altajn komandantojn kun Tuli ĉe la kapo, duonkuŝe kun la vizaĝo kiel trivita sed ankoraŭ netravedebla masko li akceptas ilin kaj sciigas per malmultaj vortoj sian findecidon: Ogotaj lin sukcedu kiel plej alta Ĥano de la mongolimperio, sed Byrte regardu ĝis kiam kurultajo povos kunveni kaj elekti lin laŭ la postuloj de la leĝo.

La Ĥano plue decidas ke la perfida reĝo de Hsia estu ekzekutita kiam li alvenos al la lagro, lia popolo estu sklavoj kaj la ĉefurbo Erikaja estu nivelita ĝis la grundo, la forpaso de la Ĥano estu sekreta ĝis kiam tio estos plenumita, por ke la kontraŭstaro de la malamiko ne ekflamu denove.

La milito kontraŭ la Kin-regno daŭru senrompe, ĝis la totala konkero kaj submeto de la lando, Tuli puŝu sin tra Honan kaj renkontu la armeojn de Boru venantajn de norde en frakasa ĉirkaŭpinĉa movo, post tio estos tempo decidi kiel agi kontraŭ la Sung-regno sude, plej grave estas ke la malamikoj de la Ĥano ne estu regalataj per spirpaŭzo pro lia forpaso.

Tuli genuas antaŭ la mortanta Ĥano, kiu etendas sian manon al li kaj konfirmas sian pli fruan decidon ke Tuli regu super ĉiuj landoj oriente, la jam konkeritajn kaj tiujn kiuj restas por konkero, dum Tjagataj responsu pri la regado de la okcidentaj landoj, sed ambaŭ devas obei al Ogataj estanta plej alta ĥano kaj submetiĝi al lia volo, en ĉio sekvi la ordonojn de Jassa kaj eviti internajn kverelojn, ĉiujn malakordojn kiuj povas konduki al dissplitiĝo de la regno.

La zorgo pri la konservo de la imperio malĉesas okupi la Ĥanon ĝislaste, sed la mortlukton li elbatalas sola inter kelkaj servistinoj, ene en la fermita jurto, kaj nenia eksteraĵo heroldas lian morton, neniaj vekrioj, neniaj ceremonioj, nenia mallevo de standardoj aŭ militsignoj.

Lia korpo estas metita en orumita ĉerko el fero kiu zorge hermetiĝas kaj pluroble da gardistoj postenas antaŭ la jurto tagojn kaj noktojn.

Estas aŭgusto en la jaro de la Porko, tiu bestosigno en kiu la Ĥano naskiĝis kvin dekdujarajn ciklojn pli frue, la kristanaro tiam skribas Anno Domini 1227.

La reĝo de Hsia ĉeestiĝas kun sia akompanantaro en la lagro de la mongoloj, la akcepto estas ceremonia sed la vizitantoj ne estas kondukataj al la blanka jurto de la Ĥano kun la levita standardo, sed al alia, ornamita por festeno.

La gastoj sidiĝas ĉe primetitaj tabloj, la solena etoso komencas leĝeriĝi kiam ili malplenigas la unuajn pokalojn atendente la Ĥanon, sed tiam la mongolaj komandantoj ĉiuj samtempe elingas siajn glavojn kaj morthakas la Hsia-reĝon kaj lian tutan akompanantaron, tiel kiel decidis la Ĥano antaŭmorte.

Poste la ekmarŝo plenumiĝas haste, la reiro al Karakorum, kun la mortinta regento en sia ĉerko ripozanta en la jurto kiu estas ŝarĝita sur kibitko, la gvardio de la Ĥano ĝin akompanas sub komando de Tuli, dum la cetero de la armeo estas lasita daŭrigi la batalojn sub vickomandanto.

La procesio moviĝas silente, kun mejlovasta fronto, kaj la bataluloj senindulge mortigas ĉion kio aperas sur ilia vojo, homojn kaj bestojn, krom tio ili nivelas ĉiujn konstruojn al la grundo, dezertigas kaj bruligas la kampojn: tio estas esprimo de funebro kaj donas korfaciliĝon al la bataluloj, samtempe tio gloras la Ĥanon, pro la kredo ke ĉiuj mortigitaj dum lia funebra procesio lin akompanos mortregnen por tie lin servi.

Nur kiam la procesio jam elpasis el la malamikaj landoj kaj

atingis la proprajn dezertregionojn la sagokurieroj dissendiĝas ĉiudirekte por anonci la morton de la Ĥano, la funebro-kantoj komenciĝas, la mortotamburoj ektondras, tiel la marŝo pluiĝas ale al Karakorum.

Funebrantaj homamasoj kolektiĝas laŭ la vojo kaj aliĝas al la procesio, rajdantaroj elvenas el Karakorum kaj descendas de la ĉevaloj por sin ĵeti algrunde kie la ĉaro de la mortinto pasas, urborande la ĉerko estas levita de la kibitko kaj portata surŝultre de la bataluloj, la veplendoj supervoĉas la batadon sur la tamburoj, ĉie homoj sin ĵetas al la polvo, vestoj kaj peltoj kaj matoj ĉiaspecaj estas sternataj surgrunde kie la procesio tiriĝas kun la ĉerko glimanta de oro en la suno.

Byrte kun Ogotaj ĉe sia flanko akceptas la mortinton sidante en la regentjurto, la ĉerko metiĝas antaŭ ili kaj ili ekĝenuas apud ĝi, poste apertiĝas la fermaĵo kaj vico da oldaj kunbatalantoj pasas por ĵeti sian lastan rigardon al la mortinta regento.

Ree la ĉerko portiĝas el Karakorum kaj estas ŝargita sur kibitko, la mortprocesio ekiras supren laŭ la rivervalo, kie la Ĥano estu entombigita en tiu bosko de larikoj, kiun li mem elektis por si.

Kaj ĉie, kie tiriĝas la procesio de morto, ekkantas la bar
doj sian adiaŭon al la Ĥano:

La jurto del Morto ruliĝas antaŭen, grincas la radoj, ĝemas
la bovoj, ĉar tie ene ripozas la Ĥano.

Ĥiĝas la vokoj super la dezertebenoj kaj la montoj ilin ĉi-
udirekte ripetas: La granda Ĥano mortis!

La greso en la valoj kaj kanaroj ĉirkaŭ la riveroj flustras kaj
susuras: La granda Ĥano mortis!

En la vokoj del anseroj, sur la flugiloj del akridoj, portiĝas
la sciigo tra la mondo: La granda Ĥano mortis!

La sagokurieroj antaŭenflugas sur ŝaŭmantaj ĉevaloj kaj
tingigas siajn sonorilojn: La granda Ĥano mortis.

Jes, la granda Ĥano mortis, la plej granda el ĉiuj mongoloj
forpasis, sed potenco lia daŭras.

La akvoj haltigas siajn kurojn, la altaj pinoj sin ĵetegas abis-
men kaj la tero tordiĝas pro doloro.

La bestoj kiujn li ĉasis, la ĉevaloj kiujn li rajdis, haltas in-
ter la ombroj por lin memori.

La fumo, kiuj leviĝas el la jurtoj, sin klinas, kaj la vento
venas kunodoro de rozoj freŝigitaj de pluvo.

La granda Ĥano mortis: lamentoj, lamentoj pro lia forpa-
so kaj jubilo, jubilo pro tio, ke li ekzistis!

Ŝargita li estis kiel fulmotondra nubo per la volo del Ĉielo
kaj blindumis tutmondon per siaj fulmoj.

Neniam antaŭe homo rajdis sian ĉevalon tiom foren en sunsubiron kaj sunleviĝon.

Kiel venkinto senpara kaj senkompara li staris antaŭ la maro senlima kaj la ĝisnubaj montoj.

La plej ekstremajn finojn del mondo li klinis unu al la alia kiel oni streĉas pafarkon ĝis romplimo.

La plej disigitan li unuigis simile ponton kiu pli grandegis ol iu pluvarko.

Li pereigis kaj starigis, prenis kaj donis same superabunde, neniu kaj nenio povis kontraŭstari, kaj lia justeco estis neŝancelebla kaj senindulga kiel tiu del Ĉielo mem.

Kiel neniu alia li estis venĝanto de ofendoj kaj premianto de fidelo, lumbrila suno del mongoloj.

Lia glavo estis kiel fulmo el serenblua ĉielo, lia militarto kiel kunpuŝiĝo de ardanta fero kaj pura glacio.

Li venis kun la ŝtormovento kaj ŝriadis kiel la sovaĝa stalono, sed li ankaŭ estis kiel serena vintrotago kun staraj fumoĵoj rekte enspacen.

Per sia saĝo li apertis korojn kaj penetris intestojn, li interpretis ĉiujn kaŝitajn signojn simile la plej grandan el ŝamanoj.

Li vastigis la mondon kaj preparis spacon por tio, kio devas veni, por tio, kio leviĝos.

Li kondukis sian popolon tra la pordego del Futuro, de kie returno ne eblas.

Grandaj tempoj, gigantaj bataloj! klangoj de arkotendenoj, fajfoj de sagoj en la acidetaodoro de verŝita sango!

Por siaj popolanoj li estis la ŝildo, kiu ilin levis, la lanco kiu ilin ĵetegis antaŭen.

Por siaj malamikoj li estis la granda tremo, kiu penetris ĝis en la dormo kaj vizioj.

Jes, la granda tremego por landoj, kiuj ŝvelis en sia sterko kaj grasiĝis en la fumo, por la pigraj popoloj en iliaj urboj el ŝtono.

La mondarbo mem tremis pro la paŝoj de la granda Ĥano, tremis kiel kverko el fero kun folioj el kupro.

En ĉiuj direktoj: submetiĝo aŭ perejo, postulo de senperfido kiel ostaĝo por la vivo.

Kaj ĉiu ribelo nuligita en pli granda ribelo simile al flamo en furiozanta fajro.

Lia gloro hejmas en senlimo kaj nekredblo, lia jurto estas kiel la volbo del Ĉielo mem.

Eĉ ne makuleto de forgeso obskurigos lian memoron, tiu aglo kiu balais super la tero.

La granda Ĥano estas for, sed liaj heredintoj restas, la filoj del aglo, kiuj sin ĵetegas del altoj.

Ankaŭ en la mortoregno li estos regento, la hundoj del abismego nenion kapablos kontraŭ li.

Dum sia dormo li ampleksos sian imperion, ĉion posedos kaj ĉion fordonos, plej potenca el ĉiuj sed kun manoj vakaj.

La pura nomado, simpla kaj serena kiel la greso en la vento, frata, malavara, senperfida!

Kaj samtempe la plej timiga mongolo, kiu longe tremigos la mondarbon kiel kverkon el fero kun folioj el kupro!

La granda Ĥano mortis, la granda Ĥano neniam mortos!

Tiel kantas la mongolaj bardoj, tiel ili daŭros, kantante, multgeneracie.

”... la nombro de l’ vortoj en lingvo de l’ homoj estas senfina
...”

L. L. Zamenhof, 1888

”Postuli (kiel kelkfoje okazas) simpligon kaj normigon de la lingvo al — se eble — unu sola nivelo estas miskompreni la aferon. Tio kondukus al ruiniga nivelado anstataŭ al strebinda evoluo. Ĝi signifus katastrofan elpovrigon por ĉiuj, ĉar tio rabus al la lingvo (kaj per tio al la homo) ĝian funkcion de multflanke efika instrumento kaj specialigita, nuancita, rafinita rimedo de serĉado kaj komunikado.”

Artur Lundkvist

GLOSARO

Mallongigoj:

EB —	Esperanta Bildvortaro 1989.
(f) —	figursence.
LT —	La Litomiŝla Tombejo, 1981.
NG —	Neologisma Glosaro, 1983.
PIV —	Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, 1977.
PV —	Plena Vortaro de Esperanto, 1930
(pp) —	parolante pri
ab	LT: "prepozicio: for de, de ĉe, malal."
ak ... ak	LT: "kaj — kaj, kiel — tiel, kiel — tiel ankaŭ, ne nur — sed ankaŭ, eĉ — eĉ. Ak: plifortigita kaj: eĉ, kaj eĉ, ja, kaj kune eĉ, samtempe eĉ, ne nur sed eĉ."
akvdukto	ĉiaspeca konstruita akvokondukilo.
Anno Domini	Latina esprimo signifanta "en la jaro de la Sinjoro (Jesuo)".
aperti	malfermi. Kp aperta en PIV.
asalti	NG: "kurataki".
atingi + inf.	atingi fari ion = sukcesi fari ion ĉar sufiĉas la tempo.
-atra	LT: "sufikso kiu signifas: havanta nuancon, similecon, kvazaŭ -a".
aŭtem	LT: "aŭtem staras sence ie inter sed, tamen kaj ja. Sed dum la unua povas troviĝi nur komence de frazparto, aŭtem kutime staras interne de ĝi. Stilistike aŭtem estas same elasta kiel tamen. La senco de aŭtem estas aŭtem iom pli milda ol tiu de sed. Ĉar dum sed disigas du pensopartojn, aŭtem efikas pli kunige."
Bizancio	la Bizanca Imperio.
Buddho	etimologie pli ĝusta formo ol la PIV-variantoj Budao, Buddo kaj Budho.
ĉaspartio	kunveno dum kiu la partoprenantoj kunlabore kaj organizite ĉasas.
ĉendi	NG: "ekbruligi".

cirkum-	prefikso signifanta "disen kaj ĉirkaŭen, zigzage, disdirekte, tien maltien". Cirkum- kovras unu el la sencoĵ kiujn Karolo Piĉ atribuas al ob-. Kp LT pĝ 237.
darfi	LT: "esti libera fari ion, povi fari ion".
defeto	malvenko. Kp defetismo en PIV.
del	de la.
des-	LT: "prefikso signifanta senigadon: desvesti — senvestigi," Kp PIV pĝ 179.
dezertroĵoj	gipso kiu dum kristaliĝo alprenis formon de platoj similaj al petaloj de rozoj.
dis	dis de.
-ea	LT: "sufikso signifanta -kolora; rozea — rozkolora".
emergî	NG: "maldroni, eliĝi".
fertila	NG: "fruktodona".
flimri	doni treman, malfirman vidimpreson kiel lumo kiu pasas tra turbulantaj aertavoloj.
geli	LT: "glaciiĝi", vd ankaŭ PIV
glitri	doni oftajn kaj ŝanĝiĝantajn lumreflektojn kiel ondanta akvosurfaco reflektas sunradiojn. (f) ŝi havis humoron glitre gajan.
graŭli	Suplemento de PIV: "kolermurmuri (pp hundo), grumbli, murmuregi".
haldo	LT: "amasego, ordinare montetforma, da karbo, sablo aŭ alia materialo".
hilo	LT: "altaĵo, eta monteto".
klangi	sonimita vorto. Kp NG pĝ 25, LT pĝ 264.
klingi	sonimita vorto. Kp NG pĝ 25, LT pĝ 264.
kludi	LT: "fermi".
kolino	LT: "pseŭdomonteto, eta monteto, hilo".
kontinui + inf.	uzo de kontinui kun infinitivo ne estas registrita en PIV.
kumulo	LT: "monteto, haldoforma, stakoforma hilo, kolino; kumuli — (montete) amasigi".
lagro	LT: "1) kuŝujo, aksingo; 2) kuŝejo, koncentrejo, barakaro, amasloĝa (amaskuŝa) arealo; 3) bivako, tendaro; lagri — bivaki — kampadi".
lorli	soni en pli obtuza maniero ol lirli.
ma	LT: "sed, tamen, aŭtem".
magii ion aŭ iun	reciti magiajn vortojn aŭ plenumi magiajn agojn por gajni potencon super io/iu.
mergi	enmeti en ion. Uzata en pli larĝa senco ol en PIV.
merĝi	1. mergiĝi; eniĝi en likvaĵon.

	2. eniĝi similmaniere en alian materion. Kp LT.
metio	ankaŭ: lerteco kaj kapablo en manlabora profesio.
monokordo	unukorda muzikinstrumento.
mortalo	Suplemento de PIV: "mortideva homo".
navedo	PV. En PIV ŝanĝita al naveto.
nihilo	nenio; kp nihilismo — neniismo, nihilisto — kiu kredas je nenio aŭ je neniigo.
olda	maljuna; malnova. Kp PIV.
ostenta	LT: "malkaŝa, malkaŝe provoka".
-oza	LT: "sufikso uzata 4) en beletro por formi vortojn kun la signifo: provizita de, plena de, riĉa je (difino citita laŭ ĉiuj lastaj eldonoj de Plena Vortaro)."
perpleksi	fari perpleksa. En PIV "perpleksigi".
rapti	rapide, forte, krude aŭ violente ekpreni. Kp NG kaj LT.
rasli	soni kiel moviĝantaj ĉenoj aŭ ŝtonetoj. Kp PIV kaj NG.
reputata	havanta (bonan) reput(aci)on.
retren	dorsdirekten. Kp retra en LT kaj NG. Retro estas neŝanĝebla partikulo kaj prefikso, retra estas adjektivo.
scendi	LT: "iri, paŝi, supreniri".
solti	LT: "esti -onta, ĉu oni -u?, ĉu estus bone, ke oni -u?".
spit	spite.
stif-	NG: "prefikso, duon-: stifpatrino."
stratego	persono havanta lertecon pri strategio, strategiisto. Aldono al la difino en PIV.
sukcedi	NG: "veni post iu, surprenante ties oficon, rangon, regadon".
ŝimri	mole kaj malakre lumi aŭ relumi per trema, milda kaj febla lumo iriza aŭ neiriza. Ekz. la vostaj plumoj de la pavoj ŝimras en multaj koloroj. (f) lia vizaĝo ŝimris kaj tiel rivelis lian profundan feliĉon.
ŝrii	tre despere kaj/aŭ tranĉe kaj/aŭ akute ŝriki.
ŝtono	ankaŭ: kerno en drupo.
ŝtrapaco	LT: "penego, ĉia longa, laciga agado, laboro, marŝo, ktp."
tiaĵo	PIV pĝ 1107: "io tia".
tigrolilio	Latine: Liliun tigrinum.
tresto	EB. Kunmetaĵo el fostoj kaj latoj uzata interalie por sekigado de fiŝoj, vestoj aŭ fojno.
turbuli	NG: "malpace skuiĝadi".

-umi	LT: "... 6) kovri -e: kreskumi (dense kreskumitaj deklivoj), blovumi (blovumitaj vojoj — blovumitaj neĝe, sable ks.), verdumi (printempe la tombo hele verdumiĝis), amumi (uzi ŝin ame), lumumi (ilumini)."
vandali	violente kaj sencele detruu kiel laŭdire faris la vandaloj.
vanui	LT: "disiĝi, foriĝi, esti malaperanta."
vimplo	longa, mallarĝa triangula flago kies unu angulo estas tre akuta.
zumri	sonimita vorto.

Geografiaj nomoj:

Afganistano	Kaspia Maro
Altaj-montaro	Kataj(o)-regno
Alaŝan-montaro	Kerulen-rivero
Amu-Darĵa-rivero	Kharasm(o)-regno
Aral-lago	Khingano-monto
Bagdado	Kin-regno
Balasaghun-urbo	Kiptĵak-regiono
Balĵuna-lago	Korasan-lando
Balkh-urbo	Koreio
Balkhaŝ-lago	Krim-duoninsulo
Bamijan-urbo	Liao-regno
Bukhara-urbo	Merv-urbo
Burkhan Khaldun-monto	Nigra Maro
Chung-tu-urbo	Nishapur-urbo
Chungŝing-urbo	Ongüt-regiono
Erikaja-urbo	Onon-rivero
Gobio-dezerto	Ordos-dezerto
Gupto-regno	Orkhon-rivero
Gurganj-urbo	Otrar-urbo
Herat-urbo	Pamir-montaro
Hindujo	Panĝabo
Honan-provinco	Peŝavar-urbo
Hsia-regno	Romo
Huang-ho-rivero	Ruslando
Irtysj-rivero	Samarkand-urbo
Jand-urbo	Selenga-rivero
Jerusalemo	Sung-regno
Kalifejo	Syr-Darĵa-rivero
Karakataj-regno	Ta-liang-urbo
Karakorum-urbo	Tibeto

Transoksianio
 Ukrainio
 Urgenĉ-urbo
 Weiho-rivero
 Volgo

Popoloj, gentoj, triboj

kaj klanoj:

araboj
 burĉikunoj
 katajoj
 karajtoj
 kharasmoj
 khungiroj
 kiutoj
 merkitoj
 mongoloj
 najmanoj
 persoj
 sulduoj
 tajĝigutoj
 tangutoj
 tataroj
 tibetanoj
 turkoj
 uiguroj

Personaj nomoj:

Alla-eddin Muhammed
 Almalik
 Aŝamgambu
 Aŭdan
 Bataĉi
 Batu
 Bektar
 Belgutej
 Biŝbalik
 Boru
 Burĝidigat-Merken
 Byrte

Chichung
 Daj-Seĉen
 Djamuga
 Djebe
 Djelal-ed-Din
 Djuma
 Djutji
 Huan-tsung
 Hulagu
 Jeke-Nidun
 Je-liu
 Jesugaj-Bagatur
 Kabul
 Kassar
 Katĉiun
 Khulan
 Kokekŭ
 Koritĉar-Margan
 Kubilaj
 Mongolajna
 Mukali
 Munlik
 Ogotaj
 Ossgin
 Sali
 Sorku-Ĉira
 Subutaj
 Ŝigi-Kutuku
 Targutaj
 Tatatunga
 Tebtengi
 Temugu
 Temulun
 Togril
 Torkoldaj
 Timuĝin
 Tjagataj
 Tuli
 Ulun
 Wai Wang
 Wang-Ĥano

Mongoldevenaj vortoj kompreneblaj el la kunteksto:

arbano

baktago

Bilik

Bogdo

Ebliss

gurtajo

ĝeguno

Jassa

kango

khatuno

kibitko

kurultajo

mingano

Möngke Kökö Tengri

nojono

ongoto

orduo

orkhono

orluk-agloj

timeno

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-057-0